

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : Frederich Pujulà
Sek. de Red. : Joseph Grau

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Novjara Saluto. — *Pri...*, Fred. Pujulà. — *IV^a Kongreso de la K. E. F.*, Jozefo Grau. — *Suscripció per a la senyera de K. E. F.* — *Enlanda Movado*, J. G. — *Bibliografio*, Tamen. — *III^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio*, Jozefo Grau. — *Oficiala parto*, K. E. F. — *Avizo.* — *Korespondado.*



JARO IV^a

JANUARO 1913^a

N^{ro} 1 (34)

Llista de delegats autoritzats per la administració de K. E. F. per a rebre les quotes

Arbós del Penadès	A. Romagosa	Major, 11.
Badalona	«Badalona Stelo».	Sant Pere, 86.
Balaguer	M. Espar Boquer.	Miracle, 7.
Banyoles	J. Aulina	Turers, 49.
Barbarà del Vallès	S. Arnella	Sant Pere, 21.
Barcelona	D. Dalmau.	Angels, 1, entl.
Begas	J. Esteve	Raval Sant Martí, 19.
Berga	J. Cardona.	Apotecari.
Blanes	S. Robert	Llarg, 42.
Borjes Blanques	F. Rubinat.	Pou, 2.
Calafell	J. Jané	
Cambriils	Josefina Maseguer	Ostal Nou.
Cassà de la Selva.	N. Puig	Bisbal, 1.
Castellar del Vallès	F. Blanquer	Fonts Calents.
Centelles	J. Raurell	
Flix	«Verda Stelo».	
Girona	F. Anguet	Progrés, 20.
Granollers	F. N. Pujadas.	Fonda d'Europa.
Igualada	A. Mosella.	P. Constitució, 11
La Escala	J. Ximinis	Fàbrica géneros de punt.
Lleida	Ll. Abadal.	Major, 12 i 14
Manlleu.	«Esperantista Amikeco»	Pont, 38, 2. ^{on} -1. ^a
Mataró	J. Solà	Sant Josep, 46.
Mieras	R. Riera	Comerciant.
Mollet	«Antaŭen».	
Moncada	Joan Buxó.	Metge.
Olot	I. Juanola	Superior, 25, 2. ^{on}
Palafrugell.	J. Marquès.	Pals, 1.
Pobla de Lillet	J. Llumà	Porxos, 19.
Prades	T. Alsina, Pvre.	
Premià de Mar	P. Alsina	Camí Reial, 81-79.
Reus.	E. Agudé.	Presó, 15.
Ripollet.	«Esperanta Akvofalo»	Nou, 20.
Rubi.	J. Ratés	Sant Magí, 1 i 3.
Sabadell.	Lloc Social.	Gràcia, 12.
Salàs.	P. Vivet.	Metge.
Sant Feliu de Guixols	J. Blanch	Caimó, 32.
Sant Llorenç Savall.	J. Roma.	
Sant Quirse de Besora	J. Fossas	Metge.
Santa Coloma de Farnés.	J. Gener.	Verge Maria, 1, 2. ^{on}
St. ^a Perpetua de la Moguda.	«Kamparo»	
Selva del Camp	J. Girona	
Tarragona	D. Obiol	Unió, 9, 3. ^r
Terrassa.	A. Oliart	Clarís, 24.
Tivissa	F. M. Brú	Avall, 16.
Torelló	C. Viñolas.	Sant Josep, 14.
Vendrell	S. Esvertit.	Cristina Baixa, 50.
Vic	J. Comella	Plaça Major, 18.
Vilafranca del Penadès.	A. Robleño	Puigmoltó, 14.
Vilanova i Geltrú	F. Mestres.	Sant Antoni, 1 i 3.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : FREDERICH PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEPH GRAU

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : *Novjara Saluto*. — *Pri...*, Fred. Pujulà. — *IV^a Kongreso de la K. E. F.*, Jozefo Grau. — *Suscripció per a la senyera de K. E. F.* — *Enlanda Movaĉo*, J. G. — *Bibliografio*, Tamen. — *III^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio*, Jozefo Grau. — *Oficiala parto*. — K. E. F. — *Avizo*. — *Korespondado*.

NOVJARA SALUTO

Al la prosperado de Esperanto, al ĝia glora
Elpensinto kaj al ĝiaj veraj amikoj la
KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
deziras plej feliĉan novan jaron

LA KOMITATO

DOKTORO ALFREDO STROMBOLI

Mi ricevis la cirkuleron per kiu mia eminenta amiko Doktoro Stromboli eksigas el la Prezidanteco de la Genova Esperanto-Unuiĝo, de la Itala Esperanto-Asocio, kaj de l'organiza Komitato de la Naŭa Universala Kongreso. Ĉu mi devas diri kun kiom da ĉagreno mi tralegis ĝin? Kio! Dro. Stromboli, la agema, entuziasmoplena, fervora samideano, ĉu li, li mem, propravole forlasas nin? Ĉu ĝi estas tiu sama Dro. Stromboli, kiu jam antaŭ du jaroj anoncis al mi ekskurson de italaj esperantistoj en Barcelonon por altiri nin grandamase al la Itala Kongreso? Jes; li mem. Mi estas devigata miri! Kio! Ĉu sufiĉas ke kelkaj lianaciaj Esperantistoj kontraŭbatalis liajn personajn sentojn kaj disvastigis la famon, ke oni intencas fari la Naŭan Kongreson liberpensula kongreso? Ni memoru la respondon de la kamparano, kiun oni kulpigis per la atesto de tri personoj, kiuj vidis lian agon: «Ĉu pro tio nur oni kondamnas min? Nu! Mi prezentos al vi centojn da personoj, kiuj ĝin ne vidis!»

Kial mia distinginda amiko ne ekpensis pri la miloj da esperantistoj, kiuj konfidis al li kaj al lia honesteco?

Mi ne scias, kion decidis la Konstanta Komitato de la Kongresoj. Komprenoble ĝi respektos la rajton libere agi. Sed se mi, kiu nun jam ne apartenas al la K. K. de la K., estus devigata doni mian opinion, mi ne akceptus la eksigon kaj mi dirus al Dro. Stromboli: Plej kara kaj distinginda amiko, se vi supozis eĉ unu solan momenton, ke la ofico de Prezidanto de Organiza Komitato kaj de Kongreso estas honora ofico, vi tute eraris; ĝi estas loko de batalo, de laboro, de sufero kaj ofero, kiu eĉ povas konduki al la morto. Mi, kiu kore vin amas, ne povas permesi ke vi agu tiel malkuraĝe.

VERKETO TRE ZORGE REVIDITA KAJ KOMPOSTITA

«Al la gloro de Doktoro Zamenhof la genia aŭtoro de l' Fundamento de Esperanto estas humile dediĉita tiu ĉi verketo tre zorge revidita kaj kompostita. La verkintoj kaj la presisto.»

Tiel diras la dediĉo presita sur la kvara paĝo de libreto, kiun sub la titolo «Esperanto-Klasika libro», ĵus eldonis la Presa Esperantista Societo. Tiu libreto entenas krom du tripaĝaj tekstoj kaj la radikoj de la «Aldono» eltiritaj el la «Oficiala Dokumentaro» eldonita de la Centra Oficejo, la «Plenan Gramatikon de Esperanto», el la paĝo

254^a de la Krestomatio, kaj la «Universalan Vortaron» eldonitan de la firmo «Hachette et C^{ie}». Ne kredu, vi kiuj tion ĉi legas kun miro en la okuloj, ke Dro. Zamenhof aŭtoro de tiuj tekstoj fariĝis tiel malmoda, ke li dediĉas al si mem siajn verkojn. Ne. La dediĉintoj estas sinjoroj Cart (akademiano) kaj Robert kiel verkintoj, kaj Sro. Polgar (lingvokomitato) kiel presisto helpita de Sro. Lengyel (akademiano) kaj aliaj. Miru nur, ĉar tiom da membroj de niaj lingvaj institucioj kuniĝis por kredi al ni, ke ili ne scias Esperanton — ĉar ni preferas ne kredi alian aferon! Ili enuige konfuzas la vortojn *verko* kaj *libro*, kaj kie ili diras : *verkistoj*, ili volas diri nur *librofaristoj*, kaj kie ili diras *verketo*, ili tute ne intencas «etigi» la grandan verkon de nia majstro, sed tute simple la de ili eldonitan «Klasikan Libron» kiu efektive estas el plej malgrandaj dimensioj. Kion ili intencis per tiu reldono? Kiu povas scii! Eble, ili intencis plialte starigi la flagon de la Fundamento, plilaŭte konstati sian amon al ĝi, per la eldono en novan libron de la verko de la Majstro? Sed, ĉu ni rajtas kredi, ke tiuj sinjoroj, kiuj almenaŭ devus parkere koni la fundamentajn tekstojn de Zamenhof, tiel ilin forgesis? Ni relegu la Majstron,

1.^e «...la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto : 1) La 16-regula gramatiko; 2) la «Universala Vortaro»; 3) la «Ekzercaro».

Nur la supre nomitaj tri verkoj PUBLIKIGITAJ EN LA LIBRO «FUNDAMENTO DE ESPERANTO», devas esti rigardataj kiel oficialaj;...»¹

Kiel do ni povos pensi, ke sinjoroj Cart (el la Akademio) kaj ceteraj pretendas, ke la Esperantistaro rigardu kiel klasika kaj fundamenta, la «Plenan Gramatikon de Esperanto» kiu ne troviĝas en tiu libro nomata «Fundamento de Esperanto» sed en la Krestomatio, kaj kiun «la esperantistoj povas rigardadi kiel *modela* sed ne kiel *deviga*»?²

2.^e «... estas necese, ke ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝdonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko.³ Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, kaj li petas, ke la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro.»⁴

1. *Fundamento de Esperanto*. Antaŭparolo. L. L. Zamenhof.

2. Kursive en la originalo.

Ĉu povas esti pli klare montrata la diferenco inter *verko* kaj *libro*? Ĉu eĉ hazarde ni povas suspekti, ke tiuj *verkintoj* (akademianoj kaj lingvakomitatoj) de la Presa Esperantista Societo ne sciis vidi ke ne al ilia «klasika libro» ni devos turni nian rigardon sed al *tiu ĉi libro* pri kiu parolas Zamenhof, al *tiuj folioj el papero kunigitaj en unu tuto*, kiuj entenas la *verkon* fundamentan, *eldonitan en formo de unu libro de la aŭtoro de Esperanto*?

3.^e «La *erareco* en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto.»¹

Kiel do la *verkintoj* de la P. E. S. pretendus, ke ni rigardu kiel fundamenta kopion de la Universala Vortaro, kiu ne entenas la polan kaj rusan tradukojn? Ĉu tio estus donebla ekzemplo de respekto al la fundamentaj deziroj de nia Majstro? Ni do implikiĝas en konjektojn, kaj tute ne povas diveni la celon de tiu verko de Zamenhof *verkita* de amaso da personoj kaj dediĉita de la *verkintoj* al la *verkinto*.

Doktoro Zamenhof efektive donacis al la homoj *sian verkon*.² Tion ĉi li ja devis fari; li ja devis certigi la homaron, ke li ne postulos rajtojn por la uzado de lia lingvo. Li donacis *sian verkon*, sed li ne donacis *ankoraŭ siajn librojn*. Kial do estas eble, ke sinjoroj Akademianoj kiel Cart kaj Lengyel, kiuj devas zorgi por la pureco de la lingvo, faris tian konfuzon inter *verko* kaj *libro*?

Ni povos pli bone opinii kiam ni scios, kiu enspezos la profiton de la vendado de tiu verko de Dro. Zamenhof eldonita, en formo de unu libro, de la Presa Esperantista Societo. Ĉu ĝi vendiĝos profite al la blinduloj?

Ni atendu la reeldonon de ĉiuj verkoj de nia Majstro; de ĉiuj, esceptinte la tradukon el Schiller — pro diskreteco.

FRED. PUJULÀ

1. *Fundamento de Esperanto*. Antaŭparolo. L. L. Zamenhof.

2. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon per ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate TIUN LINGVON, tial ESPERANTO estas «nenies propraĵo» nek en rilato materiala, nek en rilato morala (tiun lingvon, Esperanto, ne la libroj). Materiala mastro de TIU ĈI LINGVO (ne de la libroj) estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas ELDONADI (ne rekopiadi) en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj. (Deklaracio pri Esperantismo. — Unua Kongreso.)

ĈEMIZVENDEJO

Kiam mi vizitis Roterdamon, kie mi renkontis unufoje kelkajn membrojn de la karavano, kiun mi tiel inteligente kondukis ĝis Dresdeno dank'al la bonaj informoj de U. E. A., mi estis devigata sendi leteron al tiea samideano. Sinjoro de Lasarte, kiu min akompanis, kaj mi, ni restis longatempe kontraŭ la du leterkestoĵoj de la Ĉefa Poŝtoŝicejo sur kiuj estis skribitaj du vortoj, kiujn ni komprenis kiel finan predikon. Unu el ambaŭ — ni konjektis — nepre montras la keston de la por la lando mem sendaĵoj. Sed, kiu? — Ni elpremis ĉiujn niajn filologiajn konojn kvazaŭ ni deĉifrus hieroglifojn, ni dubis, ni starigis konkludojn, komparaĵojn, deduktojn... kaj ni fine enjetis la leteron en la nedecan keston.

La hispana registaro, pli malica kaj internaciema, pentrigis hispanan flagon sur la enlandan keston de la Barcelona Poŝtoŝicejo. Bedaŭrinde, la pluvo, malgraŭ sia internacieco, viŝis la kolorojn, sed la kuriozaj sekvoj de tio ĉi, estas, ke ne nur fremdulo nekonanta la lingvon povas erari, sed ke eĉ enlanda esperantisto, kiu iras enpoŝtigi leteron, revenas aĉetinte kolumon aŭ dekduon da unuakvalitaj ŝtrumpoj.

Efektive, ĝi bezonas klarigojn.

Ĉe la duboj kaj hezititoj kontraŭ la leterkestoĵoj nepre oni deflankigas iom la kapon kaj ekvidas la du lumajn imponajn facadojn de la Bazaro Esperantista kiun Sro. Benitez establis apud la Poŝtoŝicejo. La kongresanoj de la V.^a feliĉe ne havis okazon vidi ĝin; sen tio ĉiuj ili, bone provizitaj, estus havintaj kun sialandaj doganistoj la samajn interdiskutojn, kiujn havis Sro. de Mėnil kun la hispanaj doganistoj, kiuj postulis de li imposton por valizo da novaj ĉemizoj, kiujn li kunportis.

En tiu firmo ĉio rememoras Esperanton: la envolviloj, la markoj, la parolantaj nian lingvon vendistoj, la koloro kaj vortoj de la facadoj. Mi eĉ ne estas certa, ĉu Sro. Benitez ne debitas specialajn komercaĵojn esperantistajn, nome: kravatojn aŭtomate sufokigajn por donacoj al idistoj, sorbajn manumojn por dekstraj brakoj de gazetaj redaktoroj, butonarojn kun afiksaro, propagandajn kolumojn kun la 16 reguloj kaj alskribeblajn antaŭbrustoĵojn de frakaj ĉemizoj por kolekti aŭtografajn dum la Kongresoj.

«Ni ne komprenas! — skribis al mi kelkaj. — Antaŭe, niaj barcelonaj korespondantoj sendadis al ni kartojn, vidaĵojn, ventumilojn, dolĉaĵojn, kaj nun ni ricevas jen ŝtrumpojn, jen poŝtukojn, jen eĉ ĉemizojn kaj kalzonojn! Ni tute ne plendas; kontraŭe! sed ni ne komprenas».

Tamen la afero estas komprenebla. Ili eraris ne nur je leterkesto, sed je pakajo! Certe ili venis de la Esperantista Bazaro de Sro. Benitez.



Responde al kelkaj demandoj ni kun plezuro sciigas, ke la verko «*Sesdek Ŝakproblemoj*» de Sro. Jozefo Paluzie estas havebla ĉe li: strato Diputaci6, 337. Barcelono.

IV^a Kongreso de la K. E. F.

KVANKAM la Olot'a organiza komitato multe klopodis, tamen ni ne povas plene raporti pri la programo de la IV^a Kongreso de la K. E. F. Ni preferos surprizi per ĝi niajn kunfederacianojn. Sed ni kun ĝojo ilin sciigas, ke dum nia nacia Kongreso la «Ĝerona Esperantista Ligo» aliĝinta al la Federacio okazigos sian ĉiujaran kunvenon,¹ per kio ĝi kontribuos sendube al la sukceso de nia granda festo. Ankaŭ, la «Katolika Ligo de Katalunaj Esperantistoj» kunvenos okaze de la Kongreso de K. E. F. kaj alportos, kiel la pasintan jaron, sian valoran helpon al nia agado.

Por tiuj festoj «Olot'a Stelo» petis subvencion de la Urbeŝtaro de Olot kaj ĝi sin turnos ankaŭ kun sama peto al la Provinca Deputitaro en Girona kaj al lia moŝto la Ministro de Instruado. Espereble ĝi atingos malavaran donacon.

La ekspozicio de poŝtkartoj, gazetoj, societaj stampoj, k. t. p. aranĝata de «O. S.», kiu havos lokon dum nia IV^a Kongreso estos pli-gravigita per kolekto da aŭtografoj. La Organiza Komitato ilin jam petis de kelkaj eminentaj alilandaj esperantistoj, kiuj certe bonvolos komplezi ĝin.

Unu distinginda profesorino, kiu direktas publikan lernejon en Olot, kondukos la kurson de Esperanto specialan por virinoj, kiu malfermiĝos baldaŭ. Ni esperas, ke inter la grandaj ĝojoj kutimaj ĉe niaj kongresoj, ni havos tiun vidi la ĉarmajn virinojn partopreni en niaj festoj, kiujn ili faras multe pli ravaj.

Ni kuraĝigas niajn karajn amikojn el la Organiza Komitato persiste laboradi por la sukceso de la organizado konfidita al ili de la Terrassa'a Kongreso.

JOZEFO GRAU

SUSCRIPCIÓ PER A L'ADQUISICIÓ DE LA SENYERA DE K. E. F.

<i>Suma anterior</i>	69 Ptes.
Dr. Joaquim Coll, Pvre.....	5 Ptes.
Sr. Jozefo Paluzie.....	5 »
Srta. Francisca Pinya.....	0'25 »
TOTAL.....	
	79'25 Ptes.

¹. Vidu raportojn pri la kongresetoj de «Ĝ. E. L.» en noj. 6-7, 19-20 kaj 33 de K. E.

ENLANDA MOVADO

BARCELONO

En la kvartalo *Poble Nou* plejparte loĝata de laboristoj okazis la 30^{an} de Novembro propaganda paroladaro, kiun imitinde organizis niaj entuziasmaj amikoj el «*Esperanta Frateco*». En la teatra salono de la politika societo «Ateneu Democràtich Regionalista» antaŭ cento da personoj — preskaŭ ĉiuj, neesperantistoj — paroladis pri kaj por Esperanto Sroj. Campdelacreu, Dalmau, Grau kaj Rocamora. Sro. Pujulà, kiun urgaj aferoj restigis for, sendis leteron atestantan pri liaj aliĝo kaj bedaŭro ne povi partopreni en tiu propagando. La parolintoj pritraktis diversajn el la aferoj rilatantaj al nia ideo, kaj iliaj varmaj vortoj alportis konvinkon en la aŭskultintojn, kiuj ilin longe aplaudis. Poste la komitato de «E. F.» regalis la oratorojn per kelkaj frandajoj kaj oni trinkis por la prosperado de nia lingvo inter la loĝantoj de tiu kvartalo. Resume, ĝi estis tre agrabla festo al kies sukceso kontribuis ne nur la gratulindaj membroj de «E. F.» sed ankaŭ per sia ĉeesto tiuj de la en sama kvartalo sidanta grupo «Racionala Esperanta Grupo».

— La 15^{an} de Decembro ĝoja festo kunigis la geanojn de la senlaca «*Ĉiam Antaŭen*». Ĝi solenigis la datrevenon de la ekspozicio, koncerto, teatra ludado kaj aliaj propagandaj esperantaj festoj, kiujn la grupo organizis antaŭ du jaroj kaj kiuj okazis sukcesplene.

Belegaj invitiloj, arte ornamita salono, malŝparemo kaj afableco kutimaj en «Ĉ. A.» antaŭpromesis allogan feston: tia ĝi ja estis.

Ĉirkaŭ la tabloj sidigis 50 gesamideanoj, inter kiuj ni povosciti: Sinojn, Mensa kaj Pujulà, Srojn. Soler, Mensa, Rocamora, Pujulà, Serrat, Grau kaj aliajn. Kiam la ĉampano estis malŝtopita nia amiko Sro. Soler, prezidanto de *Ĉiam Antaŭen*, rememorigis la ĉeestantojn pri la solenigata dato kaj kuraĝigis ilin per aludo al la atingota premio por plua senĉesa laborado. Sro. Rocamora, prezidanto de la «K. E. F.» parolis pri la sekvoj de la sinceraj vortoj de Sro. Soler kaj gratulis la grupon, dezirante ke ĝi povu ripeti similajn festojn. Tuj fraŭlino Maria Lain legis korekte la belan versaĵon de Sro. Bicknell *Versaĵo pri Amo*. Fino. Eulalia Soler, *Kanto'n*; la *Kanto de l' ligo* kaj *Ho, mia kor'!* estis legataj respektive de Finoj. Llibertat kaj Dolors Pamies. Sro. Leonart Renom legis katalune la versaĵon *Al Esperanto*.

Grandaj aplaŭdoj kronis la belstilajn legadojn de la cititaj gesinjoroj.

Sro. Grau per kelkaj vortoj en Esperanto kore dankis kaj gratulis la membrojn de «Ĉ. A.» kaj Sro. Serrat laŭ sia kutimo sprite alparolis la ĉeestantojn. Sinjoro Pujulà diris, ke *Ĉiam Antaŭen* estas efektive grupo, kiu akiris al si tute propran karakteron kaj li deziris, ke eĉ en la unuigo projektata por fondi la Esperantistan Barcelonan Societon ĝia nomo estu konservata kiel rememoro de konstanta kaj fruktodona agado. Li petis de ĉiuj amon kaj respekton por la fervora prezidanto Sro. Soler kaj gesinjoroj Mensa, kiuj — unu en la kondukado de la grupo kaj la aliaj en sia lernejo — pruvis sian grandan sindonemon por nia lingvo. Sro. Mensa, oficiala instruisto kiu en sia lernejo instruas Espe-

ranton al la infanoj, kortuŝite dankis kaj diris, ke li daŭrados en konstanta laboro, kaj ke, por helpi al disvastigo de la internacia lingvo kaj al ĝia enkonduko en ĉiujn urbajn lernejojn, li prezentos al la konsidero de la venonta Kongreso de «K. E. F.» projekton, kiun li nun verkas. Fine Sro. Soler dankis ĉiujn kaj akceptis en la nomo de la grupo la proponon de Sro. Mensa. Aplaŭdego aŭdiĝis post la vortoj de ĉiuj parolintoj.

Kantado de la himnoj *Ĉiam Antaŭen* kaj *La Espero* finis la feston, pri kiu agrable rememoros ĉiuj ĉeestintoj. Koran gratulon al la organizintoj!

— La grupo *Supren* organizis ludantaron, kiu jam aperigis kun sukceso kelkajn fojojn la verdan stelon sur la pied-pilkaj arenoj. Ni esperas, ke per tiu ludo niaj samideanoj el *Supren* akiros la necesan sperton por enirigi la pilkon de Esperanto tra la mallarĝa pordo defendata de la partio de l' indiferentuloj.

— *Espero Kataluna* okaze de la kunfandiĝo kun la grupo *Barcelona* kaj por festi la datrevenon de sia fondiĝo okazigis lunĉon ĉe sia sidejo la 21^{an} de Decembro. Laŭ niaj sciigoj ĝi estis agrabla festo.

— La grupo «*Semo*» de la «Enciklopedia Popola Ateneo» organizas paroladon pri la bela urbo Praha, kiun faros Sro. Prof. Ang Pitlik favore subtenata de la Urbestro kaj komerca Ĉambro de tiu urbo kaj de la Bohemaj Nacia Konsilantaro kaj Landa Ligo por akceli la turisman movadon en Bohemujo. Tiu parolado estos ilustrita per 200 lumbildoj kolorigitaj de la plej fama bohema pentristo Špillar: oni povas do imagi, kiom interesa ĝi estos. Ni esperas, ke niaj samideanoj uzos tiun okazon por elmontri per amasa ĉeestado, ke ili estas veraj esperantistoj kaj kulturamantoj. Aliajn detalojn oni ankoraŭ anoncos.

BARBARÀ DEL VALLÈS SABADELL

La grava barcelona ĵurnalo «El Correo Catalán» raportis ilustrite la pasintan monaton pri tre bela festaro, kiu organizite de la katolikaj esperantistoj okazis la 15^{an} de Decembro en la diritaj urboj.

En Barbarà matene kunvenis tre multe da esperantistoj; en la paroĥa preĝejo pastro Joseph Planas, vicprezidanto de la *Kataluna Esperantisto Federacio* preĝis solenan diservon, dum kiu Dro. Joaquim Coll profesoro de Esperanto en la barcelona Universitato predikis klokvente pri la Virgulino de la Espero, patronino de la katolikaj esperantistoj. La orfeono de la «Academia Católica de Sabadell» majstre kantis la meson *Te deum laudamus* de Perossi kaj poste procesio ĉirkaŭiris ĉirkaŭ la preĝejo.

Tagmeze frate kunmangis ĉe la Kataluna Hotelo en Sabadell 40 esperantistoj, kaj plej granda ĝojo regis inter ili.

Vespere, en la tre bela festosalono de la «Academia Católica» plenplena de ĉeestantoj okazis literatura muzika festo honore de la Virgulino de la Espero kaj kiel rememoro pri la fondiĝo de esperantista fako en tiu katolika societo. Inter la delegitoj de Barcelono, Terrassa, Sabadell, Moncada, Barbarà kaj Santa Perpetua prezidis Dro. J. Coll.

Finoj. A. kaj M. Gili ludis plane kaj violone kelkajn komponaĵojn de Field,

Bach kaj Mozart. Fino. E. Huyas kantis popolajn kanzonojn katalune kaj esperante. Ili ĉiuj pro siaj tre belaj ludado kaj kantado ricevis multajn aplaŭdojn. Ankaŭ estis varme aplaŭdataj la ceteraj partoprenintoj, Fino. Teresa Arnella, kaj Sroj. Rosals, Sabadell, Argemí, Buxó, Sabater, Mas kaj Monjonell.

La Honoro tradukon de la sprita komedio de Apeles Mestres poste ludis tre bone kelkaj samideanoj, kiujn varme aplaŭdis la alestantoj. Dro. J. Coll dankis ĉiujn por la donita helpo al la bela festo okazinta kaj alparolis la katolikojn pri la fruktoj, kiujn donos al ili Esperanto ĉe la propagando de katolikismo.

Ĉe la fino aperis sur la estrado la konata propagandisto pastro doktoro F. Sardà y Salvany, kiun oni aklamis kaj devigis paroladi. Li tion faris elokvente laŭdante la katolikan esperantan agadon.

La festoj tre plaĉis al la esperantistoj kiuj ilin ĉeestis kaj ni gratulas la *Katolikan Ligon de Katalunaj Esperantistoj* kaj la societon *Katolika Stelo* de Sabadell por la efiko de ilia propagando ĉe la katolikoj.

GIRONA

Tre granda estas hodiaŭ nia ĝojo : ni povas sciigi, ke la de antaŭ tre longe dezirata unuiĝo de la grupoj en Girona jam efektiviĝis.

La 1^{ma} de Decembro fondiĝis la grupo *Ĝerona Espero* per unuiĝo de la grupoj *Amo kaj Espero* kaj *Ĝerona Esperantistaro*. La nova societo elektis la jenan komitaton : *Prezidanto* : Pastro J. Casanovas. *Vicprezidanto* : Sro. N. Martorell. *Kasisto* : Sro. J. Ferrer. *Kalkulisto* : Sro. J. Melendez. *Bibliotekisto* : Sinjoro E. Dalmau. *Sekretario* : Sro. J. Domenech. *Vicsekretario* : Sro. F. Auguet. *Membroj* : Finoj. Maria Llopart kaj Carme Maymí; Sroj. J. Guardiola kaj H. Dalmau.

Tiu komitato intencas aranĝi grandajn propagandajn festojn kaj ni deziras ke plej granda sukceso premiĝu ĝian klopodon. Nian sinceran saluton al la nova en la rondo de K. E. F. grupo *Ĝerona Espero*.

J. G.



Post rapida senkompata malsano mortis en Barcelono inĝeniero Dro. Pons y Tusquets, unu el la plej malnovaj esperantistoj en nia lando. Ĉiuj esperantistoj kaj tiuj, kiuj lin konis, konservos pri li plej bonan rememoron. Al lia familio la K. E. F. prezentas siajn sincerajn kondolencojn!

BIBLIOGRAFIO

Titolaro de Esperantaj verkoj tradukitaj el la Rusa Literaturo. G. Davidov. —

Kun antaŭparolo de B. Kotzin. N.º 1. — Majo 1912. — Eldonis «Esperanta Biblioteko de Georg Davidov en Saratov» — Librejo «Esperanto» Tverskaja, 26, Moskvo. Ruslando. — Ĉe la aŭtoro Georg Davidov. Poŝtkesto, 12, Saratov. Ruslando. Prezo. : 10 kp.

La Instituto Milner, de Jean Jullien. Tradukis la Lyon'a Grupo. — Esperanta Biblioteko Internacia. — Dresden-A 1. Ader & Borel G. m. b. H. Esperanto-Verlag. Prezo 0,100 Sm.

Tre amuza satiro pri Ama Instituto, kie per plej komikaj malhelpoj la direktoro vekas amon kaj deziron ekziĝi. La aŭtoro montras profundajn konojn pri homa psikologio, kaj la Lyon'a grupo pri Esperanto. Ĝia traduko estas korekta kaj plej bonstila.

Historio de la lingvo Esperanto. Unua parto: 1887-1900. Edmond Privat. Privat-Docento ĉe Ĝeneva Universitato. 1912. Universala Esperantia Librejo, 10, rue de la Bourse, Genève (Svislando). — Prezo : 0.500 Sm.

Per sia bela, korekta kaj eleganta Esperanto, Sinjoro Privat rakontas la historion de nia lingvo de ĝia naskiĝo ĝis la komenciĝo de la nuna jarcento. Tiu ĉi libro tre utila por niaj propagandistoj, nepre estos agrabla por ĉiu samideano, el kiuj, la plimulto, — tute kiel en nacia lingvo jam! — konas nur la grandajn strekojn de nia historio. Kiu duoninstruita homo ne hontus konstatante sian nekonon de historio de propra lando? Jen por allogo la tabelo: I. Esperanto kaj indo-eŭropaj lingvoj. II. La Esperanta vortaro. III. Zamenhof Deveno de Esperanto. IV. Apero de la «Unua Libro». V. Unua jaro. «La Dua Libro». VI. Amerika Filozofia Societo kaj «Aldono al la Dua Libro». VII. Nürnberg. Einstein. «La Esperantisto». VIII. La Ligo. Reforma Agitado. IX. «Lingvo Internacia» en Upsala. X. Franca Societo. «L'Esperantiste». XI. La influo de L. de Beaufront. XII. Esperanto en Ruslando. Interna ideo. La spirito de la lingvo.

Ilustrita Gvidlibro pri Vejle kaj Ĉirkvaŭaĝo. Verkita de Andr. Nissen, prezidanto de C. D. E. L. Eldonejo Esperantista. Kopenhago 1912. — Biblioteko de Centra Dana Esp. Ligo. 1912. — N.º 1. — Prezo : 35 oeroj.

«*La artefarita Altmontarsun-bano*» nova kuracmetodo, de Dro. med. Breiger. Berlin, fakkuracisto por fizikaj kuracmetodoj kaj lumterapio. — 1912. Ader & Borel C. m. b. H., Esperanto-Verlag. Dresden.-A, 1, Struvestrasse 40. — Prezo : 0,200 Sm.

Esperanta broŝuro por diskonigi la kuracmetodon de Dro. Breiger redak-

tita en bona Esperanto. Ĝi montras al ni ke la scienculoj konas kaj utiligas jam nian lingvon, kaj ĝi multe taŭgos por helpi al nia propagando inter neesperantistoj. — Se vi suferas ekzemon sekan aŭ malsekan, psoriasizo, aknon, erizipelon, vundojn novajn aŭ malnovajn, fistulojn, ulcerojn de kruroj, furunkojn aŭ furunkiĝon; se vin doloras artrito, reŭmatismo, diabeto, astmo, malsanoj de la koro, rendormeco, kapturniĝo, tuberkulozo, tabeso, k. t. p. kuru al Dro. Breiger kaj danku per via klienteco lian uzadon de Esperanto. Resaniĝi estas agrable; resaniĝi en Esperanta kliniko superas la idealon... Oni preskaŭ deziras fariĝi malsana!

Tatterley. — La historio de Mortinto. Verkita de Tom Gallon. Tradukita el la angla lingvo de Andrew Wilson. London British Esperanto Association (Incorporated) 133-136 High Holborn, W. C. 1912. — Prezo : 0.75 sm., 2 fr., 1.50 mk., 1 ŝ. 6 p.

Tre interesa romano kiu certe plaĉos al multaj esperantistoj. Mi bedaŭras ne koni la originalon; tiam mi povus firme rimarkigi, kun kiom da fideleco Sro. Wilson tradukis la karakterizajn esprimojn de la angla lingvo kaj de la aŭtoro mem. La tradukinto pruvis bone koni Esperanton, kaj tre certe, nur al lia tro granda respektemo por la originalo ni devas aljuĝi la enŝoviĝon de kelkaj naciismoj korektindaj por la dua eldono. Jen 200 paĝa libro, kiu agrable pasigos la tempon al la esperantistoj kaj taŭgos al la propagandistoj por montri la gravecon de nia literatura vivo.

Nurnberger Esperanto. — Trichter. N.º 10. — Leitfaden für Schnellund massenkurse von ŝattat. — Prezo 100 ekz. — 0.500 Sm. 1000 ekz. — 4.000 Sm. Ok lecionoj en kvar paĝoj por la germanaj kursoj.

Karlo. — Rakonto en dudek ĉapitroj. Edmond Privat. Kvara eldono entute represita laŭ la originala manuskripto. Dekdua milo. — Universala Esperantia Librejo. 10, rue de la Bourse. Genève. 1912. Prezo : 0,200 Sm.

Paŭlo Debenham. Romano originale verkita en Esperanto de H. A. Luyken. — British Esperanto Association (Incorporated). 133-136 High Holborn, London, W. C. — Universala Esperantia Librejo. Rue de la Bourse, Genève. Prezo : 1 Sm.

Mi legis tiun ĉi libron tute forgesante ke ĝi estas originale verkita en Esperanto. Ĝia fluoco, la abundeco de feliĉe trovitaj esprimoj, la viveco de ĝiaj dialogoj, la natureco de ĝiaj priskriboj subtenis ĉe mi la iluzion, ke mi tralegas romanon verkitan en mia nacia lingvo. La aŭtoro montris koni Esperanton kaj majstri ĝin laŭ tre rimarkinda maniero. Citi diskuteblajn esprimojn mi ne povus — ĉe kiam ili troviĝus en la libro — ĉar mi estis trenata de la bela fluado de la stilo, tre alĝustigita al la skolo al kiu apartenas la romano. Citi lingvajn belajn devigis min represiĝi la tutan verkon. Sinjoro Luyken vivas en la lingvo.

Sed li ne vivas en la realeco. Oni ne povas postuli realecan veron de melo-drama multintriga malnovaskola romano, sed en ĝia konvencia scenejo oni devas tamen konservi ĉe la pulĉinelaj protagonistoj ian odoreton el la natura vivo. Nur tiel la leganto povas interesiĝi de la intrigo kaj agado.

Laŭ Sro. Luyken la homoj dividiĝas en du skatolojn. En unu troviĝas tiuj, kiuj amas Dion reformacie; en la alia — tiuj, kiuj ateiste malamas la kreinton. La unuaj ĉeestas misiejojn, konsolas malfeliĉulojn, ludas Mozartajojn, vivadas kun la okuloj blanke turnitaj al ĉielo kaj estas tre honestaj. La duaj rigardas tra kuntiritaj brovoj, kraĉas sarkasmojn, ŝvitas envion, ludas per la fortepiano operetajn ariojn kaj estas kanajloj, friponoj, perfiduloj. — Sro. Luyken estas tro severa por la skatolo de la ateistoj. Krom tio, ke mi neniam renkontis personon havantan kiel specialan celon malamoni al Dio, mi ne bone komprenas tiun rolon en ateismo, se ateismo estas kredo pri neekzistado de kreinto. Eble Sro. Luyken konfuzas kun demonuloj kaj demonismo aŭ alia speciala sekto. Ĉiokaze, nia bonega esperantisto ne estas tro indulga; jen specimeno: «Doktoron Howard mi konsideras kapabla je ĉiu friponaĵo. Ĉu vi ne scias, ke li estas, krom fama specialisto, malbonfama ateisto kaj unu el la estroj de liberpensula klubo, kontraŭ kiu vi mem verkis artikolon en «La Atestanto...?» Kion opinios Sro. Luyken se ia liberpensulo verkas saman frazon dirante *protestanto anstataŭ ateisto kaj Reformacia misiejo anstataŭ liberpensula klubo?*

Sinjoro Hubner, komerca amiko de Paŭlo Debenham sin ofertas helpi al li en tre malfacila aventuro. La sinjorino miras pro tiu tamen natura sinofero, kaj ekkrias «Mi konjektas, ke vi ne trovos multajn tiajn komercajn amikojn en la Unuigitaj ŝtatoj». Jen la usonanoj pri kiuj nenion alian oni diras en la verko, en la skatolon de la liberpensuloj! Vere Sinjoro Luyken estas terure ĝenerali-gema. Sed tiun ĉi fojon, eble li eraras. Ĉu li ne suspektas, ke almenaŭ la reformaciaj usonanoj estos pretaj helpi eĉ al komercaj amikoj?

Los Angeles. Kalifornia. La urbo kaj la graflando. — Unua esperanta eldono. 1912. Eldonita de Komerca Ĉambro. Los Angeles, Kalifornio. — Seg-nogram Presejo.

Bela propaganda broŝuro, kiu entenas interesajn fotografajojn, historion kaj priskribon de la Kalifornia ĉefurbo, kaj utilajn sciigojn por la enmigrintoj. Ĝi estas redaktita per tre bona Esperanto, pro kio ni gratulas la eldonintan komercan Ĉambro. Mi konsilas, ke en la aliaj eldonoj, ĝi presigu noteton pri kien oni devas sin turni por ricevi vende aŭ donace tiajn interesajn broŝurojn, kun montro de la prezo en la unua okazo.

Rikke-Tikke-Tak. — Hendrik Conscience. El la flandra lingvo esperantigis Maria Posenaer. Prezo : fr. 2.00 (o, Sm. 800). Presejo De Vos & van der Groen. Antwerpen. 1912. — Havebla ĉe la tradukintino : Kroonstraat, 45, Borgerhout-Antwerpen. Belgujo.

Mia distinginda amikino fraŭlino Maria Posenaer verkis belan tradukon, kiu sola povas fari la famon de tradukinto. Kvankam la originalon mi ne konas,

la lingvo fluas tiel facile kaj nature el la plumo de la verkintino, ke mi konjektas ke la traduko estas fidela, kaj, super ĉio, ke ŝi *sentis* la originalon, el ĝi eltiris propran emocion — ĉefa kondiĉo de arto kaj literaturo, eĉ en tradukoj, kiujn oni ĝenerale redaktas pli algebre ol per la koro. Ŝia antaŭparolo estas modelo de biografio.

Mi ne scias, kial fraŭlino Posenaer koleretis pro mia kritiko pri «Ne dezirita-Ni virinoj» aperinta en la n.^o de lasta Novembro de «K. E.» Sajnas al mi, ke mi estis sufiĉe afabla kiam mi diris, ke «al ĉiu plaĉos la bona Esperanto uzita de fraŭlino Posenaer por la traduko» kaj ke «kiel esperantisto, mi legis la verkon kun granda plezuro».

Efektive, mi malaprobis argumente la ideojn entenitajn de la antaŭparolo. Sed tio ja estas mia rajto. Eble, ne certe, pri teksto de traduko el «fama» aŭtoro, mi ne rajtos diri «tiu teksto estas dormigilo kaj ĝia fama aŭtoro — tedulo el plej terura kategorio» ĉar la afero jam estas juĝita kaj des pli malbone por tiu kiu blinde akceptos la juĝon. Sed pri originaloj rekte verkitaj en Esperanto, la rajto opinii estas ne kontraŭstarebla. La celo de literaturo estas komuniki ideojn. Estas logike, ke *mi* atente ekzameni la komunikilon kun postulemaj kribriroj ĉe ambaŭ manoj, sed estas necese, ke ni ĉefe atentu al ideoj. Ne gramatikistoj sed pensistoj kaj ideistoj progresigos kaj trudos nian lingvon en la mondo.

Aliflanke, kiam oni donas ideojn al publiko oni devas atendi eblan kontraŭstaron. Fraŭlino Posenaer devus esti feliĉa, ke almenaŭ al mi ne plaĉis ŝiaj ideoj. Ĉu estas io pli terura ol verki por diri tion, pri kio jam ĉiu konsentas?!

Mi legas sur «Rikke-Tikke-Tak» la jenajn vortojn : «Rekomendita de la Internacia Unuiĝo de Esperantaj verkistoj». Kion povas signifi tion ĉi?! Laŭ mia opinio, post legado de la bona verko, ĝi estas nur rekomendo por la Unuiĝo mem; ĝi montras ke la «Unuiĝo de verkistoj» sciis vidi la bonecon de la tradukaĵo; sed ĝi tute ne estas pasporto. Alia afero estus se la rekomendon subskribus, por ekzemplo, Sinjorino Hankel mem persone aŭ multaj el la membroj de tiu Unuiĝo. «La organizado de la intelekta laboro per la Ponto», la verko pri Dürer, jen verkoj bone rekomenditaj. Sed rekomendo de Unuiĝo de Verkistoj, kio ĝi estas? Ĉar ne sufiĉas esti verkisto por rekomendi; fariĝas necese, esti ankaŭ bona. Kaj tion ĉi ni nur scios per la nomo de la aprobinto. Mi vidas sur la listo de la membroj «verkiston», kiu presigis en verkon sian jenajn frazojn : «li forlasis la duan vagonfakon» (por : la duaklasan), «pruntdemandis» (por : pruntepetis) «dum vespere», «sin kroĉi per amo kaj rifuĝo» «aŭreolo de malgajeco, kiel kaperista aro aŭ strofa kastel-mastrino, kiu atendas sian trubaduran amanton» «Senmeĉaj lumetoj kiuj nur vitronebuligas» «la feliĉegulo pli feliĉegula» (por : la malsaĝulo plej malsaĝa) «la pentraĵelmontrejo alproksimiĝis» (por : la dato de la Ekspozicio alproksimiĝis), k. t. p., k. t. p.

Ĉu ankaŭ tiu lingva vandalo rekomendas la verkon de fraŭlino Posenaer? La estimata sekretariino de la sepa agus pli bone irante tute sola! — Mi scias tamen, se mi ne eraras, ke speciala komisiono zorgas pri la tralegado de la verkoj al ĝi submetitaj. Tial, ĉu nia Reĝino Sino. Hankel ne opinias ke estus bone konigi la personojn? Tiam ni povus danki tiujn, kiuj prenis sur sin tian danĝeran

taskon, kaj ilia rekomendo, estus efektive garantio invitanta al la legado de verko.¹

Oficiala Dokumentaro de la 3.^a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio. — Krakovo 1912. Universala Esperantia Librejo. 10, rue de la Bourse, Genève. — Prezo : 1,00 Sm. frankite. — Oficiala serio. N.º 8.

Politika malliberulo. Unutagaĵo dediĉita al la afero de politikaj malliberuloj en rusa regno kun speciala konsidero «La Katorgon». — Eldonanto kaj respondeca redaktoro : Dro. Zygmunt Marek. Adreso de la red. kaj adm. Krakovo, str. Wis'lna 8, II. e.

Humana, senpartia kaj tute internacia societo, kiu celas helpi morale kaj materiale al politikaj malliberuloj en rusa imperio sen partiaj, naciaj nek religiaj diferencoj, eldonis tiun ĉi broŝuron por konigi al la tuta mondo ilian suferon kaj kun la espero, ke ĉiu humane pensanta homo volos helpi al ĝi en tiu ĉi laboro. Diskonigu la mizerojn, torturojn, sangverŝadon, unuvorte, la faktojn. Ilin vi konos per legado de «Politika malliberulo» kies ekzempleroj kostas po 25 spesdekoj (0'75 ptes.) Sendu iom da pano eĉ per plej malgranda monkvanto. Poŝtmarkoj kaj respondkuponoj estas akceptataj.

Sendu mendojn kaj monon al la Prezidanto de tiu societo : Dro. Zygmundo Marek, deputito el Aŭstria Parlamento per la supre nomita adreso aŭ al: Severino Przybyszewski, str. Rakoviska, 4. III etaĝo. Krakovo. (Aŭstrio-Galicio).

La haŭzo de la senlaboreco. H. C. Mees. Universala Esperantia Librejo. 10, rue de la Bourse. Genève. Prezo : 0'60 Sm. frankite.

Diras la aŭtoro en ĝia antaŭparolo:

«Tiu ĉi verketo estis verkita holande kaj manuskripte preskaŭ preta, kiam mi ekkonis Esperanton. Jam baldaŭ mi ekintencis aliverki ĝin internacilingve kaj pristudinte dum certa tempo mian novkonatulon mi riskis la aliverkon. La verketo ne celas kaj ne pretendas esti bela literaturaĵo; la valoron estas dononta al ĝi la enhavo. La lingvo tie ĉi estas nur ilo por internacie diskonigi miajn pensojn kaj ideojn pri kelkaj sociaj fenomenoj...»

Pri la pensoj kaj ideoj, mian personan opinion mi ne donos. Ĉiu legu kaj juĝu per si mem. La titolo sufiĉas por montri la karakteron de la verko. Mi neniel povus kaŝi nian ĝojon pro la akiro al nia movado de pensema verkisto kiu rapide lernas nian lingvon por praktike uzi ĝin. Propagandistoj notu en sian kajeron tiun ekzemplan okazintaĵon. Pri la lingvo mem en ĝi uzita, kiel ne diri ke ja ni volus ĝian belecon kaj klarecon por multaj — tro multaj, ho ve — tiel nomataj literaturaj verkoj!

TAMEN

1. Redaktinte la antaŭajn vortojn, mi legas sur la Bulteno de la «Esperantista Literatura Asocio» (Oficiala Gazeto Esperantista) tre spritan kaj amuzan difinon pri verkisto, kiu plipravigas mian diron.

Prezaro Nr. 104 de la firmo E. Neumann & C.^a. Kaiserstrasse 5. Dresden, N.
 Fabriko por kotilonajoj kaj karnavalajoj, maskaj kaj teatraj kostumoj,
 iluminaciaĵoj kaj dekoraciaĵoj. Eldonejo de teatraĵoj.
 Ĝi estas katalogo de ĉiuj esperantistaĵoj eldonitaj de tiu grava firmo.

Dictionnaire Complet Français-Esperanto. E. Grosjean-Maupin. Kolekto de
 La Revuo. Hachette et C.^{ie}, 79. Boul. Saint-Germain Paris. Prezo : fr. 6.
 Ni ĵus ricevis tiun ĉi verkon, pri kiu ni recenzos en la februara numero.

«*Grafologia Revuo*» intermita esperanta gazeto por vulgarigo de la grafologio. Adreso de la Redakcio : Peu de la Creu, n.^o 10, botiga. — Barcelono. Ĉefredaktoro : Sro. Joan Amades. — Specimeno ricevebla nur kontraŭ respondkupon.



III^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

Daŭrigon de la listo de «Eksterordinaraj temoj» ni ne aperigas en tiu ĉi numero, tial ke, kvankam estas promesitaj multaj premioj, iliaj temoj ne estas ankoraŭ tute difinitaj de la proponintoj. Per la februara numero de K. E. ni publikigos la liston de premioj jam difinitaj, kaj ni esperas, ke niaj verkistoj havigos al ni kelke da bonaj verkoj pri iliaj temoj, kontribuante per tio al la brila sukceso de la III^a Konkurso de K. E. F.

En la lastaj tagoj de Decembro ni alsendis al ĉiuj grupoj aliĝintaj al la Federacio cirkuleron, pri kiu certe volos atenti niaj entuziasmaj samideanoj. Malfacileco multnombre fari tiun cirkuleron en Esperanto devigis nin katalunlingve ĝin skribi. Ni supozas, ke ni ricevos la malavaran helpon, kiun ni petas por pli alten levi la famon de la katalunaj konkursoj.

JOZEFO GRAU
Sek. de l' Juĝontaro



Oficiala Parto

Nia estimata amiko Sro. Aubeyzon, Prezidanto de «Supren!» akceptis preni sur sin la subsekretariajn laborojn de la Federacio, kiujn okaze ne povas plenumi Sro. Bordas pro deviga foresto for de Barcelono. La K. E. F. dankas sian fervoran membron sinjoron Bordas pro la ĝis nun de li faritaj laboroj, kaj vidas kun plezuro kaj dankemo la sindonemon kaj kolegecon de la Prezidanto de «Supren!». — K. E. F.

AVIZO

Ni sendas al niaj membroj kun tiu numero la *Tabelon de enhavo* de la kolekto de la pasinta 1912^a jaro. Ni esperas, ke niaj kunfederacianoj rekomencos nin por tiu ofero, klopodante alvarbi novajn membrojn al nia Federacio.

KORESPONDADO

Sro. S. R. Barcelono. Jes, ja ni bone scias, ke *rossinyol* tradukiĝas per *najtingalo*; sed kiam ĝia ortografio tro ŝanĝiĝas, la tradukinto rajtas ankaŭ ŝanĝi la specon de l'birdo. — Sro. R. S. Barcelono. Inter la poŝtkarteto, per kiu vi demandas nin kaj la poŝtkarto, per kiu Ptro. Coll eldonis sian belan tradukon de «La Paŝtistinet», estas certe internacia formato, kiun ni ne konas. Volu vin turni al la Olota komitato. — Sro. M. Pomés. Mi ricevis vian leteron kaj p. m. — Sro. J. Ratés. Dankon por via laboro. La tri kotizaĵojn ni ricevis. — Sro. F. Anguet. Viajn leteron kaj mendon ni ricevis kaj plenumis respektive. — Sro. S. Esvertit. Dankon: la aliĝilojn ni ricevis kaj plenumis vian deziron pri la delegito en Calafell. Ni sendis la ekz. de K. E. — Sro. S. Aulina. Via karto pri la novaj federacianoj multe ĝojigis nin. — Sro. J. Juanola. Via letero alvenis al ni: ankaŭ la 68 ptoj. Ni dankas vian laboron kaj sendis la ekzemplerojn de vi petitajn. — F. Rubinat: Ricevitaj, via letero kaj p. m.

AVÍS IMPORTANT

Amb ocasió de començar l'anyada, i a fi que l'Administració de K. E. F. pugui normalitzar sos afers amb el degut ordre, bo serà que fem algunes advertencies d'ordre administratiu als nostres delegats i senyors federats en general, car del compliment i entusiasme per les mateixes depèn en bona part el nostre exit.

A tot federat que desitgi no continuar en la nostra organització, se li prega que 'u notifiqui per postal al senyor administrador, retornant al mateix temps el número de K. E. rebut.

Els senyors delegats que tinguin coneixement d'alguna alta o baixa serveixin-se notificar-ho desseguida, car les *membrokartoj* per a 1913 se enviaran per a llur cobrança a mitjans de febrer, i lamentable es que després se 'n tingui d'inutilitzar alguna. Mentrestant poden anar recollint les quotes que se 'ls entreguin per a 1913, prenent-ne bona nota a fi d'evitar ulteriors confusions.

A tots els que tinguin quantitats per liquidar amb l'Administració, se 'ls prega que 'u facin com més aviat millor, car en el mes de febrer s'ha de publicar l'estat de caixa, i llavors llurs noms figurarien com a deutors. Això tant per als senyors delegats com per als senyors federats que viuen en poblacions on no 'y ha delegat.

Les remeses poden fer-se per medi del *Giro Mutuo* i el *Giro Postal* en les poblacions on hi agi establerts aquests serveis; essent, d'amdós, preferible i més econòmic el segon. En cas contrari 's poden fer en sagells de correu de 5, 10 o 15 centims, i no de més preu, car cap utilitat ens reporta i sí perdues.

Recomanem als senyors federats que no entreguin cap quantitat a ningú que no sigui algun dels senyors autoritzats per K. E. F. per a tal cosa, la llista dels quals va a la coberta d'aquest mateix número.

Si algun dels associats dels grups aderits a K. E. F. volgués acollir-se a lo acordat en el Congrés de Terrassa referent al pagament mensual de la quota, bastarà que 'l president del grupo a que aquell associat pertanyi 'ns ho posi de manifest perquè siguin donades ad el mateix les oportunes instruccions, com també les targes especials per a dit pagament.

De l'entusiasme i fe per la nostra obra esperem que tots i cada un farem lo necessari per aconseguir que triomfi.

JOAN PIFERRER

Administrador de K. E. F.

Si algun dels senyors delegats el nom dels quals apareix per primera volta en la llista té alguna objecció a fer en contra son nomenament, se li prega que 'u notifiqui a l'Administració.

Ni rekomendas la abonon al

VEKIGO

Internacia Sendependa Organo
por la Defendo de Esperanto

APERAS ĈIUMONATE

ĈEFREDAKTOROJ

JEAN COUTEAUX

RENÉ DUBOIS

== Redakcio & Administracio ==
Rue des Feuillantines, 11 : Paris

Jara abono : 2 fr. 50 (1 Sm.)

KURACISTO

Int. Medicina Monata Revuo

VARSOVIO

Adreso : Dro. Ludwik Chy-
bczyński, str. Szopena, n.º 1

JARA ABONPREZO : 3 SM.

(Per ĉeko el la Ĉekbanko aŭ
hispanaj poŝtmarkoj)

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO

— fondita en la jaro 1909 —

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj «*Princo Sevebrjaniĵ*» kies prezo por ne-abonintoj estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donace belan Esper. libron: *Orienta almanako el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela h. t. p., h. t. p.* «La Ondoj» aperas akurate la 1-an daton, novstilo. Ĉiu n-ro havas 16 — 24 paĝ. Formato 17 X 26. Bela kovrilo. Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.) Anonco en «Koresp. Fako» 3 respondkuponoj La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm.) oni sendu al librejo «Esperanto» (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando) aŭ al aliaj Esperanto-librejoj — poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko.

Oni abonas «La Ondoj»'n ĉe la Administracio
de «K. E.», str. Gracia, 12. — SABADELL

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCI O KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
(KATALUNJO - HISPANUJO)

Red. : Frederich Puj
Sek. de Red. : Joseph G. a

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *Suscripció per a la senyera de K. E. F.* — *La Semado*, Ignasi Iglesias (trad. Jozefo Rosselló). — *El la gazetaro*, K. E. — *La Kongreso de K. E. F. en Olot*, Jozefo Grau. — *Dum mateno, ĉe l' marbordo*, Josep Ventura. — *IIIª Literatura Konkurso de la K. E. F.* — *Als senyors Presidents.* — *Bibliografio*, Fred. Pujulà kaj Tamen. — *Enlanda Movado.* — *Oficiala parto.* — *Korespondado.*



JARO IVª

FEBRUARO 1913ª

Nº 2 (35)

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al la

”Kataluna Esperantista Federacio”

Antaŭen	Mollet
Badalona Stelo	Badalona
Barcelona Stelo	Barcelona
Casino del Comercio	Terrassa
Ĉiam Antaŭen	Barcelona
Escola Universitaria	»
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Esperanta Amikaro	Banyoles
Esperanta Amo	Manlleu
Esperanta Aŭroro	Barcelona
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. y la I.)	»
Esperanta Frateco	»
Esperanta Idealo	Santa Coloma de Farnés
Esperanta Juneco	Barcelona
Esperanta Nesto	Barbarà del Vallès
Esperanta Racionala Grupo	Barcelona
Esperanta Semo	Sabadell
Esperantista Amikeco	Manlleu
Esperantista Grupo	Mataró
Esperantista Junularo	Terrassa
Esperanto kaj Patrujo	Barcelona
Evolucio	»
Forigu Barojn	»
Frateca Kunigo	Reus
Frateco	S. Feliu de Guixols
Fratego	Vendrell
Gerona Esperantista Ligo	Girona
Gerona Espero	»
Ilerda Espero	Lleida
Kampero	S ^a Perpetuade la Moguda
Kulturo	Barcelona
Laboro Esperanta	Vilanova i Geltrú
Laboro kaj Kulturo	Calafell
La Rondo	Barcelona
Lumon	Terrassa
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Novan Vojon	Barcelona
Nova Semo	Reus
Olot Stelo	Olot
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Paco kaj Amo	Palafrugell
Semo (Ateneo E. P.)	Barcelona
Semo	Buenos Aires
Supren!	Barcelona
Tarragono Esperanta	Tarragona
Unió Catalanista	Barcelona
Universala Frateco	»
Verda Stelo	Flix
Vika Esperantistaro	Vic

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
(KATALUNUJO - HISPANUJO)

Red. : FREDERICH PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEPH GRAU

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Suscripció per a la senyera de K. E. F.* — *La Semado*, Ignasi Iglesias (trad. Jozefo Rosselló). — *El la gazetaro*, K. E. — *La Kongreso de K. E. F. en Olot*, Jozefo Grau. — *Dum mateno, ĉe l' marbordo*, Josep Ventura. — *III^a Literatura Konkurso de la K. E. F.* — *Als senyors Presidents.* — *Bibliografio*, Fred. Pujulà kaj Tamen. — *Enlanda Movado.* — *Oficiala parto.* — *Korespondado.*

PRI...

ARTIKOLO DE NEESPERANTISTA GAZETO

LA malnova katalunista revuo «La Sembra» el Terrassa publikigis per sia numero 556^a la 4.^{an} kaj lastan artikolon, el serio, kiun sub la titolo «De la cultura en l'esperantisme català» (*Pri la kulturo en la kataluna esperantista movado*) aperigis lastatempe, kaj el kiu mi tradukas la jenajn vortojn kiel specimenon de la vidpunkto de l'aŭtoro.

«Mi volas diri, ke la vera kataluna esperantista agado — tiu de la unua epoko de «Espero Kataluna», de la «Esperanta Fako», de la revuo «Joventut», de la bela projekto pri Federacio unue, de la V.^a Internacia Kongreso de Esperanto poste, kaj fine, hodiaŭ de la «Kataluna Esperantista Federacio» — estis senĉese unuakvalita fa-

ranto de kataluna kulturo, kaj eĉ en certaj okazoj — la «ruĝa semajno»¹ — instrumento patrujama kaj normaliga.

Malproksime estas jam la tempo, kiam oni juĝis Esperanton armilo kontraŭ la malgrandaj nacioj. De tiu aŭ kontraŭa kredo dependis en nia lando la malprogreso aŭ la progreso de Esperanto. Tial, kiam tuj de la komenco mi atingis, ke Doktoro Martí y Julià Prezidanto de la «Unuiĝo Katalunista» sendis oficialan inviton al studado de Esperanto en ĉiun katalunan societeton, mi restis trankvila pri la sorto de nia movado.

Hodiaŭ, grava malnova revuo kiel «La Sembra» kantas la gloron de nia lingvo kaj rimarkigas ĝiajn bonfarojn en la intelekto de l' kataluna popolo. Ĉu ni povis revii tian venkon? Esperu la bonfarojn, ni ja povis, kiuj havis fidon al Esperanto. Sed ĉu ni vere povis esperi, ke iam oni rekonos ilin?

Tion ni ŝuldas, al nia komuna, disciplinema, unuiĝema agado. Se ni restus izolitaj kiel erarintaj kolomboj en densa arbaro, eĉ se ni kalkuliĝus po dekmiloj oni ne rimarkus nin. Sed ni stariĝas en la «Kataluna Esperantista Federacio» — unu el la plej gravaj Asocioj en nia lando — nia gazeto prosperas kaj facile vivadas, ni okazigas ĉiujarajn kongresojn kaj Florajn Ludojn, ni antaŭeniras laŭ antaŭdifinita ordo, konsciaj pri nia celo, kiel brava disciplinema armeo, kaj nia frata obstina irado nepre devas altiri la atenton de popolo, kiu ne kutimas vidi senhaltan obstinan laboradon de ĉiam pligrandiĝanta amaso da homoj celantan saman venkon.

Ni havu fidon. Nia Kongreso en Olot estos nova kolono sur kiun ni apogos nian disvastiĝon. Ni antaŭeniru kubuto-ĉe-kubuto; ni ronde dancu premante niajn manojn ĝis kiam en la rondo la tuta lando entenigos.

KLARIGO

En mia antaŭa «Pri...» mi diris:²

«Doktoro Zamenhof efektive donacis al la homoj *sian venkon*. Tion ĉi li ja devis fari; li ja devis certigi la homaron, ke li ne postulos rajtojn por la uzado de lia lingvo».

Kelkaj amikoj atentigas min al tio, ke eble ne ĉiuj komprenos laŭ mia deziro la sencon de la esprimo «devis». Tial mi volonte klarigas, ke mi tute ne intencas diri, ke tiu devo estas natura, logika, nepra devenaĵo de la fakto, ke Doktoro Zamenhof *elpensis*, sed de tio, ke

1. Aludo al la okazigo de la V^a Kongreso post la revolucia semajno.

2. Numero 34 de «Kataluna Esperantisto».

li deziris enkonduki sian elpenŝaĵon en homaron, kies plimulto da membroj bedaŭrinde rigardas ĉion de egoisma, profiteza vidipunkto, kaj kiuj trovas argumentojn kontraŭ li, se li postulus por sia geniaĵo eĉ la dekonon de tio, kion postulas la elpensinto de ia neperdebla pinglo aŭ muŝtimigilo.

FRED. PUJULÀ

TRO SEVERA

Bonhumora li ja kutime ne estas. Mia amiko estas tro rigida kaj ne komprenas multajn ĝojojn el la vivo. Mi montris al li kelkajn esperantistajn elpensajojn. — Jen bombetoj por festenoj. Oni ĵetas unu el ili en vian supon, kaj ĝi eksplodas ŝutante en la aeron nebulon da detranĉitaj steletoj.

Mia amiko kuntiris la brovojn.

— Jen la ŝprucilo per kiu oni remburas per steletoj vian buŝon dum oscedo post legado de verko de dutaga samideano, kaj jen ĉarma okulkrevigilo en formo de steleto, kiun oni metas apud vian vizaĝon ĉe la flanko de kie oni vokas vin.

Mia amiko gratis al si la kapon.

— Jen oranĝoj kun malmola ŝelo, kiuj rompiginte sur via kapo stelizos ĉarme vin. Kaj jen papertuba kunrulita serpento, kiu enblovite malruliĝos kaj per sia stelforma pinto ĝuste trafos vian nazon. Ĉarmaj, ĝojigaj, spritaj elpensajoj...

Mia amiko grincigis siajn dentojn kaj murmuris:

— Mankas io en la kolekto. — Kio? — Bastono kun kiom ajn vi volos da gravuritaj steloj por frakasi la ostojn al la uzintoj de tiaj petolajoj!

Mia amiko ne komprenas la ĉarmon de la vivo!



SUSCRIPCIÓ

PER A L'ADQUISICIÓ DE LA SENYERA DE K. E. F.

<i>Suma anterior</i>	79'25	Ptes.
Dr. Jascint Bremon.....	5	»
Sr. Romul S. Rocamora.....	5	»
» Delfí Dalmau.....	5	»
«Esperanta Idealo»	5	»
Germans Serdà.....	5	»

TOTAL..... 104'25 Ptes.

Segueix oberta la suscripció.

Se prega als molts grupos que han obert llistes de suscripció, que comuniquin a la possible brevedat el total resultant de les mateixes, enviant el metale al lloc social de la K. E. F.

La Semado*

DEVIZO : Ja segarem

Jam alvenis la tempo de l' semo!
 Fidu ne al plibona veter'!
 Havu ni la plugilon brilanta,
 oportunon profitu de l' ter'.
 Semu jam ni, semu ni pli,
 en postatemp' rikoltos ni.
 Bedaŭru ne,
 ni tra la mondo semi tre!
 Semu ni pli,
 bele rikoltos baldaŭ ni!

Jam sopiras la ter', ĝia busto
 jam batetas per febro interna
 pro l' dezir' de plezur' fekundanta,
 kaj malfermas la koron, eterna,
 viva font', por la nova florar'
 antaŭsign' de venonta fruktar'!
 Ni laboru, sindonaj semantoj,
 ne laciĝu, bonmarŝas labor';
 volu ne, ke pro l' sunaj radioj
 tutsekiĝu de l' tero la kor'.
 Ne timu! Semu
 ni, semu tre!
 Ni ne bedaŭru,
 rikolti ne;
 rikoltos baldaŭ ni ĝojantaj,
 kaj ĉiam vivos triumfantaj!

Nian kampon respektos furioj
 de l' venteg', kaj de l' fulmo la fal'.
 La plugiloj por liroj taŭgantaj
 nin helpigos en tiu batal'!
 Nova sun' nin salutas brilanta,
 niaj fruntoj lumiĝas pro l' hel',

* Premiita en la II^a Literatura Konkurso de K. E. F.

per la varma blovet' Ter' nin helpas;
 bird' nin trilas la kanton de l' bel'.
 Renaskiĝas Natur' al la vivo
 ridetante, kaj mortas malam',
 atendante la freŝan floradon,
 parfumitan arome de am'...

Por la homidoj tuj venontaj
 ni estu firme batalontaj!
 Semu jam ni, semu ni pli,
 en postatemp' rikoltos ni.
 Bedaŭru ne
 ni, tra la mondo semi tre!
 Semu ni pli,
 belege falĉos baldaŭ ni!

IGNASI IGLESIAS

(Tradukis JOZEFO ROSSELLÓ.)



El la gazetaro

Ni sciis kun ĝojo pri la reapero de la hispana gazeto «La Suno Hispana» kiu malaperigos la strangan impreson kaŭzatan de la manko de presorgano en lando, kiel la hispana, kie la movado estas tiel intensa. Ni estas certaj, ke niaj hispanaj samideanoj komprenos, ke estas por ili devo subteni ĉiel ajn tiun revuon por la gloro de l'Esperanto kaj de sia movado mem.

«Kataluna Esperantisto» entuziasme aplaŭdas sian renaskiĝantan kolegon kaj deziras al ĝi longan prosperan vivon.

Ni ricevis la unuan numeron de la kunigitaj francaj gazetoj «La Movado» kaj «Franca Esperantisto» kiu aperas en Parizo sub la direkto de Sro. Emile Houbart. Ĝi estas la presorgano de la «Franca Societo por la propagando de Esperanto» kaj aperos la 5^{an} de ĉiu monato sub la titolo «La Movado» (*Franca Esperantisto*)

Ni ricevis ankaŭ la unuan numeron de «Ukraina Stelo» monata ilustrita gazeto, kiu aperos en Kolomea, 360 Nora, Austrio-Galicio sub la direkto de Sro. Orest Kuzma; kaj la unuan numeron de la reaperinta «Portugala Revuo» kiu direktata de Sro. J. A. Proença aperos en Porto.-Rua de Rosario, 215. (Jare 700 rejsoj.-pts. 3'50).

Al ĉiuj ni deziras prosperan kaj longan vivon.

K. E.

La Kongreso de K. E. F. en Olot

NIAJN kunfederacianojn ĝojigos sendube la sciigo, ke la Urbeŝtaro de Olot laŭ la peto de «Olota Stelo» konsentis donaci por nia Kongreso la sumon da 500 pesetoj (200 sm.). Mi kuraĝas proponi en ilia nomo la plej koran dankon al la helpema sindona korporacio, kiu volis kontribui per tio al nia pacema agado. Ankaŭ, la Provinca Deputitaro en Girona helpis al la organiza laboro de la komitato per donaco de monsumo. Ni dankas plej kore kaj esperas, ke niaj amikoj, ĉeestante grandare la Kongreson, pruvos al la Urbeŝtaro de nia nunjara kongresurbo, ke niaj vortoj ne estas malplena kutima komplimento, sed esprimo de sincera sento.

La entuziasmo por la Kongreso ĉiutage kreskas; la prepara laboro ankaŭ; tamen niaj amikoj Olot'aj senlace klopodas kaj la rezultoj de ilia laboro, farita kun des pli granda fervoro ju pli peza ĝi estas, promesas al ni abundan rikolton de sukcesoj.

La 12^{an} de Januaro sub la prezido de Sro. Josep M.^a Garganta prezidanto de l'Organiza Komisiono de la IV^a de K. E. F., okazis en la sidejo de «Olota Stelo» la malfermo de la kurso de Esperanto por virinoj, pri kiu ni jam sciigis la K. E. F.-anojn. Granda nombro da fraŭlinoj ĉeestadas la kurson, kiun klarigas la instruistino Sino. Agna Abat kaj oni esperas, ke ĝi ankoraŭ pligrandiĝos.

Klopodante fari la Zamenhof'an lingvon facile atingebla de la laboristoj, oni proponis al la komitato de la «Laborista Ateneo» malfermon de kurso de Esperanto por ĝiaj anoj. Kun entuziasmo ĝi akceptis la proponon kaj tial la 3^{an} de la nuna monato malfermiĝos en la sidejo de tiu kultura societo kurso, kiun gvidos inteligenta samideano Olot'a, kies nomon laŭ lia peto ni ne diras.

La organiza komitato petegas ĉiujn, speciale la Prezidantojn de grupoj, bonvolu alsendi kiel eble baldaŭ por la Ekspozicio propaganda la societan stampon kaj ĉiuspecajn esperantaĵojn. Ili pensu, ke prokrastante la sendon de la diritaj objektoj, ili malfaciligas la laboron, kiu en la lastaj tagoj fariĝos tre peza.

Al karaj amikoj el ĉiuj lokoj de Katalunujo mi laŭte vokas: Fruatempe pretiĝu ĉeesti nian Kongreson; montru tiamaniere antaŭ ĉiuj la forton de nia vivado; kontribuu per via alesto al la esperantigo de la urbo, kiu ame gastigos la jaran kunvenon de nia Federacio. Vi pagos per tio la malŝparemajn penojn de la organizantoj.

JOZEFO GRAU

Dum mateno, ĉe l' marbordo *

DEVIZO : Al la maro la koro min tiras.

Dum mateno, ĉe l' marbordo,
plezurigas min la mar';
la raŭksono nur aŭdiĝas
de l' blekegoj de l' ondar',

kiuj vekas fiŝkaptistojn
al labor' de l' fiŝkaptad';
al mi plaĉas tie resti
pro la ĉarmoj de l' bruid'.

En hor' frua blankaj mevoj
jam anoncas pri l' novtag';
ili iras kaj revenas
super maro kiel sag'.

Fiŝkaptistoj tuj pretiĝas
barkon veli kun kuraĝ',
kaj post baldaŭ sur la akvo
ekvidiĝas barka naĝ'.

Kiom bela tio estas
ĉe l' marfreŝo de maten'!
Ĉe l' marbord' en tiu horo
malaperas korkaten'.

For de l'urbo malpacema
min altiras mara bel'
per moviĝoj de ondaro,
kun blankec' de ŝaŭm-mantel'.

Al la ondoj mi rakontas
nur revante en solec'
la penadojn de la vivo,
ĉiun pecon ja post pec'.

Malkovriĝas mia koro
ho, en larmoj de sufer'!
Kiom akra kaj maldolĉa
por mi estas patrin-ter'!

Bru' konfuza, iom stranga,
venas de l'ondar' al mi,
kaj per plaŭdoj sur marbordo
marsekretojn diras ĝi.

Kaj en revoj prezentigas
mia ĉarma marfein',
kies vest' purpura brilas,
kies briloj logas min.

Ĝi parolas al mi longe,
kun rideto sur la lip',
pri la ĉarm' de l'ond' giganta,
pri l' sur mar' vetur' de ŝip',
pri la ĝoj' de l' fiŝkaptistoj
dum la fiŝkaptada ir',
pri l' senfina blu' de l'akvo,
kio estas mia mir'.

Mian koron ĝi plenigas
kvazaŭ sorĉe, ĉe l' marbord',
per dolĉplena poezio
laŭ muzika marakord'.

Dolĉa sveno min ekkaptas,
mi min lasas al la Sort',
dum min ĉarmas per beleco,
de l' feino, ĉiu vort'.

Kaj sur sablo reviviĝas
mia ĉagrenita kor',
kaj la ondoj karesemaj
ĝis mi venas kun ador'.

Brila tag' alproksimiĝas
de somero la sezon',
kaj el mar' aŭdiĝas forte
la mistera onda son'.

La feino malaperas
pro l' radioj de la sun';
mi foriras de l' marbordo
ĉar labor' min vokas nun.

Jam la urb' svarmas vekita,
ĉio ŝajnas nur plezur',
ho, malvero! ĝi ne plaĉas,
nur min plaĉas marlazar'.

* Premiita en la II^a Literatura Konkurso de K. E. F.

Kaj la tagon mi pasigas
kun la koro sen dolĉ-ĝu';
ĝis venonta la mateno
min ne ĉarmas l'onda bru'.

Ve, se mankus al mi maro,
kun sekretoj de l' profund'
Ve, se mankus marfeino,
ĉe l' kor' iĝus morta vund'!

JOSEF VENTURA



III^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- III. *Premio de «Olota Stelo»*. TEMO : Laŭvola. PREMIO : Artaĵo.
- IV. *Premio de Sro. Valentí Avellana*. TEMO : Bonhumora versaĵo.
PREMIO : Pentraĵo de la proponinto, vicprezidanto de la
Arta Komisiono de la Kongreso de K. E. F.
- V. Lia Episkopa Moŝto, Dro. Ramón Guillamet y Coma, Epis-
kopo de León, proponas PREMION al la TEMO : Grava utilo
de Esperanto en la nuntempa apologia agado por katoli-
kismo.
- VI. *Premio de la «Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj»*. TEMO:
Traduki la ĉapitron XXVIII el la verko «Collaret de perles»
de J. M. Bordas. (La teksto aperis en la Januara numero de
«Kataluna Katoliko». Redakcio : J. Rosals, str. Portaferriça,
30. Barcelono.) Sro. J. M. Bordas afable cedis la traduk-
rajton kaj donacos al la gajninto de la premio unu ekzem-
pleron de sia verko. PREMIO : Lukse bindita ekzemplero de
«Kie estas la Eklezio de Kristo» traduko el M. van der Hagen
de Sino. M. Borret.
- VII. *Premio de «Ĝerona Espero»*. TEMO : Taŭga broŝureto por la
propagando de Esperanto. PREMIO : 25 pesetoj (10 sm.)
Noto. La premiita manuskripto apartenos al la grupo «Ĝe-
rona Espero», kiu povos ĝin traduki nacilingve kaj eldoni
por propagando.
- VIII. *Premio de Sro. Josep Clará*. TEMO : Laŭvola. PREMIO : De-
segnaĵo de la eminenta artisto proponinto de la temo.
- IX. *Premio de la Urbeŝtaro de Olot*. TEMO : Laŭvola. PREMIO :
Artaĵo.
- X. *Premio de Lia deputita moŝto Sro. Pere Llosas*. TEMO : Utileco
de Esperanto ĉe la studoj pri Historio. PREMIO : Artaĵo.

- XI. *Premio de la firmo «El Arte Cristiano», Bassols, Vayreda & K.^{io}* TEMO : Traduki la ĉapitron *La xacolatera* el la verko «Recorts de la darrera carlinada» de la Olotá verkisto Marián Vayreda, fondinto de «El Arte Cristiano». PREMIO : Sanktula figuro, el la faritaj de la firmo, kiu proponas la temon.

Noro : La manuskriptoj por laŭvolaj temoj devas esti *originalaj*.

Al la gajnintoj de la kvar ordinaraj premioj estos disdonitaj la sekvantaj sumoj, entute 28 spesmiloj, kiujn la citataj grupoj volis donaci por helpi al la sukceso de la III.^a Floraj Ludoj de K. E. F.

«*Barcelona Stelo*» el Barcelono donacis 25 ptojn (10 sm.)

«*La Rondo*» el Barcelono, 5 ptojn (2 sm.)

«*Esperanta Nesto*» el Barbará del Vallés, 5 ptojn (2 sm.)

«*Semo*» (A. E. P.) el Barcelono, 10 ptojn (4 sm.)

«*Ĉiam Antaŭen*» el Barcelono, 15 ptojn (6 sm.)

«*Esperanta Ideal*» el Santa Coloma de Farnes, 2'50 ptojn (1 sm.)

«*Esperanta Amikaro*» el Banyoles, 7'50 ptojn (3 sm.)

Aliaj grupoj antaŭpromesis sian sindonan helpon, kvankam ili ne fiksas ankoraŭ la sumon donacotan, kaj kelke da sinjoroj promesis proponi aliajn temojn kaj premiojn. Per la venonta numero de KATALUNA ESPERANTISTO ni publikigos novajn detalojn pri tio.



ALS SENYORS PRESIDENTS DELS GRUPOS ADERITS A LA K. E. F.

Els Presidents dels Grupos aderits a la Federació deuen recordar que, segons la modifacació introduïda en els Estatuts, pel Congrés de Terrassa, els membres de llurs grupus poden aderir-se a la nostra organització individualment i pagar la quota per mesos, o sia per fraccions de ptes. 0'25.

La modifacació fou introduïda per a donar facilitats als qui no poden fer efectiva la quota tot d'un cop, o creuen que es aquella la manera més natural de contribuir.

Els senyors Presidents tindran present que per a que s'envii la carta de federat als membres així aderits i se 'ls serveixi regularment l'exemplar mensual del KATALUNA ESPERANTISTO n'hi ha prou amb que enviïn la llista d'ells al nostre Caixer-Administrador (Gracia, 12 : Sabadell). Ells mateixos recaudaran les quotes de cada mes.

Esperem que 'ls senyors Presidents, per l'interès que han demostrat per a la Federació y per als membres de llurs grupus, procuraran servir a tots, fent popular la modifacació del Congrés de Terrassa. (Vegi-s : Estatuts. Cobertes del «K. E.».)

BIBLIOGRAFIO

Dictionnaire Complet Français-Esperanto. E. Grosjean Maupin. Kolekto de La Revuo, Hachette et Cie., 79, Boul. Saint-Germain, Paris, Prezo : fr. 6.

Kiam sinjoro Grosjean Maupin aperigis siajn du unuajn vortarojn kaj en la kulizoj de certa pulĉinela teatro la kaŝita direktoro sonorigis la tamburegon en invito al protesta koncerto, KATALUNA ESPERANTISTO¹ — tiam direktata de Domenec Serdà, — laŭte deklaris ke ĝi ne aliĝas nek aliĝos al iu ajn protesto, ĉar ĝi havas fidon al la kontrolo rolo de la lingvaj institucioj, ĉar ĝi konsideras nejusta proteston nur kontraŭ Sro. Grosjean, kiam aliaj eminentaj aŭtoroj enkondukis ankaŭ novajn vortojn en siajn vortarojn, kaj ĝi aldonis, ke ĝi ne povas kredi ke Sro. Cart estas la iniciatinto de tiu koncerto — malgraŭ la tiam ĝenerala murmuro — ĉar ne estas eble, ke la eminenta *verkonto* de la Klasika Libro havis du mezurilojn: unu por la vortaroj de aliaj, alian por la vortaroj de sia firmo plenaj de la plej arbitraj novaj vortradikoj.

Unu el la gazetoj, kiuj plej fervore batis la takton de tiu brua koncerto estis «Danubo». Kiam en kunveno ĉiuj kriadas, tiu, kiu silentas, aspektas kiel muta. «Danubo» tiel laŭte, batante sian bruston, paradis sian amon al la Fundamento, ke ni, kiuj mirigite silentadis, jam aperis preskaŭ kiel suspektindaj kaj maskitaj malamikoj de Esperanto. Ĉar «Danubo» malaprobis la vorton «komisiono», kiun ni ofte uzadis, iu kredis havi rajton sendi al ni leteron akuzante nin kiel kontraŭfundamentistojn kaj tiam ni, en propra defendo, devis konstati, ke tiu sama gazeto klarigis kiel fundamentan «*la koston akuzativon*, kiu estas uzata ĉiam kiel komplemento de la verbo *hosti*» «*la agodaŭran akuzativon*, kiu *montras la tempon*» k. t. p. tio estas, ke tiuj kavaliroj de la Fundamento kreis novajn regulojn, kiuj laŭ nia nebruanta fundamentemo povus tre bone entenigi en la 3.^a paragrafo de la 14.^a regulo².

Jen la subtenanta kolono de la trono sur kiu okaza Jupitero elpafis la fulmojn de sia furiozo; jen la banvazo de la Maratoj, kiuj ne petis la kapon de Sro. Grosjean nur ĉar la gilotino ankoraŭ ne estas en modo por... tranĉi la lingvajn demandojn.

Sinjoro G. M. eldonis nun sian «*Dictionnaire Complet Français-Esperanto*» Ĉu ĝi vekos novan bruon? Eble. Ĝi estas tiel bone verkita kaj pripensita, ĝia plano estas tiel inteligenta, ke nepre ĝi incitos la kaŝdormantan viperon de l' envio en kelkaj koroj. Homoj devas iel diferencigi de la bestoj; kaj se oni ne trovas en la verko ian fendon, en kiun tramei levilon por splitigi ĝin, ne mankos la fuŝemaj krimservantoj, kiuj, per siaj rustitaj malakraj ponardoj de antaŭurba teatro, celos, en burlesktragediaj pozoj, vundi lian privatan personon sub la stratangula niĉo de la Fundamento.

Ne pro timo, sed laŭ tute antaŭdifinita plano, Sinjoro G. M. malpligrandigis

1. N.º 11 de Kataluna Esperantisto.
2. Noj 25, 27 de Kataluna Esperantisto.

kiel eble la nombron de akceptitaj vortradikoj kaj ofte uzis por la traduko kunmetitajn vortojn kaj ĉirkaŭfrazojn.

«Mi eĉ — li diras — ne akceptis grandan nombron de vortradikoj, kiujn oni renkontas en la anonimaj vortaroj de la Presa Societo¹, ekzemple : *abdomeno, admiralto, albo, algvuzilo, almozeno, analoj, animalo, antagona, antepenulto, armaturo, aŭtopσιο, bajaderino, baraterio, baroka, bavovoĵo, belvedero, bendo, bestiala, blazo, blufi, bonzo, brizo, brutala, bujoto, cedito, cilio, ĉarto, ĉasio, ĉeĉio, disocii, disonanco, diurna, dolmano, duaro, drogmano, esplanado, estafeto, faktotumo, fifro, filamento, formacio, formalisto, frikasi, gigonĵo, graniero, ĝineceo, halukso, incendio, jungalo, kalcini, kalumelo, kamaĵo, karako, kayeno, kargo, kario, hariko, kariolo, karmanĵolo, kazako, kazulo, klaŭno, klaŭstro, klostra, kloteto, knaki, kvagli, komico, kondotiero, konstipo, kornelo, langusto, latanta, lazareto, lazarono, liardo, madrigalo, maĝo, naturalizi, obsedi, ordinacii, paĵalo, panariso, panoplio, parapeto, pedo, plako, pleksi, polekso, pompono, pretorio prevosto, prizo, purgatorio, reverso, riflo, sarmento, sentino, siesto, silvo, situo, solivo, sponla, stero, ŝejko, tilburo, tonelo, torako, trumpo, uzino, vara, vialiko, vimeno, voluto, vortico, voliua, k. t. p.* kiuj troviĝas en la Vortaro franca-Esperanta de la Presa Societo; ne ankaŭ : *brasi, egido, hirsu, kantilevero, lilako, rizoni*, kiuj troviĝas en la vortaro Esperanto-Franca, nek : *abolicii, armorioj, bankhedo, barboti, beŭlti, bigara, blokusi, boko, bujabeso, bukmekeo, bumbono, cerealoj, senjoro, terbento, vivi, k. t. p.* kiujn oni povas trovi en la Granda Vortaro de la sama firmo¹.»

Sinjoro G. M. ankaŭ ne enkondukis la vortojn *ĉaleto* kaj *koterio*, kvankam ili estis uzitaj de Dro. Zamenhof, ĉar li trudis al si la devon ne akcepti vortojn kies devenon ne povis li mem kontroli; tial «li flankenlasis *kun bedaŭro* tiujn vortradikojn, ĉar speciale *koterio*² estas tre utila».

Ĉiu vorto, frazo, ĉirkaŭfrazo, esprimo, dirmaniero, estas signita per signo, kiu montras ĝian devenon, la aŭtoron, kiu ĝin uzis, kaj permesas al la leganto konsciencan elekton. Mi ne povas laŭdi tiun metodon ĉar principe mi mem ĝin aplikis al mia Vortaro Esperanto-Hispana, sed mi deziras altiri atenton kaj admiron al la grandega, zorgega, sindona laboro, kiun postulas la metodo en 600-paĝa kompleta verko, kiel la eldonita de Sro. Grosjean-Maupin.

Mi ne havas la honoron koni lin, tial mi plej senpartie povas lin danki kaj aplaŭdi, ĉar trarigardinte lian verkon oni povas ĝoje ekkrii : Nia lingvo vere progresadas! Niaj laboriloj ĉiam perfektigadas!

Oni ne scias, kion pli admiri; ĉu la verkon mem, ĉu la paciencon, la sindonemon, la animtrankvilecon de la aŭtoro, kiu ĝin ellaboris post la pluvego da insultoj per kiuj oni superŝutis lin post la apero de lia «*Dictionnaire Complet Esperanto-Français*». Sed la insultoj, ankaŭ estas signitaj per signoj montrantaj ilian devenon kaj la kategorio de ties aŭtoroj ofte tute ne ĝenas la ripozon post honesta laborado.

FRED. PUJULÀ

1. Direktata de Sro. Cart, pioniro de la Fundamentista movado.
2. Capelletta, *partietabo, kamaradaro, interlaŭda grupo, intrigbando*.

La morgaŭa virino. Dialogo originale verkita de «Roksano». Vic-Ĉef-Vagabondino. — Prezo : 0'75 fr. (0.140 Sm.). Ĉe la aŭtorino : Roksano, Villa Roksano, Béziers (Hérault), Francujo.

Ho! ve al la edzaj ŝtrumpoj se la morgaŭaj virinoj similas al tiu satire pentrita de Roksano!... Sed ĉu la tempo uzata por fliko ne valoras multe pli ol paro da novaj ŝtrumpoj. La hodiaŭaj virinoj ne ŝpinas kaj tamen la hejmoj ne disfalis en pereon. Sed Roksano mokas unu virinon, ne la virinojn. Kaj ŝi mokas ne inteligentan virinon, sed pseŭdo-inteligentan. Se ŝi mokus inteligentecon ĉe la virino, ŝi mem estus argumento kontraŭ sia tezo.

La historio de la Esperantista Vagabonda Klubo. Verkita de Caro Oxenford.

Fraŭlino Caro Oxenford estas la fondintino de tiu klubo, kiu celas kunigi la «vagabondemajn» ne kunigeblajn personojn kaj allogi al la Esperantismo per la arto. Neniu pli bone ol ŝi povis rakonti tiun historion, kiu estos tre interesa dokumento por la estontaj verkistoj de la ĝenerala historio de nia lingvo.

Bibliografio de Esperanto. Parto unua. Libroj verkitaj en Esperanto aŭ pri Esperanto. Volumo unua. Bibliografiaj notetoj pri libroj publikigitaj de 1887 ĝis 1903 kun tabeloj alfabetaj kaj metoda. — Kajero dek-sepa el la Esperantista dokumentaro pri la oficialaj historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj. — Parĭs. Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, 51. Sept. 1912. — Prezo : 2 fr.

Kial Ido en la rolo de Internacia Lingvo ne povas superi la lingvon Esperanto? — Paul Christaller. Stuttgart. — Esperanta Universal-Biblioteko. Riga. Riga Stelo Eldonejo. — Prezo Sm. 0.25.

La kajero 8.^a de tiu interesa Biblioteko entenas verkon de nia eminenta samideano Profesoro Christaller pri la temo montrata de la titolo. Nia distinginda amiko estos la unua, kiu ĝojos, se mi diras al li sincere, ke la demando ne interesas nin katalunojn. Tial li ne miru pro tio, ke mi ne insistas pri la boneco de liaj argumentoj. Mi rekomendos lian verkon eble post cent aŭ ducent jaroj, kiam Idismo enmigros ĉe nin — se ĝi enmigras. Ne estas necese, fari pleonasmon aldonante post la nomo de Sro. Christaller ke la Esperanto uzita en la verko estas bonegal

Rimarko. «Mi prezentas la ĉi-studaĵon» Mi vidis la vorton *ĉi* kelkfoje uzitan inter artikolo kaj substantivo. Oni povis dubi ĉu ĝi akompanas la artikolon kiu iel estas montra vorto. Tia uzado ne plaĉis al mi. Sro. Christaller kunigas ĝin al substantivo per streketo. Ĉi ŝajnas al mi ankoraŭ pli stranga. Tio estas persona impresoj; la Fundamento efektive ne kontraŭstaras speciale tian uzadon, sed laŭ ĝi, ŝajnas' ke *ĉi* nur devas akompani montraĵajn vortojn (Ekz. § 30. — Univ. Vort. : *ĉi*). La impresoj ĉe mi estas pliakcentita de tio, ke en nia lingvo ni ne havas similan por tia uzo vorton. La inteligentaj klarigoj de Sro. Christaller estos por ni tre interesaj.

Samideano sendis al mi mokan leteron, ĉar en mia recenzo pri Rikke-Tikke-

Tak (paĝo 561.^a de l' KATALUNA ESPERANTISTO) mi uzis la esprimon «por ekzemplo», kiu laŭ lia opinio estas nepardonebla naciismo. Mi nur respondos, ke la esprimo estas uzita de Zamenhof : «Por ekzemplo mi citos...» (Lingvaj Respondoj. Resp. 1.^a, paĝo 6.^a, linio 13.^a).

Kaj mi aldonos por lia instruo ke, algebre,
adverbo = prepozicio + substantivo.

sekve:

ekzemple = por ekzemplo.

TAMEN

KURACISTO. *Internacia Medicina monata revuo*. — Adreso de la Red. kaj Adm. : Dro. Ludwik Chybczynski, Warszawa, str. Szopena, n.º 1. — Abonprezo : jare (10 numeroj) 3. Sm. — Fr. 7.60. (Por T. E. K. A.-anoj senpage). Unu numero kostas 300 s. Specimeno kaj ŝanĝo de la adreso — unu respondkuponon (100 s.) Oni akceptas pagojn poŝtmandate aŭ ĉeke (Ĉekbanko Esper.) — poŝtmarkojn nur el landoj nekonantaj mandatojn, ekz. el Hispanujo.

Tre interesa revuo, kiun ni ricevas interŝanĝe (aperis n.º 3). Ni rekomendas ĝin al niaj legantoj, precipe al kuracistoj.

La «Esperantista Bazar» filio de Benitez & Kio., Trafalgar 2 kaj Junqueres 18, donacis al siaj klientoj belan esperantan muralmanakon kun la portreto de Dro. Zamenhof ĉirkaŭata de alegoriaĵo. La klientoj de tiu Bazaro establita en plej centra kvartalo de Barcelono, kaj kie vendiĝas tolaĵoj, trikotajoj, ombreloj, ĉemizoj, ŝelkoj, ŝtrumpetiloj, k. t. p. estas tiel multenombraj, ke vere ni devas danki sinjoron Benitez pro la intensa kaj efika propagando de nia lingvo, kiun li faris per sia malavara donaco.

Studo pri la Organizo de Esperanto — Etude sur l'organisation de l'Esperanto.

El «Franca Esperantisto» : 1911, noj. 10, 11; 1912, noj. 1, 2, 3, 4, 6, 7, 10.

Prezo : 0 fr. 75. Paris. Eldono de Franca Esperantisto. 51, rue de Clichy.

— 1913.



La studenta grupo de «Universala Esperanto Asocio» en Trieste-Capodistria elektis kiel dumvivan honoran Prezidanton nian estimatan samideanon Sron. Jozefo Domenech, sekretario de la Grupo «Ĝerona Espero». Li ricevis de tiu grupo belan pergamemon kun alegorio desegnita de Sro. Rodolfo Ceol.

Al la grupo kaj al Sro. Domenech niajn sincerajn gratulojn. — K. E.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Grupo «Semo» (Enciklopedia Popola Ateneo) — En pasinta numero oni raportis pri parolado, kiun organizas tiu grupo, kies paroladonto estas Sinjoro Prof. Aug. Pitlik el Praha (Bohemujo). Pri tiu grava propaganda kaj instrua afero oni posedas aliajn detalojn kiujn ni plaĉe konigas al niaj karaj samideanoj.

La kvanto kaj klasifiko de la 240 lumbildoj, kiujn akompanos tiu laboro de Sro. Pitlik estas tiel : 135 bildoj de Antikva Praha; 18 bildoj de Aliaj urboj; 20 bildoj de Grotaj de la moravia kastelo; 27 bildoj de Sokola manifestacio 1912¹; 40 bildoj de Naciaj kostumoj.

Vere interesa estos tiu parolado. Ĉiuj samideanoj devas ĉeesti kaj klopodi por ke tiu afero estu vera manifestacio de nia forto. Sur ĵurnaloj oni anoncos la tagon en kiu okazos la parolado.

— En la sidejo de «Esperanto kaj Patrujo» la samideanoj el tiu grupo okazigis la 25^{an} de Januaro maskobalon esperantistan. En la bela dancosalono vidiĝis multege da maskokostumoj, kiujn portis ĝentilaj fraŭlinoj. Membroj de ĉiuj grupoj barcelonaj ĉeestis en la festo, kiun certe ili malfacile forgesos. La premiojn al la plej belaj kostumoj oni aljuĝis tiel : 1.^a al Fino. Teresita Soriano; 2.^a al Fino. Anita Corominas; 3.^a al Fino. Emilia Fontanillas. La balo daŭris ĝis la 4.^a matene.

En la sama societo, ne nur pri amuzoj zorganta, ĉiun dimanĉon matene Sro. Delfi Dalmau, profesoro de Esperanto, klarigas superan kurson, kiun multo da samideanoj konstante ĉeestas.

— *Libera Stelo*. Jen la nomo de ĵus fondita grupo en la barcelona kvartalo Clot. Komencante sian agadon, ĝi disdonis propagandajn prospektojn anoncantajn du kursojn, kiujn en la societa sidejo, str. Joan I, n.º 5. Clot, klarigos Sroj. R. Ruvio kaj A. Melis ĉiujn mardojn, merkredojn kaj vendredojn de la 8.^a ĝis la 9.^a vespere. Ni sincere salutas la novan rondon.

— La 19^{an} de Januaro kelkaj esperantistoj vizitis la novajn konstruaĵojn en nia haveno dum mara promenado, kiun *Espero Kataluna* organizis.

MANLLEU

Organizita de diversaj lokaj societoj okazis, la kvinan de la pasinta monato, tre interesa kavalkado. Niaj samideanoj bone profitis la okazon por efektiviĝi vere bonan propagandon, kaj por tiu kavalkado ili ornamis esperantan simbolan kaleŝon. Multaj penoj trudis al ili ĝia pretigado, sed fine ili venkis kaj ni povis ĝui la frukton de iliaj klopodoj. Tiu kaleŝo prezentis tre altan baĉdakenon, meze de kiu majeste staris bela busto de nia kara Majstro Dro. Zamenhof. Sub tiu baldakeno kaj sur plado de la kaleŝo, staris globuso, kiun ĉirkaŭis, bele kombinite, kvin samideanoj vestitaj per kostumoj tipaj el la kvin kontinentoj.

1. Gimnastikistoj, kiuj akiris atenton de la tuta mondo.

Multaj aliaj simboloj kaj lumaj detaloj plibeligis la kaleŝon. Brave! al niaj karaj Manlleu'aj samideanoj, kiuj per sia obstineco kaj laboro devigis paroli pri nia amata lingvo ĉiujn ĉeestantojn, kiuj grandanombre amasiĝis sur la placoj kaj stratoj por rigardadi la kavalkadon.

Post la kavalkada festo, okazis frata vespermango en la sidejo de «Esperantista Amikeco»; ĉeestis en ĝi multaj samideanoj, kiuj en la fino plej entuziasme tostis por la triumfo de ili atingita kaj por la baldaŭa atingo de nia kompleta venko. La barcelona samideano sinjoro Campdelacreu, petis de ĉiuj aliĝon al nia plej grava organizaĵo «Kataluna Esperantista Federacio». Dudek kvin centimoj ĉiumonate — li diris — estas ja vere malgranda kvanto; tamen se ĉiu kataluna samideano ĝin pagus, prezentu al vi la forton kiun nia ĉefkataluna organizaĵo atingus!

La kanto de nia himno «La Espero» finis tiun tre agrablan kaj neforgeseblan feston.

GIRONA

Mi skribas la jenan raporton, kortuŝita ankoraŭ de la gajigaj impresoj de nia triumfa festo.

Vera triumfo meritas esti nomata la ĵus realigita unuiĝo, la kunfandiĝo de la du antaŭekzistantaj grupoj «Ĝerona Esperantistaro» «Amo kaj Espero». Ne estas necese, eĉ ne decas, rememorigi la pasintaĵojn, nek raportoj malaĝrablaĵojn feliĉe estingitajn, kiam ĝojo revenas al koro, kiu de longtempe ĝin bedaŭris. La geanoj de *Ĝerona Espero* ĉion jam forgesis; ĉies estas la gloro, ĉies estas la triumfo. Batalo okazis pace, pro kio venko estas duoble sukcesplena.

La dua de Decembro estas memorinda dato por la ĝeronaj esperantistoj; tiu estas la naskiĝa festo de nia pacema grupo. Spritulo rimarkas, ke ne nur naskiĝa, sed ja edziĝa festo; ĉar la antaŭajn tagojn oni kunigis la tutan meblaron de ambaŭ fianĉoj, kiuj reciproke transdonis al si la tablojn, la ŝrankojn, la seĝojn kaj flagajn vestaĵojn; la edziĝaj ĉapitroj estas aranĝataj de ambaŭaj prokuratoroj, kiujn subskribis kaj parafis ŝtata notario, kaj fine antaŭ la tuta ĉeestantaro kiel antaŭ rajtigitaj atestantoj, la gefianĉoj inter frazoj de amo, paco kaj konkordo fariĝis geedzoj sub la pastra beno de Dro. Casanovas ĵus nomita Prezidanto, kiu per sentaj kaj kortuŝaj vortoj je la propra nomo kaj je la nomo de la elektita komitato dankis al ĉiuj preskaŭ unuanime voĉdonintaj kaj aŭguris al la gekolegare senfinedaŭran amon kaj fratan amikecon.

Je nia samideana karaktero, rajte ni esperas ke senprokraste oni povos gustumi la sukplenaĵojn de tiu ĉi esperantista arbo, kies vivplena ĝermo starigos sendube pli dikan trunkon kaj branĉaron naskontan ne nur foliajn vestaĵojn sed bonodorajn florojn kaj dolĉajn fruktojn, per kiuj nutriĝos la tuta ĝerona esperantistaro des pli grandiganta, ju pli elkreskos la arbo tiel fruktoprodukta.

Se oni demandas nin pri la kialo de nia konduto, pri la realigo de tia longtempe dezirita unuiĝo, ni diros ke nin inspiris la kortuŝa rekomendo de nia Majstro en sia saĝa parolado ĉe la lasta Internacia Kongreso, kaj samtempe la

reciproka bezono unuigi por praktike celadi la vastigon de Esperanto interniaj samlandanoj.

Ni ĝojegas rajte pro ĉi tio; ĉar ni povas nin mem elmontri kiel imitindan modelon por ĉiuj, kies frataj aŭ esperantismaj sentoj riproĉas al ili ĉu persone, ĉu grupe sian malproksimiĝon de siaj samideanoj kaj sampatrujanoj.

La nomaron de la novaj komitatanoj oni povas vidi sur la antaŭa numero de K. E. — *F. Anguet Soler.*



Oficiala Parto

Per tot el mes quedarán enviades les *membrokarto*j als senjors Delegats a l'objecte de que puguin començar el cobrament d'elles.

A fi de que no y agin males interpretacions amb l'Administració, aquesta prega als senjors Delegats que quan envien el producte de les quotes s'atenguin a les següents observacions. *Primer*a : enviar una nota detallada amb el número de cada *membrokarto* cobrat, als quals podran tenir registrats en una llista. *Segon*a : no retenir-se les *membrokarto*j no pagades, car per a l'Administració, són comprovants que després manquen, I *Tercer*a : No fer com alguns que envien metalec i no diuen qui l'envia.

L'Administració resta agraïda a tots els senjors que han complert l'avís del número anterior, emperò alguns encara sembla que res han llegit referent a les quotes atrassades, i això ha sigut causa que en aquest mateix número no agi sortit ja l'estat de caixa, com nosaltres desitjavem. Una nova vegada els demanem que vulguin ajudar-nos en nostres tasques, facilitant-nos el compliment de nostre missió.

A tots, gracies per endavant.

L'Administració.



KORESPONDADO

Sroj. L. Gobernado, S. Esvertit, J. Molas, V. Alavedra, A. Oliart, P. Viuet, R. Riera, P. Costa, R. Teixidó, kaj D. Obiol : Ni ricevis ĉiujn viajn leterojn aŭ poŝtkartojn.—Sro. A. Aleman Ruiz, Habana : Ni bone ricevis nian transpagilon por la jarabono de Sro. R. Puig. Dankojn. — Fino. L. Briggs. Leeds. Ricevitaj la responkuponoj por via abono. — Sro. F. A. Girona : Jen via raporto. Dankon. — Redakcioj de *Pola Esp.*, *La Kulturo* kaj *Poŝta Esp.*. Ni akceptas. Ni faros, kion permesos al ni la malgranda loko. — *Supren!*: Aperos en venonta numero.

Reglament de la Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer. — Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon. — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i previa acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart. — La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuiran al seu sosteniment amb la quota mínima de TRES ptes. anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grupo podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que 'ls membres individuals i llurs membres podran pagar les quotes per mensualitats. Per a aquest fi 'ls Presidents s'entendran amb el Caixer-administrador directament.

Els Presidents dels grupos aderits formaran un Consell Consultiu de la «Federació», an el qual podrà dirigir-se 'l President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en que 'u cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació», sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en lo que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. quint. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vice-president, Caixer-administrador de la revista, Vice-caixer-administrador, Secretari i Vice-secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista. El càrrec de Caixer-administrador serà permanent. El que 'l desempeñi continuarà en el càrrec fins a ordre de la Junta que farà ratificar pel pròxim Congrés.

Art. sisè. — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son càrrec; recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessàries per als efectes de l'article segon i demés assumptes del regim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre 'l Comitè Directiu i els seus representants.

Els delegats podran retenir-se, si 'u creuen convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. setè. — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, previa ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà 'l lloc on agi de celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, se nomenaran els individus que agin de formar el Comitè per al següent exercici, i s' discutiran les proposicions que agin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i incloses en l'ordre del dia.

Art. vuitè. — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les Juntes de les quals seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. novè. — Tots els acords de les Assemblees i Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desè. — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament auran de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. onzè. — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la catalana en les Assemblees.

Art. dotzè. — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.», els fons existents, o que resultin de la liquidació, passaran a la «Centra Oficjio», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

Article transitori. — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Sabadell, carrer de Gràcia, 12.

Ni rekomendas la abonon al

POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto, aperadas okan jaron, ĉiam pliinteresigante sian programon.

En 1913^a jaro «P. E.», krom 12 ilustrataj, zorge redaktataj numeroj en klasika, pure fundamenta Esperanto, donos al siaj abonantoj senpagan:

“LITERATURAN ALDONON”

(200 paĝa volumo)

«Pola Esper.» enhavas konstantajn rubrikojn: Propagandaj artikoloj. — Esperantaj demandoj. — Rakontoj, noveloj, poezioj. — Populare sciencaj artk. — Scienco kaj Vivo. — Opinioj. — Konsideru! — Kroniko. — Korespondadoj. — El Esper. Mondo. — Faktoj. — Bibliografio. — Revuo de la gazetoj. — Konkursoj kaj problemoj. — Humoraĵoj. — Respondoj de la Redakcio. — Muziknotoj. — Ilustraĵoj. — Anoncoj.

Abonprezo: Jare kun «Literatura Aldono» rb. 2,50 k. = 2,650 Sm.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio: Varsovio (Polujo), str. **ŜOPENA 8**
Specimenaj numeroj estas sendataj kontraŭ respondkupono, aŭ 10 sd. poŝtmarko

!!Laplej malkara gazeto esperantista!!

LA KULTURO

PROGRESEMA GAZETO DE LABORISTAJ
ESPERANTISTOJ EN AŬSTRIO

Aperas regule 20^{an} de ĉiu monato kaj havas ĉiam interesan enhavon. La jara abonpago 84 Sd. (K2'—, Fr. 2'—, M2'—); duonjare: duone. Specimeno kontraŭ respondkupono. Postulu provnumeron! Abonu!

La dua jarkolekto ĵus komencas!

Adreso: LA KULTURO, Praha II.,
Hybernská, 7. — (Laborista domo),
Bohemio-Aŭstrio

POŝTA ESPERANTISTO

— Oficiala organo de la —
Internacia Ligo de Esperantistoj
Poŝtoficistoj. — Ildepo

Aperas ĉiumonate; enhavas fakan kvarlingvan vortaron (germana-franca-angla-Esperanta), fakan frazaron, fakajn artikolojn pri poŝto, telegrafo, telefono kaj recenzojn pri literaturo, ĉu beletristika ĉu scienca. Diversnacia kunlaborantaro. Senpage sendata al Ildepaj membroj; jara kotizo: 1 sm; abonprezo kunsendkostoj: 1 sm. poŝtare

Oni sin turnu al la Ildepa oficejo ĉe

Arnold Behrendt, Breslau (Germanujo)
Maxstrasse, 22

Konto: Ĉekbanko Esperantista

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
KATALUNUJO
SENPAĜA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

Red. : Frederic Pujulà
Sek. de Red. : Josep Grau

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *Pentraĵoj*, L. Bacardit. —
Nia Kongreso, Jozefo Grau. — *Historio de Esperanto*
en Katalunujo, Teresa Rosell. — *III^a Literatura*
Konkurso de la K. E. F. — *Al la barcelonaj Esper-*
antistoj, Prof. Aug. Pitlik. — *Bibliografio*, Fred.
Pujulà kaj Tamen. — *Respondo al unu rimarko*,
P. Christaller. — *Enlanda Movado*. — *Atilanda*
Movado. — *Korespondado*.



JARO IV^a

MARTO 1913^a

N^{ro} 3 (36)

Llista de delegats autoritzats per la administració de K. E. F. per a rebre les quotes

Arbós del Penedès	A. Romagosa	Major, 11.
Badalona	«Badalona Stelo»	Sant Pere, 86.
Balaguer	M. Espar Boquer	Miracle, 7.
Banyoles	J. Aulina	Turers, 49.
Barbarà del Vallès	S. Arnella	Sant Pere, 21.
Barcelona	D. Dalmau	Angels, 1, entl.
Begas	J. Esteve	Raval Sant Martí, 19.
Berga	J. Cardona	Apotecari.
Blanes	S. Robert	Llarg, 42.
Borjes Blanques	F. Rubinat	Pou, 2.
Calafell	J. Jané	
Cambrils	Josefina Maseguer	Ostal Nou.
Cassà de la Selva	N. Puig	Bisbal, 1.
Castellar del Vallès	F. Blanquer	Fonts Calents.
Centelles	J. Raurell	
Flix	«Verda Stelo»	
Girona	F. Anguet	Progrés, 20.
Granollers	F. N. Pujadas	Fonda d'Europa.
Igualada	A. Mosella	P. Constitució, 11
La Escala	J. Ximinis	Fàbrica gèneros de punt.
Lleida	Ll. Abadal	Major, 12 i 14
Manlleu	«Esperantista Amikeco»	Pont, 38, 2. ^{on} - 1. ^a
Mataró	J. Solà	Sant Josep, 46.
Mieras	R. Riera	Comerciant.
Mollet	«Antaüen»	
Moncada	Joan Buxó	Metge.
Olot	I. Juanola	Superior, 25, 2. ^{on}
Palafrugell	J. Marquès	Pals, 1.
Pobla de Lillet	J. Llumà	Porxos, 19.
Prades	T. Alsina, Pvre.	
Premià de Mar	P. Alsina	Camí Reial, 81-79.
Reus	E. Aguadé	Presó, 15.
Ripollet	«Esperanta Akvofalo»	Nou, 20.
Rubi	J. Ratés	Sant Magí, 1 i 3.
Sabadell	Lloc Social	Gracia, 12.
Salàs	P. Vivet	Metge.
Sant Feliu de Guixols	J. Blanch	Caimó, 32.
Sant Llorenç Savall	J. Roma	
Sant Quirse de Besora	J. Fossas	Metge.
Santa Coloma de Farnés	J. Gener	Verge Maria, 1, 2. ^{on}
St. ^a Perpetua de la Moguda	«Kamparo»	
Selva del Camp	J. Girona	
Tarragona	D. Obiol	Unió, 9, 3. ^r
Terrassa	A. Oliart	Clarís, 24.
Tivissa	F. M. Brú	Avall, 16.
Torelló	C. Viñolas	Sant Josep, 14.
Vendrell	S. Esvertit	Cristina Baixa, 50.
Vich	J. Comella	Plaça Major, 18.
Vilafranca del Penedès	A. Robleño	Puigmoltó, 14.
Vilanova i Geltrú	F. Mestres	Sant Antoni, 1 i 3.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Red. : FREDERIC PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEP GRAU

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Pentraĵoj*, L. Bacardit. — *Nia Kongreso*, Jozefo Grau. — *Historio de Esperanto en Katalunujo*, Teresa Rosell. — *III^a Literatura Konkurso de la K. E. F.* — *Al la barcelonaj Esperantistoj*, Prof. Aug. Pitlik. — *Bibliografio*, Fred. Pujulà kaj Tamen. — *Respondo al unu rimarko*, P. Christaller. — *Enlanda Movado*. — *Atilanda Movado*. — *Korespondado*.

PRI...

LA NOVA ORTOGRAFIO KATALUNA

LA kataluna estis la lingvo, kiu havis la *honoron* posedi pli multajn ortografiojn. En Barcelono, ĉiu eldonejo, ĉiu presejo, ĉiu gazeto, ĉiu aŭtoro havis apartan ortografian sistemon. La verkisto, kiu laboris por diversaj firmoj nepre kaj fine envidis la finan skribadon. Por legi, oni bezonis specialajn filologiajn konojn, kaj ofte okazis al mi, forlasi libron aŭ ĵurnalon pro hemikranio kaŭzita de la deĉifrado de vortoj. Ĉiu vorto havis tri-kvar-kvin formojn postultajn de la respektivaj sistemoj; la fonetiko, etimologio, klasikemo, progresemo, kaj eĉ tute simple la fantazio kaj bontrovo inspiradis nin. Ĉar tio ne sufiĉis, norde, Mistral kaj felibroj alprenis la francan ortografion kaj liaj tekstoj fariĝis nelegeblaj de la sudanoj; sude, la valencianoj alprenis la hispanan, kaj nur ili povas relegi sin. Azianoj

parolantaj malsamajn lingvojn interkompreniĝas per skribado; ni, parolantaj saman lingvon, restas fremdaj je la verkoj! Arbo faligita — baldaŭ dishakita!

Vortoj kiel *kie* skribiĝas *ahon, ahont, aont, aón, ont, on!* (Mi) *volas* povas esti skribita *vull, vuy, vui, vullch* (Valencio), *buty* (Arano)! (Mi) *vivas*, — *visc, visch, vixch*. *Birdo* povas flugi sub la jena plumaro: *aucell, ocell, auzel* (Limoges), *auceyl, aucelh*, k. t. p. kvankam ĉiu elparolas same «usej!»! Oni skribos *dolçor, dolsor* (dolĉeco) por Barcelonaj presejoj, *dulsó* por Rusiljonano, *douçou* por gaskono! Tolozanoj montras la multenombrojn per *os* — *armounios* (harmonioj), ni montras per *as* aŭ per *es* — *harmonias, harmonies...* Kiel en la lingvo montriĝas la nedisciplinemo, anarĥiemo kaj individuemo, kiuj dispecetigis naturan imperion!

Tio estis ridinda, terure ridinda. Mi konas alilandanojn, kiuj parolas la lingvon kiel ni mem, kaj nur povas legi tekstojn de iaĵ presejoj kaj estas tute nekapablaj redakti letereton sen eraro. Tio devis finiĝi. Ĉiu deziris unuigon de la ortografio. Antaŭ du jaroj, mi havis la honoron prezidi la lingvan sekcion de la «Kongreso de Ateneoj kaj Kulturasocioj» kaj mi prezentis proponon favoran al Esperanto kaj al Ortografia Unuigo de Kataluna lingvo. Ĝi estis akceptita unuanime. La sento pri l' bezono estis ĝenerala. Sed la solvo ne venis. Kiam mi akceptis la direktadon de «Kataluna Esperantisto» oni demandis min, en la presejo, pri kiun ortografian sistemon mi alprenos. «Kiu ajn, estas al mi tute egale — mi respondis — sed se antaŭ unu jaro la lando ne prenis decidon ĝeneralan, mi alprenos la esperantistan ortografion.» Niaj samlingvanoj el *Poitevin* jam skribas *ke, ki* anstataŭ *que, qui!!*

La solvo venis nun. La «Institut d'Estudis Catalans» leĝodonis la deziritajn ortografiajn normojn. Certe ili estas donitaj iom aŭtokrate, nekonsultinte verkistojn, ne invitinte popolon al voĉdonado por la starigo de Komisiono; certe, tiuj normoj ne estas sufiĉe modernaj kaj kontentigaj; certe ĉiu povos trovi en ili malbonon kaj difektojn; ni diskutos tion poste; sed nia devo kiel civitanoj, kiel esperantistoj, estas akcepti kaj obei ilin. Ni donu la ekzemplon. Ni montrus per la nacia interkonsento, ke lingvo estas afero homa modifebla, dependanta de la homa volo kaj konsento. Tiel agante, ni helpas ne nur al la nacio, sed ankaŭ al Esperanto. Niaj samlandanoj komprenos tre facile, kial ni povis decidi kune kun homoj el ĉiuj nacioj skribi *amiko* tiel, ĉar ili vidos ke kiel katalunoj ni ankaŭ povis interkon senti kun niaj samlandanoj skribi *amic* anstataŭ *amich* aŭ *amig*, kiel ĝis nun!

Ankoraŭ unu fojon ni montru, kiel utila estas Esperanto por nia nacia kulturo, agante en la *hejmo* kun la disciplino, kiun ni lernis en la vicoj de l'armeo de Lingvo Internacia.

FRED. PUJULÀ

NEKOMPRENITOJ!

Oni marŝas sur oranga ŝelo, glitas kaj falas. Li glitis pro esperanta ŝlosilo kaj falis en nian rondon.

Tio okazis iam. Du tagojn poste li sin montris kiel samideanon al malnova esperantisto, kiu petis de li liajn versaĵojn. Li ne sentis la ironion, sed gardis, el tiu intervidiĝo, la impreson ke li ne estas perfekta kaj mankas al li io.

Unu tagon, li rimarkis kun surprizo, ke io, kvazaŭ lifto, supren- kaj malsupreniĝas tra lia brusto, tiklas lian gorĝon en klopodoj por eliri. Liaj okuloj akriĝas, liaj brovoj penadas kunfandiĝi kun la lipharoj, liaj fingroj erpas kaj hirtigas liajn harojn. Ho, ve! Sinjoro deziras akuŝi! Tuj, tuj alportu vortaron! Inspiro alfrapis per siaj febraj fingroj la pardon de la gloro. La bakterioj de l'rimo kaptis viktimon! Kaj la sinjoro eligis infektajn sur nian literaturon.

Dume, al alia persono okazis sama afero.

Ni alportis la poŝtukon sur niajn buŝojn. Ĉar la sinjoroj sciis ke «neniu estas profeto en sia urbeto», kvankam ili ne legis la «Proverbaron Esperantan», ili juĝis nian geston tro partia. Ni ŝirmis nian nazon sed silentis. Tamen la alilandaj gazetoj blovis al la haladzo. Tiam la sinjoroj kredis pri komploto; kaj iam, renkontinte sin reciproke, ili grupiĝis kiel la martiroj en la Roma Cirko antaŭ la senkompataj sovaĝaj bestoj, levis la brakojn al la ĉielo kaj interŝanĝis kelkajn konsolajn vortojn per sia fantazia Esperanto.

— Legiĝis al mi prikritikon al vi!

— Ankaŭas al mi, ke prikritikon al vi ankaŭ!

— Mia animo veas! Kioma enviecado!

— Aj! Nu! Baldaŭe ne oni povos verki!

— Kvazaŭas al mi, ke vi pravegas!

— Mi demandas vian konsolan manon!

— Tuŝu!

Kaj ili malaperis tra la nokta ombro. La vento de iliaj agititaj gestoj tremetigadis la luman nebulkronon de l'inspiro, starantan super iliaj kapoj.



PRESERARO

En la versaĵo «*Dum mateno ĉe l'marbordo*», aperinta en la februara numero de K. E., la verso «Jam la urb' svarmas vekita» devas diri «Svarmas jam la urb' vekita». Konfuzo ĉe la presprovaĵo erarigis la kompostiston.

Pentraĵoj*

DEVIZO : Antaŭ ol semi, plugu ĉiam

Petro Pala por *palaco*
 per peniko pentras placon...
 poste pardon, papilion,
 parkon, plankon, pavilonon,
 princon, platanon, paĝion,
 palmon, pilastron, plafonon...

Por *potpististo* pilolon,
 poton, potason, pistilon,
 poliklinikon, primolon,
 peston, pomadon, pinĉilon...

Por *pastro* pentras predikon,
 procesion, parabolon,
 papon, paŭzon, pontifikon...
 paskon, pazion, popolon...
 pekon, pian paroĥanon,
 psalmon, profeton, patronon,
 paradizon, pilgrimanon,
 preĝon, promeson, pardonon...

Por *parolisto* pledadon,
 propagandon, polemikon,
 pesimisman, paroladon,
 parlamenton, politikon...
 progreson, peton, programon,
 postparolon, partianon,
 postulon, planon, proklamon,
 parolejon, patrujanon...

Por *paŝtisto* paŝtistinon,
 perspektivan panoramon,
 pinastron, poluson, pinon,
 pantoflon, printempon, pramon...
 pejzaĝon, pinton, pepadon,
 pinion, ponton, paŝadon...

Por *plugisto* pentras pizon,

persikon, pluvon, papagon,
 paseron, porkon, palizen,
 paniklon, pajlon, plantagen...
 pomujon, puton, perdrikon,
 pajlejon, prunon, paprikon...

Por *par'-fianĉa* purpuren,
 platenon, perlon, portreton,
 parfumon, pudron, plezuron,
 poŝtkarton, pompon, pezeton...
 poezion, petolajon,
 pasion, penson, pinĉajon...

Por *popolo* paciencon,
 piraton, pipon, paperon,
 perfidon, ploron, potencon,
 piastron, pilkon, panteron...
 pasporton, pupon, petrolon,
 problemon, pafon, petardon,
 procenton, pulvon, pistolon,
 proverbon, pagon, ponardon...
 perukon, pladon, pedikon,
 pacon, paton, policanon,
 planedon, pakon, panikon,
 prismon, plumbon, porcelanon...
 pfenigon, pencon, pasteĉon,
 premion, plumon, pokalon,
 profesion, prozon, peĉon,
 prospekton, piedestalon...
 parlamoton, pantomimon,
 poŝhorloĝon, pulĉinolon,
 profesoron, pergaminon,
 pantalonon, pluvombrelon...

Post parado per *poumo*,
 punkton povas punkti plumo!

L. BACARDIT

* Premiita en la II^a Literatura Konkurso de la K. E. F.

Nia Kongreso

Ĝis la IV^a en Olot!

Vi, kara federaciano, kiu entuziasme per tiuj vortoj adiaŭdiris la amikojn ĉe la disiro post la Kongreso en Terrassa, sendube pretiĝas ĉeesti nian IV^{an}; kaj vi, federaciano ankaŭ, kiu ne povis partopreni la belajn festojn dum la III^a Kongreso, certe tiujn vortojn prononis, antaŭpromesante al vi ĉeeston en nia ĉiujara kunveno, kiu okazos en Olot post nur du monatoj. La tempo rapide forpasos de nun ĝis tiam; la tempo forrapidos kaj ni ĉiuj, federacianoj, ĝuos la festojn, kiujn niaj Olot'aj samideanoj preparas por ni.

Certe, ĉiu memoras la entuziasmajn vortojn de la reprezentantoj de «Olota Stelo» en nia lasta kongreso. Ili petis por si la organizon kaj okazigon de la jara festo de la K. E. F. en sia urbo, — kiu, kiel ankaŭ Reus, invitis oficiale la esperantistojn — por premii kaj kuraĝigi la laboremajn samideanojn de la norda regiono kataluna, kiuj akceptas la pezan taskon regali la kongresanojn per la festoj, kiuj fariĝis laŭ protokolo kutimaj ĉe la Kongresoj de nia Federacio.

Karaj amikoj! Efektive al multaj el vi estas nefacile, pro malproksimeco, veturi al nia kongresurbo; ja nia fervojreto ne faciligas tiun vojaĝon, sed ni petas ĉiun kaj stimulas, iri al Olot por montri la forton de nia disciplinema organizaĵo, kontribuante al la sukceso de la helpa lingvo, nia amata Esperanto, inter la loĝantoj de la ĝeronaj urboj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al nia afero. Vi pensu, ke la impresoj, kiujn kaŭzos la partopreno en nia Kongreso de granda nombro de esperantistoj estos des pli grava, ju pli da urboj kaj regionoj neproksimaj ili reprezentos, kaj la Olot'aj samideanoj povos prezenti tiun fakton tre elokventan al la konsidero de la ankoraŭ pri ideo de internacia lingvo dubantaj personoj.

Per la venonta numero de KATALUNA ESPERANTISTO ni publikigos la programon de la Kongreso kaj donos al niaj kunfederacianoj ĉiujn necesajn sciigojn, pri loĝado, veturado, k. c. Ni ankoraŭ unu fojon invitos niajn amikojn ĉeesti la IV^{an} Kongreson de la K. E. F. en Olot kaj ni esperas, ke malgraŭ tio, ke tiu urbo kuŝas en unu ekstremo de nia lando, la proksima ĉiujara festo de la Federacio estos ĉiurilate brila sukceso.

JOZEFO GRAU



Historio de Esperanto en Katalunujo

VILANOVA I GELTRÚ

1905. — 30^a Aprilo. — Mortis Sro. Jozefo Vidal Llopart, la unua esperantisto de Vilanova i Geltrú. Oni konservas lian esperantan bibliotekon en la Biblioteko-Muzeo-Balaguer.

1.^a Septembro. — Sro. Francisko Mestres malfermas en sia domo privatan kurson de Esperanto. Estis la unuaj vilanovaj lernantoj de la zamenhofa lingvo la laboristoj Sroj. Angelo Capitan, Jozefo García kaj Isidro Fusté.

1907. 29^a Januaro. — Kunsido de kelkaj esperantistoj en «Centre Català». Oni decidas la kreon de grupo kaj la malfermon de kursoj.

2.^a Februaro. — Unua priesperanta artikolo de Sro. F. Mestres publicita de la kataluna gazeto de V. kaj G. «Costa de Ponent».

16.^a Februaro. — Ekaperas en la kataluna gazeto de V. kaj G. «Costa de Ponent» la unua esperanta presado. Oni presas la gazeton ĉe la fama firmo Oliva kaj Kio.

24.^a Februaro. — Fondiĝo de la grupo *Laboro Esperanta*. Sinjoro Fr. Mestres estas nomata prezidanto.

28.^a Julio. — Unua okazanta en V. kaj G. priesperanta parolado de Sro. Rosals en «Centre Català»

4.^a Aŭgusto. — Unuafoje en Hispanujo oni donacas monan premion al verko esperanta. Dro. Bremón Masgrau gajnas en la Konkurso Literatura kaj Scienca de «Ateneu Vilanoví» la premion donacitan de kelkaj esperantistoj, per sia tradukaĵo de la versaĵo de Verdaguer, «La Cegueta».

1.^a Oktobro. — Sro. F. Mestres malfermas kurson de Esperanto en «Ateneu Vilanoví».

2.^a Oktobro. — Grava inaŭguro de esperanta instruado en la hora societo «L'Unió Vilanovina». Paroladoj de Sroj. Mestres, Vadull kaj Galceràn.

9.^a Novembro. — Publika parolado de Sro. Rosals en «Ateneu Vilanoví» pri Esperanto.

26.^a Decembro. — Parolado de Sro. Victor Oliva en la grupo «L. E.» pri la temo «La Gramatiko, eliro de la Civilizacio».

28.^a Decembro. — La fraŭlinoj ĉeestantaj la unuan kurson de Esperanto donacis tre belan standardon por la societo «L. E.»

1908. — 19.^a Marto. — Propaganda ekskurso al Sitges organizita de grupo «L. E.» kun ĉeesto de Sro. Rosals, el Barcelono, kaj Sro. Robreño, el Vilafranca del Penedès.

13.^a Aprilo. — La ĵurnalo «Diario de Villanueva y Geltrú» malfermas ĉiusemajnan Esperantan fakon en siaj paĝoj.

19.^a Septembro. — Inaŭguriĝas la «Esperantistaj Dimanĉoj» en la societo «L. E.»

1909. — 23.^a Januaro. — Oni nomas prezidanto de «L. E.» Sinjoron Jozefo Escofet.

29.^a Junio. — Unua trairo de l' standardo de la grupo «L. E.» tra la urbo, portata de Sro. Mestres, en la popola festo per kiu Vilanova honoras la eminentan verkiston Guimerà.

15.^a Oktobro. — Sro. Jozefo Escofet komencis kurson de nia lingvo en «Ateneu Vilanoví».

1910. 5.^a Aŭgusto. — Unuafoje en Katalunlando estas premia-taj la lernantoj de esperanta kurso en solena kaj publika kunsido, en kiu Sroj. Urbestro, Prezidanto de «Ateneu Vilanoví» kaj Mestres paroladas pri nia afero.

Malfermo de ekspozicio de esperantaj poŝtkartoj enlokigita en la grupo «L. E.» Oni sukcesis kunigi milon da poŝtkartoj plej diversaj.

8.^a Aŭgusto. — La eldonisto el Barcelono B. Baxarias publikigas en la kolekto «De tots colors», «Un Retrat», katalunan tradukon de la dramo «Portreto» originale esperante verkita de Nadina Kolovrat, kies tradukintino estas nia samurbanino Eulalio Rosell. «Un Retrat» estas la unua kataluna traduko de verko esperanta.

14 Aŭgusto. — Intima festeno en «L. E.» organizita de la Vilanova Esperantistaro en honoro de Fino. Eulalio Rosell, okaze de la eldono de «Un Retrat».

3.^a Oktobro. — Fino. Teresa Rosell en la grupo «L. E.» malfermas kurson de Esperanto kaj kataluna gramatiko.

15.^a Decembro. — «Laboro Esperanta» decidis aliĝi al K. E. F.

La komitato de «Laboro Esperanta»

TERESA ROSELL
Sekretariino

(Daŭrigota.)



III^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

XII. — *Premio de Lia senatana moŝto Sro. Frederic Rahola.*
 TEMO : Laŭvola. PREMIO : Unu volumo lukse bindita de la interesa hispana revuo «Mercurio».

Noto : La manuskriptoj por laŭvolaj temoj devas esti *originalaj*

«*Esperanta Semo*» el Sabadell donacis 30 ptojn (12 sm.) kaj

«*Supren!*» el Barcelono 5 ptojn (2 sm), por aldoni al la sumo da 28 spesniloj, kiun oni disdonos al la gajnintoj de la kvar ordinaraĵaj premioj.

RIMARKOJ. La partoprenontojn en la Konkurso ni avertas, ke la verkoj, kiuj estos laŭ la Verdikto de la Juĝontaro (kiu aperos en la Aprila numero de KATALUNA ESPERANTISTO), premiitaj aŭ menciitaj, apartenos al la Redakcio de K. E., kiu ilin publikigos laŭbezone. Tamen, ĝi volonte konsentos al la aŭtoroj, kiuj tion petos, permeson publikigi siajn verkojn.

Ni avertas ankaŭ, konsekvence de komuniko de la Prezidinto de la II^a L. K. pri verko, deklarita citinda, kiu estas plagiato de la kataluna versaĵo «Egloga» de Joan M. Guasch gajninta la Naturan Floron ĉe la barcelonaj Floraj Ludoj, la jaron 1908^{an}, ke ĉar estas neeble legi ĉion, kio publikigas ĉiulande, la respondeco pri plagiatoj, kiuj povos rezulti premiitaj apartenos entute al iliaj aŭtoroj.



Al la Barcelonaj Esperantistoj

Ĉar pro manko de tempo kaj pro granda nombro de esperantistaj societoj mi ne povis ĉiujn viziti, mi per ĉi tiuj linioj salutas ĉiujn kaj adiaŭas samtempe de katalunaj esperantistoj de *esperantista* urbo Barcelona.

La restado en Via bela urbo restas por mi neforgesebla precipe tial, ke la kultura celado de Via kataluna nacio tute similas al la nia, kiu uzis nian karan lingvon Esperanto kaj forsendis min, por ke mi informu la fremdlandon pri la «vera» stato de nia nacio, pri kiu niaj malamikoj ĉiutage disvastigadas en la ĵurnaloj nur *malveron*. Vivu Esperanto kaj doktoro Zamenhof, kiu per sia bela lingvo donis precipe al la malgrandaj nacioj ŝlosilon per kiu oni povas malfermi la koron de ĉiu bona homo, deziranta ekkoni la veron!

Barcelona la 28^{an} de februaro 1913.

Prof. AUG. PITLIK el Praha (Bohemujo)

BIBLIOGRAFIO

Un artista en Ajedrez. (Valentín Marín). Ensayo crítico por José Paluzié y Lucena. Con la traducción en Esperanto por Federico Pujulá y Vallés. Barcelona. Hijos de Paluzié. Editores. 1913. Precio : 2 pesetas.—Kio signifas : Artisto en Ŝakludo. (Valentín Marín) Kritika provoverko de Jozefo Paluzié kaj Lucena. Kun la Esperanta traduko de F. P. kaj V. Filoj de Paluzié. Eldonistoj. 1913^a. Prezo : 0.800 s.

Ĉar Valentín Marín estas fame konita de ĉiu homo, kiu sin dediĉas al la nobla ŝaka ludo, kaj sekve, ĉar biografio pri li estas internacie interesa, Sinjoro Jozefo Paluzié verkinte sian verkon opiniis, ke nepre la esperanta traduko devas akompani ĝin. Sinjoro Paluzié havas pasion : la Ŝakludon. Li estas aŭtoro de la fama *Manual de Ajedrez* (Lernolibro de Ŝakludo) verkita en hispana lingvo, kies tri volumoj entenas en siaj 1.054 paĝoj la plej rimarkindajn erudicion kaj konojn pri la arta ludo, kaj krom tio li estas fama kiel verkisto de ŝakproblemoj. Li estas posedanto de la dua — laŭ graveco — ŝakluda biblioteko en Hispanujo : centoj kaj centoj da volumoj en plej diversaj lingvoj, kies plimulto — malgraŭ la lingvaj konoj de nia distinginda amiko — restas por li tute nekompreneblaj. Per tio oni facile komprenos kiom multe efika estos lia Esperanta propagando inter ŝakludistoj, kaj lian fervoron por la internacia lingvo.

La verkon, per kiu li prezentis al la publiko 60 ŝakproblemojn siajn, li mem redaktis tute en Esperanto. Tiun ĉi li volis redakti hispane por la hispanlingvanoj, esperante por komplezi siajn tre ĝustajn teoriojn pri la eldonado de verkoj, kiuj krom la nacia havas internacian intereson. La sola eraro el tio ĉi kuŝas en la fakto ke pro siaj multaj okupoj li zorgigis min pri la traduko; ĉar oni povus pensi ke sinjoro Paluzié ne opinias — kiel li opinias efektive — ke la idealo estas verko kaj traduko de la aŭtoro mem; kaj ĉar ĝi ŝtelis de ni la okazon legi belstilan literaturajon.

La tradukinto, mi, ne havante la rajton de l'aŭtoro libere traduki, celis reprodukti kiel eble plej fidele la stilon de la verkinto kun la spirito de la hispana lingvo mem, ĉiam — kompreneble — ne flankigante de la spirito de Esperanto. Ĉu li prosperis, ne mi, nek «K. E.» povas diri.

Mi volas nur kaj fine rimarkigi preseraron, ĉar ĝi permesos al mi paroli pri, laŭ mia opinio, uzinda vorto. En la paĝo 88^a, aperas la vorto *publikado* anstataŭ *publicado*, kiun mi skribis. Oni facile komprenos, ke la aŭtoro ne deziras ke la amatoroj *entreprenu la publikigadon* de hispanaj ŝakverkoj, kiuj ne ekzistas, kaj sekve ilin oni ne povas *igi publikaj*; sed ke li deziras ke ili *entreprenu la publikadon*, agado, kiu konsistas el *kolektado, ordigo* de materialoj, *redaktado, verkado, presigado* kaj *publikigado* de la rezultanta libro. Ĉu ne estas sufiĉe granda la diferenco inter la *publikigisto*, kiu tamburas aŭ trumpetas leĝojn tra vilaĝoj kaj la *publicisto* jam uzita de Dro. Zamenhof — kaj inter la agoj de ambaŭ, por ke ni eltiru el tiu lasta la *publici* tre saĝe proponitan de Sro. Christaller?

Lingvaj Respondoj. (Nova serio). Doktoro L. L. Zamenhof. Paris. Esperantista Centra Oficejo. 51, rue de Clichy, 51. 1913. — Prezo : 0 fr. 75.

Ĝi entenas la prilingvajn respondojn de Dro. Zamenhof aperintajn en «La Esperantisto» (1889-1893) kaj «Oficiala Gazeto» (1911-1912), kiuj estis reprezentitaj de la Centra Oficejo en broŝuron por faciligi iliajn relegon kaj uzadon.

Tiun broŝuron, kies utilon kaj valoron ni ne bezonas laŭdi, ni insiste rekomendas al ĉiuj. Ĝi devas troviĝi en la libraro de ĉiu bona esperantisto.

Verkoj ricevitaj kaj recenzotaj:

Tra l' silento. Elektitaj poemoj de Edmond Privat. Universala Esperantia Librejo. 10, rue de la Bourse, Ĝenevo. — Moskva Librejo «Esperanto» 26 Tverskaja, Moskvo. — Prezo. Sm. 0,60.

Pri Estetiko en Medicino. Dro. Heliodor Świecicki. El Pola lingvo tradukis Mieczysław Czerwiński. T. E. K. A. Biblioteko N.º 1. - Varsovio. Prezo Sm. 0,30.

Kion Patrino povas suferi. Hendrik Conscience. Esperanta traduko de Frans Schoofs. Eldonejo de «Belga Esperantisto» Vondelstraat. 20. Antwerpen. 1913. Prezo : Sm. 0,20.

Karaktero. Laŭ Mr. J. M. Van Stipriaan Luŝcius advokato en Hago. Dua plivastigita kaj plibonigita eldono, tradukita de Sro. J. L. Bruiju, laŭ la 6.^a eldono de l'nederlanda originalo, kaj kontrolita de la Esperantista Literatura Asocio. Hago. 1913. Librejo «Espero». Prezo : Sm. 0,20.

Laborista klaso kaj socialismo. Marcel Cachin, Membro de la Pariza Urbeŝtaro. El la franca lingvo esperantigis L. Berland, urba konsilanto, kaj L. Vergnaud membro de E. S. F. I. O. — E. S. F. I. O. Paris, 49, Rue de Bretagne. 1912. — Prezo : Sm. 0,10.

El la domo tie kontraŭa. Skizo laŭ la vivo. Verkis Arnold Behrendt. Ricevebla de l'aŭtoro : Breslau 16, Maxstr. 22. Germanujo. Prezo : Sm. 0,10. (unu respondkupono.)

L'Esperanto Méthodique. — Cours complet par L. C. Deslaurier, professeur diplômé d'Esperanto. Paris. Presa Esperantista Societo. 33, rue Lacépède, 33. 1913. — Prezo : 1 fr. 25 (0 Sm. 500)

TAMEN

«La Svaba Esperantisto» — Der Schwäbische Esperantist.

Duonmonata gazeto por la divastigado kaj flegado de la lingvo Esperanto. — Oficiala organo de la «Virtemberga Esperanto-Ligo» kaj de la «Virtemberga Esperanto-Instituto» Esslingen a N. kaj ties «Patrona Societo». Of. Org. de la Virtemberga Sekcio de la «Germana Akademia Esperanto-Ligo». — Redaktoro : Dro. Zimmermann. Aperas en Schusseusied. Jara Abonprezo : Por Germanujo kaj Aŭstrio : 0,900 s. Por Eksterlando : 1. Sm. 2,50 s.



Respondo al unu rimarko

Pri la recenzo de Sro. Tamen rilate mian verketon, mi diras la jenon : Certe, jes, mi tre ĝojas ke la katalunoj ne bezonas tian pritrakton; mi ankoraŭ pli ĝojus kiam ni germanoj ne ĝin bezonus. Sed io bona ankaŭ estiĝis el tiu batalo kontraŭ kritikuloj de Esperanto : ni ekkonis pli profunde, ke ni estas sur bona vojo.

Rilate la esprimon *ĉi-studaĵo*, kiun mi uzis en la antaŭparolo, mi mem ne plu scias, kiele mia lingvosento ĝin trudis al mi. Eble pro tio, ke mi jam iajoje vidis la esprimon *ĉi kune* (germane *hiemit*) kiu estas kuntiraĵo el *kune kun tio ĉi* aŭ pro tio ke mi ofte emas uzi mallongigojn kaj mi opinias ke *ĉi* tre ofte povas anstataŭi la formojn *tiu ĉi*, *tie ĉi* ne kaŭzante konfuzon. Oni ja rajtas uzi ekzemple *ĉi-studo* anstataŭi *ĉia studo*, kaj mi tre ŝatas meĉi streketon inter vortpartoj kiuj povas ŝajni radikan vorton anstataŭ komponitan. Kiam do oni anstataŭas la kompletan, normalan formon *tiu ĉi* per *ĉi* kaj el tiu vorto formas *ĉi-a*, (kiun mi elparolus iom alie, malpli flue, ol ĉia), oni pli mallonge uzos *ĉi-studo* kaj la streketo estas same oportuna, kompren-helpa kiel ĉe piediranto, kiun neniu legos pie-diranto. Certe mi estus povinta uzi la normalan esprimon *la ĵena studaĵo* aŭ *la ĵen-studaĵo*.

Mi ankaŭ uzis unufoje en la dirita verketo (kaj ankaŭ alie) la esprimon *ti-kiu* anstataŭ *tiu kiu*. Mi kredas ke tiaj formoj, mallongigaj, iom post iom eniĝos en nian lingvon, ĉar mi opinias, ke praktiko kaj vivo estas pli potencaj ol regulo kaj teorio. Mi opinias, ke oni ankaŭ aliloke ŝanĝos la nunan kutimon, ekzemple kiam oni nun citas aron de artikloj, kiun vendas iu firmo, oni ĝenerale uzas la pli-nombran (multenombran) formon kaj tio ne sonas bele (indiferente ĉu oni uzas *-oj* aŭ idiste *-i*) tial persono, kiu ŝatas kaj sentas belsonon, preferos ĉe tia okazo kiel eble la ununombran formon, aŭ li inklinos uzi *oj da ĉevalo, bovo, ŝafo* kie oni povas laŭ bezono apostrofi la *-o*. Tiaj modifoj de regulaj formoj eble al neniu plaĉos, tiam ili pereos, aŭ ili plaĉos al kelkaj, tiuj ilin same uzos kaj iom post iom ili fariĝos regulo, kiel oni nun ĉie senĝene, ofte eĉ prefere, uzas *ĉi-tie* kvankam oni ĝin unue forte kontraŭbatalis, ĉar *tie ĉi* estis normala.

Mi finas miajn vortojn, dirante plenespere : «vivu Esperanto!»

P. CHRISTALLER



Tre interesa kaj bona por propagando — la letero de nia blinda rusa samideano Sro. Vas. Eroŝenko, kiu sola vojaĝis tra Eŭropo de Moskvo ĝis Londono. Ĝin publikigis «La Ondo de Esperanto» per sia numero de Januaro 1913.

ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Malgraŭ ke neordinare pluva vetero sieĝis en iliaj hejmoj la esperantistojn, la ĉambrego de la Popola Enciklopedia Ateneo sidejo de la grupo «Semo» estis la 25^{an} de pasinta Februaro tute plena de la samideanoj, kiujn la anonco de parolado pri urbo Praha altiris. Je la 10^a vespere Sro. Prof. Aug. Pitlik trairis la salonon, komenconte sian paroladon kaj brua aplaŭdado lin akceptis. Sro. Sucre, prezidanto de la P. E. A. prezentis al la ĉeestantoj la distingindan paroladonton, kiun poste Sro. Dalmau, prezidanto de «Semo», kore salutis nome de la barcelonaj esperantistoj. En tiu intertempo plipleniĝis ankoraŭ la festosalono, kaj ĉe ĝiaj pordoj scivole amasiĝis multe da starantaj personoj, plimulte, neesperantistoj.

Sro. Pitlik salutis komence niaurbajn samideanojn kaj per sia flua parolo informis nin pri la origino de la bohemoj, pri la rasoj en Bohemujo loĝantaj kaj travivigis de ni kelkajn historiajn okazintaĵojn. 180 bildoj unu post alia aperis sur la ekrano; pitoreskaj anguloj en Praha, riĉaĵoj multvaloraj, artaj konstruaĵoj, vidindaj panoramoj ravis la alestantaron, kiu ne ĉesis laŭdi la belan kolorigon de la bildoj, el kiuj plej multe plaĉis tiuj ĝardenaj. Post malgranda paŭzo — fotografisto dum ĝi impresis kliŝaĵon — la parolanto reprenis la interesan prezentadon de belefektaj bildoj, kaj montris al ni specimenojn de popolaj bohemiaj kostumoj, kaj de sokolaj gimnastikaj ekzercadoj. Tiuj ĉi mirigis per sia impona aspekto kaj oni tial plej atente aŭskultis la detalojn pri ili, kiujn Sro. Dalmau tradukis katalune por la personoj, kiuj ne komprenas Esperanton.

Fine, ni konatiĝis kun la bohemiaj dancoj, kiujn per kolorriĉaj bildoj prezentis al ni Sro. Pitlik, kiu per siaj lastaj vortoj montris la celojn de sia paroladvojaĝo kaj, dankinte la afablecon de la aŭskultantoj, stimulis ĉiujn al kuraĝa disvastigo de nia lingvo, kiel sola utila rimedo por kompreniĝoj internaciaj. Aplauĝego premis la bonan laboron de la paroladinto, kiu estis tre gratulata de la ĉeestantoj, pro la interesa parolado kaj la sukcesoj de li atingitaj dum sia vojaĝo.

La sekvintan tagon Sro. Pitlik vizitis la redakciojn de katalunaj ĵurnaloj, kaj estis akompanata de kelkaj esperantistoj tra nia urbo, kies interesaĵojn ili montris al li.

Al la gratuloj kaj bondeziroj, kiujn vi ricevis, ni aldonas, kara bohema samideano, niajn plej varmajn. — J. G.

— La societo «Esperanto kaj Patrujo» informas ĉiujn esperantistojn, ke ĝi malfermis superan kurson de Esperanto, kiun klarigas Sro. Delfi Dalmau, profesoro de K. E. F. Al ĝia sidejo — str. Correu Vell, 5. — povas sin turni ĉiuj personoj havantaj ian prilingvan dubon. Por ricevi respondon oni bonvolu aldoni poŝtmarkon. En la sama societo la 4.^{an} de Februaro Sro. Ildelfons Rius komencis elementan kurson, kiu okazas de 9.^a ĝis 10.^a vespere mardojn kaj ĵaŭdojn. Ĉeesto en ambaŭ kursoj estas senpaga.

En ĝenerala kunveno la 19.^{an} de Januaro «E. kaj P.» elektis la jenan komitaton: *Prezidanto*, Sro. Johano Blanch. *Vicprezidanto*, Sro. Petro Domenech. *Sekretario*, Sro. Johano Viñas, *Vicsekretariino*, Fino. Karmeno Sandalinas. *Kasisto*, Sro. Jozefo Mateu. *Bibliotekistino*, Fino. E. Fontanillas. *Membroj*, Sroj. Domeniko Bayarri kaj Jako Romagosa.

— *Espero Kataluna* organizis por siaj geanoj maskobalon, kiu brile okazis en ĝia sidejo la 1.^{an} de Februaro.

— La *Esperanta Grupo Supren!* en ĝenerala kunsido, elektis la jenan komitaton: *Prezidanto*, Sro. Francisko Piñol. *Vicprezidanto*, Eŭsebio Durán. *Sekretario*, Sro. Jozefo Guilleumot. *Vicsekretario*, Sro. Tomazo Fraile. *Kasisto*, Sro. Felipo Bonjoc. *Vichasisto*, Sro. Salvadoro Micoła. *Bibliotekisto*, Sro. Manuelo Monguió, kiuj je la nomo de la Grupo salutas ĉiujn gesamideanojn. La grupo deziras profesoron de Esperanto; informoj estas donataj mardojn, ĵaŭdojn kaj dimanĉojn de la 9.^a ĝis la 10.^a vespere ĉe ĝia sidejo, str. Muntané, 6.

— Por solenigi la trian datrevenon de sia fondiĝo, *La Rondo* okazigos, la 15.^{an} kaj 16.^{an} de tiu ĉi monato, esperantistajn festojn.

OLOT

La malfermo de nova kurso de Esperanto, kiun donas la Vicprezidanto de *Olot Stelo*, okazis la 18.^{an} de Februaro. La kurso havas lokon en la societa sidejo la lundojn, merkredojn kaj vendredojn de 9.^a ĝis 10.^a vespere.

«O. S.» elektis el siaj geanoj komisionon speciale difinitan por akiri standardon por la grupo.

La 17.^{an} de Februaro formiĝis la Olotregiona fako de la Hispana Societo «*Esperanto kaj Ruĝa Kruco*», kies prezidanto estas nia bona amiko Sro. Garganta.

La nove elektita Komitato de *Olot Stelo* konsistas el la sekvantaj gesinjoroj: *Prezidanto*, Sro. Jozefo M.^a Garganta. *Vicprezidanto*, Sro. Pere Roqué. *Sekretario*, Sro. Manuelo Prat. *Vicsekretariino*, Fino. Maria Escubós. *Kasistino*, Fino. Concepció Vayreda. *Bibliotekisto*, Sro. Candi Agustí. *Membroj*, Sroj. Jozefo Boix, Pere Cuscoy.

— Sinjoro J. M. Garganta, Prezidanto de «Ĝ. E. L.» sendis al la Komitato de «K. E. F.» por publikigo la jenan

REGULARON de la IV.^a KONGRESO DE «ĜERONA ESPERANTA LIGO»,

kiu okazos en Olot la 11.^{an} kaj 12.^{an} de Majo 1913.

ARTIKOLO 1.^a Ĉiu esperantista grupo aŭ izolita samideano povos aliĝi al la Kongreso posedante la aliĝilon (Kongreskarton). — 2.^a La Kongreskartoj

kostos : Por la grupoj 10 pesetojn, por ĉiu esperantisto 2 pesetojn. — 3.^a La kongreskartoj rajtigas al sia posedanto ĉeesti ĉiun kunvenon de la Kongreso. — 4.^a Projektojn aŭ proponojn por ilia aprobo nur povos prezenti la Grupoj aŭ apartaj samideanoj enprovincaj, aliĝintaj al la Ĝ. E. L. Ili devas esti senditaj al la Organiza Komitato antaŭ la 30^a de Marto. — 5.^a Tuj kiam la Organiza Komitato estos ricevinta la diskutotajn proponojn aŭ projektojn, ordigos ilin, kaj sciigos laŭpove al ĉiu enprovinca grupo. — 6.^a Ĉiuj geanoj de Ĝ. E. L. posedantaj la kongreskarton, havos la rajton : 1.^e Ricevi senpage la Memorigaĵon-Jarlibron. — 2.^e Diskuti kaj voĉdoni la proponojn. — 3.^e Ricevi fervojan rabatilon, uzeblan ĉe la vagonaro «Olot a Gerona». (La Organiza Komitato klopodos kaj fidas ilin atingi de la ĉefdirektoro de tiu fervojo). — 7.^a La estraro de la Kongreso konsistos el la Direkta kaj Konsulta Komitatoj de Ĝ. E. L. kaj Organiza Komitato de la IV^a. — 8.^a Ĉar la celo de Ĝ. E. L. estas varmigi Esperanton estas dezirinde ke la diskutotaj proponoj aŭ projektoj estu skribitaj per la Zamenhofa Lingvo. — Olot, Februaro de 1913^a. — LA ORGANIZA KOMITATO. — *Prezidanto*, Sro. Josep M.^a Garganta; *Vicprezidanto*, Sro. Candi Agustí; *Sekretario*, Sro. Anton Fortet; *Kasisto* : Sro. Manuel Prat; *Financisto* : Sro. Pere Roqué; *Membroj* : Fino. Maria Escubós, Fino. Concepció Vayreda, Sro. Josep Boix kaj Sro. Pere Cuscoy. — *NOROJ*. — 1.^a Alsendinte 1^o20 pesetojn, oni tuj ricevos aliĝilon (Ĝ. E. L.-a Membrokarto). 2.^a Nur la geanoj de Ĝ. E. L. aliĝintaj antaŭ la 30^a de Marto estos enskribitaj en la Memorigaĵo-Jarlibro. 3.^a La Kongreskartoj kaj Ĝ. E. L.-a Membrokarto estas haveblaj ĉe la kasisto de Ĝ. E. L. (Sro. J. Vilá. Vinkomercisto. Olot). Ilian koston oni povas sendi per poŝtpagilo (kie tio estas ebla) aŭ poŝtmarkoj 5-10-15 centimaj).

REUS

En lasta ĝenerala kunsido la grupo «Nova Semo» elektis la Direktan Komitaton sekvantan : *Prezidanto*, Sro. P. Aguadé. *Vicprezidanto*, Sro. Enric Aguadé Parés. *Kasisto*, Sro. F. Simó. 1.^a *membro*, Fino. Teresa Barrufet. 2.^a *membro*, Fino. Jozefino Felip. *Bibliotekisto*, Sro. S. Castellví. *Vicbibliotekisto*, Fino. Teresa Estela. *Sekretario*, Sro. F. Baró. *Vicsekretario*, Sro. J. Garcia. *Konsilisto*, Sro. A. Clivillés.

Ekskursaj fakoj : *Prezidanto*, Sro. Nil Alsina; *Vicprezidanto*, Fino. Magdaleno Domingo. *Membroj*, Finoj. Antonino Serra, Jozefino Anguera, Sroj. Batlle, F. Terrafeta, F. López. — *La Delegito*.

RUBÍ

La esperantistoj el Rubí malfermis esperantan kurson, kiu estis favorata de granda nombro da junuloj kaj fraŭlinoj. Ili ariĝis en la grupo «Esperanta Burĝono» kiu sidas ĉe la strato Unió n.º 1. — *J. Ratés*.

K. E. salutas kaj kuragiĝas tre kore la novajn amikojn.

TARRAGONO

«Tarragono Esperanta» faris la 23^{an} de lasta Januaro gravan kunvenon por elekti la duonon de la Direkta Komitato, kion laŭ regularo oni faras ĉiujare.

Pli ol kvindek personoj ĉeestis, inter kiuj, kelkaj neesperantistoj eble altiritaj de la invito publikigita.

Sro. Agustí faris paroladon pri la praktikaj kursoj donitaj ĉitujare, kaj Sro. Obiols parolis pri la financa stato de la grupo. Poste Sro. Montserrat rakontis pri la grupoj vizititaj dum la someraj ekskursoj de «T. E.» kaj fine oni legis la nomojn de la elektitoj por formi la komitaton, kiu restas jena:

Prezidanto, Sro. D. Obiol. *Vicprezidanto*, Sro. F. Agustí. *Kasisto*, Sro. P. Huecas; *Kalkulisto*, Sro. M. Alegret; *Sekretario*, Sro. J. Montserrat; *Vicsekretario*, J. Alborná. *Bibliotekistino*, D. Roig. *Membroj*: Finoj. F. J. Muntané, T. Balart kaj D. Navarro.

Ankaŭ oni elektis la komisionojn de propagando kaj ekskursoj kaj nomis korespondanto en Reus, Sron. Jozefo Vidal. — *La Delegito*.

TORELLÓ

Kelkaj junuloj el tiu ĉi urbeto entuziasmaj al nia sankta afero decidis venigi ĉiudimande esperantiston el la Manlleu'a societo «Esperantista Amikeco» kaj estis elektita por ilin instrui Sro. B. Nogué profesoro kaj fondinto de la Societo Manlleu'a supre citita. Nune li finis la kurson kaj ĉiuj kune profesoro kaj lernantoj decidis fondi grupon kaj aliĝi al nia Federacio.

* * *

La *Kataluna Grupo Esperantista de Paris* kunvenos ĉiusabate, de la 9.^a ĝis 11.^a vespere, ĉe «Café du Départ», boulevard St-Michel (angulo de la rue Gay-Lussac). Sekretario: F. Fernández, 3, rue Budé, Paris (4.^e).

★ ★ ★

Alilanda Movado

En ĉiuj landoj Esperanto senĉese kaj konstante progresas. La manko de loko malpermesas al ni informi ĉiujmonate la federacianojn pri la movado en aliaj landoj, kaj tial ni nur pri la enlanda ilin sciigas, montrante samtempe al la eksterlandaj samideanoj la staton de nia ideo en Katalunujo. Sed ni volas hodiaŭ raporti pri kelke da gravaj pruvoj de nia forta vivado, kiuj kuraĝigante la esperantistojn, prezentas faktojn montrindajn al la konsidero de la indiferentuloj, kiujn ofte konvinkas pli multe la eksterlandaj ol la enlandaj aferoj, pro tio ke «propra supo brogas, — fremda allogas».

La 9.^a Internacia Kongreso de Esperanto, kiu pro specialaj cirkonstancoj ne povos okazi en Genova, okazos en Bern, ĉefurbo de Svisujo ĉe la fino de Aŭgusto nunjara. Oni aŭguras al ĝi tre grandan sukceson, ne nur tial ke ĝi havos lokon en lando tiel vizitinda, sed ankaŭ ĉar la germanaj samideanoj

ĉestos ĝin grandnombre partopreninte en la 8.^a Germana Esperanto-Kongreso, kiun ili faros en Stuttgart en la antaŭa semajno. Alia Kongreso, tiu de la Federacio de la grupoj esperantistoj de Norda Francujo, okazos en Douai (Francujo) la 1.^{an} de Junio; ĝin prezidos Sro. Rollet de l'Isle, prezidanto de la Franca societo por la propagando de Esperanto. Sialflanke la belgaj samideanoj, kies Kongreso okazos en Spa, ĉestos ankaŭ kaj sukcesigos la Internacian Esperantistan Semajno-Kongreson, kiu havos lokon en Gent de la 14.^a ĝis 20.^a de Aŭgusto, dum la Internacia Ekspozicio.

Por tiuj kongresoj estas en preparo belaj festoj, per kiuj la organizantoj celas allogi ankaŭ la neesperantistojn : eldono de poŝtkartoj kun vidaĵoj kaj alegorioj, glumarkoj, kongreslibroj; baloj, teatraj prezentadoj kaj koncertoj, ĉio ĉi estos proponita al niaj samideanoj, kiuj partoprenos en la anoncigitaj Kongresoj. Krom tio aludita la germanaj esperantistoj preparas ion, kio havos specialan signifon por la ideo de Esperantismo. La *Germana Esperanto-Asocio*, sin turnis, pere de la ĉiulandaj gazetoj, al plej konataj eminentuloj ĉiufakaj, petante ilian opinion pri la ideo de mondlingvo, eĉ se ĝi estas malfavora por Esperanto. Tiujn opiniojn oni presigos nacilingve kaj Esperante en la Kongreslibron, kiu fariĝos tial tre valora dokumento.

Aliparte, la Propaganda Ligo *Parkurbo Esperanto*, per cirkulero, kiun ni ne povos publikigi, informas nin pri sia agado kaj sukcesoj. Ĝi ricevis multe da laŭdoj kaj kuraĝigaj leteroj de plej distingindaj amikoj de Esperanto kaj la lotleteroj de la Societa loterio estas multe aĉetataj pli ofte de personoj, kiuj ne celas profiti je la gajnoj sed subteni la entreprenon. Ĝis la fino de 1912^a enskribiĝis en la Ligo 3782 personoj, kaj tiu nombro sufiĉe kreskis ĝis nun. La sukceso de la entrepreno vidiĝas tiel certa, ke baldaŭ en tiu ĉi printempo oni komencos la konstruadon de la Parkurbo; ni ne bezonas rekomendi al niaj legantoj, ke ili subtenu la laboron de la Ligo aligante al ĝi kaj aĉetante la lotbiletojn.



Ni atentigas la K. E. F.-anojn pri tio, ke kvankam la februara numero de K. E. estis presita akurate, ĝi ne povis esti tuj dissendita pro ĉirkonstancoj nedependantaj de la Redakcio.

KORESPONDADO

Redakcioj de «Svisa Espero», «Orienta Azio» kaj «Časopis Českych Esperantistů» : Viajn anoncojn ni aperigos en venontaj numeroj.

LA KOMITATO DE LA «K. E. F.», KUN LA CELO
PLIRIĈIGI LA FEDERACIAN KASON KAJ EBLIGI
LA ENTREPRENON DE PLI GRAVAJ PROPAGANDOJ,
ELDONIS UNUAN SERION DE KELKAJ MILOJ DE
MARKOJ, KIUJN CERTE ELĈERPOS LA FERVORO
KAJ ENTUZIASMO DE LA GRUPOJ.

ĜI ESPERAS, KE ĈIU GRUPO AĈETOS ALMENAŬ
KVINCENTON DA ILI, KAJ ILIN ALGLUOS SUR
ĈIUN KOMUNIKAĴON, CIRCULERON, PROPAGAND-
ILON, K. T. P.

ĈIU MARKO KOSTAS 1 CENTIMON NUR. ONI VENDAS
ILIN JE FOLIOJ DE 50 SPECIMENOJ.

SIN TURNI AL SRO. J. PIFERRER, STR. GRACIA, 12,
SABADELL

SENDU MONON KUN LA MENDO, PER POŝTMARKOJ
AŬ POŝTPAGILOJ.

ALIAJ ELDONAĴOJ PUBLIKIĜOS, KIAM ĈI TIU ESTOS
ELĈERPITA.

KOMUNIKU IDEOJN AL LA KOMITATO!

Ni rekomendas la abonon al

LA PLEJ MALNOVA
EL ĈIUJ ESPERANTAJ GAZETOJ
(FONDITA EN 1895)

La plej enhavoriĉa! La plej malkara!

Lingvo Internacia

Centra Organo de la Esperantistoj

Th. Cart

Ĉefredaktoro

APERAS REGULE ĈIUMONATE

48 paĝoj da plej bona teksto!

Jara abono : 5 fr. (2 Sm.)

Specimena numero por unu respondkupono

Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika por Junuloj
Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

P. de Lengyel

Ĉefredaktoro

Jara abono : 3 fr. (1 Sm. 200)

Specimena numero por unu respondkupono

Lingvo Internacia kaj Juna Esperantisto kune

Jara abono : 7 fr. (2 Sm. 800)

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue de Lacépède. — Paris

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO

— fondita en la jaro 1909 —

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj «*Princo Serebrjaniĵ*» kies prezo por ne-abonintoj estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donace belan Esper. libron: *Orienta almanako el la lingvoj japana, ĥina, araba, ĥinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p., k. t. p.* «La Ondo» aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16 — 24 paĝ. Formato 17 X 26. Bela kovrilo. Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.) Anonco en «*Koresp. Fako*» 3 respondkuponoj La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm). oni sendu al librejo «*Esperanto*» (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando) aŭ al aliaj Esperanto-librejoj — poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko.

*Oni abonas «La Ondo» 'n ĉe la Administracio
de «K. E.», str. Gracia, 12. — SABADELL*

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
KATALUNUJO

Red. : Frederic Pujulà
Sek. de Red. : Josep Grau

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *Internacie nekomprenebla.* — *Grava Okazintaŝo.* — *III^a Literatura Konkurso de la K. E. F. Verdikto.* — *IV^a Kongreso de K. E. F.* — *Historio de Esperanto en Katalunujo*, Teresa Rosell. — *Olot : Kelkaj notoj pri la Kongresurbo*, J. Domenech Alberich. — *Enlanda Movado.* — *Korespondado.*



JARO IV^a

APRILLO 1913^a

N^{ro} 4 (37)

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al la "Kataluna Esperantista Federacio"

Badalona Stelo	Badalona
Barcelona Stelo	Barcelona
Casino del Comercio	Terrassa
Ciam Antaŭen	Barcelona
Escola Universitaria	»
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Esperanta Amikaro	Banyolés
Esperanta Aŭroro	Barcelona
Esperanta Fako (secció del Ĉ. A. de D. del C. i la I.)	»
Esperanta Frateco	»
Esperanta Idealo	Santa Coloma de Farnés
Esperanta Juneco	Barcelona
Esperanta Nesto	Barbarà del Vallès
Esperanta Racionala Grupo	Barcelona
Esperanta Semo	Sabadell
Esperantista Amikeco	Manlleu
Esperantista Grupo	Mataró
Esperantista Junularo	Terrassa
Esperanto kaj Patrujo	Barcelona
Evolucio	»
Forigu Barojn	»
Fraterna Kunigo	Reus
Frateco	S. Feliu de Guixols
Frateco	Vendrell
Ĝeronprovinca Esperantista Ligo	Girona
Ĝerona Espero	»
Ilerda Espero	Lleida
Instituto por la disvastigado de l'esperanta gazetaro	Barcelona
Kampero	S ^{ta} Perpetua de la Moguda
Kulturo	Barcelona
Laboro Esperanta	Vilanova i Geltrú
Laboro kaj Kulturo	Calafell
La Rondo	Barcelona
Lumon	Terrassa
Malestraro (U. F. N. R. Dte. II)	Barcelona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Novan Vojon	Barcelona
Nova Semo	Reus
Nova Harmonio	Torelló
Olota Stelo	Olot
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Paco kaj Amo	Palafrugell
Semo (Ateneo E. P.)	Barcelona
Semo	Buenos Aires
Supren!	Barcelona
Tarragono Esperanta	Tarragona
Unió Catalanista	Barcelona
Universala Frateco	»
Verda Stelo	Flix
Vika Esperantistaro	Vic
Vojantaŭen	Mollet

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Red. : FREDERIC PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEP GRAU

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Internacie nekomprenbla.* — *Grava Okazintaĵo.* — *III^a Literatura Konkurso de la K. E. F. Verdikto.* — *IV^a Kongreso de K. E. F.* — *Historio de Esperanto en Katalunujo*, T. Rosell. — *Olot : Kelkaj notoj pri la Kongresurbo*, J. Domenech Alberich. — *Enlanda Movado.* — *Korespondado.*

PRI...

GRAMATIKA STILO (SINTAKSO) KAJ
STILO (SPEGULO DE L'PERSONECO)

MI legas kun surprizo en «Oficiala Gazeto» 5.^a jaro. - n.^o 8 Februaro (Bulteno de «Esperantista Literatura Asocio») la jenon :

«E. L. A.» estos danka, se multaj gazetoj presigos la regularon, ĉar la celo de E. L. A. ne ankoraŭ estas sufiĉe konata aŭ ŝatata.

Ni tion vidis en recenzo de «Kataluna Esperantisto» Nro 34, pri *Rikke-Tikke-Tak*, trad. de M. Posenaer.

La recenzo opinias ke tia bona verko ne bezonas la rekomendon de granda unuiĝo, kies anoj ne ĉiuj estas famuloj. Tio donas al ni oportunan okazon iom paroli pri nia labormaniero...»

Ni surpriziĝis, ĉar ne nur nia recenzisto ne opiniis tion, sed

ankaŭ ĉar post la recenzo li longe korespondadis kun Sinjorino Hankel klarigante sian ideon tiel sincere kaj detale ke ĉiu dubo fariĝis neebla.

La seriozeco de nia gazeto postulas ke ni remetnu la demandon en sian lokon kaj mi profitos la oportunan okazon, kiun liveras al mi tiu bedaŭrinda eraro, por diri publike mian opinion pri E. L. A. kaj similaj kontraŭartaj asocioj.

Unue, mi volas represigi la tekston de la recenzisto por ke la leganto povu facile konstati la neĝustecon de la E. L. A. - a raporto.

Mi legas sur «Rikke-Tikke-Tak» la jenajn vortojn: «Rekomendita de la Internacia Unuiĝo de Esperantaj verkistoj». Kion povas signifi tion ĉi! Laŭ mia opinio, post legado de la bona verko, ĝi estas nur rekomendo por la Unuiĝo mem; ĝi montras ke la «Unuiĝo de verkistoj» sciis vidi la bonecon de la tradukaĵo; sed ĝi tute ne estas pasporto. Alia afero estus se la rekomendon subskribus, por ekzemplo, Sinjorino Hankel mem persone aŭ multaj el la membroj de tiu Unuiĝo. «La organizado de la intelekta laboro per la Ponto», la verko pri Dürer, jen verkoj bone rekomenditaj. Sed rekomendo de Unuiĝo de Verkistoj, kio ĝi estas? Ĉar ne sufiĉas esti verkisto por rekomendi; fariĝas necese, esti ankaŭ bona. Kaj tion ĉi ni nur scios per la nomo de la aprobinto. Mi vidas sur la listo de la membroj «verkiston», kiu presigis en verkon sian jenajn frazojn: «li forlasis la duan vagonfakon» (por: la duaklasan), «pruntedandis» (por: pruntepetis) «dum vespere», «sin kroĉi per amo kaj rifuĝo» «aŭreolo de malgajeco, kiel kaperista aro aŭ strofa kastel-mastrino, kiu atendas sian trubaduran amanton» «Senmeĉaj lumetoj kiuj nur vitronebuligas» «la feliĉegulo pli feliĉegula» (por: la malsaĝulo plej malsaĝa) «la pentrajelmontrejo alproksimiĝis» (por: la dato de la Ekspozicio alproksimiĝis), k. t. p., k. t. p.

Ĉu ankaŭ tiu lingva vandalo rekomendas la verkon de fraŭlino Posenauer? La estimata sekretariino de la sepa agus pli bone irante tute sola! — Mi scias tamen, se mi ne eraras, ke speciala komisiono zorgas pri la tralegado de la verkoj al ĝi submetitaj, Tial, ĉu nia Reĝino Sino. Hankel ne opinias ke estus bone konigi la personojn? Tiam ni povus danki tiujn, kiuj prenis sur sin tian danĝeran taskon, kaj ilia rekomendo estus efektive garantio invitanta al la legado de verko.¹

La recenzisto konis do tre bone la regularon de E. L. A. ĝian labormanieron kaj celon, kaj li tute ne opiniis, ke ĉar ne ĉiu ano de E. L. A. estas famulo, la bona verko de fino. Posenauer ne beronis la rekomendon.

Cetere, la ideo pri E. L. A. ne estas nova. Ĝi prezentigis jam en nia nacia Kongreso de Tarragono, kaj ĝi estis unuanime malakceptita

1. Redaktinte la antaŭajn vortojn, mi legas sur la Bulteno de la «Esperantista Literatura Asocio» (Oficiala Gazeto Esperantista) tre spritan kaj amuzan difinon pri verkisto, kiu plipravigas mian diron.

kun la kontraŭa voĉo de la proponinto mem. Ni do ĝojas, ke en tiu ĉi afero, ne nur nian personan opinion ni elmontras sed ankaŭ tiun de nia propra Federacio.

La demando, aliflanke, ne kuŝas nek kuŝos en tio ĉu ĉiuj membroj de E. L. A. estas aŭ ne famuloj. Jam estas pruvite, ke almenaŭ unu el ĝiaj membroj tute ne konas gramatikon, kaj sekve ke oni rajtas sin demandi ĉu ankaŭ tiu persono rekomendas, kaj ke oni rajtas konsili ke tiu rekomendo estu subskribita de konitaj personoj. Rekomendo estas ĉiam antipatia kaj malfavoras la rekomenditaĵon; sed rekomendo anonima superas ĉian strangaĵon.

Ni tamen tre facile akceptos ke ĉiu senescepte membro de E. L. A. estas ne nur famulo sed eĉ eminentulo. La granda plimulto el ili ja estas gravaj esperantistoj, kiujn ni respektas kaj admiras! Ni akceptos, ke ĉiuj estas gravaj. Ĉu ilia kolektiva agado estos malpli malbona? Tute ne.

Se nia literaturo devas esti algebra, pala, malvarma, senkolora afero, tiam estas akceptebla la rolo de korektanta tekstojn Asocio, sed en tiu okazo la plej bona afero estus tute rezigni la esperon havi literaturon kaj lasi nian lingvon en la manoj de komercistoj al kiuj tre utilis oficejo por korektado de anoncoj kaj prospektoj: Oni povas tre honeste esti komercisto, bezoni redakti afiŝon kaj ne koni sufiĉe la lingvon. Sed oni ne povas honeste (arte parolante) entrepreni artan verkon nekonante la lingvon, per kiu oni verkos ĝin. Ĉar tiu verko nepre havos neniun el la personaj karakteroj, kiuj valorigas la artaĵojn, ĉar la stilo de la verkisto aperos subpremata de la malfacila uzado de la instrumento per kiu li laboris, ĉar tiu verko estos osto sen karno, karno sen spirito, spirito sen flugiloj.

Se la verko entenas unu aŭ du erarojn — ili tute ne ĝenos la leganton, ĉar la grava afero estas la fundo, ne la formo de l' artaĵoj. Cetere, por korekti akuzativan formon aŭ forigi nekorektan vorton, sufiĉas unu amiko¹. Sed se la verko entenas amason da eraroj, oni tuj povas certigi, ve la verko estas malsprita, ĉar nur malspritaj neinteligentaj personoj povas kuraĝi verki artan tekston per lingvo, kiun li ne profunde konas. Korekti tiajn verkojn, eltordi ĝiajn frazojn alnajli al ili flikaĵojn, estas kvazaŭ aldoni lignan kruron al lamulo, platenan gorĝon al sengorĝulo, feran hokon al senmanulo. En la vivo oni bezonas iri, manĝi, kaj preni; sed de neniu estas postulita la verkado de libro, kaj oni ne devas esti sentimentala en la arta mondo.

1. En naciaj presejoj sufiĉas la provkorektisto.

Ni ne bezonas hospitalon de kripluloj; ni ne devas ilin konstrui se ni ne volas ridigi la artistojn de ĉiuj nacioj.

En neniŭ lando en la mondo oni vidis similan aferon! Ĉu oni imagas la ridegon per kiu estus akceptita en Literatura Asocio franca aŭ germana, la membro, kiu sin prezentus kun libro plena de gramatikaj eraroj? Oni sendus lin al lernejo. Kial do ni devas milde kaj kove senfine padeli sur nebonaj tekstoj por atingi neartan produktadon? Ĉu, okaze, nur la nombro de niaj eldonaĵoj antaŭenpŭsos la movadon?

La principa eraro el ĉio ĉi, kuŝas en la grava konfuzo inter Grammatiko kaj Stilo. Nia kolego Sro. Grau verkas nun artikolon¹ pri tiu grava demando, kiun mi nun nur pritraktos de ĝenerala vidpunkto. La stilo havas kun grammatiko samajn rilatojn kiel la maniero peniki havas kun kolora teorio: tio estas, neniun. Se por atingi verdon mi miksas ruĝon kaj nigron oni povos instrui min kaj korekti mian eraron, sed pri la miloj da nuancoj, kiujn mi atingos per bluo kaj flavo, kaj pri la maniero loki la farbon sur la tolon, oni ne povos korekti min sen grava peko kontraŭ mia personeco kaj kontraŭ la verko mem.

Kial do fari konfuzon inter grammatiko kaj stilo? Se mi uzas akuzativon ĉe la subjekto, mi ne pekas kontraŭ stilo, sed kontraŭ grammatiko. La stilo de verkisto povas esti bona aŭ nebona; laŭ sia stilo li estos ŝatata, kaj lia stilo karakterizos lin². La grammatikeco de verkisto nepre devas esti bona; se ne, li ne estos verkisto.

Similan konfuzon oni faras pri naciismoj, kaj tamen la demando ĉi tie estas ankoraŭ pli klara. Se mi diras «tiu, kio venas» kiel oni diras katalune, ne naciismon, sed grammatikan eraron mi faras. Naciismon mi faras, se ekzemple, por diri ke iu agas neĝuste kaj mallerte mi diras «ke li metas la piedojn en la sitelon». Eble tiu ĉi esprimo izolita estos nekomprenebla de aliaj krom Katalunoj, sed en arta teksto, kie ĝi respondos al la ĝenerala ideo, ĝi povas esti pli klara ol la plej vulgara kaj ripetita esprimo. Kial do mi forigos aŭ ne uzos ĝin nur tial, ke ĝi estas naciismo³? Ĉu ni ne devas permesi, ke la

1. *Per ĝi li pritraktos la antaŭparolon de la Krestomatio, kiun ŝajne ne ĉiuj bone komprenas.*

2. Vidu kiel majstre kaj genie la stilo de Zamenhof estas malsama en la tradukoj de La Biblio, kaj Rabistoj, kaj en liaj kongresaj originalaj paroladoj!

3. *Sed kiel mi povas scii ĉu tiu aŭ alia esprimo estas naciismo nekomprenebla de ĉiuj nacioj? Ĉu mi devas koni ĉiun lingvon el la mondo? Kial en tiu okazo mi bezonas Esperanton? Ĉu ne sufiĉas la gramatika korekteco kaj la teksta*

naciismoj, kiuj estas la riĉaĵo de la naciaj lingvoj venu flue en nian literaturon riĉigi ĝin, aŭ ĉu ni devas verki tiel vulgare senimage, malvarme, plate kaj meĥanike, nur por ke neinteligentaj homoj komprenu nin,... kaj por ke spritaj homoj, tedite forĵetu niajn tekstojn? Post tio ĉi oni venos al la konkludo ke ankaŭ ni ne povas diri ke la penso flugas, ĉar ĝi ne havas flugilojn kaj ni devos preni ĉiun vorton kun la korseta difino de la vortaroj. Mi ne scias ĉu tio estas la idealo de lingvo, sed mi certigas ke tio ne estas la idealo de literaturo.

Aliflanke, per tiu sistemo povas okazi tio, kio jam okazis al E. L. A., ke persono povis defendi la tekstojn, kiujn oni al li korektis, per tekstoj de la Majstro mem!

Ne, oni ne devas korekti! Oni ne devas korekti la stilon ĉar tio estas herezio kontraŭ arto. Oni ne devas korekti fuŝitajn tekstojn, sed sendi la verkiston al la kursoj, kie oni klarigas nian lingvon.

La recenzistoj frapu senkompate ĝis kiam nur lertuloj kuraĝos trempi la plumon en inkon; sed oni ne kuraĝigu patrine la nelertulojn dirante al ili : «venu miaj karaj kun viaj difektajoj al nia riparejo; venu kun viaj kripligitaj filoj; de ni ili foriros kun centpatra spirito certe, sed ili aspektos kiel sanaj.»

Unuigi la stilon, unuigi la artan senton estos tro, almenaŭ por nia latina temperamento. Disciplino, militisteco ne konvenas al artistoj. La teorio de l' koloroj estas pli internacia ol nia gramatiko mem, kaj tamen, kiom da skoloj, kiom da stiloj, en pentrarto!

La beleco de naturo kaj la fonto de la vivo troviĝas en diverseco ĉe unueco. Sufiĉu al ni la ĉenojn de la gramatika unueco kaj ni benu ilin; sed ni ne alnajlu ilin al la muro de unu stilo. Libereco, LIBERECO, LIBERECO!!

FRED. PUJULÀ

INTERNACIE NEKOMPREENBLA

Mi viŝis miajn manojn per la tuko alkrōĉita al la muro, inspektante je la spegulo ĉu mia kombajo estas korekta. En la apuda salono, la partoprenantoj en la festeno prenas siajn lokojn ĉirkaŭ la tablo prezidata de du fremdaj samideanoj. Bruo de seĝoj, de manĝilaro. Mi rapidas al mia loko, sed du fingroj ankoraŭ malsekaj tenas dorsan butonon de mia redingoto kaj haltigas min. Ili apartenas al la urba interpretisto, kiun afable la urbestro komisiis apud niajn fremdajn amikojn. Li ridetas, remetas siajn manojn sub la ŝprucon de l' krano, kaj mistere alparolas al mi :

— Mi ankaŭ, sinjoro!

kunstareco? Post la multe ripetita pruvo de la taŭĝeco de Esperanto, kiel interkomprenigilo, ni ne rajtas en tia grado dubi pri ĝi.

— Viajn manojn? Jes, mi vidas.

— Ne. Mi ankaŭ estas elpensinito de internacia lingvo!

— Ha!?

— *Is roñes y omoc detsu edeup rev al oibah nat etnemlicaŭ omoc sedetsu le Otnarepse.*

— Mi tute ne komprenas... Mi petas...

— Mi diris, ke kiel vi povas vidi, mi parolas ĝin tiel facile kiel vi Esperanton.

Efektive, li ne nur facile sed ankaŭ rapide, rapidege parolas ĝin. Mi restas mirigita. Li viŝas siajn manojn kaj rigardas min fikse. Mi rigardas ĉirkaŭ min. Ni estas solaj.

— *Seup euq, osaca es naierc sedetsu euq sedetsu nare sol socinú euq naiesop anu augnel lanoicanretni? In euq son somarapuhc le oded, erbmoh!*

— Sed sinjoro, tiu lingvo ŝajnas al mi ekstreme malfacila! Mi certigas ke mi komprenas nenion el ĝi!

— Ĉu ne? Tamen ĝi estas simple la kastila lingvo malrekte prononcita. Mia fratino parolas ĝin tiel flue kiel mi. Kaj, estu certa, ni ja povas trakuri la tutan mondon; neniu komprenos nin. Ĝi estas internacie nekomprenebla.

Li rigardas min pli fikse ol antaŭe. Mi rerigardas ĉirkaŭ ni. Ni estas solaj!!..... Kiam mi sidis ĉe mia loko, mi longe elblovis retransviligitel!

NOVA ADRESO. — Sro. Fred. Pujulà. — Strato Universitat, 48.-*Barcelono.*



GRAVA OKAZINTAĴO

Per varma parolado, nia distinginda amiko Moŝto Salvador Albert, deputito al la Hispana Parlamento, prezentis Esperanton al la Kunsido de la Kongreso de Komercaj Ĉambroj lasttempe okazinta en Madrido. La Kongreso unuanime aprobis la jenan tekston:

«La Kongreso rekonas la necesecon disvatigi la instruadon de Esperanto».

Ni parolos pli longe pri tiu grava venko atingita de nia samlandano, sekretario de la Komerca Ĉambro de Sant Feliu de Guixols kaj de la Kongreso. Nun, ni nur faras la jenajn petojn:

La gazetoj, kiuj represigos ĉi tiun sciigon, bonvolu sendi du ekzemplerojn al Sro. Albert, kiujn li transdonos al la Kongresa estraro.

Grupoj kaj izolitaj samideanoj, afable sendu al li gratulon por lia meritplena laboro.

La adreso : Sro. Salvador Albert. *Sant Feliu de Guixols.* KATALUNUJO.



III^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

LISTO DE DEVIZOJ DE LA VERKOJ RICEVITAJ

Noj. 1^a, Aŭtuna impresio. — 2^a, Serenado. — 3^a, Forta kiel Morto. — 4^a, Ne ĉiam suferoj. — 5^a, Sursum corda. — 6^a, Ceres. — 7^a, 8^a, 9^a, 10^a (Sen devizo, kaj subskribitaj). — 11^a, La popoloj tre bezonas unu la alian por siaj grandaj celoj. — 12^a, L'Arkeo. — 13^a, Floroj, miaj floroj... — 14^a, Excelsior. — 15^a, Lonicero. — 16^a, Amo nobligas la Homon. — 17^a, Jen. — 18^a, Violeto. — 19^a, Rozeto. — 20^a, Sursum corda! — 21^a, Clemencia Isaura. — 22^a, Ni semu kaj semu, neniam laciĝu! — 23^a, Toma onklineto. — 24^a, Kataluna rimarkindaĵo. — 25^a, Nederlandano. — 26^a, Esperantia Entrepeno. — 27^a, Kiam florojn vidas mi, Mi ekpensas tuj pri vi. — 28^a, Ni semas kaj semas. — 29^a, Laŭdata estu Dio. — 30^a, Printempo. — 31^a, Frat' fraton atakas ŝakale. — 32^a, Benon al vil — 33^a, En la mondon venis nova sento. — 34^a, Pentekosto. Alvenis post la datolimo por ricevo de verkoj la sekvantaj: Noj. 35^a, Calma, 36^a, Fides.

VERDIKTO

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. *Versaĵo pri Amo*. — La premio estas aljuĝata al la verko n.º 15, «Vi kial ne venas», devizo: Lonicero.
- II. *Prozaĵo pri Amo*. — Neniu el la senditaj verkoj meritis la premion. Konsiderinte la valoron de la verko n.º 5, «Amo», devizita: Sursum Corda, oni aljuĝas al ĝi tiun ĉi premion.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. *Traduko el «L'Atlántida»*. — Tiu ĉi premio ne estas aljuĝata.
- II. *Traduko de «Pasqua Granada»*. — Premio, al la verko n.º 34, «La Pasko de l'Greno», devizo: Pentekosto. *Unua mencio*, al la verko n.º 16, «La Pasko de l'Grajniĝo», devizo: Ceres. *Dua mencio*, al n.º 20, «Pentekosto», devizita: Sursum corda.

La sumo da 42 spesmiloj donacitaj malavare de la grupoj cititaj en la antaŭaj numeroj de «K. E.» estas disdonota po 14 sm, al ĉiu aŭtoro de la verkoj, noj. 15, 5 kaj 34.

La NATURA FLORO kaj la rajto elekti Reĝinon de la Literatura Festo estas aljuĝataj al la verko n.º 15, devizita: Lonicero (La aŭtoro de tiu verko estas tre petata konigi tuj sian adreson kaj nomon al Sro. Jozefo Grau, sekre-

tario de la Juĝintaro, str. Clarís, 72, Barcelono, kiu interkonsentos kun li pri ĉiuj detaloj).

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. *Premioj de «La Revuo»*. — I^a Premio, al la verko n.^o 25, «P. A. de Genestet», devizita : Nederlandano. II^a Premio, al n.^o 14, «La Patro de l'Usona Literaturo», devizo : Excelsior.
 - II. *Premio de Ader & Borel*. Al la verko n.^o 11, devizo : La popoloj tre bezonas unu la alian por siaj grandaj celoj.
 - III. *Premio de «Olota Stelo»*. — Al la verko n.^o 1, «La Folio», devizo : Aŭtuna impresio.
 - IV. *Premio de Sro. V. Avellana*. — Al la verko n.^o 12, devizo : L'Arkeo.
 - V. *Premio de Lia episkopa Moŝto Dvo. R. Guillet*. — Al la verko n.^o 26, devizita : Esperantia Entrepreno.
 - VI. *Premio de la «K. L. de K. E.»* — Al la verko n.^o 29, devizo : Laŭdata estu Dio.
 - VII. *Premio de «Gerona Espero»*. — Ne konkursita.
 - VIII. *Premio de Sro. J. Clarà*. — Al la verko n.^o 3, «Soneto», devizo : Forta kiel Morto. *Mencio*, al la verko n.^o 13, «La Rozo blanka», devizo : Floroj, miaj floroj.
 - IX. *Premio de la Urbestro de Olot*. — Al la verko n.^o 2, «La Kata-Luna lingvo» devizo : Serenado.
 - X. *Premio de Lia deputita Moŝto Sro. P. Llosas*. — Ne aljuĝata.
 - XI. *Premio de «El Arte Cristiano»*. — Al la verko n.^o 31, «La Ĉokoladkruĉo», devizo : Frat' fraton atakas ŝakale.
 - XII. *Premio de Lia senatana Moŝto Sro. F. Rahola*. — Al la verko, n.^o 24, devizo : Kataluna rimarkindaĵo.
- La aŭtoroj de la premiitaj kaj menciitaj verkoj volu sendi al la sekretario la kvin unuajn liniojn de sia verko.

Por la Juĝintaro

La Prezidanto,
BARONO DE MÉNIL

La Sekretario,
JOSEF GRAU

NOTO : Al la aŭtoroj de la verkoj premiitaj aŭ menciitaj de tiu verdikto estas liverotaj belaj diplomoj, kiujn ricevos ankaŭ la aŭtoroj de la verkoj, atingintaj premion, mencion aŭ citon en la I^a kaj II^a Konkursoj Literaturaj. Ili bonvolu komuniki sian adreson al la konkursa sekretario.

— Ni kun malĝojo sciigas, ke pro grava malsano de Sinjorino Bourlet, nia estimata Prezidanto ne povis plenumi sian oficon. Lin austataŭis, kiel Prezidanto, la famekonata Sinjoro Barono de Ménil, kaj kiel membro de la Juĝintaro, nia eminenta samideano Doktoro Raoul Bricard.



IV^a Kongreso de la K. E. F.

Honora Komitato

Sinjoraj Moŝtoj: D. Joan Meroles Isamat, Urbestro; D. Pere Llosas, Parlamenta deputito; D. Lluís Bolós, Provinca deputito; don Agustí Riera, Prezidanto de la Provinca deputitaro; D. Sixte de Lacalle, Ĝerona Provincestro; D. Lluís M.^a de Mesa, Juĝisto; don Pere Murcia, Militista komandanto; Dro. Esteve Ferrer, Paroĥestro; D. Nonito Escubós, Vicprezidanto de la komitato de l' Muzeo-Biblioteko; D. Josep M.^a Garganta, Delegito prezidanto de la Ruĝa Kruco; D.^a Agna Abad, Profesorino de Esperanto; D. Ursicino Gutiérrez Jaque, Kapitano de ĝendarma korpuso.

Organiza Komitato

Prezidanto : Josep M.^a Garganta. *Vicprezidanto* : Candi Agustí. *Sekretario* : Antoni Fortet. *Kasisto* : Manuel Prat. *Financisto* : Pere Roqué. *Membroj* : María Escubós, Concepció Vayreda, Josep Boire, Pere Cuscoy.

Propaganda Komisiono

Pere Roqué, prezidanto. Isidre Juanola, Antoni Fortet, Joan Vilà, Ramón Aubach, Joan Sarola.

Komisiono por la Festo de la L. K.

Candi Agustí, prezidanto. Josep M.^a Garganta, Joaquim Vayreda, Antoni Serra, Antonia Escubós, Rosalía Güell.

Arta Komisiono

Josep Boix, prezidanto. Valentí Avellana, Josep, Lluís Trias.

Komisiono por Festoj

Manuel Prat, prezidanto. Ignocenci Vinyas, Joaquim Vayreda, Francisco Güell, Mercè Iglesias, Rosita Llosas, Josepa Figueras, Ramona Vilà, Dolors Pujol, Joaquim Rosals, Anicet Nogué, Josep Casas, Josep Sarola, Serafi Soler, Josep Prat, Joaquim Oliveras, Francisco Torramilans.

Komisiono por loĝejoj

Pere Cuscoy, prezidanto, Joan Vilà, Pere Roqué, Lluís Guitar, Dolors Costa, Rosita Coros, Agneta Manyalich, Dolors Membreis, Ignasi Casas, Joan Badía, Salvador Baburés.

Historio de Esperanto en Katalunujo

VILANOVA I GELTRÚ

1911. 1.^a Januaro. — La Urbkonsilantaro donis al grupo «L. E.» subvencio de 100 pesetoj.

30.^a Aprilo. — La Vilanovaj esperantistoj vizitas urbon Vendrell, afable invititaj de grupo «Frateco». Okaze de tiu ekskurso Fino. Teresa Rosell faras en grupo «Frateco» esperantan paroladon.

4.^a Aŭgusto. — Vizitoj de la anoj de «Frateco» el Vendrell al grupo «L. E.» Lunčo en la sidejo de la tiama «L. E.» en honoro de la Vendrellaj esperantistoj. Parolado de Sro. Escofet, per esperanta lingvo.

24.^a Junio. — En la I^a Literatura konkurso de la K. E. F. estas premiita la versduo «Maro — estas gutaro.», temo de Sro. Pujulá, kies aŭtorino estas nia samurbanino Eulalia Rosell.

1.^a Oktobro. — Inaŭguriĝas unuagrada kaj duagrada kursoj en grupo «L. E.», klarigitaj de Sro. Marko Vadell kaj Fino. Teresa Rosell.

22.^a Oktobro. — Parolado de Sro. Delfi Dalmau ĉe la «Ateneo Vilanová», pri la temo «La spirito kaj la korpo idiomaj. Ĉu Esperanto estas idiomo?»

26.^a Oktobro. — En konkurso inter la geanoj de la societo «L. E.» por devizo de tiama grupo, kvindek tri devizoj estas prezentitaj. La juĝantaro decidis doni la unuan premion al la devizo «Laboru esperante — kaj esperu laborante». Aŭtoro nekonita.

1912. 12.^a Januaro. — Estas balotita prezidanto de la grupo L. E. Sro. Gustau Galcerán.

15.^a Februaro. — La grupo «L. E.» disvastigis 500 flugfoliojn «Esperanto en una fulla».

— Oni dediĉas kunsidon de «L. E.» al bedaŭrinda verkisto Joan Maragall. Post studado de la bela esperanta traduko de «La Vaca cega», premiita en la I^a Literatura konkurso de la K. E. F. oni legas prozajn kaj versajn verkojn de tiu fama publicisto.

25.^a Majo. — Okazas en V. kaj G. la grava Dua kongreso de Ateneoj kaj kulturaj Societoj. Ĉe la Biblioteko-Muzeo-Balaguer Sro. Pujulá Vallés faris paroladon pri la temo: «La estonta literaturo. Kiu estas ĝia lingvo?» En la sama kongreso Sro. Ll. Jou Olió, el la komisiono de Pedagogio, lerte kaj elokvente parolas pri la jena oficiala temo: «Kiajn lingvojn oni devas uzi en la lernejo de la Ate-

neoj?». Estas la tria konkludo — unuvoĉe aprobita — de lia disertacio : «En la superaj kursoj de la ateneaj lernejoj oni devas instrui la internacian lingvon Esperanto.»

30.^a Junio. — En la II^a Literatura Konkurso de la K. E. F. estas premiita la poezio «Apud la kameno» de niaj samurbaninoj Teresa kaj Eulalia Rosell. Oni donacis al tiu versaĵo, belega pro la penso kaj la formo, la premion donacitan de la Urbestra Moŝto de Terrassa.

21.^a Julio. — La grupo «L. E.» honormemoris la datrevenon de la 21.^a de Julio de 1887^a per literatura kaj muzika festo. Fino. Tereso Rosell legas neeldonitajn tradukaĵojn. Paroladoj de Sroj. Codina kaj Galcerán.

2.^a Setembro. — Sro. Jozefo Escofet malfermas kurson de Esperanto en la sindikalista societo «Centro Obrero». Tiu kurso estas multe ĉeestata.

Vilanova i Geltrú, 30^a Setembro, 1912^a

La komitato de «Laboro Esperanta»

TERESA ROSELL

Sekretariino



Kelkaj notoj pri la Kongresurbo

OLOT

Olot sidas meze de bela ebenaĵo. Pentrinda montaro kun interesaj vidindaĵoj ĉiam novaj ĝin ĉirkaŭas; ĝi estas akso de ĉarma kaj produkto plena regionio, kie la artoj kaj homaj industrioj senĉese kreskadas kaj progresadas. La *Fluviá* rivero trakuras ĝin, naskante ĉie freŝecon, verdecon, kaj nekompareblan kreskajaron kaj riĉigas ĝiajn apudajn kampojn. Kiam ĝi alvenas en la urbon, varme ĝin karesas kaj kisas, movas la turbinojn de la fabrikoj kaj bruege falas de l' kluzo al kluzo, inter hela, arĝenta kaj blanka saŭmo.

De la vulkana *Montsacopa*, la domaj konstruaĵoj etendiĝas al rivero tial ke la urbo fiere malkonsentas ĝian troan plilargiĝon, sed ĝi sin liberigas, koncentrigante ĝiajn akvojn, kiuj trakuras laŭlonge ĝiajn riverbordojn.

Tie-ĉi oni pasadas la vivon naive kaj kviete, tutplenan de karakterizita diverseco, kaj tio permesas ĝui malsimilajn impresojn, ĉiam agrablajn kaj harmoniajn : de la humila senkulturo vilaĝana, al

altrango grandsinjora; de la ĉaraj akrasonoj, al la komplika industria progresado; de la milda kvieteco kamparana, al bruego de la modernaj grandaj urboj; de la landantikvaj moroj, al la suke-esplena evoluado.

OFICIALA OLOT'O

Laŭ la lasta statistiko la Olot'a urbo enhavas 8.000 loĝantojn. Ĝi estas ĵuga distrikto.

Ĝia Urbestro konsistaj el 16 konsilantoj kaj la Urbestro estas elektata laŭ reĝa ordono.

Eklezie ĝi apartenas al Ĝerona Eparhio, kaj ĝia Paroĥestro havas altrangon de Ĉefpastro.

KOMUNIKIGANTAJ VOJOJ

La antaŭ nelonge finita fervojo alprosimigas la urbon al Ĝerono, faciligas la komunikojn kun la Kataluna Ĉefurbo, plibonigas la tutajn aferojn kaj pligrandigas ĝian industrion vivoplenan.

Per kvar ĉefvojoj konstruitaj kaj du konstruotaj komunikigas Olot kun la ceteraj provincaj urboj.

Ĝi havas telegrafian oficejon, poŝtoficejon, kaj estas centra telefona komunikejo de preskaŭ la tuta regiono.

LA URBO

Olot estas certe antikva urbo, tamen ĝi estas bela kaj enhavas tre interesajn konstruaĵojn, nome: la Ĉefpreĝejo Sankta Stefano, templo konstruita laŭ Greka Romana Stilo; la Sankta Virgulina preĝejo, nomata de la *Tura*; la Teatro; la Rifugejo; la Kazerno; l'Areno por bovatoloj; la lernejo de la Patroj Piskolanoj; la monaĥejo de l'Patroj Kapucenoj; kaj aliaj. Ĝiaj Stratoj ŝtonpavimaj; ĝiaj interesaj promenejoj, ekzemple: «El Firal» (La Foirejo); «La Parko»; «Barcelono» kaj «Sankta Roko», beligas la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn.

La nokta publika iluminacio estas hela kaj malavara dank'al Kompanio «Elektra-Brutau»:

Ĉe la Rifugejo, troviĝas la urba Muzeo-Biblioteko en vastaj ĉambroj; kaj malgraŭ tio ke ĝi estas de ne antaŭ longe starigita, tamen ĝi estas vizitinda. En la Muzea Fako estas multvaloraj verkoj de Olotaj artistoj kaj de alilanduloj; ankaŭ estas tie, antikvaĵoj, kaj la grava kolekto «Gelabert» de vulkanaj produktoj. La Biblioteko estas nun en plena periodo de aktiva organizado; kaj enhavas jam multenombrajn verkojn tre interesajn. Tie trovi-

ĝas la sidejo de «Olota Stelo». Du publikajn teatrojn havas la urbo: «El Principal» dependanta de la Urbaregado kaj «L' Ideal Park», kaj du sportivaj societoj, nomataj; «Olot Deportivo» kaj «Sport Club Olot».

LA INDUSTRIO

La Olota industrio estas tre grava. Antaŭ longe ĝiaj malgrandaj industrioj estis superegaj, sed nenia kiel la karakterizanta la regionon, tio estas; la fabrikado de *barretinas*¹. Olot estis tiam la vera monta urbo. Pro la dekadenco de tiaj industrioj alvenis baldaŭ mallonga krizo, sed ili jam denove reakiris sian enviindan prospercon, kaj Olot marŝados antaŭen kun la ceteraj provincaj urboj.

Ĝiaj ĉefaj industrioj konsistaj el puntaj objektoj, *boines*², religia statuario, ledoj, fajencoj, farunoj, kolbasoj, k. c.; kies produktaĵojn estas jam de longe famkonataj, ne nur en Hispanujo, sed ankaŭ en fremdlando, tial kompreneble la industria movado ĉiutage estas pli grava, kaj tio faciligas okupon al kelkaj miloj da laboristoj.

LA TERKULTURO

Olot estas centro de grava terkultura regiono. Ĉiujn lundojn kaj vendredojn la regionaj kamparanoj kunvenas kaj vendas ĉe la Olot'a halo iliajn alportitajn grenojn kaj ceterajn produktaĵojn; la ĉiumonataj unuaj lundoj, estas malgrandaj foiroj, krom la ceteraj okazantaj, la 17^{an} de Majo, nomata (La Maja foiro); la 9^{an} de Aŭgusto (La Sankta Romana), la 18^{an}, 19^{an} kaj 20^{an} de Oktobro (La Sankta Luka), la 30^{an} de Novembro (La Sankta Andrea), kaj 21^{an} de Decembro (La Sankta Tomasa).

La regiona Olota kamparo estas produktemega, pro ĉiujaraj rikoltoj konsistantaj el tritiko, sekalo, maizo kaj aliaj grenoj.

Ĝia terkultura Sindikato multe sin okupas pri tiu branĉo tiel grava de la homa scio, por ke ĝi konstante evoluciadu kaj progresadu.

LA ARTO

La Olota arta famo estas ja vere tre konata. La speciala karaktero de la Olotanoj, ilia inklino al la desegno kaj pentrarto, devenas certe de la multvalora influo, ekzercata de la meritinda belarta urba lernejo, kies specialaj kaj prosperaj kursoj estas

1. Speciala ruĝa ĉapo uzata de la kamparanoj.
2. Baska ĉapo.

instruataj ĉe la Rifugejo. Kelkaj Olotaj generacioj tie ĉi instruiĝis kaj tie ĉi oni ekvidis kaj ekkonis ĝiajn eminentulojn, kiuj forlasis poste la humilan urbon kaj serĉis pli vastan kampon por sia agado kaj kulturado, atinginte veran sukceson. La famo konatigis iliaj nomojn.

Olotanoj estis Vayreda, Blay, Clara kaj aliaj jam mortintaj, sed ĉiam vivantaj en la menso kaj la koroj de niaj samurbanoj kiuj ĉiuhore ilin laŭdas.

FAMAJ OLOTANOJ

Krom la antaŭaj gloraj nomoj florintaj en ĝi, Olot estas patrujo de aliaj tri distingindaj scienculoj, nome : la fama juristo Johano Petro Fontanella, honorita kun la altrango de «Conceller en Cap»⁴; la klera doktoro Stefano Vilanova, estinta episkopo de Jaca kaj Tarazona; la naturalisto Javier Bolós, eltrovinto de la vulkanaj regionaj formacioj; le fratoj Batlló, tiel famkonatoj; Stefano Paluzie, rimarkinda verkisto kaj historiisto de la urbo; Estanislao Vayreda, glora literaturisto kaj aŭtoro de «La Punyalada» (La Ponardvundo), kaj multaj aliaj.

OLOT DUM LA SOMERA SEZONO

Olot estas konsiderata, kiel la plej milda urbo dum la somero, pro siaj specialaj kondiĉoj; ĉi-tion certigas la multenombraj familioj ĉiujare alvenintaj por pasigi la varman sezonon.

Dum la nokto la temperaturo estas de 15^o al 16^o, sed tia malvarmeco ne estas danĝera, ĉar tie-ci ne okazas varmaj kaj malvarmaj ŝanĝoj, kiel ĉe la alpaĵ regionoj.

Ĝia klimato estas bona kaj sana; grandnombro da fontoj, ĉe pentrindaj lokoj invitas trinki iliajn freŝajn akvojn kaj allogas fari al ili agrablajn ekskursojn. Unuvorte, Olot estas paradizeto, kie oni ĝuas la vivon, sanan, trankvilan, amuzan kaj agrablan.

ANTON BOLOS
(Aŭtoro de la verko)

Tradukis
JOSEP DOMENECH ALBERICH



La Provizora programo kaj hortabelo de vagonaroj kaj veturiloj aperos en la Maja numero.

1. Ofico simila al Ministra Prezidanto en Sendependa Katalunujo.

ENLANDA MOVADO

La 21^{an} de la pasinta Marto mortis en Olot la patrino de sinjoro Josep M.^a Garganta prezidanto de la Organiza Komitato de la IV^a Kongreso de la K. E. F. kaj de la grupo «Olota Stelo». Al nia kara amiko kaj lia familio ni prezentas nian kondolencon por la malfeliĉo, kiu ĉagrenas ĉiujn amikojn de nia eminenta kunfederaciano.

La manko de loko devigis nin koncizigi la raportojn pri la festoj kaj propagandoj faritaj lastatempe de niaj enlandaj amikoj. Ni multe bedaŭras, kaj esperas ke ili klopodados pligrandigi la nombron de federacianoj, por ke ni povu duobligi tiun nombron da paĝoj de nia gazeto, kiuj ne povas nune enteni la tromultan materialon. — K. E.

BARCELONO

«La Rondo» okazigis la 15^{an} de Marto vespere en sia sidejo la anoncitan teatran prezentadon esperante kaj nacilingve. Akurate komencita la festo bone sukcesis. La fervora samideano Sro. Valero arte ludis la monologon «Okaza Artisto», forte aplaŭditan kaj el la legantoj de poezioj distingigis fraŭlino A. Fontanellas pro sia bona prononcado. Oni aplaŭdis ĉiujn partoprenintojn precipe post la ludado de la kataluna komedio «Els jambus». Balo kronis la vesperfeston. La sekvintan tagon posttageze la geanoj de la grupo ekskursis al Pedralbes kaj «fonto de la Leono.» 60 personoj kuniris tien kaj multe amuzigis.

— La maskobaloj organizitaj de «Esperanto kaj Patrujo» kunigis en ĝian salonon multajn samideanojn; sekve de tio la grupo kreis amuzan fakon, kiu klopodos per logaj festoj kaj belaj baloj kunvenigi la esperantistojn amuzemajn, kiujn ĝi invitas per ĉi tiuj linioj. La 30^{an} de la pasinta monato okazis balo tre animita kaj aliaj okazos ĉiujn dimanĉojn de Aprilo je la 10^a vespere ĉe la sidejo de la grupo, str. Correu Vell, 6.

— En la kurso malfermita de «Supren», kiun oni reklamis per grandaj afiŝoj, petis matrikulon pli ol 50 personoj, el kiuj 25 konstante ĉeestas la kurson gvidatan de Sro. Vilá. Tio estas kuraĝiga fakto, kiun ni prezentas al la ceteraj grupoj, ne dubante ke ili penos atingi similajn rezultatojn.

— La grupo «Paco kaj Amo» komencis la 10^{an} de Marto sub la gvidado de Sro. Jozefo Roig kurson de Esperanto, kiu estas multe vizitata.

BANYOLES

Propaganda esperantista festo, kun partopreno de Sroj. Delfi Dalmau el Barcelono, Petro Costa el Sta. Coloma de Farnès kaj Ernest Dalmau el Gerono, okazis la 24^{an} de Marto. Honoris la feston Lia Moŝto la deputito

Sro. Joaquim Coromina, vicprezidanto de la Ĝeronprovinca Deputitaro, kaj reprezentantoj de la Urbestro kaj lokaj societoj.

Sro. Johano Aulina, prezidanto de *Esperanta Amikaro* salutis la publikon, prezentis la oratorojn kaj transdonis la prezidan lokon al la reprezentanto de la Urbeŝtraro. Sro. Ernest Dalmau disertaciis pri la bezono de lingvo internacia; Sro. Petro Costa parolis pri la utileco kaj graveco de Esperanto kaj fine Sro. Delfi Dalmau elokvente paroladis pri la temo «Kial nur Esperanto triumfos?» Aplaudado bruega ofte aŭdigis dum kaj post la paroloj de la oratoroj, kiuj kantinte la Esperon, oni regalis per motorboata veturado sur la lago.

Vespere okazis balo honore de la esperantistoj, kio kun la paroladaro kaj la ekspozicio de esperantaĵoj aranĝita de «E. A.» altiris al ni multajn enurbanojn.

OLOT

La Komitato de la Internacia Konkurso de Stampoj petas ankoraŭ unu fojon de *ĉiuj grupoj*, ke ili bonvolu sendi sian stampon al la konkurso. Por tio ĝi presigis specialajn kartoĵojn, kiujn ĉiu grupo ricevos. La nericevintaj turnu sin al la Prezidanto de la Stampa Konkurso, Sro. Pere Roqué, str. Pardaŭ, 12. Olot.

SANTA COLOMA DE FARNĚS

Kun ĉeesto de la prezidanto de la K. E. F. Sro. Romul S. Rocamora kaj de Sroj. Delfi Dalmau el Barcelono kaj Ernest Dalmau el Ĝerono la 23^{an} de Marto okazis sukceso, malgraŭ la pluva vetero, la paroladaro organizita de «Esperanta Idealo».

Prezidis la kunsidon Lia deputita Moŝto Sro. P. M. Bufill. La aŭskultantoj premiis per bruaj aplaŭdoj la paroladojn de la antaŭe cititaj sinjoroj pri la historio, kvalitoj kaj utiloj de la helpa lingvo Esperanto, kaj pri ĝia rolo en la ekonomia kaj socia vivo. Fine Sro. Costa fermis la kunsidon kaj sciigis ke la lotado de la entreprenita loterio poresperanta estas prokrastata ĝis la Kongreso de K. E. F. en Olot.

Ĉe la foriro la alestintoj ricevis propagandajn foliojn, kiuj bone efikis.



KORESPONDADO

J. Puig. Ni sendis la rooo markojn por B. S. — J. Pujol. Ni ricevis vian p. k. La afero estas klarigita. — J. Buyé. — Ni *ĉiumonate* kaj *senescepte* sendas al *ĉiuj* K. E. Ni ripetis la sendon de la Marta numero. Ni sendis rooo markojn kaj la ekz. de K. E. por Sro. Albors.

Virtembergia Esperanto Instituto kaj Dro. J. Belohlav: Bedaŭrinde ni ne povas komplezi vin ĉar loko mankas; sed per tio ĉi ni esprimas nian simpatian al viaj entreprenoj. — Korespond-Oficejo «Esperanto» kaj Sro. E. Janich: Ni notis pri viaj cirkuleroj.

**Eldonoj de la
Kataluna Esperantisto Federacio**

PROPAGANDAJ FLUGFOLIOJ

Tot l'Esperanto en una fulla
vendiĝas po **unu centimo**
ĉiu ekzemplero

Oni sendu kun la mendo la send-elspezojn!

GLUMARKOJ

ĴUS ELDONITAJ!

BELAJ!

Esta vendataj po **unu centimo** ĉiu marko je folioj de 50 ekzempleroj.

Por la grupoj mendantaj pli ol milon da markoj estas farata rabato de 25 %.

Sendu la monon per poŝtmarkoj aŭ poŝta ĝiro al sidejo de la K. E. F., strato Gracia, 12 : Sabadell.

Ni rekomendas la abonon al

Ĉiunmonata internacia gazeto

ORIENTA AZIO

estas la sola bela gazeto kun kolorigitaj ilustraĵoj, en Japanujo, Ĥinujo kaj Korujo, kaj ĉiunmonate aldonas unu kajeron de

SININSTRUITO DE JAPANA AŬ
ĤINA LINGVOJ

aŭ diversaj katalogoj.

Jarabono : 1.20 sm; duonjare 0.60 sm; provnumero 0.10 sm.

(Ni ne ricevas poŝtmarkojn, krom japanaj.) Sin turni al la Redakcio «Sekaigo-Ŝoin» Oŭsakimaĉi, Ebaragun, Tokio, JAPANUJO.

NOMARO de 100 samtempe aperantaj esp. gazetoj kun multe da sciigoj pri la esperanta movado, artikoloj esperantaj, literatura aldono kun traduko de la fama bohema romano *Avineto*, estas enhavataj en la specimena n-o de *Ĉasopis Ĉeskŭch Esperantistŭ*. Por unu respondkuponon vi ricevos du malsamajn specim. n-ojn, gvidfolion tra Praha kaj aliajn presajojn esp. La adresoj de fremdlandaj korespondantoj estas enpresataj senpagel Sin turni al Red. de Ĉ. Ĉ. E. en Praha II. Dittrichova ul. 7. Bohemujo. Baldaŭ aperos : *Jan Amos Komenskŭ / Comenius / 1592-1670. La unua pioniro por ideo pri artefarita lingvo internacia. Tiu ĉi fama filozofo ellaboris jam en la jaro 1641 en sia verko Via Lucis detalajn regulojn pri konstruo de arta helpa lingvo, respondantajn al la principoj de Esperanto. — La verko / proksimume 70 pĝ. / estas jam nun mendebla / tri resp.-kup. / ĉe «Esperanto-Oficejo» en Praha II. Vodiĉkova ul. 38. Bohemujo.*

== LA REVUO ==

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado

de

DRO. L. L. ZAMENHOF

Literaturaj verkoj. Teatraĵoj. Poezioj. Informoj. Internacia vivo

Unu numero : fr. 50

Abono : por Francujo 6 fr.

Por aliaj landoj : 3 Sm. 800

Abonebla ĉe la Administracio de K. E. F., str. Gracia, 12 — SABADELL

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
KATALUNUJO

Red. : Frederic Pujulà
Sek. de Red. : Josep Grau

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *Pro inklino al la Sano.* —
Pri feminismo. J. Hadall, C. Biknell, Mende, J.
Ostrowski, Mirza Abbas Ali. — *IV^a Kongreso de la*
K. E. F. en Olot. Programo, Hortabelo de vagona-
roj kaj veturiloj. Tagordo. Proponoj. — *III^a Lite-*
ratura Konkurso de la K. E. F. — *Balanç de l'any*
1912. — *La Pestiŝtineteto.* Trad. de Pastro. J. Coll.
— *Enlanda Movado.* — *Bibliografio.* Tamen. —
Korespondado.



JARO IV^a

MAJO 1913^a

N^o 5 (38)

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al la "Kataluna Esperantista Federacio"

Badalona Stelo	Badalona
Barcelona Stelo	Barcelona
Casino del Comercio	Terrassa
Ciam Antaŭen	Barcelona
Escola Universitaria	»
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Esperanta Amikaro	Banyoles
Esperanta Aŭroro	Barcelona
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. i la I.)	»
Esperanta Frateco	»
Esperanta Idealo	Santa Coloma de Farnés
Esperanta Juneco	Barcelona
Esperanta Nesto	Barbarà del Vallès
Esperanta Racionala Grupo	Barcelona
Esperanta Semo	Sabadell
Esperantista Amikeco	Manlleu
Esperantista Grupo	Mataró
Esperantista Junularo	Terrassa
Esperanto kaj Patrujo	Barcelona
Evolucio	»
Forigu Barojn	»
Frateca Kunigo	Reus
Frateco	S. Feliu de Guixols
Frateco	Vendrell
Ĝeronprovinca Esperantista Ligo	Girona
Ĝerona Espero	»
Herda Espero	Lleida
Instituto por la disvastigado de l'esperanta gazetaro	Barcelona
Kampano	S ^{ta} Perpetua de la Moguda
Kulturo	Barcelona
Laboro Esperanta	Vilanova i Geltrú
Laboro kaj Kulturo	Calafell
La Rondo	Barcelona
Lumon	Terrassa
Malestraro (U. F. N. R. Dte. II)	Barcelona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Novan Vojon	Barcelona
Nova Semo	Reus
Nova Harmonio	Torelló
Olota Stelo	Olot
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Paco kaj Amo	Palafrugell
Semo (Ateneo E. P.)	Barcelona
Semo	Buenos Aires
Supren!	Barcelona
Tarragono Esperanta	Tarragona
Unió Catalanista	Barcelona
Universala Frateco	»
Verda Stelo	Flix
Vika Esperantistaro	Vic
Vojantaŭen	Mollet

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Red. : FREDERIC PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEP GRAU

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Pro inklino al la Sano.* — *Pri femi-*
nismo. J. Hadall, C. Biknell, Mende, J. Ostrowski, Mirza Abbas Ali. —
IV^a Kongreso de la K. E. F. en Olot. Programo. Hortabelo de vagonaroj
kaj veturiloj. Tagordo. Proponoj. — *III^a Literatura Konkurso de la*
K. E. F. — *Balanço de l'any 1912.* — *La Pastistineteto.* Trad. de Pastro. J.
Coll. — *Enlanda Movado.* — *Bibliografio.* Tamen. — *Korespondado.*

PRI...

LA KONGRESO DE HISPANAJ KOMERCAJ ĈAMBROJ

KIAM antaŭ unu jaro nia amiko Salvador Albert, deputito al la Hispana Parlamento, estis preta prezenti al tiu ĉi projekton de leĝo deviganta la lernadon de Esperanto en Institutoj, Universitatoj, Komercaj kaj Militistaj Lernejoj, kaj ni havis ĉiun favoran ŝancon por vidi ĝin aprobita kaj por aŭdigi de la alta tribuno dokumentoplenan paroladon pri nia lingvo, — la ministraro *permesis* la instruadon de nia Esperanto en ĉiu oficiala lernejo. Per tiu facila venko ni efektive malvenkis. Dum longa tempo, la ministroj havos belan respondon al niaj petoj pri trudo: ili parolos pri libereco, kaj ili certigos ke ĉar la studentoj ne ĉeestas tiujn kursojn, nia lingvo ne havas simpatian. Ili havos la belan rolon. Ni devas konservi la nian silentante.

Sed silento en la Parlamento, ne signifas silenton en aliaj

lokoj, kaj Albert, kies promeso helpi al nia movado fariĝis devo en lia animo, profitis la okazigon de la Kongreso de Hispanaj Komercaj Ĉambroj, kies sekretario li estis, por prezenti al aprobo la proponon pri kiu ni parolis en nia antaŭa numero. Kaj la Kongreso voĉdonis unuanime.

Albert estis preta fari antaŭ la grava kunveno defendon de nia lingvo, sed tre lerte, tre sprite, li pritraktis la temon de la vidpunkto de l' devo de la Kongreso, kaj supozante ke ĉiu delegito ne bezonis pluajn klarigojn, kion efektive pruvis la unuanima sendiskuta decido.

Mi represigos la tekston de la propono, por ke oni vidu kiel rekte ĝi trafas la Komercajn Lernejojn kaj Akademiojn:

«LA KONGRESO REKONAS LA NECESECON DISVASTIGI LA INSTRUADON DE ESPERANTO».

Mi tre insiste petas miajn distingindajn kolegojn, kiuj represigos tiun ĉi sciigon, aŭ pritraktos pri ĝi en siaj respektivaj gazetoj, havu la afablecon sendi 1-2 specimenojn al Sro. Salvador Albert, Deputito (Sant Feliu de Guixols - Katalunujo), kiu, kiel sekretario de la Kongreso, komunikos ilin al la Kongresestraro. La enlanda gazetaro povos sin okupi denove pri tiu decido, kiu estis telegrafita de Madrido al ĉiu hispana ĵurnalo, kaj de ĉiuj estis komentita.

Niaj samideanoj kaj grupoj tre helpos nin, gratulante nian deputiton, ne pro tio ke li bezonas kuraĝigon, sed tial, ke per tiuj gratuloj li havos argumentojn por novaj entreprenoj.

Al la Kongreso de Komercaj Ĉambroj, «Kataluna Esperantisto» en la nomo de la «Kataluna Esperantista Federacio» sendas gratulon kaj aplaŭdon. Al Sro. Salvador Albert, — koregan dankon. Mi estas certa, ke nia IV^a Kongreso okazonta baldaŭ en Olot, rememoros kiel ĝi meritas, la agadon de nia talentoplena verkisto.

Mi profitas la okazon per danki tre varme nian eminentan Generalon H. Sebert, kaj la «Centran Oficejon», kiuj tiel malavare kaj sindone provizis per dokumentoj nian defendinton.

LA IV^a KONGRESO DE «K. E. F.» EN OLOT

Unu jaro rapide flugis super ni. Ni havas ankoraŭ en la koro la impreson de la sukceso de nia III^a en Terrassa, kie la grupo «Lumon» kun siaj disciplinemaj sindonemaj membroj preparis festojn, kiuj malfacile malaperos el nia memoro. Kvazaŭ ankoraŭ vibras ĉirkaŭ ni la ĝojo de Terrassa dum la inaŭguro de la «Placo de Dro. Zamenhof»; ankoraŭ ni aŭdas la aklamojn per kiu Sabadell malkovris la

tabulon, kiu donis al granda strato la nomon de nia majstro; ankoraŭ bruas la svarmo, flirtas en la aero la centoj da ventumiloj de tuta popolo kunveninta ĉirkaŭ natura teatro por vidi prezentadon de Esperanta verko... Tamen, unu jaro pasis. Nia triumfa ĉaro senhalte antaŭeniras, kaj por signi nian vojon, jen la Olotanoj, kiuj vokas nin al nova kunveno, al novaj festoj kaj kunfratiĝo. Ni ne rigardu malantaŭen. Estintajn venkojn ni forgesu, se ili devas kontentigi nin; ni ilin memoru, se el ili ni scios tiri novan kurakon por ĉiam novaj bataloj.

Olot vokas nin nun. Post kelkaj tagoj la Pirineaj valoj aŭdos nian voĉon. Per nia IV^a ni alportos nian semon al peco de nia lando, kie nur mirakle Esperanto disvolviĝis ĉar neniam nia komuna agado celis ĝin. La movado en la provinco Ĝerono estas intensa ĝis tia punkto, ke la Ĝeronanoj jam opiniis necesa kunigi sin en Ligo; sed ni devas alporti al ili la forton de la tuta lando, kaj montri al la popolo per nia ĉeesto, ke ili ne estas solaj, kaj ke ni estas pretaj ilin defendi kaj apogi.

Nia IV^a prezentas ĉiun garantion por sukceso. Sinjoro Garganta, la Prezidanto de la Organiza Komitato disponis por sia laboro la helpon de «Olota Stelo» la grava grupo, kies membra fervoro estas konata de ni ĉiuj. La multnombraj komisionoj, kiujn ili starigis por ĉiu aparta fako, montras ke ili zorgis la detalojn kaj ke la rezultajo estos perfekta kaj rememorinda.

La «Floraj Ludoj» akiris por ĉi tiu jaro gravecon vere ne atenditan. Sinjoroj Carlo Bourlet, Gabriel Chavet kaj Barono de Ménil, afable akceptis lokon en la juĝantaro. La Prezidanta parolado de Sro. Bourlet estis atendita kun emocio, ĉar ĉiu konas la belajn stilon kaj pensojn de la Direktoro de «La Revuo» kaj pro lia situacio rilate la X^{ua} Internacian Kongreson, oni atendis de li interesajn deklarojn pri la Floraj Ludoj. Bedaŭrinde, lastmomente, subita malsano, grava malsano de lia distinginda edzino devigis lin forlasisian lokon, kaj nomi kiel akstataŭanton, Sinjoron Raoul Bricard, nia eminenta samideano, kies verkoj, de ĉiuj konitaj, ŝparas al ni laŭdojn kaj prezenton.

La verdikto, jam aperinta, malkovris kelkajn majstrajn verkojn, kiuj honoras nian konkurson; kaj ĝia ĉefa premio, la Natura Floro, profunde kontentigas nian naturan amon al la lando. Efektive, la nunan jaron, laŭ decido de internacia juĝantaro, la Natura Floro estas aljuĝita al niaj talentoplenaj samlandaninoj fraŭlinoj Rosell, aŭtorinoj de la versaĵo «Vi, kial ne venas?» al kiuj ni jam ŝuldas nian devizon kaj aliajn meritplenajn poemojn.

La Prezidanta parolado estos verkita de Barono de Mènil, aŭtoro de nia himno, la inteligenta muzikisto kaj sprita verkisto de nekompareblaj teatraĵoj. Tiuj samideanoj, estas tiel amataj ĉe ni, estas tiel *niaj*, ke oni povas vere sin demandi ĉu efektive la juĝantaro estis internacia!

Kaj, se io mankis, jen la beleco de la naturo ĉe kiu disvolviĝos nia Kongreso, jen la ombroplenaj valoj, la abruptaj montoj, la murmuremaj fontoj, la rokoplennaj riveroj, la stingitaj vulkanoj — gigantoj dormantaj kiel simboloj de mortintaj lingvaj antaŭjuĝoj — la riĉaj kampoj, la tintantaj rajdobestoj, la vojaj gastejoj...

Dum ni traveturos la vojojn per la malnovaj bruaj veturilegoj, la tritiko verdos sur la kampoj. Verdu super ili nia standardo, semo de l' anima pano, ĉe kiu nia koro ruĝos kiel la papavo.

FRED. PUJULÀ

PRO INKLINO AL LA SANO

Li alfrapis al mia pordo kaj prezentis sin. Li estas nekonatulo; — iu kvardekjara persono en malnovaj, elfrotitaj, sed tre puraj vestoj. Li parolas katalune kun azia akcento, kaj liaj trajtoj malkaŝas mestizon de Filipinsulo.

— Mi venas pro la Kongreso de Olot.

Kaj silentigante min per mana gesto, li daŭrigas:

— Sinjoro; vivo estos vivo kaj ni devas zorgi ĝin. La mondo estas reprezentajo, kiel diris germano; ni zorgu do la reprezentanton. Kaj la reprezentanto, kun via permeso, estas mi.

— Ĉu vi reprezentos en Olot ian grupon?

— Vi ne komprenas min. Mi reprezentas al mi la mondon — la mondon kiel reprezentajon. Ĉu vi ne konas Schopenhauer?

— Ne; sed mi bone prezentas lin al mi.

— Sekve, ĉar Esperanto estas monda — tutmonda — afero, ĝi troviĝas ankaŭ en mia reprezentado. Se mi finiĝas, Esperanto ankaŭ. Vi do havas intereson konservi min.

Li silentigas min denove.

— Sinjoro, la Higieno priokupas min super ĉio. Mi sekvas dietojn, kurac-sistemojn, receptojn, ĉion, kio povas konservi mian vivon. Olot estas fontoplena urbo, kies akvoj posedas mirindajn kvalitojn. La provizora programo de la Kongreso jam parolas pri Fonto *Moixina, de les Tries, del Ferro, k. t. p.* — Apud ĉiu kunsido, troviĝas kuntrinko. Mi deziras pluajn informojn. Ĉu vi opinias, ke por mia sano, la aliĝo al la Kongreso estos bonega?

— Kompreneble, kompreneble! — mi respondas — Unue, ĝi purigos vian lingvon¹. Due...

— Due, mi petas?

— Due, eĉ vi povos konsulti la «Apotekiston de Olot»².

Li dankis kaj rapide foriris por aĉeti gramatikon kaj aliĝi al la Kongreso. Jen kiamaniere mi plenumis mian ĉiujaran devon aligante unu membron al nia Federacio.

1. *Llengua (Katalune) = lingvo-lango.*

2. Komika protagonisto de fama komedio.

Pri feminismo

NEKONITAJ OPINIOJ DE KONITAJ ESPERANTISTOJ

SUFRAĜISTINOJ, la tipo de kuiristinoj, kiuj malutiligas la supon. Entuziasmo en ĉio estas dezirinda, sed la nediskreta entuziasmo malbonodoras inter ĉiuj prudentaj homoj. La ĝisdataj metodoj por gajni rajton, servpovon, influon en la mondo de politikaj kaj urbaferoj, praktikataj de la voĉrajtserĉistino ne pruvas sian prudenton kaj kapablon.

Kontraŭe, ŝia tuta manifestaro kontraŭstaras la aserton ke ŝi meritas voĉrajton. La devoplenumantaj virinoj de la hejmo, kiuj konsciencie agas ĉiam kaj ĉie por la plibonigo de mondcirkonstancoj en kiujn eniros ŝiaj gefiloj estas ja la meritantoj de voĉrajto. Kiu povas rigardi plezure kaj ŝatante la frenezagojn de virinoj, kiuj per tiaj farmanieroj ĉesas esti virinaj? Ho! pensante pri la gloro de virineco, patrineco, fraŭlineco, knabineco, mi forgesas alkласi la sufraĝistinojn en tia nobla, alteleviginta kategorio. Al kiu la gloro de reformo? la sufraĝistino? ne, neniel.

Ŝi, en la plej bona senco, la plej plena signifo de l' vorto, estas la reformanto, kiu, per aminda ekzemplo, en la hejmo, en la societo, en la sia propra mondo influas, alkuraĝigas sian gefilaron, sian gefrataron fari la veran bonfaron, la noblan vivadon. For! la bruiĝantino! Virino, la floro humana, la lastakreitaĵo de bonega Dio, la helpanta kamaradino de la viro. Ho virino, per nenia paŝo por nenia rajto ne ekmalviriniĝu. Via alteco iĝos, rajte de ĝia propra destino, pli alta. Via agpovo, via eniro en la povejojn, via konfesita potenco, dank' al via gracieco, modesteco kaj virineco, neniel kripliĝos, sed kreskos ĝis kiel la plenkreskiĝinta rozo, ĝi dissendos la bonegajn bonodorojn, admirigante la tutan homaron. Neniu, eĉ dum momento, neos ke la virino faris grandegan progreson en la lasta duonjarcento; sed tio okazis ne pro perfortaj marŝadoj, ne perforte, sed per la vivanta indeco de virinoj kies karakteroj malebligas ke ili restu en la postrangoj. Animvaloreco estas la sola trezoro, kiu donas la plej kontentigan premion, kaj al la virino malfermos pordojn ĝis nun fermitaj kontraŭ ŝi.

J. HADALL
Blackpool (Anglujo)

Pri feminismo en Italujo. Estas malfacile klarigi la movadon mallonge de la jaro 1898, la jaro en kiu okazis tiom da gravaj malpacoj subtenitaj de la socialistoj, ĝis nun. La reviviĝo de la *Virina* movado ĉiam progresis kaj nuntemple ekzistas du partioj, la unua katolika modernista, aristokrata; la dua, pli ruĝa, socialista. La centroj estas Romo kaj Milano, kvankam ĉie oni pli malpli laboras; sed en Romo antaŭ du jaroj okazis grava Virina Kongreso organizita de la partio *nigra* «La nacia federacio de la virina agado» kaj iom poste, alia kongreseto en Milano «Virina unuiĝo». Pri la propono de la virina voĉdono (per la deputitoj mi supozas) la du-partioj estas samopiniaj.

En la revuo «Vita Femiale Italiana» kies redaktorino estas Fino. Sofia Bisi Albini, Romo, kaj en la «Virina unuiĝo» Milano, oni trovas sciigojn pri la movado. Precipe la societo sin okupas pri la *bonfarado*, la protektado de geinfanoj kaj de la virinaj rajtoj.

Hieraŭ Mile deputato diris al mi, ke la virinoj en Italujo mal-multe laboras pri la virina politika voĉdono, sed ke pli kaj pli ili eniras en nepolitikajn situaciojn. Ekzemple: kiel helpantinoj kaj konsilantinoj en hospitaloj, en rifuĝejoj, malliberejoj kaj en la urbaj aĵeroj.

Mi kredas, ke kredeble vi en Katalunujo, kiel la italaj virinoj en niaj nordaj provincoj, estas ĉiuj progresemaĵoj, kaj laboras por la edukado, la libereco, la progreso de la virinaro.

Sed kredeble ĉe vi en la suda Hispanujo kie ĉe ni en Napolo Sicilio kaj aliloke la virino celas nur pli pri la sklavino de la viro ol pri lia egala samrajta kunulino.

Mi antaŭ nelonge renkontis Svisan fraŭlinon, kiu reiris hejmen post unujara restado en familio en Sevilla kaj ŝi rakontis al mi ke laŭ ŝia opinio la virino tie estas nur sklavino, kiu nenion povas aŭ kuraĝas fari sen permeso de la pastro aŭ de la viro kaj ŝi mem ne povas toleri tiun vivadon.

CLARENCE BICKNELL

Bordighera (Italujo).

Vi volas scii mian penson pri feminismo? Mi opinias ke la virino estas en la batalado de la vivo tute egala je la viro. Ŝia rolo antaŭ la homa societo estas vivadi per laborado. La societo ŝuldas al ŝi justecon kaj protektadon. Sed ŝia ĉefa rolo en la homaro estas la stareco de la familio. Ŝi devas helpadi sian viron; eduki siajn infanojn; esti la konsolanta angelino meze de sia hejmo.

MENDE

(Alger.)

Vi ektuŝis tre multajn gravajn demandojn sociajn kaj politikajn. Pri ĉiu el tiuj ĉi demandoj oni povus verki apartan libron. Ĉu mi povas respondi ilin tiel rapide? Pri mia lando mi povas diri ke ĝi nun travivas tre malfacilan, kruelan, sangan historian periodon.

Mia opinio pri Katalunujo? Ili ŝajnas al mi tre vivaj, inteligentaj, entreprenemaj kaj progresemaĵoj, kiel ĉiuj politike premataj nacioj. Mi tre simpatias ilin. Pri la virina juneco kaj emoj en Rusujo? Temo tro komplika kaj grava por nun en poŝtkarto ĝin preparoli. Mi nur diros ke inter la fraŭlinoj aspirantaj memstarecon, ĉu vizitante la universitatojn, ĉu okupante diversajn atingebajn por ili oficojn la rusinoj estas multoble pli multenombraj ol la virinoj el iu ajn alia lando. Tre multaj el ili heroe batalis kaj oferis sian vivon por la popola libereco.

Mia opinio pri feminismo? Mi opinias ke la virinoj devas esti egalrajtaj kiel la viroj kvankam grandparte ili ne estas ankoraŭ maturaj por tio ĉi, sed, se oni ne egalrajtigos ilin, ili neniam maturiĝos kaj ĉiam restos nek bonaj edzinoj, nek saĝaj edukistinoj de siaj infanoj, estontaj generacioj de civitanoj, nek prudentaj amikinoj de viroj kaj neniam ekkonos la veran, profundan kaj altan esencon de la vivo, restante nur malserioza amuzilo tre ofte tre danĝera por la viroj...

DOKTORO J. OSTROVSKJ

(Rusujo.)

La feministoj estos pravaj kiam ili kunigos la celadon al plibonigo de la situacio de l' virinoj en la socio, al la akiro de rajtoj egalaj al tiuj de la viroj, kun zorgo konservi aŭ plibonigi la virinajn spiritajn fortojn kaj naturajn emojn : ke la manoj, kiuj gvidas lerte aŭtomobilon, balancu delikate lulilon; ke la buŝo, kiu parolas pri metafisiko, estu kisinda kaj kisma...

MIRZA ABBAS ALI

Mombasa (Afriko Orienta).

Kolektis fraŭlino E. Rosell.



IV^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio en Olot

Provizora Programo

DIMANĈO 11

Matene : Alveno de la Kongresanoj : Manifestacio. — Oficiala akcepto ĉe la Urbdomo. — *Posttagmeze* : 3.^a h. Oficiala malfermo de la Kongreso. Labora kunsido. (Ĉe la Urbdomo). — Ekskurso al la fonto «Sant-Roc». Sardanoj¹. — *Vespere* : 9.^a h. $\frac{1}{4}$. Festo de la Floraj Ludoj en la teatro «Principal».

LUNDO 12

Matene : 8.^a h. Katolika meso. Esperanta prediko de Pastro Dro. J. Casanovas. — 9 h. Kunsido de la Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj. — 10.^a h. Kunsido de Ĝerona Esperanta Ligo. — 11.^a h. Labora Kunsido. (Ekskurso al la fonto «de les Tries»). — *Posttagmeze* : 1.^a h. Oficiala festeno. — 3.^a Labora kaj ferma kunsido (Ekskurso al la fonto «Moixina». Sardanoj¹). — *Vespere* : 10.^a h. Balo. Teatra prezentado.

Ekzamenoj

Dimanĉo 11.^a 5.^a h. *posttagmeze*. Skribaj.

Lundo 12.^a 10.^a h. *matene*. Parolaj.

MARDO 13

Postkongresaj ekskursoj

10.^a h. Al kratero de «Sant Francesc» kaj vizito al kelkaj fabrikoj. — *Posttagmeze*. Al najbara vilaĝo «Sant Joan les Fonts» Vizito al bredejo de trutoj, de Sro. Torres.

Tabelo de la hoteloj en Olot

Hotel de Europa, 7 ptes. diaries. — Fonda del Parque, 6 ptes. diaries. — Fonda de la Estrella, 6 ptes. diaries. — Fonda de Baudili Aulina, (abans Xam), 5 ptes. diaries. — Fonda Resplandis, a 3'50 i 5 ptes. diaries.

1. Kataluna danco.

Vojaĝo al Olot

Hortabelo de la vagonaroj, kiuj veturas de Gerona al Olot

Oni veturas al la kongresurbo tra diversaj vojoj : Gerono, Sant Joan de les Abadesses, Banyoles, Figueres.

El Gerono elveturas vagonaroj je la 5'40, 9'42, 13'49 kaj 18'15, kiuj venas Oloton respektive je la 8'41, 12'08, 16'48, 20'43.

De Olot al Gerono ekveturas je la 3'50, 9'50, 14'38 kaj 17'39, vagonaroj kiuj alvenas al Gerono je la 6'18, 13'05, 17'04, 20'34.

Tiu hortabelo eble estos post la 15.^a de Aprilo anstataŭata de la sekvanta :

El Gerono :	5'40, 9'42, 15'40	kaj 18'15
Alvenoj :	8'40, 12'08, 18'40	» 20'43
El Olot :	2'35, 5'00, 11'30, 14'40	

Dimanĉojn kaj festajn tagojn forveturos de Olot je la 17'38 eksterordinara vagonaro. Niaj amikoj devos informiĝi pri kiu el tiuj tabeloj efektive regas.

Veturiloj inter Olot kaj St. Joan de les Abadesses.

Eliroj el Barcelono :	Vagonaro.	6'00	13'46	17'15
Id. el Sant Joan :	Veturilo.	10'30	19'00	21'00
Alvenoj :		13'30	22'00	24'00
Eliroj el Olot :	Veturilo.	1'00	9'45	13'00
Id. el St. Joan :	Vagonaro	6'00	14'24	17'10
Alvenoj al Barcelono		9'21	18'28	20'23

Veturiloj inter Olot kaj Banyoles.

El Olot :	8'00	22'00	El Banyoles :	13'00	18'00
Alvenoj :	12'00	2'00	Alvenoj :	17'00	21'00

Veturiloj inter Olot kaj Figueres.

El Olot :	4'00	14'00	El Figueres :	5'00	14'00
Alvenoj :	9'00	19'00	Alvenoj :	10'00	19'00

Tagordo : Proponoj

Oni memoros, ke dum la pasinta Kongreso en Terrassa la aprobo de la Regularo por Floraj Ludoj proponita de Pastro Coll estis prokrastita, por ebligi al ĉiuj detalan studadon de ĉiu regulo. Ĉar la Regularo, tiel kiel ĝi estis proponita, jam publikigis, la Kongreso de Olot devos decidi pri ĝiaj partoj kaj tuto. La diskutado kaj voĉdonado pri tiu Regularo troviĝas rajte en la tagordo.

— Por solvi la malfacilaĵojn, kiujn ofte renkontis la Organizaj Komitatoj de niaj Kongresoj, kaj la Komitatoj de nia Federacio rilate al la Kongresa organizado, tial ke interkonsento pri ĉiu detalo postulis longajn korespondadojn kaj ofte vojaĝojn ĉar la Organiza Komitato ne havis regulajn delegitajn rajtojn, la Federacio decidis eksteroficiale en Tarragono, proponi kiel membron de Komitato de K. E. F. la prezidanton de la Organiza Komitato, kiu tiamaniere havus aŭtoritaton por preni decidojn kaj iniciatojn. Sed la III^a Kongreso, kiu devis okazi en Vic montris tuj, la mabonecon de tia solvo, ne nur ĉar la Kongresa kunsido, kiu devas elekti la membrojn de la K. E. F.-a komitato, ne povas scii, kiu estas la prezidanto de la Organiza Komisiono, sed ankaŭ ĉar, elektinte kiun ajn, ĝi trudus difinitan personon al la lokaj esperantistoj, ĝi iel premus la grupajn aŭtonomiojn, kaj el tio rezultus ne nur tordo de la spirito, kiu devas inspiri ĉiun agon en Federacio, sed ankaŭ malhelpo al la bona organizado de la Kongreso mem.

La organizado de la Olota Kongreso montris denove, kiom multe necesa estas la strarigo de rajta aŭtoritato en unu solan manon. Nia distinginda samideano Sro. Garganta, kiu ne ricevis povon de la Federacio mem, sed de la lokaj esperantistoj, neniam povis solvi per si mem eĉ la plej malgandajn detalojn kaj bagatelojn. Li estis devigata por ĉiu afero kaj afereto, kunvenigi la multenombrajn komisionojn, aŭdi la ĉies opiniojn, kaj ofte atendi festajn tagojn liberajn por ĉiuj membroj de l' Komitato kaj Subkomitatoj. La granda aktiveco kaj laboremo de niaj kolegoj de Olot, estis malhelpata de tia komplika proceduro kaj protokolo.

Necese do estas reguligi ĉi tion respektante : 1^o la aŭtonomion de la lokaj esperantistoj, 2^o la rajton de la K. E. F.-a komitato interkonsenti por ĉiu afero kun unu sola persono, kiu estos ĝia regula Delegito kaj kies decidoj estos oficialaj, kaj ne kun ia alia komitato nerajtigita, kies decidoj devos atendi postajn aprobojn por oficialiĝo.

Konsiderinte tion, la Konsulta Komitato de K. E. F. konsistanta el Prezidantoj de la aliĝintaj Grupoj komisiis Srojn. Campdelacreu kaj Amades por defendi proponon en tiu senco, kiun subskribas ankaŭ «Kataluna Esperantisto».

Niaj samideanoj estas petataj studi la aferon kaj alporti al la diskutado siajn apartajn ideojn kaj perfektigojn.

Jen provizoraj tekstoj super kiuj oni povos labori :

«La grupo aŭ grupoj el la urbo elektita por la sekvanta Kongreso, interkonsentiĝos, kaj antaŭ kiam estos finiĝinta la monato

sekvanta al la elekto, ili elektos du personojn, kiuj kun la oficoj de Prezidanto kaj Vic Prezidanto, zorgos pri la organizado de la Kongreso. La K. E. F.-a komitato rajtigos tiun elekton, kaj de tiu momento ĝi nur rekonos kaj akceptos la aŭtoritaton de la Prezidanto, aŭ de la Vic-Prezidanto kiam ĉi tiu okupos la lokon de la unua.

La lokaj esperantistoj povos, kiam ili volos, eksigi el iliaj oficoj tiujn Delegitojn kaj elekti novajn. Sed tiu nova balotado devas atingi almenaŭ tiom da voĉoj kiom la unua.»

—L'article setè del reglament vident de nostra Federació, quedarà ampliat amb l'adició següent : «L'organizació dels Congressos o Assamblees referides, correrà a càrrec de totes quantes entitats esperantistes i adherides a la K. E. F. estiguin domiciliades en la localitat on aquests hagin de celebrar-se, a no ésser que alguna d'elles renunci a prendre part en dita organizació. Una vegada acordada la localitat i en el plaç d'un mes, les entitats locals designaràn un individu amb el qual s'entendrà directament el Comitè de la K. E. F. Dit individu no podrà resoldre cap treball en definitiva sense la previa sanció del referit Comitè. En cas de renuncia o força major, les mateixes entitats locals nomenaràn a la millor brevetat possible un individu substitut. — JOAN CAMPDELA-CREU. — J. AMADES.

PROpono. — Modificació del paragraf primer del

Art. quart. — La «F. C. d'E.» comptarà únicament de membres individuals, que contribuiràn al seu sosteniment amb la quota mínima de 4 ptes. anyals pagades per endavant. — DELF DALMAU.

Alia propono. — Kreo de komisiono por propagandi Esperanton al la membroj de la karavanoj, kiuj vizitas Barcelonon.

— El senyor Dalmau convoca a tots els federats de Barcelona a una reunió que tindrà lloc durant el Congrès en el dia i hora que s'anunciarà a Olot per a tractar de la constitució de la Societat Central Esperantista de Barcelona.



III^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

Kun granda plezuro ni sciigas al niaj samfederacianoj, ke la versaĵo : «Vi kial ne venas?» devizo «Lonicero» premiita per la 1.^a Premio al Originala Versaĵo kaj per la «Natura Floro», estas verkita de niaj estimataj samlandaninoj fraŭlinoj Eulalia kaj Teresa Rosell.

La Juĝintaro de la Konkurso proponis al ili la tronon de la Reĝino kaj lokon en la «Ama Sekvantaro». Niaj samideaninoj tiel modeste, kiel afable por Olot, rifuzis la honoron, kaj insiste petis ke la Juĝintaro elektu por la alta loko fraŭlinon el la Urbo, kiu gastos nin. Ankoraŭ motivo por aplaŭdi ilin.



Balanç de l'any 1912

SORTIDES DE CAIXA

Mes	Dia		Pessetes
Janer . . .	30	Factura «L'Avenç»	85
» . . .	30	Correu i remesa revista	8'70
Febrer. . .	23	Factura «L'Avenç»	179
» . . .	29	Correu i remesa revista	9'15
Març . . .	1	Factura «L'Avenç»	90
» . . .	11	Factura J. Canals Domènech	5
» . . .	29	Factura «L'Avenç»	90
» . . .	31	Correu i remesa revista	9'05
Abril . . .	9	Envio de 20 Fr. a C. O. de Paris	22'20
» . . .	30	Factura «L'Avenç»	90
» . . .	30	Correu i remesa revista	9'30
Maig . . .	31	Correu i remesa revista	10'45
Juny . . .	20	Factura «L'Avenç»	105
» . . .	22	4 retrats de la casa Audoard.	12
» . . .	28	Factura Josep Recort	7
» . . .	28	Factura J. Dalmau.	27
» . . .	30	Despeses de secretaria.	5'05
» . . .	30	Correu i remesa revista	8'10
» . . .	30	Envio telegrams Varsovia i Bordighera	11'30
Juliol . . .	15	Factura A. Joarizti, S. en C.	29'65
» . . .	31	Factura «L'Avenç»	315
» . . .	31	Correu i remesa revista	10'30
Agost . . .	30	Correu i remesa revista	1'15
Setembre. .	31	Correu i remesa revista	8'40
Octubre . .	10	Factura «L'Avenç»	100
» . . .	31	Factura «L'Avenç»	100
» . . .	31	Correu i remesa revista	9'10
Novembre .	30	Factura «L'Avenç»	100
» . . .	31	Correu i remesa revista	9'70
Desembre. .	31	Correu i remesa revista	10'25
» . . .	31	Despeses de secretaria.	15'35
<i>Total.</i>			1,492'20

ENTRADES A CAIXA

	Pessetes
Existencia en caixa en 1/1/1912	326
Cobro de 6 quotes de 1911	18
Cobro de 413 quotes de 1912	1,239

	Pessetes
Venda de 12,200 <i>flugfolioj</i>	61
Import de drets d'exàmens (1 profesoreco, 2 lernado)	11
Import venda <i>ponumere</i> K. E.	86'55
Comisió venda llibres	3
<i>Total.</i>	1,744'55

RESUM

	Pessetes
Despeses generals,	1,492'20
Valor 5 % de pessetes 430, retintut per diversos delegats	21'50
Existencia en caixa en 31/12/1912	230'85
<i>Total.</i>	1,744'55

El President, *Ròmulo S. Rocamora*. — El Vice-secretari, *M. Bordas*
El Tresorer-Administrador, *J. Piñerres*



La Paŝtistineto¹

Kataluna popola kanto.

DEVIZO : Ho mia patrineto!

Kion donos ni al paŝtistineto?
Kion donos ni, por ke dancu ŝi?
Jen donaco mia, unu kapuĉeto,
kaj en la monteton ŝin alsendos mi.
Ne la pluv', ne l'neĝo falas sur montet',
kaj la vento ĉion movas en l'eben',
Sub la ombreto, l'ombrejo, l'ombret',
floroj, violoj kaj rosmaren'.

Tradukis
DRO. JOAQUIM COLL, Ptro.



1. Premiita en la II^a Literatura Konkreso de la K. E. F.

ENLANDA MOVADO

TERRASSA

Sub la aŭspicoj de la grupo «Lumon» okazis la 2^{en} de Marto je la naŭa vespere parolado de Sro. Aug. Pitlik pri Praha, en la ĉefa salono de «Casino del Comercio», kiun superplenigis granda nombro da ĉeestantoj, neesperantistoj kaj esperantistoj.

Sro. Alavedra, prezidanto de «Lumon» prezentis la distingindan profesoron, kiu elokvente parolis pri la diversaj aspektoj de sia urbo, kies belegaj bildoj ĉarmis la alestantaron. Ni povus ripeti ĉi tie ĉiujn frazojn de la raporto pri la parolado de Sro. Pitlik en Barcelono: tiu, kiun li faris ĉe ni, estis grava sukceso por Esperanto, kiu unu fojon plie montriĝis antaŭ la Terrassanoj kiel la sola rimedo de facila kaj plena internacia kompreniĝo.

Entuziasma aplaŭdado, krioj Vivu Bohemujo, gratuloj; ĉio ĉi estis la krono de la bela tasko de Pro. Pitlik.

ĜERONA

La pasintan marton okazis en la sidejo de nia societo «Ĝerona Espero» la lasta parolado, kiun nia nelacigebla samideano Sro. Delfi Dalmau faris en nia provinco dum la Paskofestoj.

Sro. Defi Dalmau per sia longa kaj bela parolado klarigis la belsonecon kaj riĉecon de Esperanto per multenombraj ekzemploj. Multaj aliaj teknikaj aferoj estis klarigitaj en la parolado de nia pioniro, kiu finis rekomendante al la ĉeestantoj, kiuj ankoraŭ ne lernis Esperanton, ĝian lernadon, ĉar Esperanto, li diris, estas la vera humana lingvo, ĉar ĝi estas la lingvo de ĉiuj homoj, la nura internacia lingvo, kiu solvas la gravan problemon de homa interkompreniĝo.

Kiel ĉiam, Sro. Dalmau invitis la ĉeestantojn peti klarigojn kaj ĉe kontraŭdiri liajn vortojn kaj kiel pruvo de konformeco multaj aplaŭdoj kronis sian belan paroladon.

Sro. J. Costa de Santa Coloma de Farnés, salutis en la nomo de la esperantistoj de Santa Coloma, kaj rekomendis la unuiĝon de la esperantistoj por fari laboradon.

Sro. Jozefo Domenech de «Ĝerona Espero» parolis pri la organizado de la esperantistoj farante detalan studon pri tio. Tiel Sro. Domenech kiel Sro. Costa estis aplauditaj pro iliaj paroladoj.

La prezidanto de la grupo Sro. Dro. Jozefo Casanovas dankis la ĉeestantojn, kaj la kunveno finiĝis ĉe la ekkrioj «Vivu Esperanto».

DELEGITO



BIBLIOGRAFIO

Ira l' silento. Elektitaj poemoj de Edmond Privat. — Universala Esperantia Librejo. 10, rue de la Bourse Genero. Moskva Librejo «Esperanto» 26 Tverskaja, Moskvo. Presita de «The Arden Press.» Letchworth (Herts) Anglujo; artista presejo de belaj libroj. Prezo. Sm. 0.60.

Bela estas efektive la libro, eleganta, alloganta, inda je la lerteco de l'aŭtoro. Eble ni devus paroli nur pri la libro, ĉar, kion diri pri Privat, kiam oni jam diris la nomon? Certe la poeziaj ideoj de la poemoj, ne estas novaj; — tion ĉi oni trovas eĉ en naturlingvaj poetoj — sed kia lingva flueco, kia facileco, kia beleco en la diro, kaj kia muzikeco en la ritmo. Jen ekzemple :

Sur vojo de l' vivo nun vagas mi sola
 Senzorge al kie la tempo min blovas;
 Ĉar, kvankam min celus eĉ vorto konsola,
 En aĝ' mia nuna mi vivi ne povas.
 Haltis mia koro voje
 Ĉe la tomo de l' princino,
 Kiu donis al mi foje
 Dolĉan manon de fratino.

RIMARKOJ. — Sinjoro Privat rimigas unufojon *muzikon* kun *mistikan* («Kantas amo»). Tiun konsonantan rimon, kiun ni ofte rimarkigis ĉe multaj, ni katalunoj ne konas. Por niaj oreloj, tie ĉi troviĝas rima malpleno. Trovado-roj elpensis la vokalan rimon, kie la vokaloj estas samaj de post la akcentita vokalo, kaj la konsonantoj malsamaj. Tiu formo, enkondukita de ili en la kortegon de Alfonso la V^a, fariĝis tre uzata kaj karakteriza en hispanaj landoj. Laŭ la reguloj, kiuj respondas al melodiaj postuloj, la versaĵoj devas senescepte rimi, vokale, aŭ plene, sed oni ne devas miksi ambaŭ rimojn, kiel ekzemple en la citita verskvaro kie *blovas* kaj *povas* rimas vokale kun *sola* kaj *konsola*, kaj ŝajnas kvazaŭ eĥo, kiu ne troviĝas regule en la cetero de l' poemo; kaj kiel en la jena

Sur blanka siringo jam svenas vespero,
 Kaj amo kantadas, dum flugas abeloj,
 Kaj ĉiam pli supre tra nokta l' aero
 Ĝi lulas la revojn ĝis kampo de l' steloj.
 Ĉe l' lampoj eternaj en alta ĉielo,

kie krom la rimo plena, estas eĥo en ĉiu dua verso, kaj eĉ plena rimo kun nuna verso de apuda verskvaro. Tiu okaza resonado, kiu ne respondas vole al la interna sento de la versaĵo, kaj sekve ne estas regula nek necesa por la kompleteco de la arta verko, estas teda al niaj oreloj. Kiu sentas rimon inter *muzikon* kaj *mistikan*, tiu nepre sentos pli grandan inter *aero* kaj *abeloj*.

Ne mallaŭde ni diras tion, sed kun la deziro alporti nian naciajn senton kaj scion al la komuna starigo de la Esperanta versofarado. Eble ni ne estas pravaj, kaj ĉio dependas nur de simpla alkutimiĝo. Niaj deziroj konkretiĝas jene:

- 1.^e Versoj devas interrimi aŭ plene, aŭ vokale, sed ne plene kaj vokale samtempe. (Se tio ne okazas regule kaj vole en la tuta versaĵo).
- 2.^e Eviti ke apudaj versoj rimu vokale. (Sama rimarko kiel antaŭe).
- 3.^e En plena rimo, ĉiuj vokaloj kaj konsonantoj, nepre devas esti samaj de post la akcentita vokalo.
- 4.^e En vokala rimo, la konsonantoj nepre devas esti malsamaj de post la akcentita vokalo.

Tiujn malfacilaĵojn postulitajn de melodio oni povas tre facile eviti:

- 1.^e Per sentrima versado.
- 2.^e Per prozo.

Propaganda piedvojaĝo al la Oka Internacia Esperantista Kongreso (11-18 de Aŭgusto 1912.) — V. N. Devjatnin. (L. K.) — Munĥeno 1912. — Presejo E. Janich, München. — Prezo: 1 suk. 50 pfg. (75 sd.)

Ĝi ne estas elpensita Jules-Verne'a rakonto — ĉar tion povus ŝajni tiel longa piedirado en nia elektra, aeroplana epoko — sed simpla, klara raporto pri la vojaĝo de Parizo al Munĥeno entreprenita de sinjoroj Devjatnin kaj Romano por altiri la popolan atenton al nia ideo. Ili sukcesis. Kompreneble. Oni konsilas al virinoj, kiuj deziras aperi kiel belegaj, serĉi la akompanion de malbelulino. Multaj, kiuj kredis ke Esperanto estas frenezajo, certe juĝis ĝin plej saĝa afero apud la frenezeco de piedirado en nia epoko de malkaraj transportoj. La Kamparanoj, kies mortigitaj kokinoj, vokas venĝon kontraŭ aŭtomobiloj, certe komprenos la pacemon de nia afero, kiu replenigas la vojojn per trankvilaj malrapidaj irantoj. Sro. Devjatnin rakontas tre pitoreskajn anekdotojn pri ilia vojaĝo, kaj oni legas la verkon kun plezuro. Tamen, la nuna edzino de nia distinginda amiko Sro. Borson, rajtos kolereti. Efektive, Sro. Devjatnin diras eke la geedziĝo ne okazis dank'al milito. Ni ne scias ĉu nia piedirinta samideano estas partiano de l' fraŭleco, sed ĉiel ni konsilas por la dua eldono, — kiu nepre okazos baldaŭ, ĉar la verko elĉerpiĝos — la esprimon «maldank'al». Ĝi ne estos tre belstila, sed almenaŭ iom pli afabla.

TAMEN

KORESPONDADO

Sro. A. C. : Ni parolos pri tio en Olot. — Sroj. M. X., B. G., H. P. : Dankon pro viaj gratuloj. — Fino. M. A. : Bonvolu vin turni al la Loĝkomisiono en Olot. Ni ne povas komplezi vin. Dankon.



A L'AVENÇ s'està imprimint en un volum
de la seva Biblioteca popular el

CURS PRÀCTIC DE LA LLENGUA ESPERANTO

D'EN FREDERIC PUJULÀ

la primera edició del qual fa temps està completament agotada. Dit *Curs* conté l'explicació de les setze regles del Dr. Zamenhof, temes, versions, textos i un Vocabulari de més de 800 mots.

Per que representa la Biblioteca popular de L'Avenç en el nostre moviment literari català, els esperantistes comprendrà la gran importància que té per a tots, el que un dels seus volums sia dedicat a l'idioma internacional.

Preu del volum : 50 cèntims

Per la seva baratura, l'obra podrà usar-se per a la propaganda, distribuint-la en vetllades, inauguracions de cursos, congressos, etc.

L'Avenç, desitjant fer el tot després de fer el molt, ha decidit fer una sensible rebaixa als *Grupus Esperantistes* i particulars per a un nombre determinat d'exemplars que encarreguin en ferm.

Essent ja nombroses les demandes que hi han fetes, els Presidents de Grupus i particulars que no vulguin esperar les edicions posteriors, poden des d'ara fer la petició dels exemplars que desitgin, adreçant-se directament a L'Avenç:

Rambla de Catalunya, 24 : Barcelona



Reglament de la

Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer. — Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon. — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i previa acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart. — La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuiran al seu sosteniment amb la quota mínima de TRES ptes. anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que'ls membres individuals i llurs membres podran pagar les quotes per mensualitats. Per a aquest fi els Presidents s'entendran amb el Caixer-administrador directament.

Els Presidents dels grups adherits formaran un Consell Consultiu de la «Federació», an el qual podrà dirigir-se el President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en que ho cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació», sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en lo que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. quint. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vice-president, Caixer-administrador de la revista, Vice-caixer-administrador, Secretari i Vice-secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista. El càrrec de Caixer-administrador serà permanent. El que'l desempenyi continuarà en el càrrec fins a ordre de la Junta que farà ratificar pel pròxim Congrés.

Art. sisè. — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son càrrec: recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessaries per als efectes de l'article segon i demés assumptes del règim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre'l Comitè Directiu i els seus representants.

Els delegats podran retener-se, si ho creuen convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. setè. — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assamblea o Congrés general, en el qual, previa ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà el lloc on hagi de celebrar-se el vinent Congrés o Assamblea, se nomenaran els individus que hagin de formar el Comitè per al següent exercici, i es discutiran les proposicions que hagin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assamblea, i incloses en l'ordre del dia.

Art. vuitè. — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les Juntes de les quals seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. novè. — Tots els acords de les Assamblees i Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desè. — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament hauran de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades en les Assamblees o Congressos generals.

Art. onzè. — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la catalana en les Assamblees.

Art. dotzè. — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.», els fons existents, o que resultin de la liquidació, passarán a la «Centra Oficejo», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

Article transitori. — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Sabadell, carrer de Gracia, 12.

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
KATALUNUJO

Red. : Frederic Pujalà
Sek. de Red. : Josep Grau

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

*Pri... Fred. Pujalà.—IV^a Kongreso de K. E. F.—
Grava rimarko.—Verdikto de la Stampa Konkurso.—
Suscripció per a la senyera de K. E. F.—
Enlanda Movado.—Oficiala Parto.—Korespondado.*



JARO IV^a

JUNIO-JULIO 1913^a

N^{ros} 6-7 (39-40)

NAŬA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, 24-31 Aŭgusto 1913

La organiza laboro de la Naŭa nun tre bone marŝas, kaj la aliĝoj iom post iom alvenas, sed tamen estas necese, ke la Esperantistoj, kiuj intencas partopreni en la Kongreso, aliĝu ĉiuj kiel eble plej baldaŭ. Oni pripensu, ke por multaj organizotaj aferoj, por la kongreslibro, la presajoj, la diversaj festoj kaj amuzajoj, la Loka Komitato devas scii la proksimuman nombron de la kongresanoj, kaj ĉar la tempo por la organizado de la Naŭa estas nur duone tiel longa ol la tempo por la aliaj kongresoj, ni ankoraŭ unu fojon petas, ke oni ne prokrastu la aliĝon kaj alsendon de la mono por la kongresa karto (6 Sm. — 15 Frankoj). Se oni ne ankoraŭ klare scias, ĉu oni loĝos en privata ĉambro aŭ en hotelo, oni ja povos sendi la monon por la loĝado pli malfrue, sed ni petas ne mendu ĉambron post fino de julio; post tiu dato, la komitato ne plu povos akcepti respondecon por bona loĝejo.

Nia kara Majstro D-ro. L. L. Zamenhof ĵus sciigis nin, ke li ĉeestos la Kongreson kun la *tuta familio*, edzino kaj tri gefiloj. Estas do devo de ĉiuj Esperantistoj honori la Majstron per sia ĉeesto kaj tiamaniere ankaŭ helpi al la bonsukceso de la Naŭa.

Por la organizado de la diversaj ekskursoj kaj vojaĝoj dum kaj post la Kongreso ni faris kontrakton kun bona vojaĝfirmo en Zurich, kiu nun preparas la planojn de la diversaj vojaĝoj. En nia venonta cirkulero ni verŝajne povos detale raporti pri tiu flanko de la Kongreso.

La Organiza Komitato ankaŭ komencis starigi Honoran Komitaton, al kiu jam aliĝis multaj eminentuloj en Bern.

Ĉar por la organizado de la Naŭa, kiel ni jam diris, ni havas nur kelkajn monatojn, ni insiste petas ĉiujn *Esperantistajn Gazetojn* kaj ĉiujn Deleĝitojn de UEA, ke ili diskonigu per ĉiu forto la enhavon de niaj cirkuleroj, kiujn ni bedaŭrinde *pro manko da tempo ne povas sendi al ĉiuj aparte*.

Fine, ni petas pardonon al tiuj personoj, kiuj jam mendis poŝtkartojn kaj glumarkojn sed ilin ne ricevis ĝis nun. Ĉar ni mem, pro fatala malhelpo ricevis la sigelmarkojn nur nun, ni prokrastis ankaŭ la sendon de la kartoj por eviti duoblan koston. Sed nun la regula dissendado komencis, kaj baldaŭ ĉiuj estos kontentigitaj. Ni samtempe rememorigas, ke ni eldonas du belajn poŝtkartojn (po 10 ctj. — 4 sd) kaj ankaŭ same belan sigelmarton (100 ekzempl. — 40 sd).

Laŭ interkonsento kun la Pensionoj kaj Privatuloj de la Kongresurbo, la Organiza Komitato sukcesis atingi sufiĉe pli malaltajn prezojn por la ĉambroj kaj manĝoj. Ĉar ni tiom sciigas nur en lasta minuto, ni detale raportos nur en la venonta numero de la Oficiala Gazeto de la Kongreso.

Direktanta Komitato

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Red. : FREDERIC PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEP GRAU

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : Pri..., Fred. Pujulà. — IV^a Kongreso de la K. E. F. — Grava Rimarko. — Verdikto de la Stampa Konkurso. — Suskribiĉo per a la senyera de K. E. F. — Enlanda Movado. — Oficiala Parto. — Korespondado.

PRI...

NOVA REDAKTORO

MI havas la plezuron sciigi al niaj legantoj, ke de nun, Sinjoro Estanislau Pellicer formas parton de nia Redakcio. Sro. Pellicer, kiu dum du jaroj plenumis la oficon de sekretario de nia Federacio kaj meritis ĉies aprobon; kiu estis premiita en niaj Floraj Ludoj per tri unuaj premioj kaj kelkaj mencioj, prezentas ĉiun garantion de amo al nia organizaĵo kaj de fideleco al, kaj kono de, Esperanto. Kvankam tre juna, li estas jam malnova esperantisto. La nunan jaron li estis elektita membro de la Juĝontaro de la IV^a Floraj Ludoj. Li speciale sin okupos en nia redakcio pri la direktado de la subkomisionoj de Havenoj kaj Karavanoj, kaj ni estas certaj ke lia helpo tre multe simpligos la grandan laboron, kiu jam pezas sur nin.

Krom liaj esperantistaj kapabloj nia amiko kaj kolego havas specialan lertecon; li virtuoze ludas la fortepianon. «Kataluna Esperantisto» nun, *preskaŭ* ŝajnas grava institucio: ĝi *preskaŭ* havas orkestron!

Ni tre kore premas liajn manojn.

FRED. PUJULÀ

IV^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Olot, Majo 1913

10^a, Sabato

LA VOJAĜO AL OLOT

KIAM ni desaltis de nia veturilo kun fraŭlinoj Rosell, la gajnintinoj de la Natura Floro, sur la trotuaron de la Franca Stacidomo, la plej agrabla surprizo atendis nin. Andrés Piñó, la prezidanto de la «Valencia Grupo» kaj redaktoro de «La Suno Hispana», kiun de post la V^a Internacia ni ne vidis, desaltas ankaŭ de veturilo kaj klarigas al ni, ke li venas al la Kongreso kun speciala delego de sia grupo por studi nian organizaĵon.

Apenaŭ ni havas tempon premi lian manon, ĉirkaŭpreni lin, kaj bati lian dorson, kiel ordonas la utila kutimo ĉi tie, de unu kaj alia flanko alvenas konatuloj. Jen kapitano Perogordo, komisié sendita de la Ministro de Militaj Aferoj; jen Sro. Codorniu, kun la fervoja gvidlibro en la mano; jen Sro. Sabadell, kiu venas ricevi du premiojn el la Floraj Ludoj; kaj jen Sroj. Rosals, Rocamora, Bremon kun nova bastono, Aguadé, de Reus, kaj amaso da gesamideanoj el Terrassa, Sabadell, Tarragona, k. t. p.

Ni demandas pri aliaj samideanoj. Tiam oni klarigas al ni, ke nia vagonaro ĉiam malfruigás, ke ĝi neniam trafas la korespondadon kun la fervojo de Olot, kaj ke niaj kolegoj forveturis per antaŭa vagonaro. Ni admiras unu fojon ankoraŭ niajn fervojajn kompaniojn kaj rezignacie starigas projektojn por la nokto, kiun ni devos pasigi en Ĝerono. Ni profitos la okazon por fari publikajn paroladojn.

Per niaj *utilaj* ĉirkaŭprenoj ni forigas la polvon de niaj vestaĵoj. La kutimo permesos al ni ŝpari niajn brosojn kaj alveni tute puraj en ĉiun urbon. Jam la 9^{an} je la 11^a vespere, kiam Sro. Perogordo malsupteniris de la rapida vagonaro de Madrido kovrita de la polvo de tiel longa vojaĝo, li falis en la brakojn de cent samideanoj, kiuj atendis lin, kaj ni lin skuís tiamaniere, ke eĉ ne unu karbero restís sur li, kaj li estis preta manifestacie traíri kun ĉiuj la Ramblojn ĝis sia hotelo.

Dum neni kongresa vojaĝo oni tiel multe ridis. Ĝojo kaj gajo flugis tra la spaco, kiuj ne devis halti dum la tuta Kongreso. Sro. Sabadell per siaj spritaj anekdotoj, en kiuj li sin pentras ĉiam kiel suferantan viktimon, Sro. Codorniu per siaj rimarkoj kaj konsideroj al la rakontoj de la unua, kaj per sia malfeliĉa gvidlibro, kiun ĉiu deziras konsulti ĉiun minuton, Sro. Bremón per sia nova bastono, kiu sin apogas sur ĉio escepte sur la planko, minacante okulojn kaj implikiĝante en krurojn kaj valizojn, Sro. Piñó per sia rakonto pri angla samideano kiu mendis, kiel memoraĵon, uzitan pikilon de boybatalo, kaj post analizo de la sango, malkovras ke ĝi estas ŝafa, je la granda miro de la valencia samideano, kiu siavice estis trompita de nedelikata buĉisto:—Ĉi devigas nin krevi de rido. Oni vortludas pri Olot, la kongresurbo (ol-ot'). Kiu estas la plej komparota urbo?... Sro. Bremón certigas meze de aplaŭdoj, ke ĝi estas urbo *Kiel...*—Je kio similas muro al maro?—Je tri literoj?—Ne, sinjoro: *je l'afiŝoj—je la fiŝoj!*—Kiu estas la birdo, kiu havas ruĝan kreston, matene kantas tiel «kokoroko», kaj havas longan rostron kiel elefanto?—Mi ne scias!—La koko.—Sed, sinjoro, la koko ne havas rostron!—Efektive; sed mi diris pri rostro nur por erarigi vin!—Ĉar estis malpermesite forĵeti kiun ajn tra la fenestro, la proponinto ankaŭ alvenis en Olot.

Post kvar horoj da vojaĝo ni atingas Ĝeronon. La kajoj de la stacidomo estas plenaj de fraŭlinoj kaj esperantistoj, kiuj senpolvigas niajn vestojn. Terura masaĝo tamen. Dum la venonta Kongreso ni kirasigos nian dorson per kelkaj ekzempleroj de niaj nevenditaj eldonoj.

En Ĝerono ni ne havis tempon senti la amikajn batojn; alia pli grava impresio kortuŝis nin. La du enurbaj rivalaj grupoj kunfandiĝis antaŭ nemulte en unu solan, kaj anstataŭ nokto de malamo ni renkontas matenan krepuskon de frateco kaj espero. Oni nur bedaŭris ne esti multbraka hinda statuo kaj ne povi tial ĉirkaŭpreni pli da brustoj samtempe.

Ni malfruiĝis je unu horo. Ĉu la alia vagonaro jam foriris? Niaj Ĝeronaj samideanoj avidaj reteni nin kun si, certigas ke jes. Sed oni avizas nin, ke dank'al la klopodoj de pastroj Casanovas kaj Coll, de ĉiuj samideanoj, kiuj forveturis per la alia vagonaro, kaj al la afableco de la Kompania Inĝeniero, Sro. Boy, kies manojn ni ne premis de antaŭ dudek jaroj! kaj de la stacidomestro, la vagonaro atendas nin!

Ni kuras al veturiloj; galope oni nin kondukas tra la urbo, kaj ni alvenas apud longega vagonaro jam plena de esperantis-

toj, al kiu oni devas aldoni ankoraŭ kelkajn veturilojn. Ĉi tie ni renkontas Sron. kaj fraŭlinojn Gili, Sron. Domenech kun lia simpatia edzino, Sojn. Amades, Horta, la esperantistojn de Sant Feliu de Guixols, amason de novaj kaj nekonataj samideanoj, kies nomoj plenigus tutan paĝon. La Ĝeronaj samideanoj, kiuj venos morgaŭ, adiaŭas nin, kaj la vagonaro ekiras inter vivu! kaj aplaŭdoj.

Dum la veturado, en Amer, la popolo, kiel ĉiun sabaton, pleniĝas la stacidomon. Sro. Kurt Fritzsung, la germana samideano, kiu partoprenas la Kongreson elgas flagon tra fenestro kaj krias Vivu Esperanto! Unu momenton ni timas popolan ŝercon, sed nia timo fariĝas emocio pro la unuanima ovacio, kiun la popolo faras al la krio respondante per «vivu-oj» kaj aklamoj. Piñó estas mirigita, sed ni ankaŭ. Ni neniam esperis ke nia propagando tiel profunde eniris en la popolan koron.

Ni alvenas en Olot, kun malfrueco de du horoj post la tempo montrita de la gvidlibro de Sro. Codorniu, pliprefere konsultata de Sro. Bremón ol la hortabelaro de Sro. Perogordo... kiu tute ne entenas hortabelojn!

Post senfinaj klopodoj kaj penoj ni loĝiĝas. La hoteloj estas superplenaj. De ĉiu urbo kaj vilaĝo en rondo de tridek kilometroj, scivolemaj familioj venas al nia festo. Eksterordinara iluminado heligas la facadon de la Urbodomo de kies balkonoj pendas damaskaj tapiŝoj. La urbo feste vestiĝis por ni.

Jam estas preskaŭ noktomezo, kiam ni finas nian vespermanĝon, kaj anstataŭ ripozi ni iras al la akceptejo ĉe la urba muzeo. La ekspozicio de esperantaĵoj estas movoplana. Tie ni renkontas Pastron Planas Vicprezidanton de K. E. F., Sron. Albagés, Prezidanton de *Vika Esperantistaro*, Pastron Ribas, kaj multajn aliajn, kiuj vojaĝis tra la vojo de Sant Joan de les Abadeses.

La membroj de la organiza komitato zorgas la lastajn detalojn sub la direktado de Sro. Garganta. Sroj. Prat, Agustí, Roqué, Fortet, Cuscoy, Vayreda, Rosals,... ĉiuj membroj de la komisionoj, kies nomojn oni povas legi en la raporto de la monato Aprilo, helpataj de la belaj samideaninoj fraŭlinoj Vayreda, Escubós, Güell, Iglesias, Llosas, Figueras, Vilá, Pujol, Guitar, Costa, Coros, Manyalich, Membreis kaj aliaj kies nomojn estas neeble memori, laboras ĉirkaŭ la tabloj, kaj afable helpas, informas, akompanas la alvenintojn, kies nombro pligrandiĝas senĉese post la alveno en la placon de la grandaj veturiloj inter bruo de tintiloj, krioj de veturigistoj, svarmo de pakaĵoj, krako de vipoj... Olot, centro de enlanda pasinta politika milito, devis prezenti similan aspekton je la alveno

de armitaj regimentoj. Sed nia armeo estas paca, kaj ĝia venko, ne lasas malamikojn nek venkitojn! Ho, la belaj malnovaj urboj vekitaj de nia febro kaj agitiĝo!

11^a, Dimanĉo

AKCEPTO ĈE LA STACIDOMŌ KAJ MANIFESTACIO

LA sidejo de «Olota Stelo» en la granda konstruaĵo, kie estas instalita la urba Muzeo, estis jam tutplena unu horon antaŭ la fiksita por la deiro de la aŭtoritato al la stacidomo. En la granda klaŭstro, kies murojn kovris per esperantaĵoj ĉiuspecaj la aranĝintoj de la propaganda ekspozicio, kunvenis ĉiuj esperantistoj olotaj kun la multaj aliurbaj alvenintaj la sabaton, la membroj de la Ruĝa Kruco, la tuta Urbestro kaj ĉiuj distingindaj personoj kaj oficialaj oficistoj, kiuj svarmis rigardante la interesajn kolektojn de gazetoj esperantaj, de fotografiaĵoj, de aŭtografoj de eminentaj esperantistoj kaj la ceterajn rimarkindaĵojn el kiuj ĉefe altiris la atenton la aro da stampoj grupaj partoprenintaj en la Internacia Konkurso, kiun «Olota Stelo» aranĝis.

La Urba Orkestro, preta antaŭmarŝi antaŭ la akceptantaro, ludis intertempe kelkajn kompoziciojn, ĝis la momento kiam post la bela standardo de la olota grupo la kunvenintoj foriris al la stacidomo, kien kun ni iris ankaŭ grandega amaso, scivole rigardanta. En la kajoj ni vidis Sron. Meroles, urbestro, Sron. Pere Llosas, deputito parlamenta, ĉiujn aŭtoritatulojn, la reĝinontan fraŭlinon Escubós, fratinojn Rosell, kaj reprezentantojn de ĉiuj enurbaj ĵurnaloj kaj de intelektaj, artaj, komercaj asocioj. Kiam la vagonaro alveturis aplaŭdego miksiĝis kun la sonoj de *La Espero*. Protokolaj prezentadoj okazis inter la reprezentantoj alvenintaj kaj la urbaj aŭtoritatoj; la flagoj flirtis en l'aero kaj la manifestacio tuj organiziĝis.

Antaŭiris la urba muzikistaro, sekvis la kongresanoj sub la verdaj standardoj, la altaj membroj de la Ruĝa Kruco en korporacio, la Urbestro kun la pedeloj kaj la Komitato de la Federacio apud la reprezentantoj de Iliaj Moŝtoj la Ministroj de Instruado kaj Milito. Inter muro de personoj starantaj ambaŭflanke de la irantaro, la esperantistoj kore salutataj per aplaŭdoj trairis la ĉefajn stratojn, — kie bonvenaj frazoj kaj svingataj poŝtukoj certigis

jam pri la granda sukceso, kiun la Kongreso estas atingonta, — kaj eniris en la Urbodomon, kie havis lokon la oficiala akcepto de la kongresanoj.

OFICIALA AKCEPTO

Solene akceptis nin la urboj de niaj Kongresoj, sed tiu ceremonio en neniu el ili estis tiel impona, kiel en la kongresurbo de nia kvara. En la prezida loko ĉe la salono de kunsidoj en la Urbodomo, Lia Moŝto la Urbestro Sro. Joan Meroles, apud kiu sidis Sinjoraj Moŝtoj Sro. Agustí Riera, prezidanto de la ĝeronprovinca deputitaro, Sro. Dro. Esteve Ferrer, paroĥestro, Sro. Lluís M.^a de Mesa, ĵugisto, Sro. Reprezentanto de la Milita Aŭtoritato, Sro. Pere Llosas, parlamenta deputito el la Olot distrikto, Sro. Josep M.^a Garganta, prezidanto de *Olot Stelo* kaj multaj aliaj distingindaj personoj, akceptis bonkore la kongresistojn.

La paroladon salutan de Sro. Urbestro respondis katalune la prezidanto de K. E. F., per sinceraj vortoj, atestante al la gastama urbo la simpatiojn de la esperantistoj tre honoritaj de la akcepto, kiun oni faris al ili superantan la plej optimismajn esperojn de la gastoj ĵus alvenintaj.

Sro. Perogordo, uniforme vestita, per bela parolo en kastila lingvo enkadrita de lia eleganta gestado salutis afable la urbon kaj la katalunajn esperantistojn.

Samajn sentojn esprimis en kortuŝantaj frazoj Sro. Andrés Piñó, kiu alparolis valencie kun dolĉa prononcado.

La aplaŭdoj konstante sonis dum la ceremonio, kaj kiam la ĉeestantoj povis liberiĝi de la potenco de fotografisto, kiu per siaj kliŝoj volis eternigi la bildon de la festo, ĉiu disiris en sian flankon al la Hoteloj kaj gastejoj.

MALFERMO DE LA KONGRESO

En la bela salono de la Urbodomo, kie la kongresanoj amasiĝadas jam de antaŭ duonhoron, fariĝas subite plena silento, kiam Sro. Agustí Riera, prezidanto de la Provinca Deputitaro de Ĝerono, stariĝas kaj en la nomo de Lia Moŝto la Ministro de Publika Instruado alparolas la alestantojn. Per afablaj vortoj salutas la urbon Olot, ĝiajn aŭtoritatojn kaj la kongresanojn, kiuj en sia kulturcela agado venis kuniĝi en grandan feston por plifortigi la ĉies entuziasmon per la konstato pri vivo kaj progreso de la esperantista familio. Prezentas al la Kongreso siajn bondezirojn por Esperanto kaj en la nomo de la Ministro deklaras la Kongreson malfermita.

Kiam la aplaŭdado estingiĝas, Sro. Rocamora, prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio legas sian esperantan paroladon, per kiu li rakontas pri la deziroj de la Komitato, kiujn ĝiaj klopodoj ne povis ankoraŭ efektiviĝi, kaj esperas, ke dum la sekvonta jaro la Federacio enkorpiĝos en sian liston de venkoj, la nunajn dezirojn, tiam jam realiĝintajn. Sonas la aplaŭdoj, bruas la salono kaj la Prezidanto, komencante la I^{an} Laboran Kunsidon, adiaŭnas Sron. Agustí Riera, meze de la entuziasma aplaŭdado de la kongresistoj.

LABORAJ KUNSIDOJ

I.^a — II.^a, *Dimanĉo posttagmeze*. — Sro. Pujulá, aplaŭde salutita de la ĉeestantoj, memorigas, ke dum la IV^a Internacia Kongreso, en Dresdono, Sro. Perogordo kaj li, ambaŭ kune petis por Barcelono la V^{an} Kongreson, al kies sukceso tiel multe kontribuis Sro. Piñó, aranĝante la postkongreson en Valencio, kie la esperantistoj estis ravitaj de la afableco de la tieaj samideanoj kaj de la ĉarmoj de la bela Naturo. Ni ĉiuj devas ĝoji, ke ili ambaŭ partoprenas en nia Festo, kaj ni profitos ilian restadon ĉe ni por fiksi la bazojn de supera abstrakta organizaĵo en Iberio, kiu laborados firme por la definitiva starigo de Esperanto.

Sro. Perogordo diras, ke la vortoj de Pujulá trafis lin en lian koron: kortsŭite li certigas, ke vere la esperantistoj estas unu por ĉiuj, ĉiuj por unu, ĉar ĉi tie ne troviĝas kastiloj, nek valencianoj, nek katalunoj, sed nur esperantistoj. (Aplaŭdoj). Li deziras, ke laŭ la ekzemplo de la Kataluna Federacio kreiĝu en aliaj regionoj novaj federacioj, elmontro de ilia esperanta vivo.

Sro. Piñó alparolas: mia koro saltas en la brusto pro entuziasmo; mi ŝparas la vortojn kaj malfermas la brakojn por ricevi de la katalunoj forton kaj unuecon. Bruaj aplaŭdoj longe sonadas, dum li ĉirkaŭprenas Sron. Pujulá.

La entuziasmo vekita de la elokventaj vortoj de la pioniroj varmigas la medion, kaj ofte dum la delegitoj de la grupoj, post invito de la Prezidanto, salutas la Kongreson, ĝi eksplodas en fortaj aplaŭdoj.

En la nomo de *Barcelona Stelo* (Barcelona), kaj de *Ilerda Espero* (Lleida), parolas Sro. Grau. Sro. Johano Campdelacreu, nome de *La Rondo* (Barcelona); Sro. Domingo Obiols, de *Tarragono Esperanta* (Tarragona); Sro. Johano Piferrer, de *Esperanta Semo* (Sabadell); Sro. Josep Albagés, de *Monta Grupeto* (Sant Llorenç Savall) kaj de *Viha Esperantistaro* (Vic); Sro. Victor Lluís, de *Frateco* (St. Feliu de Guixols); Sro. Pere Durán, de *Libera Stelo* (Barcelona); Sro. Benito Bellver, de *Esperanta Aŭroro* (Barcelona); Sro. Johano Rosals, de *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*; Sro. Pere Mata, de *Esperanta Amikaro* (Banyoles); Sro. Mikaelo Garriga, de *Esperantista Junularo* (Terrassa); Sro. Joan Mir, de *Esperantista Amikeco* (Manlleu); Sro. Joan Gili, de *Esperanta Fako* de Centre Autonomista de D. del C. i de la I. (Barcelono) kaj de *Badalona Stelo* (Badalona); Sro. Frederic Mensa, de *Ciam Antaŭien* (Barcelona); Ptro. Jozefo Casanovas, de *Ĝerona Espero* kaj la ĵurnalo «El Norte» (Ĝerono); Sro. E. Aguadé, de *Nova Semo* (Reus); Ptro. Francisco Viver, de la

ĵurnalo «Ciutat Nova» kaj de *Esperanta Lernejo* (St. Feliu de Guixols); Sro. Josep Ventura, de *Lumon* (Terrassa); Sro. Pere Cortada, *Esperanta Idealo* (Santa Coloma de Farnés); Dro. Joaquín Coll, de la ĵurnalo «El Correo Catalán» (Barcelona); Sro. Delfi Dalmau, de *Semo* (Barcelona); Sro. Josep Puntí, de *Vojantaŭen* (Mollet); Sro. Joan Romagosa, de *Esperanto kaj Patrujo* (Barcelona); kaj Sro. Perogordo, de la *Hispana Ruĝa Kruco*, de *Centra Esperanta Grupo* (Madrido) kaj de la *Societo Hispana por la propagando de Esperanto*.

Sro. Bordas, vicsekretario, legas telegramojn de Lia Moŝto Ministro de Publika Instruado; de *Esperanta Frateco* (Barcelona); de Sro. E. Pellicer; de *Esp. Racionala Grupo* (Barcelona); de Sro. G. Pi (Frankfurt-Germanujo); de la *Esp. Grupo de la U. F. N. R. Dte. II* (Barcelona); de la *Grupo de Valencio*, kaj aliĝojn de la grupoj *Esperanta Frateco* (Vendrell) kaj *Norda Stelo* (La Escala). Aplauĝoj sonis post la telegramoj (preskaŭ ĉiuj en Esperanto) kaj komunikajoj legitaj.

Ankaŭ, Sro. Bordas legas tuj la raporton sekretarian kiun li verkis. La taskoj de la Komitato dum la intertempo Junio 1912^a-Majo 1913^a estas bone priskribitaj. Solena festo en la salonoj de la «Foment del Treball Nacional», en Barcelono, por la malfermo de la kursoj en nia lando; partopreno de K. E. F. en la jubileaj festoj de Esperanto; eldono de propagandaj markoj; komuniko (senresponde lasita de tiu korporacio), al la *Kuracista Akademi de Katalunujo*, petanta la uzon de Esperanto en libro resumo de la laboro de kuracista kongreso. Fine, li dediĉis kelkajn frazojn al la memoro de niaj mortintoj, precipe al komandanto C. Huecas, animo de la movado en Ĝerono, kaj kantis la esperon pri triumfo. Denove aŭdiĝis aplauĝoj por la bela raporto de nia laborema amiko, kiu sciis agrabligi la ordinare senĉarman rakontadon.

Sro. Grau, kiel sekretario de la Floraj Ludoj, legas leteron de niaj francaj samideanoj. Sroj. De Menil, Bourlet, Chavet, Bricard, kiuj bedaŭras neĉeesti en la Kongreso kaj deziras al ĝi la plej brilan sukceson. Pastro Planas en la nomo de la infana grupo *Esperanta Nesto* (Barbará) elokvente salutas la Kongreson, kaj tion faras ankaŭ Sro. Garganta nome de *Olot Stelo* kaj de la urbo de Olot.

Plene enirante en la kongresan taskon la Kongreso aklame aprobas la financon staton, publikigitan en KATALUNA ESPERANTISTO. Dro. Coll prezentas la sekvantan proponon, kiun oni aprobas unuanime: «Laŭ la propono de la profesoroj de K. E. F. la Kongreso en Terrassa unuanime akceptis kiel diplomitajn profesorojn Srojn. Pujulá kaj Bremón. kiuj formis la unuan ekzamenantaron. Tial ke ni ne parolis pri personoj sed nur pri la tribunalo, kiu estis formata de la cititaj Sroj. kaj de Sro. Rosals, kiu bedaŭrinde pro malĝoja motivo ne povis partopreni en ĝi, mi proponas al la Kongreso ke ankaŭ Sro. Rosals estu diplomita profesoro kiel ekzameninto en la unua tribunalo por profesoroj.»

Estas legataj la proponoj de Sroj. Campdelacreu, Amades kaj tiu de la Redakcio de K. E. rilatantaj la elekton de prezidantoj de la organizaj komitatoj de Kongresoj de K. E. F. Sro. Pujulá subtenas la opinion, ke ambaŭ pro-

ponoj unuigitaj devas aldoniĝi al la Regularo de K. E. F. Sro. Piferrer proponas la redaktadon de *interna* regularo en la Federacio, en kiu povus enteniĝi la propono subtenata de Sro. Pujulá, kaj la ceteraj, kiujn la disvolviĝo de la socia vivo postulas. Sro. Pujulá kunigas ĉiujn proponojn kaj la Kongreso akceptas ilin unuanime, konfidante je la Direkta Komitato por la elekto de la redaktantoj de la interna regularo. Post legado de la propono de Sro. D. Dalmau, pri ŝanĝo de la K. E. F.-a kotizaĵo, Dro. Bremón petas la ĉesigon de la kunsido, kiun oni reprenos morgaŭ matene.

II.^a — 12.^a, *Lundo*. — Ĝi komenciĝas je la 11^a matene en sama salono de la Urbdomo. Sro. Bordas legas leterojn de Iliaj Moŝtoj la Ministroj de Publika Instruado kaj de la Militaj Aferoj, kiujn la Kongreso aplaŭde ricevas, Ankaŭ leteron de Sro. Maynar (Zaragoza) li legas kaj la Kongreso aplaŭdas.

Propono de *Ĉiam Antaŭen* por oficialigo, ne permeso, de Esperanto en la lernejoj defendas longe per elokventaj vortoj Sro. Mensa, kiun kun plezuro aŭskultis la kongresanoj. Sro. Grau petas, ke la propono estu akceptata kiel bazo por la laboro de la organizaĵo supera, kiun hieraŭ aludis Sroj. Piñó, Perogordo kaj Pujulá. La propono estas akceptata unuanime laŭ la formo montrita de Sro. Grau.

Sro. Dalmau faras kelkajn rimarkojn pri la unua artikolo de nia regularo, kiujn respondas Sro. Grau.

La proponon de Sro. Dalmau pri kotizaĵo li defendas tuj kiam oni ĝin metis en diskutadon. Kontraŭ ĝi parolas Dro. Coll kaj en la diskuto partoprenas Sroj. Serrat, Pujulá kaj Piferrer. Fine, Sro. Dalmau retiras la proponon.

Sro. Bremón, klarigas al la Kongreso la rilatojn ekzistantajn inter la Kataluna Esperantista Federacio kaj la Oficialaj Institucioj de Esperanto: en du Oficialaj Institucioj ekzistas reprezentantoj de Katalunujo. En la Lingva Komitato reprezentas la katalunan lingvon Sroj. Pujulá, Sabadell kaj Bremón; la laboro farita de la lingvo-komitatoj, celis ĉiam al la bona irado de Esperanto, laŭ lingva vidpunkto, en nia lando: pro tio oni formis komisionon kun celo revizi kaj ekzameni la verkojn aperantajn ĉe ni, kritiki ĝiajn malbonajn kvalitojn kaj rekomendi ĝiajn bonajn, pro tio la lingvo-komitatoj membroj de K. E. F., helpadis al la sukceso de la ekzamenoj, prezidante la tribunalojn k. t. p. En la Administra Komitato reprezentas la Federacion Sro. Bremón, kaj dum du sinsekvaj jaroj ĝi pagis la kotizaĵon de 200 membroj. Sro. Bremón finas sian paroladon dirante, ke li konsideris devo la sciigon al Kataluna Esperantista Federacio de tiuj aferoj, kaj la Kongreso laŭ propono de Sro. Grau decidis esti aŭskultinta kun plaĉo la klarigojn de Sro. Bremón, kaj pliiĝi la kotizon laŭ la nuna financa situacio.

Sro. Grau prezentas proponon, petante de la Kongreso dankan simpatian voĉon por Sro. Salvador Albert, parlamenta deputito, kiu en la ĵus okazinta Kongreso de Hispanaj Komercaj Ĉambroj atentigis pri la graveco de nia ideo kaj atingis la estimindan konkludon pri kiu niaj federaciaj legis en la lasteaperintaj numeroj de KATALUNA ESPERANTISTO. La kongresanoj per longa ovacio montras sian aprobon por la agado de nia eminenta partiano Sro. Albert.

Sro. Pujulá parolas pri la ideo de asocio supera al ĉiuj ekzistantaj en la Iberia duoninsulo kaj rakontas pri la preparaj laboroj, kiujn la ĉeesto kaj helpo de Sroj. Perogordo kaj Piñó bele fruktigis. Li prezentas al la Kongreso la sekvantan proponon, kiun starante la kongresanoj ovacias:

1. «La Kongreso rekonas la necesecon de supera potenca Komitato, kiu kunigante ĉiujn fortojn kaj havante ĉies reprezenton, klopodos por la starigo kaj oficialigo de Esperanto en Iberio.

2. La Kongreso vidos kun ĝojo la starigon de similaj al la nia Federacioj en la ceteraj partoj de Iberio kaj ilian kunagadon en granda Konfederacio, kiu respektante ĉies liberecon, laboros efike kaj unukore por la antaŭe diritaj celoj.

3. La Kongreso por la preparaj laboroj en tiu grava kaj necesa organizado elektas la jenan komisionon: Sro. Prezidanto de K. E. F., Sro. Piñó (Valencio), Sro. Perogordo (Madrido), Dro. Bremón kaj Sro. Grau (Barcelono)».

Sro. Perogordo petas ke Sro. Pujulá estu ankaŭ membro de la komisiono. (Aplaŭdoj). Sro. Rocamora dankas la klopodojn de ĉiuj, proponas nian samideanon Sron. Mainar (Zaragoza) kiel komisionanon kaj gratulas la Kongreson por la honoriga decido, kiun ĝi prenis ĵus. Dro. Coll diras, ke la Kongreso demetu en la Komisionon la povon aligi al si la personojn, kiujn ĝi kredos necesaj, kaj per aklamado la kongresanoj aprobas la tutan projekton kun la prezentitaj aldonoj.

Oni venas al studo de la projekto de Konservantaro de la Floraj Ludoj, verkita de Dro. Coll kaj publikigita en KATALUNA ESPERANTISTO. Ĝia aŭtoro legas ĝin kaj la Kongreso aprobas unu post alia ĉiujn artikolojn kun du aldonoj de Sro. Grau kaj unu de Dro. Coll, kies laboron per aplaŭdado premias la kongresanoj. (La tutan tekston de la Regularo aprobita trovos niaj amikoj en la venonta numero de K. E.).

Estas legataj du telegramoj en Esperanto: de *Tarragono Esperant* kaj de Sro. Aubeyzón. La delegito de *Supren* (Barcelono) prezentas sian rajtigilon.

Sro. Grau, defendonte la proponon krei komisionon por propagandi Esperanton inter la fremduloj kiuj vizitas Barcelonon, petas Sron. Pujulá, ke li klarigu la kaŭzon de malsukceso de la Marista komisiono kreita de la II^a Kongreso. Sro. Pujulá parolas pri la bona organizo de la poŝtaj servoj en Barcelono, dank' al kiuj la pakajoj, senditaj al la ŝipoj en la ĉefurba haveno ankritaj, revenis senescepte al la komisiono. Sro. Obiols diras, ke eble en la haveno de Tarragono la entrepreno povos sukcesi, tial ke la samideanoj tarragonaj mem portos la pakajojn al la ŝipoj. La Kongreso aprobas danke lian proponon kaj aŭskultinte la parolon de Sro. Grau pri sia, akceptas ĝin per aplaŭdoj.

III.^a — 12.^a, *Lundo posttagmeze*. — Sro. Rocamora donas la parolon al Dro. Coll, kiu prezentas klarigon pri la laboro de la komisiono zorganta la akiron de standardo kaj la monkoklekton komencitan en Terrassa. Per aplaŭdoj oni aprobas la taskon de la komisiono.

Proponon subskribitan de Sro. Bori kaj aliaj, pri reguligo de la agado de la delegitoj de K. E. F., en la senco nomi aliajn delegitojn en Barcelono, defendas la unua subskribinto. Sro. Piferrer parolas traŝefe pri tiu demando kaj Sro. Rosals solvas la aferon kun la aprobo de la Kongreso proponante sian helpon al la K. E. F. Oni decidas, ke Sro. Rosals estu kun Sro. Dalmau delegito de la Federacio en Barcelono.

La Redakcio de KATALUNA ESPERANTISTO prezentas proponon, kiun subtenas Sro. Grau, por starigo de nova servo de la K. E. F.; t. e. ĉirkaŭsendo de la gazetoj ricevitaj interŝanĝe al la grupoj aliĝintaj, laŭ kondiĉoj klare difinitaj. Dro. Coll petas ian modifon kaj Sro. Pujulá klarigas la sencan de la propono. Intervenante en la diskuto Sroj. Coll, Rosals kaj Grau, kaj fine tiu lasta retiras la proponon.

Sro. Rocamora antaŭ ol demeti sian oficon de Prezidanto resumas la debatojn kaj proponas la sendon de komunikoj al Dro. Zamenhof atestante al li la estimon kaj fidelecon de la K. E. F.; al Sroj. Ministroj de la Militaj Aferoj kaj Publika Instruado, kies konduto rilate la Kongreson tiel kontribuis al ĝia sukceso, al nia madrida samideano Sro. Guilmain, kiu sinofere helpie la laboron de Sro. Rocamora en la hispana ĉefurbo kaj al la senataro Sro. Labra kiu kur Sro. Morote, deputito mortinta antaŭ kelkaj tagoj, (la kongresanoj momente stariĝis liamemore), faciligis al nia prezidanto la taskon apud la Ministroj. La Kongreso per bruaj aplaŭdoj montris sian konsenton kun la diroj de Sro. Rocamora, kiu anoncis, ke oni tuj devas elekti la urbon, kiu gastigos nian V^{an}.

Sro. Aguadé, en la nomo de la samideanoj el Reus, klarigas kial ili ne povas ĉi tiun jaron proponi al la Federacio la okazigon de la venonta kongreso en Reus. Sro. Pujulá, konsciante la pravon de la manifestaĵoj de Sro. Aguadé, proponas al la Kongreso la okazigon de la venonta en Sant Feliu de Guixols, urbo kiu en Terrassa proponis sin al la K. E. F. kiel kongresejo por nia IV. Longa aplaŭdado akceptas la proponitan urbon kaj montras la ĝojon de la federacianoj por la elekto. Sro. Aguadé diras, ke li klopodos apud siaj samurbaj esperantistoj por ke Reus gastigu proksimate tempe la ĵaran kunvenon de la K. E. F. Sro. Rocamora dankas lin kaj Sro. Grau esprimas la deziron de *Ilerda Espero*, kies geanoj izolite batalantaj kontraŭ granda indiferecenteco petas la helpon ĉies por okazigi en Ilerdo unu el la venontaj Kongresoj de la Federacio.

Sro. Victor Lluis kaj Ptro. F. Viver nome de la du grupoj de Sant Feliu dankas la Kongreson kaj promesas ilian helpon al la organizo kaj sukceso de la V^a Kongreso de la Federacio. La aplaŭdoj laŭte sonantaj atestis la simpatian kun kiu ĉiuj akceptis la sincerajn vortojn de la Sant-Feliu'anoj.

Sro. Pujulá stariĝas kaj per klaraj frazoj parolas pri la agado de Sro. Rocamora en sia ofico kaj proponas, ke la Kongreso reelektu lin sia Prezidanto. La aplaŭdo de la ĉeestantaro montris la unuaniman konsenton. Por Ptro. Planas, nia modesta kaj fervora vicprezidanto, kiu dum du jaroj sin oferis por nia celo, Sro. Pujulá petas aplaŭdon, kiun la Kongreso plezure donis. Li proponis por la ofico de vicprezidanto la ageman Dron. Joaquim Coll, kies nomon la kon-

gresanoj akceptis kun aplaŭdoj. Sron. Pellicer, kiu plenumis la sekretarian oficon dum la du lastaj jaroj, la ĉeestantoj honoris per ovacio, kiun ili daŭrigis por akcepti la nomon de Sro. Bordas, kiu havos la oficon de sekretario, helpate de Sroj. Campdelacreu kaj Horta kiel vicsekretarioj; Sro. Rey, daŭras kiel kalkulisto kaj Sro. Piferrer laŭ la decido de la Terrassa Kongreso administras la Federacion. Ilin ĉiuj la aplaŭdoj salutis, montrante la konfidon kaj esperon de la federacianoj.

Fine, Sro. Rocamora, dankinte por sia reelektio, petas dankan voĉon por Olot kaj por la organizintoj de la IV^a Kongreso, montras sian esperon en la kunagado kaj interhelpo de ĉiuj kaj fermas la laborajn kunsidojn de la Kongreso.

FERMA KUNSIDO

Sro. Roura, urbkonsilanto, reprezentanto de Moŝto la Urbestro, ĝojas, ke la Kongreso estis tiel fruktoporta; deziras ke Esperanto plene triumfu kaj elokvente demontras per bela parabolo, ke nia lingvo estas senmorta. Diras, ke li transdonos al la Urbeŝtraro de Olot la dankajn sentojn de la Kongreso kaj fermas ĝin meze de varma, longedaŭranta aplaŭdego.

KONGRESAJ EKSKURSOJ

Kiuj surpriziĝis vidante en la provizora programo la viziton al la Fontoj de «Sant Roc», «Moixina», kaj «des Tries», tiuj povis konstati la pravecon de la olotaj samideanoj, kiuj aldonis al la kongresaj festoj la ĉarmon de la tri belaj ekskursoj. La ĉirkaŭaĵo de Olot fame bela ravis ĉiujn: sub pure blua senmakula ĉielo, ĉirkaŭate de altaj montoj, kie ĉiuj nuancoj de l'verdo kaj bluo faras simfonion de koloroj, de kiuj en malproksimo estas krono la hela blanko de la eterna neĝo pirinea, la valo floras alloge meze de la kanto de l'akvoj serene fluantaj. Imagu tiun pejzaĝon sub la oro de l'suno matena, pensu ĝin tegitan de la vesperkrepuska mantelo, aŭdu en ĝi kvazaŭ pepadon de supernatura birdaro la jen plendan, jen ĝojan sonoradon de la popola *sardano*, kaj vi prezentos al vi neĝustan bildon de la spektaklo, kiu forte impresis neforgeseble en ĉiujn kongresanojn. Krome, ĉiu laŭ sia prefero, aldonu al la dirita belo la mildan babiladon de la graciaj samideaninoj olotaj, aŭ la triladon de la najtingaloj kantantaj sur ĉiu branĉo, aŭ la fajron de l'fojnaj kampoj aŭ la arĝenton de lagetoj kaj akvostarejoj. Spite, kiu ne vidis la olotan valon, tiu ne povos havi ideon pri ĝia beleco, kiun niaj vortoj maltrafe priskribis.

La tuta kongresanaro iris post la unua labora kunsido al la danco de sardanoj en fonto *Sant Roc*; la lundon matene al *les Tries* kaj post la ferma kunsido al la *Moixina*, de kie oni revenis, kiam la steloj jam tremetis en la ĉiela volbo.

FLORAJ LUDOJ

11.^a, Dimanĉo; je la 10.^a vespere

IRKAŭ la Floraj Ludoj, la esence lingva festo, turniĝas la sukceso de niaj Kongresoj. Nekatalunoj eble ne komprenos bone tiun fakton, sed ĉe ni, precipe la neesperantistoj juĝas pri niaj Kongresoj laŭ la efekto de la literatura festo. Oni pensu do, kia estos la juĝo de la Olotanoj, kiuj plenigis eĉ angulojn de la granda «Teatro Príncipe» malgraŭ tio, ke la neesperantistoj devis pagi la rajton okupi loĝiojn kaj apogseĝojn. Tamen, la teatro estis plenplena kiam la kurteno leviĝis kaj ĉe la scenejo prenis lokon la enurbaj aŭtoritatuloj maldekstre de la reĝina trono, kontraŭ la Juĝintaro, kiu sidis ĉe la dekstra flanko.

Sro. Meroles, urbestro, prononcis la frazon «la festo estas malfermata» kaj Sro. Garganta, kiu prezidis la Juĝintaron, donis la parolon al ĝia sekretario Sro. Grau, kiu iris al la tribuno legi sian raporton jenan:

«Sinjorinoj kaj Sinjoroj:

La trian fojon la Kataluna Esperantista Federacio invitis al sia Konkurso la literaturistojn, al ĝia Festo la amantojn de la internacia lingvo. La III^a Floraj Ludoj majeste nunmomente ekfloras.

Elvoku, geamikoj, la mezepokon: rigardu. Sur la areno longa vico de brilantaj kavaliroj paradas antaŭ ni; el la helaj armaĵoj la blazonoj malaperis, —oni ne povas rekonii la luktontojn. Trumpetoj sonas: la turniro estas komen-cita. Svingiĝas la armiloj; sur la ŝildoj la glavoj splitiĝante fajras. Unu post alia faladas la batalantoj. Nur du restas. Al kiu estos la venko?

Jen ili rifuzas lukti inter si kaj levas la vizieron. Miru!... En la batalo el-venkis per la forto de sia inspiro Fraŭlinoj EULALIA kaj TERESA ROSELL. Gloron al la poefinoj! La Natura Floro estas al ili unuanime aljuĝita de la Juĝintaro. — Sed, ŝirmataj ankoraŭ per la ŝtala turnira armaĵo, ili ĝentilece proponas la honoran premion kaj elektas la Reĝinon, kiu devas prezidi nin.

Vortoj miaj emociu kantu, vortoj miaj sonore vibru, kiel trumpetado de heroldo, proklamante la nomon de Ŝia Moŝto.

Gesinjoroj: Ni riverencu nian Reĝinon. Ŝi estas la bela Fraŭlino MARIA ESCUBÓS SERRAT-CALVÓ.

Fratinoj Rosell, kiuj meze de ovacio iris ricevi de la Juĝintoj la premion de *honoro kaj ĝentilo* tra iris denove la parteron akompanataj de Sroj. Codorniu kaj Sabadell kaj proponis al Fraŭlino Es-

cubós la floran sceptron de la Festo, dum sinjoro Grau proklamis laŭtavoĉe ŝian nomon kiu estis akceptata per akklamado daŭranta ankoraŭ kiam Ŝia Reĝina Moŝto brakenbrake iranta kun kapitano Perogordo, sekvata de la Ama kortego, eniris la salonon. La ovacio plilaŭtiĝis kaj, nur kiam oni sufiĉe komentariis la belecon de la Reĝino kaj de ŝiaj akompanantinoj, la sekretario povis daŭrigi la legadon de sia raporto.

«Reĝina Moŝto,
Gentilaj Korteganinoj,
Respektindaj Aŭtoritatuloj,
Eminentaj Reprezentantoj,
Gesamideanoj:

Aromajn, bongustajn fruktojn ni atingis ĉi-tiun jaron de la juna arbo, al kies enradikiĝo, ĉiam pli profunden, ni kontribuis per la Konkurso, kiun finas la bela Festo okazanta. La girdando, plektita de niaj verkistoj per siaj kantoj, superabunde premias la klopodojn de la Komitato en la nomo de la Kataluna Esperantista Federacio organizinta la spiritan lukton. Ne granda nombro da verkoj konsistigas ĝian sukceson, sed la fakto, ke ili ĝenerale estas verkitaj en pura, eleganta lingvo. Kvankam kelkafoje oni povus riproĉi la senzorgon de la verkistoj, kiuj sur sensignifaj temoj starigis belaspektajn pompajojn, bedaŭrinde malplenajn, la komparo kun similaj okazoj en la katalunaj unuaj konkursoj trankviligis tute la animon de la Juĝantoj, kiuj ĉerpis el la studado de la verkoj konvinkon plifirmigantan ilian esperon en la baldaŭna triumfo de nia penado.

Realaj aferoj regas la vivon de la homoj; praktikuloj ŝajnas konduki la Homaron: sed feliĉe, en efektiveco, nur la vivantoj en revo gvidas ĉion al ĝia destino. Ni estas do ĝojaj, ke ni helpis la kulturadon de nia literaturo kaj ricevis el ĝi la konstaton pri fortikeco multon promesanta. Memoru, gesinjoroj, ke ĝi estas la ĉefa garantio, ke nia ideo ne pereos, kaj kreu plenkonfide, ke lingvo, kiu nutras la fruktoričan arbon, havas la forton sufiĉan por sin trudi al la Mondo eĉ kontraŭ ĉiaj baroj.

Mi longe parolus pri tio, se ne estus centfoje ripetitaj ĉiuforme, kiel ekzemplo, la konsideroj, kiujn mi povus prezenti al vi pri la intensa efiko de la Floraj Ludoj ĉe la reviviĝo de la kataluna nacio. La hezitanta balbutado de la poetoj, kiuj per lingvo longatempe forlasita kuraĝe ekkantis, restarigis iom post iom malgraŭ ĝi mem la Nacion, kiu komence ilin mokis. Tiurilate, mirinda estas la simileco de la agado de tiuj revuloj kun la nia, kaj pri ĝi mi suprajte parolas hodiaŭ,—kiam ni festas solene la triumfon de niaj poetoj kaj verkistoj,— ne por kuraĝigi niajn samideanojn, ja certajn je nia venko, sed por montri al la neesperantistoj, kiuj scivole nin aŭskultas kaj rigardadas, la ekzemplon de la Pasinto.

En la inerteco de la nacia vivo de Katalunujo, meze de la ĝenerala skeptikeco, la voĉo de kelkaj amantoj de la patra lingvo eksonis, timeme modu-

lante ĝiajn preskaŭ mortajn vortojn, kaj el la naivaj strofoj, el la trokonfidaj verkoj, la spirito de la raso prenis la ĝermojn, kiuj revivigis nova la forgesitan propralanda literaturon. Certe, la rezultaĵojn de la konstante daŭrigata agado ne antaŭvidis la pioniroj, kiuj la unuaj rebruligis la fajron de Poezio en la proza lando nia; sed miraklo efektiviĝis, kaj apud la poetoj revantaĵ ekster realeco, baldaŭ enviciĝis en la armeojn por la lingvo batalantajn la praktikaj homoj, kiuj altenlevis la staton de la popolo kaj vekis en ĝi la estimon al la propraj naturaj havaĵoj. Tial, post kvindek jaroj de obstina, persista laboro oni povis konstati, ke la renaskiĝon de la Nacio, postulanta siajn perditajn rajtojn kiel tia, oni ŝuldas al la literaturaj festoj, kiuj, farante la lingvon pura kaj bela, retiris ĝin el la forgeso kaj ĝin donis al la popolo, kiel ĝian grandan forton, kiel ĝian karakterizantan econ.

Ni esperantistoj, trairis nur la duonon de la vojo, kiu kondukis Katalunujon al ĝia aktuala stato. Ni marŝas ankoraŭ, kaj nian fidon kreskigas ĉiujare la sukceso de la literaturaj konkursoj, kiuj tie kaj ĉi okazas, klare montrante, ke unu fojon ankoraŭ Literaturo fariĝos la bazo de mirinda konstruo, la idealo nia. Per la inspiraj verkoj al nia konkurso prezentitaj la verkistoj alportis alian ŝtonon al la ŝtuparo, kiu levos nin ĝis nia alta celo: ŝatindajn verkojn ili havigis al ni, kaj mi antaŭpetas por ili varman aplaŭdon. (Kiu sonis longatempempe).

La delikataj sentoj de la originalaj premiitaj versaĵoj, la ĉarma formo per kiu ili estas esprimitaj, povas, eĉ solaj, fari la sukceson de Konkurso. Ĝi donis al ni ankoraŭ alian plezuron: el la tradukoj prezentitaj ni vidis kun ĝojo ke la belaj de la kataluna literaturo estas plene kaj ĝuste konservataj de la internacia lingvo. Domaĝe, ke la konkurso montris, ke ni ne havas la poeton kapablan verve transporti al la tutmonda literaturo la raven de la majstraj versoj de Verdaguer!

La Juĝintaro laŭ la formo montrita en la noto VII de la Alvoko al la Konkurso ekzamenis la verkojn ricevatajn, kaj unuanime opiniis pri ilia valoro.

ORDINARAJ TEMOJ. — La premio difinita por la originala versaĵo pri Amo estas aljuĝata al la verko num. 15, «Vi, kial ne venas», devizo: *Lonicero*. Ĝi estas ĉarma, ama plendo, enkadrata en korektaj versoj plene ritmaj, ĉe kiuj la aŭtoro imitis la elegantan rimon, kiun sole uzis Cabanyes, la bedaŭrinda poeto el Vilanova, enamita en la sonorecon de la versa silaba ritmo. La konsonanco de la lasta piedo de ĉiu dua verso kun la dua piedo de la triaj versoj havigas al la versaĵo valoron tre ŝatindan, kaj montras ke la verkinto majstras en nia lingvo, kiun li facile faldas kaj alkonformigas al sia penso. Ĉar tiu versaĵo estas la plej bona el la verkoj kronataj per ordinaraj premioj, ni aljuĝis al ĝi la Naturan Floron.

Rezultis aŭtorinoj de la premiata versaĵo devizita *Lonicero*, Fraŭlinoj Eulalia kaj Teresa Rosell, el Vilanova i Geltrú.

Fraŭlinoj Rosell supreniris al la Reĝino, de kies manoj ili ricevis la diplomon, kaj Fino. Eulalia legis la versaĵon, kiun ŝi sube ni presigas:

VI, KIAL NE VENAS?

Devizo : *Lonicero*.

Vi, kial ne venas al brakoj la miaj
akcepti konfide la koran oferon?
Perfidan hederon ĉe ili ne vidu,
Amanto karega.

Hedero, arbeton la sian subtenon
karese ĉirkaŭas, ornamas per siaj
volutoj graciaj, belverdaj, kaj fine
mortigas kruele.

Mi vin ĉirkaŭprenos per brakoj similaj
al la Ionicero, arbara girlando,
florinta rubando, neniam rabanta
la vivon por vivi.

Vi, kial ne venas al brakoj la miaj,
florantaj pasie, de l'am' Ionicero?
Tro longa espero la florojn velkigos...!
Vi, kial ne venas?

Nenecese rakonti pri la ovacio, kiu kronis la kortuŝante deklaman verkon; ĝi longe daŭris, ĝis kiam la aŭtorinoj sidigis ĉe la scenejo apud la Juĝintoj.

«Premion al originalaj prozaĵoj ni ne povis aljuĝi ĉar la kelkaj alvenintaj ne plenumis la kondiĉojn *pri Amo* aŭ estis nesufiĉe bonstilaj. Anstataŭe, ĉar la verko num. 5, «Amo», devizo : *Sursum Corda*, aspiranta al la premio de la I^a Originala Konkurso, estas bona versaĵo glosanta la devizon *Espero, Fido, Amo* de la Internaciaj Floraj Ludoj, ni aljuĝis al ĝi la premion difinitan por la prozaĵoj originalaj. Aŭtoro: Sro. Clarence Bicknell, el Bordighera (Italujo).

Nur unu traduko de la proponita fragmento de «L'Atlántida», de Verdagner, estis prezentata. Tial ke ĝi estas nekorekta, la Juĝintaro decidis ne aljuĝi la premion dediĉitan al tiu temo.

Ok tradukoj de «Pasqua Granada», la bela peco de Ignasi Iglesias, aspiris al la premio. La juĝistoj longe konsideris la valoron de ĉiu el ili kaj alju-

ĝis la premion al la verko num. 34, «La Pasko de l'Greno», devizita : *Pentekosto*, kiu estas rimarkinda pro siaj flua stilo kaj ĝustaforma traduko. Aŭtoro : La Esperanta Fako de la societo «Centre Autonomista de Dependents del Comerç i l'Industria», de Barcelono.

Unua mencio estas aljuĝata al la verko devizita *Ceres*, kies stilo estas tre bona, kvankam la tradukaj vortoj ne ĉiam ekzakte respondas al la originalaj. Aŭtoro : Sro. Estanislau Pellicer, el Barcelono.

Dua mencio por la verko num. 20 devizita *Sursum Corda*, ĉe kiu trouzo de la participa formo *int* anstataŭ *ant* senvalorigas la bonan Esperanton uzatan ie en tro rigida formo. Aŭtoro : La kursanoj de la supera kurso de Sro. Delfi Dalmau ĉe *Esperanto kaj Patrujo*, Barcelono.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ. — I. Premio de «La Revuo». — En tiu Konkurso estis difinitaj por la du premioj la verkoj numj. 14 kaj 25, kiujn la juĝistoj opiniis egale bonaj.

Tamen la I^a premio estas aljuĝata al la verko num. 25, «P. A. de Genestet», kun devizo : *Nederlandano*, ĉar ĝi konigas nekonatan verkiston, kiu ŝajnas tre interesa. Aŭtoro : Ankoraŭ nekonita.

Oni aljuĝis la II^a Premion al la verko num. 14, «La Patro de l'Usona Literaturo» devizita : *Excelsior*. Aŭtoro : Nekonita ankaŭ.

II. Premio de la firmo Ader & Borel. — Nur la verko num. 11, devizita : *La popoloj tre bezonas unu la aliajn por siaj grandaj celoj*, aspiris al la proponita premio; ĝi estas sufiĉe korekta por meriti ĝin. Aŭtoro : Sro. Kurt Sommer, el Chemnitz (Germanujo).

IV. Premio de Sro. Valenti Avellana. — Du spritaj versaĵoj alvenis por la Konkurso de bonhumoraj. La premion difinitan al ili ni aljuĝis al tiu devizita : *L'Arkeo*, kiu ricevis la num. 12. Aŭtoro : Sro. Clarence Bicknell.

V. La Premion de Lia Episkopa Moŝto Dro. R. Guillamet oni aljuĝis al la verko num. 26, kies devizo estas : *Esperantia Entrepreno*. La temo proponita estas bone pritraktata per korekta lingvo. Aŭtoro : Pastro Jozefo Casanovas, profesoro ĉe l' Seminario Gerona.

VI. Premio de la «Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj». — La premion oni aljuĝas al la verko num. 29, kun devizo : *Laŭdata estu Dio*. Aŭtoro : Sro. Alfonso Sabadell, el Barcelono.

VII. Premio de «Gerona Espero». — La interesa temo proponita, verki broŝuron propagandan, restis malfeliĉe ne konkursita.

X. Premio de Lia Deputita Moŝto, Sro. P. Llosas. — La sola verko, kiu traktis la temon difinitan, estas tiel sensignifa, ke la juĝistoj decidis ne aljuĝi la premion. Al tiu rezultato kontribuis ankaŭ la troa abstrakteco de la temo, kiu malpermesas seriozan pristudon, almenaŭ en la nuntempo.

XI. Premio de «El Arte Cristiano», firmo Bassols, Vayreda kaj Kompa-

nio. — Malgraŭ kelkaj makuletoj en la esprimoj uzataj la traduko premiata estas multe pli bona ol la alia verko, kiu celis tiun premion. Ĝi estas aljuĝata al la verko num. 31, «La Ĉokoladkruĉo», devizita : *Frat' fraton atahas ŝakale*. Aŭtoro : Sro. Alfonso Sabadell.

III, VIII. IX kaj XII Konkursoj. — La juĝistoj grupigis ĉiujn verkojn prezentitajn por la kvar premioj al laŭvolaj temoj kaj elektis el ili la plej bonajn. La aljuĝo estas farita jene.

Premio de «Olota Stelo», al la verko num. 1, «La Folio» devizo : *Aŭtuna impresio*, flua versaĵo en bona Esperanto. Aŭtoro : Sro. Josep Ventura, el Terrassa.

Premio de Sro. Josep Clará. Al la num. 3, devizo : *Forta kiel Morto*, bela soneto memore de kapitano Scott kaj liaj kunuloj kiuj glore mortis en la suda poluso. Aŭtoro : Sro. Clarence Bicknell.

Mencion al tiu premio la Juĝintaro difinis al la verko «La Rozo blanka», kun devizo : *Floraj, miaj floroj...*, kiu montras ĉe sia aŭtoro facilecon en la versofarado, pli rimarkindan se li ne uzus kvazaŭ plenan rimon la solan asonancan de la akcentitaj vokaloj; makulo, kiun la juĝistoj opiniis grava. Aŭtoro : Sro. Josep Ventura.

La premio de la Urbestro de Olot estas difinita al la verko num. 2, «La Kata-Luna Lingvo», devizita *Serenado*, kiu estis prezentata por la konkurso de bonhumoraj versaĵoj. Tre sprita estas ĝia enhavo, en kiu la aŭtoro kurioze ludas la vortojn. Aŭtoro : Sro. Clarence Bicknell.

Fine, al la verko devizita : *Kataluna rimarkindaĵo*, ni aljuĝis la premion de Lia Moŝto Sro. Frederic Rahola, Senatano. Per korekta lingvo estas rakontata la stranga uzo de antikvaj vestaĵoj ĉe la pastraj studentoj de la urbo Vic. Aŭtoro : Sro. Jozefo Albagés, el Vic.

Post la dato fiksita kiel limo por akcepto de verkoj alvenis du, el kiuj unu meritis specialan atenton de la Juĝintaro. Ĝi estas la verko num. 35 devizo : *Calma*, bela traduko de la Odo «Otium Divos», de Horacio, en kiu estas konservata la ritmo de la latinaj versoj, kun ĝusta traduko de ilia enhavo. Konsiderinte ĝian altan meriton kaj la facilecon en la tradukado, kiun per ĝi montras la aŭtoro, ni aljuĝis al ĝi Specialan Honoran Mencion, bedaŭrante ke la kondiĉoj de la Konkurso ne permesas alian ajn pruvon de estimo. Tamen ni atentigas pri tio, ke la cirkonstanco de malfrua alveno estas tre grava, kaj ke oni en alia okazo atentos pri ĝi. Aŭtoro : Nekoniĝa ĝis nun.

Kaj nun, unu solan vorton: Dankon!

Dankon al vi, bela Reĝino, fervora esperantistino, kiu portis al ni la freŝecon de via juneco kaj la ĉarmon de via persono, simbolojn de la beleco de la urbo, kiu tiel afable nin gastigas. Dankon al vi, korteganinoj, loga bukedo de parfume odorantaj floroj, kiuj ĉirkaŭas la altan tronon de la Belo en ĉi tiu Festo de Fido kaj Amo. Dankon al vi, amikoj, kiuj malavare helpis la taskon de la Komitato donacante jen valorajn premiojn, jen monajn sumojn. Dankon al vi, esperantistaj gazetoj, kiuj publikigis nian

programon kaj verdikton. Dankon al vi, konkursintoj, kiuj kontribuis al la sukceso per viaj verkoj. Vin ĉiujn sendistinge ni gratulas, laŭreatojn kaj nelaŭreatojn, por la nobla emo levi la spiriton al la altaj regionoj, kie trankvilo plene regas. Agante tiamaniere vi altigis ankaŭ la gloron de nia Patrujo, kies nomo brilos per oraj nuancoj en la Historio de la bataloj por Lingvo internacia nur se vi obstine laboras kaj oferas viajn intelektajn fortojn por la venko de nia idealo, la bela lingvo Esperanto. La penso, ke vi havas la honoron partopreni en la enkonduko de tiu perfektiga elemento, kiu transformos la Mondon, stimulu vin pli multe ol miaj sincere diritaj vortoj al persista laborado kronota post nelonge per la plej brila venko.»

JOZEFO GRAU

La aplaŭdoj, kiuj aŭdiĝis post la sekretaria raporto, plivigliĝis kiam Dro. Coll eklegis la prezidantan paroladon de Sro. Carlo Bourlet. La entuziasmo debordiĝis ĉe ĝia fino kiam la ĉeestantoj akklamis varme la nomojn de Sro. Bourlet, De Menil, Chavet kaj Bricard, membroj de la Juĝintaro, kiuj ne povante partopreni en la Festo, sendis al ĝi siajn sincerajn salutojn.

Ĉiuj premiitaj versaĵoj estis legitaj kaj la aplaŭdado kiun ili meritis sonis laŭte en la vasta salono.

Jen la prezidanta parolado, kiun Dro. Coll bele legis :

«Reĝina Moŝto,
Belaj Princinoj,
Sinjorinaj kaj Sinjoraj Moŝtoj:

Permesu, ke, antaŭ ĉio, la Prezidanto de la Juĝintaro de la Esperantistaj Floraj Ludoj esprimu al vi sian profundan bedaŭron pro tio, ke li ne povas diri mem al vi ĉi tiun paroladon.

En neniu lando oni pli kore, pli sincere akceptis la internacian lingvon, ol en la progresema Katalunlando. Neniu popolo pli bone komprenis la altan signifon de nia homama entrepreno, ol la nobla kataluna popolo. Esperanto trovis inter vi veran hejmon; ĝi trovis ĉiujn apogojn, ĉiujn helpojn necesajn por sia disvolviĝo, por sia pliriĉiĝo, por sia egaligo al la plej malnovaj kaj famaj lingvoj de plej kulturitaj popoloj. Jam du fojojn mi havis la grandan plezuron viziti Katalunlandon, kaj du fojojn mi pasigis inter vi plej feliĉajn horojn de mia tuta vivo. La ĉiekonata gastameco de la Katalunoj, la nesuperebla progresemo de ilia spirito estas por la alilanda vojaĝanto nekomparebla ĉarmo kaj allogo. Vi do komprenos, ke mia bedaŭro ne estas simpla esprimo de ĝentileco, ke ĝi estas sincera, profunda, kaj ke, en la horoj, kiam okazos viaj festoj kaj al vi unu el miaj kolegoj legos ĉi tiun tekston, mi, de malproksime, pensos al vi, pensos al via bela lando, pensos al via admirinda propagando

kaj mi kore krios : «Vivu la lando de la Katalunoj! Vivu Esperanto inter la Katalunoj!»

Neniu kutimo, inter ĉiuj centjaraj kutimoj de ĉiuj civilizitaj popoloj, estas pli bela, pli eleganta, ol la kataluna kutimo de la Floraj Ludoj. Ŝajnas, ke nur en lando de Latinoj, en lando de suno, de flamo kaj amo, povis naskiĝi tiu Festo, kiu ligas la du plej noblajn sentojn de la homo: la Amo al la Belparolo kaj la Amo al la Belvirino. Unu subtenas la alian, unu plibeligas la alian. Literaturo sen Amo estas bildo sen koloroj; Amo sen delikata esprimo estas multekosta metalo kaŝita en gango.

Same kiel la Katalunaj Floraj Ludoj helpas al la disvolviĝo, al la konservo, al la ornamo de via nacia lingvo, same la Esperantaj Floraj Ludoj helpas al la pliriĉigo, al la firmigo, al la plenfino de nia kara lingvo Esperanto. Stultuloj ofte ripetas, ke lingvo artefarita neniam povos posedi literaturon. Ili mokas niajn poeziojn, kiujn cetere ili ne konas; ili mokas niajn oratorojn, kiujn cetere ili neniam aŭdis; ili mokas niajn aktorojn, kiujn cetere ili neniam vidis. Ili venu al la Kataluna lando, ili partoprenu tiujn grandajn festojn, kiujn vi tiel bele scias efektiviĝi; ili venu legi la verkojn de niaj premiitoj; ili venu aŭskulti viajn elokventajn paroladistojn; ili venu por vidi la prezentadon de la admirindaj teatraĵoj, kiuj naskiĝis en via medio : Ili tiam eble komprenos ke Esperanto ĉesis nun esti artefarita lingvo, ke, parolita de miloj kaj miloj da homoj, skribita de plej diversaj aŭtoroj, prilaborita de plej malsamaj inteligentoj, kvazaŭ elskulptita kaj modelita de plej kontraŭstaraj literaturaj tendencoj kaj penadoj, ĝi akiris vere nun la rajton al la vivo kaj la spiron de lingvo de granda popolo.

Kaj iam, kiam niaj nepoj relegos la Historion de Esperanto, kiam ili scios pri la grandaj esperantistaj manifestadoj en Katalunlando, pri la bela Kongreso en Barcelono, pri la entuziasmaj prezentadoj de «Mistero de Doloro» antaŭ miloj da vibrantaj spektatoroj, ili tiam komprenos la grandan signifon de la movado en via lando, kaj ili vin benos.

Dankon do al vi, karaj amikoj, kiuj devigis nin kompreni, ke lingvo sen literaturo estas vivanta estaĵo sen cerbo; dankon pro la klopodoj, kiujn vi faris por plibeligi nian Esperanton; dankon pro la nobla ekzemplo, kiun vi donas al la tuta Esperantistaro.

Certe la Prezidanto de la Juĝintaro de la Esperantistaj Floraj Ludoj estus malprava, se li hodiaŭ volus certigi, ke ĉiuj verkoj senditaj al la Konkurso, estis majstraj, indaj je la plej alta literaturo. Inter la multenombraj manuskriptoj, kiujn ni ricevis, pli ol unu estis ja nur provo de juna ankoraŭ balbutanta komencanta literaturisto; sed eble tiuj mem laboroj estis por ni la plej kortuŝantaj. Kiam, sub la anonimeco de la Konkurso, oni rekonas la hezitantan manon de entuziasmigita novevarbita, kiam oni sentas la puran flamon de la nova adepto ardanta pro la beleco de la entrepreno ĵus ekkonita, la koro de la juĝanto batas pli forte, kaj li dankas la kreinton de Esperanto, kiu efektiviĝis tian miraklon.

Cetere, el tiom da laboro kaj penado, elŝprucis kelkaj juveloj, kiuj restos por ĉiam ornamoj de nia beletristiko. Se, inter tiom da manuskriptoj, nur tri

aŭ kvar estas vere talentaj, prezentas vere tiun duoblan kvaliton, kiu karakterizas literaturan pecon : la firmecon kaj profundecon de l'sento kune kun la gracieco kaj harmonio de l'esprimo, ni jam devas ĝoji, ĉar tio estas multo. Kiom estas la lingvoj en la mondo, kiuj posedas *tri* verajn literaturajn ĉefverkojn? Kiom da ruboj, kiom da senutilaĵoj, kiom da kriplajoj pocente aperadas en ĉiuj lingvoj, ruliĝas kaj malaperas, ĝis kiam fine naskiĝas vera *Verko*, kiu surnaĝos la vastegan ondaron de la fluanta lingvo!

Ni do gratulas plej kore ĉiujn kuraĝajn partoprenantojn en tiuj ĉi Ludoj; ne nur tiujn, kiujn la sorto favoris, sed ankaŭ tiujn, kiuj ne atingis ankoraŭ la deziratan sukceson, sed ĝin atingos morgaŭ. Ĉiuj, per sia penado, bone laboris por Esperanto; ĉiuj alportis al la vasta konstruaĵo, kiun ni kune entreprenis, unu ŝtonon pli; kaj iom post iom per nia obstina daŭrigo, per longa persisteco, ni starigos en la mondo monumenton, kiu estos la plej granda ĉefverko, kiu atestos la potencon de la homa spirito.

Mi do, karaj samideanoj, plej kore invitas vin aplaŭdi ankoraŭ unu fojon niajn premiitojn, kriante kune kaj plej fervore : «Vivu Esperanto en la bela Katalunlando!»

CARLO BOURLET

Sro. Urbestro prononcis la vortojn: «da festo estas finita» kaj ĉiuj stariĝis, kiam la Reĝino kaj ŝia Kortego malsupreniris de la Trono akompanataj de la aŭtoritatoj kaj de la membroj de la Juĝintaro de la Literatura Konkurso, meze de amaso da samideanoj, kiuj ilin salutis fervore.

La festo estis finita; kaj la disirantaj partoprenintoj sendube alportis en ĉiujn olotajn hejmojn la bonodoron de Poezio, kies spirito floris en la spaco dum la bela soleno de la III^a Literatura Konkurso de la K. E. F.

DANKA NOTO. Al la pligravigo de la ordinaraj premioj de la III^a Literatura Konkurso kontribuis la sekvantaj grupoj.

<i>Esperanta Semo</i> , Sabadell	30 Ptoj.
<i>Barcelono Stelo</i> , Barcelona	25 »
<i>Ĉiam Antaŭen</i> , Barcelona.....	15 »
<i>Frateco</i> , Vendrell	10 »
<i>Lumon</i> , Terrassa	10 »
<i>Semo</i> (A. E. P.), Barcelona.....	10 »
<i>Esperanta Amikaro</i> , Banyoles.....	7'50 »
<i>Esperanta Nesto</i> , Barbarà	5 »
<i>La Rondo</i> , Barcelona	5 »
<i>Supren</i> , Barcelona.....	5 »
<i>Esperanta Idealo</i> , Santa Coloma.....	2'50 »

ENTUTE..... 125'00 »

Tiu sumo estis disdonita po 41,65 ptoj. al ĉiu el la tri gajnintoj de la ordinaraĵ premioj.

Krome, *Ĝerona Espero* donacis la 25 ptojn, kiujn ĝi proponis por la VII temo eksterordinara, al la Komitato de la Floraj Ludoj por kontribui al ĝiaj elspezoj (eldono de diplomoj, k. t. p.).

Al la malavaraĵ grupoj la plej koran dankon.

12.^a, Lundo

FESTO DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

EN la fama preĝejo de Nia Sinjorino del Tura, je la oka matene kunvenis la katolikaj esperantistoj por Diservado, kiu elvolviĝis en tri partoj: 1.^a, Sankta Meso; 2.^a, Esperanta predikado, kaj 3.^a, Oferdono de la bukedego el naturaĵ floroj de la Literatura festo al la Sankta Virgulino.

Pastro J. Planas, Paroĥestro de Barbará del Vallés, oferdiris meson en la ĉefa altaro. La ĉarma fraŭlino María Escubós, Reĝino de la Festo de la Esperantistaj Floraj Ludoj, kun la arta bukedego okupis honoran seĝon antaŭ la presbiterejo akompanate de siaj junaj kaj belaj korteganinoj vice lokitaj en ŝiaj flankoj. Ankaŭ Sroj. Perogordo, Gutiérrez, Kurt Fritzsching kaj Pastro Coll lokigis en presbitereja benko.

Antaŭ granda popola amaso, kiu avidege atendadis la novaĵon, Ptro. Francisko Viver supreniris predikejon, kaj per belsona internacia lingvo klarigis tute taŭgan temon, vidigante al katolikoj la necescon konatiĝi kun tiu admirinda lingva interrilatilo, kies celo, simila al tiu de kristanismo, estas kunfratigi la tutan homaron sur la bazo de reciproka interkompreniĝo. Katalunlingve li faris mallongan resumon por komplezi la neesperantistojn ĉeestantajn.

Tuj kiam estis finitaj la meso kaj prediko, laŭ tradicia kutimo ĉe la olotaj Floraj Ludoj, la Reĝino de la Festo kun sia korteganinaro, sekvata de multaj aliaj ekstorolotaj esperantistoj supreniris la ĉambro-tronon de la Patronino de Olot, antaŭ kies bruna, kvaŝaŭ amsune bruligita bildo, turnita al la vizitanto, ŝi prezentis al la Sanktega Virgulino la artan bukedon el interplektitaj naturaĵ floroj, kies oferon glosis Pastro Dro. Coll per kortuŝaj kaj inspiritaj preĝaj vortoj.

Post la religia servado, la membroj de la «Kataluna Ligo de

Katolikaj Esperantistoj» kunvenis ĉe la *Círculo Católico*, kaj krom aliaj gravaj decidoj, ili elektis la jenan komitaton: Prezidanto, sinjoro J. Rosals; Vicprezidando, Dro. Casanovas; Sekretario, Pastro Johano Sabater; Vicsekretario, Dro, J. Potcher; Kasisto, Sro. M. Gili; Voĉdonantoj, Dro. Johano Mauri kaj Pastro Francisko Viver.

OKULVITRULA VERMUTO

La plej amuzan kunvenon de la Kongreso ni ŝuldas al la okulvitraj kongresanoj, kiuj antaŭ la festeno arigis ĉirkaŭ tabloj de la kafejo «Novetats» en aparta kurioza kunsido. La scivolemo vekigis en la koro de ni ĉiuj, kaj preskaŭ la tuta Kongreso staris ĉirkaŭ la rondo, en kiu oni ne povis partopreni sen vidiga aldonajo sur la nazo. *Vidiga* ne estas la ĝusta vorto, ĉar kelkaj ĉeestantoj akiris la rajton trinki vermuton, per helpo de nigraj vitroj—batalilo kontraŭ la suna heleco. Ni devas konfesi, ke kelkaj ĉeestantoj artifikis, ĉar ni vidis ĉe la kuntrinko personojn, kiuj sidis malantaŭ vitroj, kvankam ordinare ili eĉ povus vidi formikon ĉe la pinto de masto. Ni protestas kontraŭ tiu blindeco al la malaprobinda artificio—kiu cetere nenion forprenas el la graveco de la kunveno—, ĉar la rigoro estis tro mallarĝa por ni mem. Sro. Pujulá, ne akceptita pro manko de nazaĵo, ne povis legi la jenan himnon—sufiĉe malbonan—kiun ni publikigas pro raportista devo:

La vitroj grandigaj tremetas sur nazoj
vunditaj de premaj risortoj.
Ĉe ĉiuj la vortoj, kaj gestoj, kaj frazoj...
kaj frazoj, kaj gestoj, kaj vortoj...
la vitroj tremetas sur siaj la bazoj:
la nazoj!

Ni laŭdu sen ripozo la ciklopojn
uzintajn laŭmonokle teleskopojn!

Ni plendu pri sterno, ni homoj miopaj,
faliga por vitroj la niaj.
Ke landoj Aziaj, Afrikaj, Eŭropaj...
Eŭropaj, Afrikaj, Aziaj...
eksci pri l'plendo de homoj multopaj
miopaj.

Ni laŭdu sen ripozo la ciklopojn
uzintajn laŭmonokle teleskopojn!

Malbenu ni ŝviton glitigan. La lenson
ni kantu, kaj nian la dankon.

Ĉar helpas ĝi mankon kaj donas kompenson,
kompensas de l'vido la mankon...
ni kantu—laŭdante de vitroj la denson,—
la lenson.

Ni laŭdu sen ripozo la ciklopojn
uzintajn laŭmonokle teleskopojn!

La kunveno estis tre frata. Tamen, kiam la scivolaĵ rigardantoj rimarkis ke okulvitrujoj trinkas la vermuton tute kiel la aliaj homoj, ili foriris seniluziigitaj, kaj lasis la trinkintojn sub la furiozo de la fotografistoj (Abomeno por ili!)... ĉar la reflektio vualigas la kliŝojn.

OFICIALA FESTENO

Je la dua posttagmeze komenciĝis la festeno servita en la granda salono de la «Círculo Olotense»... La tablo aranĝita en formo de kvarpinta forko, kunigis ĉirkaŭ si cent tridek kunmangantojn. Ĉe la Prezida flanko, inter bukedoj, fraŭlino María Escubós, Reĝino de la Floraj Ludoj, prezidis akompanata de Moŝto la Reprezentanto de la Urbestro, kaj de la Prezidanto de la «Kataluna Esperantista Federacio.» Okupis lokojn apud ili, Sroj. Llosas, deputito; de Mesa, Juĝisto; Gutierrez, ĝendarma kapitano; Agustí, urbkonsilanto; la Ministras reprezentantoj, kaj reprezentantoj de la urbaj artaj, politikaj societoj.

Kontraŭ la prezidantaro, fraŭlinoj Rosell, ĉirkaŭataj de pioniroj, suferis sian gloron dum longaj momentoj pro postulado por aŭtografoj.

La menuo estis servita de la restoracio Xam, kaj konsistis el la jenaj servicoj: Variaj almanĝaĵoj, Rizo valencia, Porklumbaĵo je Milana, Bovidaĵo kun legomoj, Rostita kokido, Desertoj, Flano, Kukoj, Fruktoj, Vinoj : Enlanda, Ĉampana, Ŝereza. Kafo.

La tabloj estis kovritaj per floroj, kiuj antaŭ la deserto kaj laŭ la iniciato de la enurbaj fraŭlinoj fariĝis kugloj de improvizita batalo.

Ĉe la ĉampanvino, la tostoj komenciĝis. Per laŭta, energia, kaj eksterordinara elokventeco, Sro. Roura por la urbestro, kaj Llosas, deputito, kantis la belecon de Olot, la artistemon de ĝiaj filoj, kaj la diajn kvalitojn de la Virgulino de l'Tura, patronino de la urbo. Ili vokis sur nin ŝian altan protekton por ke ŝi petu de sia filo forigon de la puno Babela. Tre kortuŝitaj, ni dankis ambaŭ oratorojn kaj premiis la personan stilon de iliaj paroladoj per ankaŭ laŭta ovacio.

Nia malnova samideano Sro. Gutierrez, ĝendarma kapitano, sin turnis per emociitaj vortoj al la fraŭlinoj kaj esprimis belegajn sentojn pri estonteco. Klare, simple, kore, Sro. Agustí, urbkonsi-

lanto, parolis en la nomo de la enurba esperantista grupo, kaj kiam li komencis peti pardonon por la eblaj mankoj de la organizado la ĝeneralaj aplaŭdoj malpermesis al li daŭri sur tia vojo kaj pruvigis la ĝeneralan dankemon kaj kontentecon. Sro. Kurt Fritzs-ching, nia germana kongresano, tre sprite rimarkigis ke la K. E. F.-aj kongresoj pligraviĝas ĉiun jaron, kaj la beleco de la fraŭlinoj, kiuj ilin ĉeestas, ankaŭ; li aldonis, ke lia fervoro por Esperanto nepre kreskas kaj ke se li ĉeestos ankoraŭ kelkajn kongresojn li certe fianĉiĝos. Lia sprita parolado estis tre aplaŭdita. Sro. Perogordo diris belajn vortojn kun sia karakteriza bonkoreco. La longedaŭraj aplaŭdoj, kiujn ni al li dediĉis, montris unu fojon pli la estimon nian por li mem kaj por la societo kiun li reprezentis. Sro. Grau, kiel sekretario de la Floraj Ludoj rememoris la neĉeestantajn membrojn de la Juĝintaro, trinkis al la Reĝino, kaj montris koncize la signifon de nia literaturo. Sro. Pujulá, inter grandaj ridoj, certigis ke li ne plu kredos la sciencon, kiu asertas ke la olotaj vulkanoj estas estingitaj, ĉar la esperanta vulkano flamas per la lafo de entuziasmo, kaj plene pruvas la malon. Li trinkas al la sano de la poetinoj Rosell, la gajnintinoj de la Natura Floro, kiuj apud la maro, nia «maro verda, mar' blua, maro ŝaŭmadanta» verkis laŭ rimo de enlanda poeto por lia gloro kaj riĉigo de la Esperanta literaturo, kaj kiuj modeste rifuzis la reĝimecon por fraŭlino el Olot, helpante al la simbolo de edziĝo de la katalunaj maro kaj montaro. Sro. Bremon, rimarkigis ke sur la ŝildo de Olot estas pentrita flugilo (*alot*-flugilo) kaj per tre ĝustaj, trafaj konsideroj li komparis aviadon, Esperanton, kaj la olotan esperantemon kaj progresemon. Pastro Coll tostis en la nomo de la katolikoj kun sia flua kaj bela dirmaniero. Fine, Sro. Rocamora, havis dankajn vortojn por ĉiuj; li rememoris verkon de urba verkisto, el kiu li eltiris elegantajn ekzemplojn kaj komparojn: li glosis la paroladojn de la tostintoj, kaj finis per trinko al la sukceso de la Iberia Konfederacio, pri kiu voĉdonis la matena labora kunsido de la Kongreso.

Je la kvara kaj duono oni forlasis la manĝotablon kaj rapidis al la ferma kunsido.

KONGRESETO DE ĜERONPROVINCA ESPERANTA LIGO

Je la 9^a vespere ĉe la Urbdomo kunvenis la membroj de la Ĝeronprovinca Esperanta Ligo, kiuj sub la prezido de Sro. Josep María Garganta alprenis la sekvantajn decidojn:

I. Kiam la Kongreso de la K. E. F. okazos en la ĝerona provinco, la Ligo kunvenos en la kongresurbo de K. E. F.

II. Elekti delegitojn de Ĝ. E. L. en ĉiu urbo, kie ne ekzistas grupo aliĝinta al Ĝ. E. L.

III. La mono restanta post la pago de la administraj aferoj de Ĝ. E. L., estos uzata por propagando, laŭ la decido de la Direkta Komitato aŭ kiam tio fariĝos necesa.

La kunsidantoj prenis aliajn decidojn modifantajn la internan regularon de la Ligo kaj post danka parolado de Sro. Garganta, kiu proponis sendi salutan telegramon al Dro. Zamenhof, la kunsido estis fermata.

LA BALO

La salono de la «Círculo Olotense» aspektis tre agrable dum la balo je honoro de la Kongresanoj. La fraŭlinoj olotaj en elegantaj kostumoj grandamase partoprenis la dancadon, kun la junularo esperantista, kiu flirtis ĉirkaŭ la belaj samideaninoj en senĉesa babilado. Tie ni havis la plezuron saluti la plej distingindajn familiojn el Olot kaj ĉiujn samideanojn kaj kongresistojn, kiuj per tiu festo adiaŭis la urbon kaj la simpatiajn organizintojn de la Kongreso.

Nomojn ni ne citas, por ne riski kvankam senvolajn, malplaĉajn forgesojn: ni nur diros, ke el la festoj de la Kongreso, tiu resto longatempe en la memoro de la partoprenintoj,

Post la Balo multaj kongresanoj iris rekte al la stacidomo forveturi per la unua matena vagonaro. Malgraŭ la pluvo, kiu la lastan vesperon ĝenis nin, granda nombro de samideanoj restis en Olot por ĉeesti la morgaŭon la postkongresajn ekskursojn anoncitajn. Ĉe la deiro la stacidomo bruis kiel abelaro pro la adiaŭoj ĝojaj, per kiuj la veturontoj promesis al la restantoj rendevuojn en la V^a Kongreso apud la maro, en Sant Feliu de Guixols.

EKZAMENOJ

Dum la horoj anoncitaj en la provizora programo havis lokon la skribaj kaj parolaj ekzamenoj.

Sroj. Pujulà, Bremón kaj Coll formis la tribunalon, en la ekzamenoj por la profesora diplomo, kaj la Juĝintaron de la atesto pri lernado konsistigis Sroj. Rosals, Gili kaj Grau.

Post brilaj pruvoj de kompetenteco en nia lingvo kaj en gramatiko, fariĝis profesoroj Sroj. Josep Albagés (Vic); P. Aulina

(Banyoles); Ptro. Josep Casanovas (Ĝerono); Joaquim Costa, Pere Costa (Santa Coloma de Farnés); Ptro. Francisco Viver (Sant Feliu de Guixols).

La ateston pri lernado ricevis Sro. Pere Mata (Banyoles).

Ilin ĉiujn ni gratulas pro la sukceso.

13^a, Mardo

POSTKONGRESO

LA samideanoj, kiuj restis en Olot allogitaj de la projektitaj ekskursoj al la kratero de St. Francesc kaj al la fontoj kaj fabrikoj de la proksima vilaĝo St. Joan les Fonts, certe ne bedaŭris sian restadon inter la olotaj samideanoj, malgraŭ ke la pluvado obstina forprenis ĉarmon al la postkongresaj festoj. La vizitoj tamen efektiviĝis kaj niaj eksterurbaj federacianoj konservas de ili kaj pri la aŭfableco de la membroj de la Organiza Komitato plej agrablan rememoron, ĉar la klopodoj de niaj agemaj amikoj kompensis abunde la oferon ekskursi sub la pluvo, kiu tamen ne povis malvarmigi la entuziasmon de la ekskursantoj.

* * *

RESUMO

La Kongreso de Olot kun siaj brilaj festoj kaj kun siaj fruktoportaj decidoj restos longatempe kiel unu el la plej helaj venkoj de nia Federacio. La karaktero oficiala, kiun donis al ĝi la alta protekto kaj speciala partopreno de la hispana Ministraro, kiu fakte malfermis ĝin, per tio kontribuante al la sukceso, estas garantio de la triumfo plena, kiun atingos certe la Iberia Konfederacio, kies bazojn la Kongreso prilaboris, danke al la helpo entuziasma de Sroj. Piñó kaj Perogordo, kiuj en reprezento de gravaj organizaĵoj honoris nian ĉiujaran Feston.

La simpatio montrata de la loĝantaro de Olot al siaj gastoj pravas kiom multe nia afero prosperas en nia lando, kie la ĝenerala aprobo ŝatas pli kaj plie ĉiun tagon la esperantan ideon, kiu konstante enradikiĝas, promesante por baldaŭa tempo la plej mirindajn fruktojn.

Ni danku sincere ĉiujn membrojn de la Organiza Komitato de la Kongreso, kiuj sub la direktado de Sro. Josep M.^a Garganta sciis prepari por ni la belan festaron: iliajn klopodojn rekompencu niaj amikoj per la laŭdoj, kiujn la laboro de la organizintoj bone meritas.



GRAVA RIMARKO

Post longa prokrasto, kaŭze de grava striko de kompostistoj kaj presistoj en Barcelono, ni povas *fine* aperigi ĉi tiun numeron eksterordinaran. La raporto pri la kongresaj taskoj kaj festoj okupas nian tutan lokon, kaj tial la sciigoj pri Enlanda Movado, Bibliografio, Oficiala Parto kaj ceteraj fakoj, kiuj amase superŝutis nin dum la du lastaj monatoj, ne povas enteniĝi tute en tiun numeron. La sekvanta, t. e. la Aŭgusta, aperos akurate kaj enhavas la tutan materialon, kiu restas ĉe ni.

Ni petas la federacianojn, ke ili volu bone noti pri tio, kion ni diras responde al la multego da demandoj parolaj kaj skribaj, kiujn ni ricevis dum la longa intertempo, kiam daŭris la bedaŭrinda striko.

La Redakcio



VERDIKTO DE LA INTERNACIA KONKURSO DE STAMPOJ

Premio al arteco estas aljuĝata al la stampo num. 5 de la societo *Esperanta Semo*, de Sabadell.

Subpremioj. 1^a Al la stampo num. 26, de la *Booma Esperantista Grupo*, de Boom (Belgujo). 2^a Al la stampo num. 9, de *Esperanta Nesto*, de Barbará del Vallés. 3^a Al la stampo num. 99, de la *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*.

Premio al simboleco estas aljuĝata al la stampo num. 2, de *Esperanta Aŭrovo*, de Barcelono.

Subpremioj. 1^a Al la num. 26, de *Booma Esperantista Grupo*, de Boom (Belgujo). 2^a Al num. 9, de *Esperanta Nesto*, de Barbará del Vallés. 3^a Al la num. 5, de *Esperanta Semo*, de Sabadell. 4^a Al num. 1, de *La Rondo*, de Barcelono.

Olot, 30^{an} de Aprilo 1913. Por la Juĝintaro: Anton Serra, PREZIDANTO.
Martí Casadevall, SEKRETARIO.



SUSCRIPCIÓ
PER A L'ADQUISICIÓ DE LA SENYERA DE K. E. F.

El 25 d'abril se reuní a casa el Sr. Rosals la Comissió de la Senyera de la K. E. F. Entre'ls reunits regnà força entusiasme per portar a bon terme l'encomanda que'ls féu el Congrés de Terrassa. Entre'ls diversos acords presos hi figuren el de celebrar festes per recaudar cabals i el d'obrir un concurs de projectes. A l'efecte es nomenaren dues subcomissions, formades pel Sr. Pujulà, el Dr. Coll, la Sra. Rebours, i el Sr. Saltiveri la primera, i per la Sra. Rosals, les Srtes. Gili, Saltiveri i Rossell i Mn. Planas la segona; amdues presidides pel president de la K. E. F.

<i>Suma anterior</i>	104'25 ptes.	
Sr. Joan Camps (Mendoza).....	15	»
<i>Lumon</i> (Terrassa)	10	»
<i>Anino d'Esperanta Semo</i>	1	»
Srta. C. Saltiveri	2	»
Sr. J. Serrat	3	»
Sr. Joan Rosals	2'50	»
Sra. J. Rosal de Rosals.....	2'50	»
Sr. J. Tarrech	1	»
<i>Laboro Esperanta</i> (Vilanova)	10	»
<i>Ĉiam Antaŭen</i> (Barcelona)	9	»
Srtes. Teresa i Eularia Rosell*	41'65	»
<i>Barcelona Stelo</i> (Barcelona)	25	»
TOTAL.....	226'90 ptes.	

Segueix oberta la suscripció.

* Import del premi guanyat en els Jòcs Florals d'Olot.



ENLANDA MOVADO

La 29^{an} de Junio estis la dua datreveno de l'morto de tiu kara amiko nia, Sro. Domènec Serdà, kiu tiom kaj tiom sin oferis al la starigo de nia K. E. F.

Samideanoj! Memoru pri li kaj imitu lian fervoron por Esperanto!

UNIVERSITATO DE BARCELONO

Ekzamenoj de Esperanto

La 4^{an} de Junio okazis en la Universitato la ekzamenoj de la lernantoj, kiuj sekvas la kurson de Pastro Coll, kaj kiuj laŭ Reĝa ordono rajtas ricevi ateston pri la konoj de ili akiritaj en la oficiala kurso.

Sinjoro Pujulá, kiel lingvokomitatano, Sro. Grau anstataŭante Sron. Bremón, lingvokomitatano, kaj Pastro Coll, konsistigis la Tribunalon. Fraŭlino Pilar Puigbonet, atingis unuagradan ateston kun la noto «Supera honora merito». Duagradan ateston obtenis S-ino. Vicente González (Alta merito), fraŭlino Teresa Arnella (Supera merito) kaj S-roj. Manuel Bonet kaj Antonio Plà.

La 6^{an} de Junio, sub tribunalo de Sroj. Pujulá, Bremón kaj Coll—profesoroj de K. E. F.—okazis la ekzamenoj por distribui atestojn de lernado kaj profesoreco de K. E. F. al la lernantoj, kiu prezentiĝis kiel kandidatoj.

Fraŭlinoj Teresa Arnella ricevis ateston de lernado. Sroj. Monjonell, Planas kaj Miquel fariĝis profesoroj de la «Kataluna Esperantista Federacio».

La saman tagon okazis la konkurso por gajni la premion «Universitat» (100 pesetoj) donacitan ĉiujare de malavara anonimulo por la plej bona lerninto el la Universitata kurso. Sro. Pla, la sola kiu respondis al la plejmulto de la malfacilegaj demandoj estis unuanime elektita laŭreato.

Ĉar ni ĉiuj devas interesiĝi al la prospero de la Universitata kurso, ni petas de la Prezidantoj de grupoj, ili instigu siajn prezidatojn enskribiĝi por la venonta jaro. Ni informos ilin per K. E. kiam la Universitata registro estos malfermita pri tiu fakto kaj pri la horo de la kurso.

BARCELONO

Kun granda plezuro ni sciigas niajn legantojn pri la sukceso de nia samideano barcelona Sro. Petro Mayol ĉe la *Granda Internacia Konkurso Fotografia* de la firmo Gebert, en Belgujo. Li atingis grandan diplomon per multe-

nombra kolekto de fotografajoj de festoj kaj ekskursoj esperantistaj, okazintaj en Katalunujo, kiujn li prezentis sub la devizo : «Esperanto.» Tiu grafika dokumentaro pri nia Enlanda Movado fariĝis konvinka argumento ĉe la ekspozicio de l' konkursajoj.

Ricevu nia amiko sinceran kaj kuraĝigan gratulon.

—«Konstante frapante» estas la nomo de nova Esperantista Grupo ĵus fondiĝinta en nia urbo. Ĝia sidejo estas ĉe nia amiko la K. E. F.'a delegito por Barcelono, Sro. Delfi Dalmau, strato dels Angels, num. 1. Ĝia unua faro por Esperanto estis praktika supera kurso pri nia lingvo kaj Esperantismo.—Ĉiuj ge-K. E. F.-anoj estas konsiderataj kiel membroj de «Konstante Frapante» kaj ĉiel rajtas ĉeesti la eldiritan kurson; ne-K. E. F.-anoj devos pagi por tiu kurso, se ili ĝin volos ĉeesti; tiu kurso akceptas kaj bonvole respondos ĉiajn demandojn de eksterbarcelonaj federacianoj; ili nur bonvolu sendi la poŝtmarkojn por la respondo. Ankaŭ tiun rajton devos pagi la nefederacianoj. De ĉiuj «Konstante Frapante» antaŭakceptas kaj antaŭdankas ĉiajn donacojn, precipe monajn.—D. D.

VILANOVA I GELTRU

La dimanĉon 25^{an} de Majo, Sro. Pujulá faris paroladon en la Ateneo pri la temo «Sinibaldo de Mas. Unu amiko de Manel de Cabanyes.» Elektita aŭdantaro ĉeestis la kunvenon. Sro. Pujulá profitis la okazon paroli pri la literaturaj rilatoj inter de Mas, de Cabanyes, kaj Ariban (partianoj de lingvo internacia), kaj pri la ideografia sistemo de la unua, (al kiu nur mankis ekvidi la internaciecon de la vortaro por eltrovi nian Esperanton!) por fari defendon de lingvo internacia, kaj elmontri la sistemon de nia helpa lingvo. Dum sia pledo, kaj por kuraĝigi la esperantistojn kontraŭ la rideto de la skeptikuloj, Sro. Pujulá prezentis la historion de la ĉefaj homaj elpensoj mokitaj de la scienculoj*.

PALAFRUGELL

La societo *Paco kaj Amo*, fako de la «Ateneu Palafrugellenc», organizis propagandan paroladon, kiu okazis la 31^{an} de Majo vespere en la teatro de la «Centro Fraternal» pri la temo *La spirito de la internacia lingvo*.

Sro. Josep Grau, el Barcelono, antaŭ cento da personoj, inter kiuj troviĝis la plej kleraj kaj distingindaj el la urbo, longe parolis pri tiu temo, klarigante la internan ideon de Esperanto kaj vidigante per konvinkaj argumentoj, ke la esperantistoj estas sur la vojo al la triumfo. La ĉeestantoj aplaŭdis la laboron de la parolinto, kiun la samideanoj regalis afable per vizito al la fabriko de korkaĵoj de Miquel & Wincke kaj per ekskurso al la lumturo de Sant Sebastia.

SANTA COLOMA DE FARNES

En la loterio, kiun *Esperanta Idealo* organizis, atingis la premiojn en la

* Niaj propaganditoj trovas tre interesajn argumentojn pri tiu temo en la I^a ĉapitro (*Les incroyables*) de la verko «L'Inconnu et les problèmes psychiques» de Camille Flammarion. — Paris. Ernest Flammarion, éditeur. 29, rue Racine, près l'Odéon. (Noto de la Redakcio.)

Ioto, kiu okazis en Olot post labora kunsido de la Kongreso de K. E. F. la jenaj biletoj:

1 ^a Premio	Numero	3886
2 ^a »	»	1454
3 ^a »	»	4883
4 ^a »	»	8488

VENDRELL

Frateco okazigis la 4^{an} de Majo ĉe la loĝejo de «Orfeo Vendrellenc» vesperfeston esperantistan. Versaĵojn katalunajn kaj esperantajn legis Finoj. Asunció Constantí, Alberta Sanabra kaj Beatriu Mercadé kaj Sroj. Antón Baldris, J. Galvez kaj Francesc Guitart. Originalan verkon «Perqué som esperantistes» legis Fino. Maria Julivert, profesorino de la grupo kaj Sro. J. Marcé legis la verkon «L'Esperantq devant de la joventut», originalan de Sro. Amadeu Martorell. Kun akompano ĉe la piano de Sino. Jovita Serra de Miquel, ludis tre bone kompoziciojn de Bach, P. Roda kaj aliaj la juna violonisto Sro. Ricart Batlle, kaj Sro. Joan Miró, el la Vendrell'a Orfeono kantis «Mefistofele» kaj popolajn kanzonojn.

Sro. Joan Martorell, kiu prezidis, ĉe la fino eldiris dankan paroladon kaj la ĉeestantaro aplaudis forte lin, kiel ankaŭ ĝi aplaudis ĉiujn partoprenintojn. — Tre bela festo, kiu honoras la agemecon de *Frateco*.



Oficiala Parto

La 25^{an} de Majo kunvenis la nova Komitato de K. E. F., en Barcelono ĉe Sro. Rocamora. Ĉiuj membroj ĉeestis.

Necese oni kredis studi bonan manieron restarigi la Konsultan Komitaton (projekto aprobita en Tarragona) kaj, en okazo ke tia restarigo fariĝu ne ebla, krei la konsulojn *comarcals*, kiuj tre bone povus formi la Konsultan Komitaton.

La D. K. pritraktis ankaŭ financajn kaj propagandajn aferojn kaj gratuligis pri la sukceso de nia IV^a Kongreso en Olot dank' al honorindaĵ klo-podoj de niaj fervoraj samideanoj de tiu urbo.

Oni decidis okazigi grandan feston, por solenigi la fermon de kursoj, ĉe la grava korporacio *Ateneo Barceloni*.

Okazos nova kunveno de l'D. K. de K. E. F. la 22^{an} de Junio en la sama loko. — La Sekretario, Manuel Bordas.



KORESPONDADO

Sro. L. Renom, Barcelono. Vian artikolon ni ne povas publikigi: ĝi ŝaj-nus reklamo al nil Plezure ni parolos kun vi pri la afero. Dankon por viaj es-primoj. — Sro. M. P. Eble vi ricevis la cirkuleron per kiu ni sciigis, ke la striko en Barcelono malpermesas la aperigon de K. E.—Sro. J. A., Barcelono. Efekte-ve stranga, tiu diferencigo ĉe la pago de l'sidlokoj. Ni informiĝos de la speciala komisiono pri tio zorginta.—J. Buyé. Barcelono. En venonta numero.

IV^a Kongreso de la K. E. F.

BELAJ FOTOGRAFAĴOJ DE

LA KONGRESAJ FESTOJ

MANIFESTACIO : AKCEPTO OFICIALA : FLORAJ
LUDOJ : LA KONGRESANARO EN FONTO SANT
ROC : EKSKURSO AL «LES TRIES» : OKULVITRULA
VERMUTO : VIZITO AL LA FONTO MOIXINA :
DUMVOJAĜAJ FOTOGRAFAĴOJ : ĈIRKAŬAĴOJ
DE OLOT : K. T. P. K. T. P.

Mendeblaj, po 0'20 ptoj. ĉiu, de nia samideano

PETRO MAYOL

Travessera, 41, Gracia; aŭ de *Barcelona Stelo*, Marquès
del Duero, 88, kaj *Supren*, Montaner, 6, Barcelono

GLUMARKOJ

JUS ELDONITAJ!

BELAJ!

Estas vendataj po unu centimo ĉiu marko je folioj de 50 ekzempleroj.

Por la grupoj mendantaj pli ol milon da markoj estas farata rabato de 25 %.

Sendu la monon per poŝtmarkoj aŭ poŝta ĝiro al sidejo de la K. E. F., strato Gracia, 12 : Sabadell.

Ni rekomendas la abonon al

POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto, aperadas okan jaron, ĉiam pliinteresigante sian programon.

En 1913^a jaro «P. E.», krom 12 ilustrataj, zorge redaktataj numeroj en klasika, pure fundamenta Esperanto, donos al siaj abonantoj senpagan:

“LITERATURAN ALDONON”

(200 paga volumo)

«Pola Esper.» enhavas konstantajn rubrikojn: Propagandaj artikoloj. — Esperantaj demandoj. — Rakontoj, noveloj, poezioj. — Populare sciencaj artk. — Scienco kaj Vivo. — Opinioj. — Konsideru! — Kroniko. — Korespondadoj. — El Esper. Mondo. — Faktoj. — Bibliografio. — Revuo de la gazetoj. — Konkursoj kaj problemoj. — Humoraĵoj. — Respondoj de la Redakcio. — Muziknotoj. — Ilustraĵoj. — Anoncoj.

Abonprezo: Jare kun «Literatura Aldono» rb. 2,50 k. = 2,650 Sm.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio: Varsovio (Polujo), str. ŚÓPENA 8
Specimenaj numeroj estas sendataj kontraŭ respondkupono, aŭ 10 sd. peŝmarko

Abonu Malkarega

SVISA ESPERO kaj
MONDA POŝTO

Duonmonataj oficialaj organoj de la «Svisa Esperanta Societo», alternante aperantaj, kun la monata aldono «La Kolektanto» por ĉiuspecaj kolektantoj.

Helpa kaj Propaganda organo de la

IX^a UNIVERSALA KONGRESO

DE ESPERANTO EN BERN, 1913

Prezo nur Sm. 1'60 por ambaŭ gazetoj kune. En Svislando nur Fr. 3.

ŝkribu al Sr. J. Thalmann, Fischenthal (Zürich-Svislando)

ĈU VI NE ESTIS ĈE LA
«OKA» EN KRAKOVO? NE!

Tial vi ankaŭ ne aŭdis la laŭdon de nia
Majstro pri la bele ilustrita, riĉenhava

Kongresnumero de «La Marto»

Ĝi raportas pri ĉiuj antaŭaj kongresoj.
Sendu tuj 2 *respondkuponojn* kaj vi ĝin
ricevos aŭfrankite. Tial vi ankaŭ ne aŭ-
dis la laŭdojn de la gekongresanoj pri

— LA MARTO —

la tutaŭstria, ilustrita, monata, familia
gazeto por la diversnacia Aŭstrio.

Specimenon kontraŭ *respondkupono*
Abonprezo: jare 5 K. = 2,200 Sm.

ĉe LA MARTO, Haida (Bohem.)

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
KATALUNUJO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

Red. : Frederic Pujulà
Sek. de Red. : Josep Grau

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pri..., Fred. Pujulà. — *Malagrablaj sekvoj.* — *La Pas-
ko de l'Greno*, Trad. el Ignasi Iglesias. — *El la Lite-
raturaj Konkursoj.* — *Konservantaro de la Floraj*
Ludoj. (Regularo). — *Historio de Esperanto en Kata-
lunujo.* Montcada, Esperantano. — *Bibliografio,* Ta-
men. — *La IX^a Universala Kongreso.* — *Edziĝoj* —
Enlanda Movado. — *Oficiala Parto.* — *Korespondado*



JARO IV^a

AŬGUSTO 1913^a

N^{ro} 8 (41)

Llista de delegats autoritzats per la administració de K. E. F. per a rebre les quotes

Arbós del Penedès	A. Romagosa	Major, 11.
Badalona	«Badalona Stelo».	Sant Pere, 86.
Balaguer	M. Espar Boquer.	Miracle, 7.
Banyoles	J. Aulina	Turers, 49.
Barbarà del Vallès	S. Arnella	Sant Pere, 21.
Barcelona	D. Dalmau.	Angels, 1, entl.
»	Joan Rosals	Porta-ferrissa, 30.
Begas	J. Esteve	Raval Sant Martí, 19.
Berga	J. Cardona.	Apotecari.
Blanes	S. Robert	Llarg, 42.
Borjes Blanques	F. Rubinat.	Pou, 2.
Calafell.	J. Jané	
Cambrils	Josefina Maseguer	Hostal Nou.
Cassà de la Selva.	N. Puig	Bisbal, 1.
Castellar del Vallès	F. Blanquer	Fonts Calents.
Centelles	J. Raurell	
Flix	«Verda Stelo».	
Girona	F. Anguet	Progrés, 20.
Granollers	F. N. Pujadas.	Fonda d'Europa.
Igualada	A. Mosella	P. Constitució, 11
La Escala	J. Ximinis.	Fàbrica géneros de punt.
Lleida	Ll. Abadal.	Major, 12 i 14
Manlleu.	«Esperantista Amikeco»	Pont, 38, 2. ^{on} -1. ^a
Mataró	J. Solà	Sant Josep, 46.
Mieras	R. Riera	Comerciant.
Mollet	«Vojantaŭen».	
Moncada	Joan Buxó.	Metge.
Olot.	I. Juanola	Superior, 25, 2. ^{on}
Palafrugell.	J. Marquès.	Pals, 1.
Pobla de Lillet	J. Llumà	Porxos, 19.
Prades	T. Alsina. pvre.	
Premià de Mar	P. Alsina	Camí Reial, 81-79.
Reus.	E. Aguadé.	Presó, 15.
Ripollet.	«Esperanta Akvofalo»	Nou, 20.
Rubi.	J. Ratés	Sant Magí, 1 i 3.
Sabadell.	Lloc Social.	Gracia, 12.
Salàs.	P. Vivet.	Metge.
Sant Feliu de Guíxols	J. Blanch	Caimó, 32.
Sant Llorenç Savall.	J. Roma.	
Sant Quirse de Besora	J. Fossas	Metge.
Santa Coloma de Farnés.	J. Gener.	Verge Maria, 1, 2. ^{on}
St. ^a Perpetua de la Moguda.	«Kamparo»	
Selva del Camp	J. Girona	
Tarragona	D. Obiol	Unió, 9, 3. ^r
Terrassa.	A. Oliart	Clarís, 24.
Tivissa	F. M. Brú	Avall, 16.
Torelló	C. Viñolas.	Sant Josep, 14.
Vendrell	S. Esvertit.	Cristina Baixa, 50.
Vich	J. Comella	Plaça Major, 18.
Vilafranca del Penedès.	A. Robleño	Puigmoltó, 14.
Vilanova i Geltrú	F. Mestres.	Sant Antoni, 1 i 3.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SENPAĜA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Red. : FREDERIC PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEP GRAU

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Malagrablaj sekvoj.* — *La Pasko de l' Greno.* Trad. el Ignasi Iglesias. — *El la Literaturaĵ Konkursoj.* — *Konservantaro de la Floraj Ludoj.* (Regularo). — *Historio de Esperanto en Katalunujo.* Montcada, Esperantano. — *Bibliografio,* Tamen. — *La IX^a Universala Kongreso.* — *Edziĝoj.* — *Enlanda Movado.* — *Oficiala Parto.* — *Korespondado.*

S-ro. CARLO BOURLET

la eminenta pioniro de Esperanto, direktoro de «La Revuo», prezidinto de la III^a Literatura Konkurso de K. E. F., mortis la 12^{an} de Aŭgusto pro malfeliĉa akcidento.

Esperantismo longatempe ploros lian perdon!
Pace ripozu nia amata amiko!

EL PRINCIPI D'AUTORITAT

Ho hem dit varies vegades i ho repetirem tantes com sigui convenient : en la nostra organització tot-hom ha d'ésser útil i ningú necessari. L'inoblidable Serdà (i tots sabem lo necessari que ell fóra entre nosaltres) ja erigí el principi en norma. Avui, quan la Federació s'és engrandida i compta amb l'entusiasme de tots, la democràcia de l'organització és més intensa, i els individus sols tenen aquella importància que'ls dóna la tasca acomplerta. L'autoritat, entre nosaltres, és un símbol representació de l'energia i de la voluntat col·lectives, no una energia i una voluntat apart que domini i s'imposi per damunt de les dels altres. Els càrrecs són fonts de devers i no de drets. Els grups i els federats són ja majors d'edat per sortir l'impertinència de Júpiters armats de llamps i asseguts sobre caixes de trons. Els Comitès, les Redaccions, les Comissions, les Delegacions, no són sinó cadenes de treball, i no patents d'hegemonia o títols de distinció. Som una reunió d'homes que lluiten per un ideal comú, i no un banc de galiots que remen sense saber la direcció i sols quan la tralla de l'arraix tueteja les esquenes. Tot-hom, des del primer al darrer, té el dret de donar son cop de rem voluntari, i no regoneixem altre capità que'l mutu respecte i l'amor a la causa que'ns uneix. Els maquiavelismes, les trabetes, que tenen un lloc adequat en les lluites polítiques, no han de trobar ambient entre nosaltres.

Aquests són els principis que presideixen l'organització de la nostra revista, on els càrrecs són purament legals i on treballem en harmoniós companyerisme. Aquestes són les causes que molts companys de Federació no hi tinguin càrrecs, que, si fossin honorífics ocuparien per dret propi; però essent de treball, ni ells poden acceptar ni nosaltres oferir pertinentment. Aquest és l'esperit de germanor, de companyerisme, de sacrifici per la causa, que'ns ha d'inspirar en l'organització general. I els qui no ho entenguin així perdràn llur temps i el faràn perdre a tots. En lloc d'esmerçar llurs forces en aquesta equivocada actuació, faràn millor aprofundint l'estudi de la llengua, el camp de la qual, entre les setze regles i els treballs filològics, és un camp on hi ha molt camp per córrer.

TEORIOJ

Mi rememoras kun teruro la patosajn profesorojn, per kiuj la destino favoris min en la sudamerikaj kaj hispanaj liceoj, kie mi havis la malfeliĉon lerni. Ho, tiu instruisto de Fiziko kaj Ĥemio, — ĉar tiuj aferoj iradis en niaj programoj kune kiel la ĉevaloj de tramveturilo! Ho, tiu kompatindulo, kiu informadis nin pri la misteroj de la Natura Historio! Ve al la frakasita geografiisto *maldank'* al kiu mi ne sciis; kie kuŝas Aŭstralio se mi ne havus esperantistan jarlibron!

Mi vidas ankoraŭ ilin sidantajn malantaŭ la katedroj kaj klarigantajn per elokventa parolo la plej neantaŭviditajn difinojn. La flava febro estis amindaĵo apud la pesto de teorioj per kiu oni superŝutadis nin .. Tiuj bravaj Ptolomeo, Arkimedo kaj Koperniko neniam povus imagi, ke iam ili taŭgos por tiel multe tedi infanajn kapojn! Tiu kara Linneo, kiu ne apartigis el la «*homo sapiens*» en apartan specon la teoriemajn dupiedulojn! .. Oni nur imagu personon parolantan dum sinsekvaj horoj pri kotiledonoj kaj pistiloj, ostoj kaj nervoj, puŝoj kaj altiroj, gasoj kaj fluidaĵoj, formuloj kaj difinoj, binariaĵoj kaj atomoj, stelaroj kaj eklipsoj... dum en malproksima ŝranko kuŝas polvokovritaj kaj tor de nia tuŝo kiel fetiĉoj, la remburitaj bestoj, la globusoj, provvazoj, piloj, ŝtonoj, metaloj kaj landkartoj!

Mi konfesas, ke ne pro tia instruado, sed pro aliaj pli simplaj kaŭzoj, mi scias montri per la fingro nian sunon. Nur pro kutimo, ne pro ĥemiaj konoj, mi miksas en la salaton salon kaj pipron sen timo je eksplodo. Ne pro la fizikinstruisto, kiu falis sur mian vojon, sed observinte kiel oni eltiras bieron el la toneloj, mi scias pri la premo de la gasoj...

Unu apotekisto el miaj amikoj iam parolis al mi pri juna kuracisto, kiu receiptis tormulon por piloloj, kies kunmetaĵoj liveris likvaĵon pli fluan ol rivero, kaj proponis kontraŭdermitan pulvoron, kiun feliĉe oni ne elpistis, ĉar la miksaĵo rezultigus eksplodaĵon el la plej terura speco... Jen ankoraŭ viktimo de teoriemaj instruadoj!

Ja mi revidas ankoraŭ tiujn profesorojn kun iliaj kapoj de sufiĉeco trans kies okulojn mi legas nun ilian malestimon por la *vulgaraj* tuŝeblaj kaj videblaj realaĵoj!

Kaj pro ili mi vidas kun kompatato tiujn homojn, kiuj ĉu per ŝtoniga katenado ĉu per radikala reformado de nia lingvo, lokas sin teorie en ekstremaĵoj, malproksime de la laborejo, kie ĝi sangobatas kaj grandiĝas.

FRED. PUJULÀ

MALAGRABLAJ SEKVOJ

Ludi pioniran rolon trudas al la individuo strangajn oferojn. Ni ne parolu pri la okazoj, kiam la pioniroj devas stoike malliberigi en ceremonian kostumon, nek pri la turmenta ĝeno subskribi dum malplaĉe malkvietigita digestado kelkajn dekojn da menuoj. Niaj kunfederacianoj partoprenintaj en la Kongreso de Olot ja tion povis observi. Sed, kio efektive depasas la ordinaraĵajn cirkonstancojn, estas la fakto, ke unu el niaj plej karaj pioniroj *devis* tedi nin dum esperantista festo, parolante pri la kutimoj de la helikoj kaj pri tio, ĉu ili supreniros aŭ ne, kiam ili rampas sur verda stelo ĉe piedestalo subtenanta buston de Zamenhof.

Multaj el la amikoj niaj, kiuj ĉeestis la lastefaritan feston de *Barcelona Stelo*, sin turnis al ni kun demandoj rilataj je la stranga disertacio de sinjoro Pujulà pri la helikoj aluditaj, kiun li faris en formo simbola, — ĉar estas videble, ke oni bone rimarkis lian nekompetentecon. Ni, maldiskretaj, klarigos la aferon, se nur oni promesas konservi la sekreton.

Sian toston komencis Pujulà dum la oficiala festeno en Olot, asertante, ke de post tiu momento li ne plu kredos la sciencistojn...¹ Longa silento sekvis tiujn vortojn : la konsciaj kunmangantoj kun miro rigardis unu la aliajn, kaj kiam nia direktoro reparolis kaj pravigis sian sprite neseriozan diron, jam estis plene ofendita unu eminenta samideano nia, sciencisto, aŭ almenaŭ, sciencemulo, kiu sin dediĉas prefere al konkologio. Post la festeno la eminenta samideano iris renkonte al la pioniro kaj postulis de li formalan rektifion. Malkompreniĝo okazis, tial ke Pujulà bezonis longajn klarigojn pri la kaŭzoj de la ofendo, sed fine li konsentis ĝentile, aŭ eble por ŝpari al si insistadon pri la afero.

La kondiĉojn de l'rektifio ni ne konis, kaj nur kiam ni vidis nian karan amikon kaŝite demetantan el sia poŝto sur la verdan piedestalon unu helikon, ni komprenis, ke ili estas tro severaj. Ni komprenis, kaj el ni, ĉefe S-ro. Rey, la prezidanto de «B. S.», kiu dum S-ro. Pujulà alparolis la ĉeestantojn kaj turnis ilian atenton al la heliko pace dormanta sur la verda drapo, tenis sian poŝbruligilon super ĝi, lumigante por ke oni ĝin vidu.

Jen, karaj scivolaj demandintoj, kial per unu heliko kaj per unu tedo nia pioniro, eĉ kontraŭ sia volo, retransviligis la fieran sciencemon de unu nia samideano kaj devigis S-ron. Rey (nian monarĥon)² malaltigi publike sian rangon. — J. G.



-
1. Vidu antaŭan numeron de «K. E.».
 2. Kastile, Rey = Reĝo.

La Pasko de l' Greno¹

DEVIZO : *Pentekosto*

NEN ni denove, kun alia efektivigita iluzio kaj kun alia espero en la koro de l' jaro krevanta de vivo kaj juneco, kronanta la someron per la plej voluptaj floroj el la tero kaj per la heloj de flamanta ora suno, kiu neniam maljuniĝas, kies potenco neniam malpligrandiĝas. La elspiroj de la vintro, maldiafanigantaj la senmakulan bluan ĉielon, iom post iom disiĝis, torportante post si la malgajecon de la naturo; la nebulaj vualoj, kiuj honteme kovris la suprojn de la plej altaj montoj, subite disŝiriĝis, kondensiĝante en la spaco kiel ploro de treŝa roso; la neĝoj, glaciigitaj de la frostoj, tuj kiam la suno kisis ilin, fandiĝis, ekstremante, brilante kun rebriĵoj de multekostaj ŝtonoj, kaj fluante al la ebenaĵo kiel grandega degutado de larmoj.

Kiel ĝuas la vido, rigardadante la verdajn arbarojn kaj fruktejojn, kun makuloj de blonda greno kaj hela genisto, ore lumŝanĝa! Kaj kiel enridiĝas la spirito, ĝoja, ĉe la granda eksplodo de vivo, kiun ĉi tie kaj ĉiuloke donace proponas la sindona tero dankema al la homo, kiu per sia penado ĝin kulturis! Jen ni, jen ni denove, kun alia efektivigita iluzio kaj kun alia espero, en la fino de la floradoj promesantaj bongustajn fruktojn, kiuj rekompencas niajn klopodojn kaj dezirojn, kiujn, en eterna renoviĝo kaj harmonia edzeco de la vivo kaj morto, la naturo naskadas, paradante sian belegecon kaj sian kreaĵojn forton.

Ho sinmaldonaj animoj, avaraj je viaj riĉaĵoj! Rigardadu humiligite la sindonan fekundigon de la tero : la korno de la abundeco ne estas nur via propraĵo. Al ĝi rajtas, tiel kiel vi mem, la homoj viaj fratoj, la malfeliĉuloj, kiuj ne povas gajni sian ĉiutagan panon, kaj tiuj, kiuj dolore ĝin gajnas; al ĝi rajtas, tiel kiel unuj kaj aliaj, la humilaj formikoj, sin provizantaj por la vintro : kiel ankaŭ la graciaj birdoj, la gajgaj kantistoj, kiujn vi forpelas, maldankante iliajn triladojn.

Jam ĉio grajniĝis. La burĝonoj, floriĝinte, entenas la frukton; la verdinta novtrunko, stangiĝinte, elmetis plenan spikon; kaj la suno, kiel ama patro, maturigante ĉion, sin etendas enridiĝante, kaj kisantante per siaj fajraj radioj la plenan de nova vivo.

1. Premiita en la III^a Literatura Konkurso de K. E. F.

Dissemantoj de amo, dissemantoj de gajeco : kantu triumfe laŭdan himnon danke al la eterna patrino! Viaj klopodoj estas florintaj, viaj penadoj estas grajniĝintaj, tiel kiel vi esperis. Ne restu malkontentaj. Daŭru semante kaj dissemante, aliformigante la senkulturajn kampojn en fruktejojn, la fruktejojn en ĝardenojn, ĉiam kontidaj kaj sindonemaj, ĉiam pensante pri morgaŭo; ĉar viaj dezirooj kaj viaj penoj trovos en la koro de la homoj kaj en la internajoj de la tero la ĝermigan varmon, kiu ornamos vin per gloraj floroj kaj fruktoj

Ni kantu ĉiuj kune, harditaj de tiu suno, kiu neniam maljuniĝas, kies potenco neniam malpligrandiĝas. Ni kantu, ĉar ni estas denove kun alia efektivigita iluzio kaj kun alia espero, en la pleneo de l' jaro krevanta de vivo kaj juneco, kronanta la someron.

Ni kantu, ĉar la tempo estas glora : ni estas en Pasko de l' Greno!

IGNASI IGLESIAS

Tradukis : *Esperanta Fako* de la «C. A. de D. del C. i de la I.»



El la Literaturaj Konkursoj

II.^a — S-ro Alfonso Sabadell estas aŭtoro de la du verkoj, cititaj de la Verdikto, kies devizoj estas : *Ĉar tio estis feino, kiu prenis...* (Tradukitaj tekstoj, II), *Al la bonodora timiano* (Eksterordinaraj temoj, II).

III.^a — La II^{an} premion de *La Revuo* gajnis per sia verko, devizo *Excelsior*, sinjoro Herbert M. Scott el Moundsville (Usono).

Estas aŭtoro de la traduko de la tina «Otium Divos», distingita per Speciala Honora Mencio, S-ro. Josep Roselló Ordines el St. Joan (Mallorca).

La aŭtoroj de la verkoj premiitaj aŭ menciitaj en la I^a kaj II^a L. K., kiuj ankoraŭ ne ricevis la diplomojn, bonvolu komuniki siajn adresojn al S-ro. Jozefo Grau, strato Claris, 72, Barcelono.



Konservantaro de la Floraj Ludoj de K. E. F.

REGULARO APROBITA DE LA IV^a KONGRESO EN OLOT

- I. — La Konservantaro zorgos pri ĉio koncernanta la Florajn Ludojn de K. E. F.
- II. — La Konservantaro konsistas el membroj *honoraj*, *aktivaj* kaj *protektaj*. La unuajn oni prokamos, proponite de la Konservantaro en la jara Kongreso de K. E. F., aŭ se ne eble en la festo de la Floraj Ludoj. Estos membroj *aktivaj*: a) La Juĝintoj de la kvar unuaj Literaturaĵoj Konkursoj; b) La gajnintoj de tri ordinaraĵoj premioj en la Floraj Ludoj; c) La Profesoroj de K. E. F. kiuj estos gajnintaj kvin premiojn; d) La personoj, kiuj kontribuis al la sukceso de Esperanto, kiujn la Konservantaro akceptos laŭ propono de la Komitato de K. E. F. Estos *protektaj* anoj, kiuj subtenos per minimume kvinpeseta jara kotizaĵo la agadon de la Konservantaro.
- III. — La Konservantaro elektos ĉiujare el la aktivaj anoj ses personojn, kiuj devos formi la Juĝantaron de la Konkurso. Tiu elekto devos okazi dum la dekkvin tagoj post la Floraj Ludoj. Ĉiuj Konservantoj havas rajton de voĉo por tiu elekto.
- IV. — La membroj de la Juĝantaro elektos el si la personojn, kiuj plenumos la oficojn de Prezidanto kaj Sekretario. Ankaŭ ili elektos la Jarkonservanton, kiu devos fari la inaŭguran paroladon de la Floraj Ludoj. Kiu ajn membro de la Konservantaro povos esti elektita Jarkonservanto.
- V. — La oficojn de Prezidanto kaj Kasisto de la Konservantaro havos la Prezidanto kaj Kasisto de la K. E. F.
- VI. — Ĉiujare dum la Kongreso okazos la Floraj Ludoj en la urbo, kie ĝi havas lokon. Se Kongreso ne okazos, la Konservantaro decidos pri la dato kaj loko de la Floraj Ludoj.
- VII. — La alvoko kun la ordinaraĵoj temoj publikiĝos almenaŭ kvar monatojn antaŭ la Floraj Ludoj.
- VIII. — La Konservantaro proponos premiojn al du originalaj temoj (prozaĵoj kaj versaĵoj) kaj al du tradukaĵoj (prozaĵoj kaj versaĵoj). La Natura Floro estos aljuĝata al la plej bona el tiuj kvar verkoj.
- IX. — Aliaj premioj povos esti proponitaj de privatuloj aŭ societoj, se ili tion sciigas en konvena tempo. La proponintoj de premioj rajtas elekti personon, kiu intervenos en la Juĝantaro la aljuĝon de ties premio.
- X. — Al la gajninto de la Natura Floro oni donos la rajton elekti Reĝinon de la Festo, kiu partoprenos laŭ la kataluna kutimo. Kiam la gajninto ne uzos sian rajton, ĝi apartenos al la Juĝintaro.
- XI. — La premiitaj verkoj apartenos al la Konservantaro, de kiu oni por publikigo devos peti permeson. KATALUNA ESPERANTISTO, kiel oficiala organo, povos ilin publikigi sen ties permeso.

Historio de Esperanto en Katalunujo

MONTCADA (Montkada)

MALGRANDETA vilaĝo, proksima al Barcelono, enhavanta ĉirkaŭ 1800 terkulturistajn loĝantojn, estas Montcada, kiu kuŝas flanke de la riveroj Besós kaj Ripoll, ĉe ilia kunfluiĝo, kaj apud bela monto, sur kies supraĵo staris antaŭe feŭdala kastelo, kaj hodiaŭ kuŝas ermitejo dediĉita al Dipatrino de Montcada.

La unua esperantisto estis la distinginda kuracisto S-ro. Jozefo Buxó, tre sciema persono, kiu sin dediĉis dum liberaj horoj al la lernado de ĉia ajn progreso; tial li estis estinta volapukisto, kaj kiam per Dominika monaĥo el Valencio (1903), li sciis la ekziston de la nova internacia lingvo nomita Esperanto, li tuj mendis je Barcelono la necesajn verkojn, kaj ne trovinte ilin, nek katalunajn, nek kastilajn, ĉar ili estis ankoraŭ aperontaj, li aĉetis francajn. Li lernis do Esperanton per francaj verkoj, kaj tuj post la apero de la kastila gramatiko de Vicento Inglada (Januaro 1906), kaj de la praktika kurso de R. Duyos kaj V. Inglada (Februaro 1907), li ilin aĉetis por sin perfektigi en la kono de nia lingvo.

Li ricevis (1907) viziton de la aktivaj societanoj de «Espero Kataluna» el Barcelono, preziditaj de la nelacigebla S-ro. Rosals, kiu invitis lin eniri en lian katalunan aron, ĉar soleco estas patrino de neageco.

Propagandinte ame Esperanton al siaj multaj konatoj, kaj kiam li estis pli varme laboranta por Esperanto, tiam li grave malsaniĝis pro stomaka malsano, kiu kondukis lin al la morto je la 13^a de Aŭgusto de la 1908^a jaro.

Restis kun ni por sekvi la patran vojon lia filo Johano, ankaŭ kuracisto, kiu heredis de sia patro la amon al Esperanto. Li jam malfermis du kursojn de Esperanto per kataluna lingvo, uzante la «Praktikan kurson» de S-ro. Pujulà. La unua (Februaro 1909^a) estis klarigita en ĉambro de la Paroĥa Preĝejo, kaj ĉeestis Pastro Mariano Mas, paroĥestro; Pastro Jozefo de Plandolid, vikario; Pastro Anĝelo Bordas; S-ro. Celesteno Aguilar, apotekisto; S-ro. Johano Cervera, barbiro; S-ro. Salvatoro Vilanova, ĉarpentisto; S-ro. Francisko Tapiola, ĉifonisto; kaj S-roj. Agusteno kaj Salvatoro Artés, terkulturistoj. La dua kurso estis klarigita en la infana publiklernejo, kaj ĉeestis du instruistoj, unu instruistino, apotekisto, kaj aliaj sinjoroj.

Dum la dua kurso ni faris du ekskurso-vizitojn; unu (Julio

1909^a) al esperantista grupo «Esperanta Akvofalo», de Ripollet, en kies sidejo S-ro. Cervera en la nomo de la Montcadaj Esperantistoj diris varman paroladon, salutante al Ripolletaj samideanoj, kaj D-ro. Joakimo Coll, tiama vikario de tiu lasta vilaĝo, kiel voĉesprimanto de la vizitatoj diris belan respondan paroladon, dankante kore la viziton. Post biera kaj limonada trinkado kaj senlaca interparolado la Ripolletaj amikoj akompanis nin ĝis la ekstero de sia vilaĝo, kie ni adiaŭis ilin. La duan viziton ni faris al la publikinstruisto de «Santa Perpetua de Moguda», S-ro. Jardí, esperantistigema viro, kiu akompanis nin ĉe la Paroĥestron, ĉe la kuracistojn, ĉe la apotekiston, ĉiuj jam esperantistoj en la koro, kiuj nin ricevis afable. Post kontentiga esperanta posttagmezo, tiuj novaj amikoj kuniris kun ni ĝis la lastaj domoj de sia vilaĝo, kaj adiaŭante, ni deiris de ili.

En la 5^a de Junio de 1911^a ni ricevis viziton de la grupo «Esperanto kaj Patrujoj», de Barcelono. Alvenis multenombraj geesperantistoj kun standardo, kiujn ni kore akceptis kaj akompanis al la akvaj putoj el kiuj estas elĉerpata per vapormaŝino trinkebla akvo kondukota al Barcelono. Post la vizito de la ĵus inaŭgurita ponto super la rivero Besós, ni ĉiuj nin direktis al «Café Colón», kie S-roj. Albinyana, Anglada, Bermudez kaj Rodríguez parolis varme kaj konvinke pri Esperanto.

Pro la malgrandeco de la vilaĝo, kaj la neklereco de la loĝantoj la esperantistoj estis ĉiam malmultaj, sed konvinkitaj. Mi kredas ke baldaŭ nova kurso estos klarigata, kaj ke Esperanto akiros novajn adeptojn.

ESPERANTANO



Kruele batas sorto la esperantistojn en nuna Aŭgusto.

Abato Austin Richardson, prezidanto de la katolika esperantistaro subite mortis pro sufoka atako la 20^{an} de Aŭgusto en Bossey (Svisujo). Grandanima viro, kore estimata de ĉiuj, li estis la pioniro de Esperanto inter la katolikoj, ĉe kiuj li kreis organizon fortan kaj potencan. Kiam li estis preparanta la Esperantistan Pilgrimon al Romo, la morto rabis lin for el la mondo.

Ripozu en paco!

BIBLIOGRAFIO

El la domo tie kontraŭa. Skizo laŭ la vivo. Verkis Arnold Behrendt. Ricevebla de l'aŭtoro, Breslau, 16, Maxstr. 22. Germanujo. Prezo : 20 pfg. Alilando : 10 sd. (1 resp.-kupono.)

Naiva rakonteto pri ftizulo, kies malfeliĉo estas tiel granda, ke li eĉ perdis esperon pri estontaj vojaĝoj. Ĝis nun ni kredis pri la optimismo de ftizuloj. Sro. Behrendt forprenas de ni tiun kredon. Terura ruinigema jarcento estas la nia! Tamen, ni nur plene malkredos post apelacio al niaj kolegoj de «Kuracisto». Jen specimeno de la verko :

«Li aŭskultas, kielmaniere oni diskutas proponojn pri farotaj vojaĝoj al la belajoj sur nia tero —, kaj li eĉ ne posedas la forton por iri sola, sen helpo, en la apudan ĉambron. Kaj li aŭskultas la interparolojn : «Kiel vi fartas?», «Bonege!, mi dankas!» — ho! dum kiu longa tempo li jam ne diris, ne povis diri : bonege! eĉ ne : bone! ĉar li ne volas mensogi.»

Bedaŭrinde, tia verema homo mortis. La pardonon, kiun li ne bezonis, ni povas aljuĝi al la aŭtoro kiel rakontisto.

Laborista klaso kaj Socialismo. — Marcel Cachin, membro de la Pariza Urbestro. El la franca lingvo esperantigis L. Berland, urba konsilanto, kaj L. Vergnaud, Membro de E. S. F. I. O. — E. S. F. I. O. (Esperantista Sekcio Franca de la Internaciista Organizaĵo) Paris, 49, Rue de Bretagne. 1912. Prezo : 0 fr. 25. (0.10 s.). || *Esperantista presejo.* L. Fillandeu, Avenue de Pont-Neuf, 41. Limoges. || Ĝi estas sendata afrankite, kontraŭ respondkupono.

Tre interesa broŝuro por politikistoj kaj tiuj kiuj deziras koni la verajn celon kaj signifon de socialismo. Ĝi estas redaktita per bona Esperanto. Sinjoro L. Betoulle, urbestro de Limoges, kaj membro de la Franca Parlamento prezentas la broŝuron per tre fervora letero. Ni ne scias ĉu niaj lertaj samideanoj prosperos allogi esperantistojn al socialismo; nia neŭtraleco malpermesas al ni fari deklaron pri tio, sed ni estas certaj, ke ili altiros multajn burĝojn al esperantismo, ĉar vere estas rimarkinda tiu broŝuro prezentita de franca deputito, verkita de Pariza konsilanto kaj tradukita de membro de la Pariza Urbestro.

Karaktero. Laŭ Mr. J. M. Van Stipriaan Luiscius, advokato en Hago. Dua plivastigita kaj plibonigita eldono, tradukita laŭ la 6^a eldono de l' Nederlanda Originalo, kaj kontrolita de la Esperantista Literatura Asocio. Hago. 1913. Librejo «Espero» Prezo : fl. 0.25 — 0.20 sd.

Ĝi estas nova bone kaj plene korektita eldono de verko pri kiu ni parolis la pasintan jaron. Sinjoro J. L. Bruijn, la tradukinto, pri kiu ni scias per la antaŭparolo, permesas la retradukon de la verko en ĉiun lingvon escepte la

Nederlandan. Represado de verko post zorga korektado estas serioza nobla afero, kiu certe gajtigos al S-ro. Bruijn la aplaudon kaj estimon de ĉiu esperantisto. Bonvolu li akcepti nian sinceran gratulon.

RIMARKOJ. — (Pri kelkaj vortoj la tradukinto ne interkonsentis kun E. L. A. Ilin li montris al la elekto de l' legantoj (ek: *penetrita de la penso, altruisto, altruismo, angoro* en senco de sufero, doloro, k. t. p.) (Li klarigas ke «li ne uzis la akuzativan formon en frazoj, kiel *ŝanĝi ĝi en*». Ni ne komprenas kial oni devas fari tion sisteme. Ni ja rajtas, kaj eble devas, diri «dividiĝi en tri partojn». Okazas kun ĉi tio same kiel kun prepozicio *da*, pri kiu oni diskutadas ĉu tiu aŭ alia vorto montras aŭ ne montras kvanton kvazaŭ oni forĝesis, ke ni estas partianoj de lingvo artefarita kaj ke unu fojon por ĉiam ni konvinkigis pri tio, ke lingvo estas homa afero kaj tial ĝi dependas de nia volo. Sekve ne la vortoj per si mem montros aŭ ne montros kvanton, sed nia volo montros ĝin per ili, kaj ni komprenigos nian volon per la prepozicio *da*. Se ni diras «patrino da amo», oni povos nekompreni nin, sed tio dependos de la inteligenteco de l' aŭskultanto, kio estas afero tute ekstergramatika. Same okazas kun la direkto, kiu estas montrata, ne de la movsenso de l' verbo, sed de nia volo per la akuzativo en la nereakta komplemento. Ni ne forgesu, ke la lingvo estas al la servo de nia penso kaj ke ne nia penso estas al la servo de la lingvo.)

Kion patrino povas suferi. — Hendrik Conscience. Originale verkita en flanda lingvo. Esperanta traduko de Frans. Schoofs. Eldonejo de «Belga Esperantisto». Vondelstraat, 20, Antwerpen, 1913. — Prezo: fr. 0.50. (20 sd.)

Malegoismaj homoj ne bezonas alpuŝon al la bono. Moraligaj verkoj estas por ili nenecesaj. Egoistoj, male, bezonas kondukantan manon, etenditan fingron, kiu montras al ili la vojon. Oni povas atingi bonon de tiuj ĉi lastaj, laŭ du malsamaj manieroj: plibonigante ilin mem, aŭ uzante ilian propran egoismon, kiel incitilon. Ĉi tiun lastan manieron elektis Hendrik Conscience, kiu havis profundajn konojn pri la homa koro.

«Malfeliĉa Janneken! la larmoj ŝprucis el liaj okuloj, kiam li vidis vin foriranta... Nu, mia kara, diru al mi, ĉu sur la mondo ekzistas pli granda feliĉo ol ĉi tiu? Tiuj bonaj homoj mortis pro malsato, ili levis ĉielen siajn brakojn kaj petegis la Sinjoron por helpo; ni venis al ili kiel senditoj de la dia kompatemo ĉi tiu surgenuigis antaŭ ni kiel antaŭ anĝeloj, kiuj venis por sciigi al ili, ke ilia preĝo estis plenumita, kaj en ni ili benis kaj dankis Dion! Ho, Adela, nia socia vivo povus esti frivola kaj vana,... la larmoj de tiuj personoj elaçetos multajn el niaj pekoj!»

Tiu iel nemorala verko estis bonege tradukita de S-ro. Frans Schoofs per klara kaj flua stilo.

Pri estetiko en Medicino. — D-ro. Heliodor Świecieki, El Pola lingvo tradukis Mieczysław Czerwiński. T. E. K. A. Biblioteko, N.º 1. — Varsovio. 1913. Prezo: 30 sd. — Prezejo L. Boguslawski. Varsovio.

Belajn pensojn enhavis la parolado, kiun D-ro. Heliodor Świecieki el Pos-

naŭ (Posen) faris en Krakovo la 21-an de julio 1911^a ĉe la XI^a Kongreso de polaj kuracistoj, kaj kiujn ni povas ĝui nun dank' al la bona traduko de Sinjoro Mieczyslaw Czerwiński la inteligenta direktoro de «Kuracisto». — La temo de tiu parolado ŝajnos paradoksa al multaj; precipe al ili konvenos la legado de tiuj pensoj inspiritaj de profunda amo al la belo kaj bono. — Ofte ni maldolĉe ridetis komparante la milionojn elspezitajn de Ŝtatoj por konservado en Muzeoj de difektitaj aferoj el malaperintaj civilizacioj, kun la penadoj de l' samaj Ŝtatoj por malaperigi la naciajn neoficialajn lingvojn en ĝi. En tiu ordo de ideoj, se ni konsideras, ke homo estas ĉefverko, ĉefartaĵo, ni tuj komprenos la vidpunkton de D-ro. Świećieki, kaj lia tezo ne plu ŝajnos paradoksa.

L'Esperanto Méthodique. — Cours complet par L. C. Deslaurier, professeur diplômé d'Esperanto, Paris. Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, 33. En vente également chez l'Auteur, 2, pl. Saint-Pierre, Bordeaux et dans les principales librairies. 1913. Prezo : 1 fr. 25. (o. sm. 500).

La metodo ŝajnas bona. Sinjorino Deslaurier, kiu ĝin sekvis, atingis per ĝi bonajn rezultatojn. La verko entenas aproban kuraĝigan leteron de Rektoro Emile Boirac. La talento de Sinjorino Deslaurier estas certa garantio de la boneco de la lernolibro.

Kurioza rimarko. La franca — diplomatia, pornuanca lingvo! — erarigis nin. Nur dank' al la letero de Rektoro Boirac, kiu komenciĝas per la vorto «Madame» ni eksciis, ke l' *auteur, professeur* L. C. Deslaurier, estas nia distinginda *samideanino, aŭtorino, profesorino*.

TAMEN



La IX^a Universala Kongreso

Lasthore ricevitaj informoj, senditaj de nia diligenta amiko S-ro. Delfi Dalmau sciigas nin pri la sukceso de la Bern'a Kongreso. Pli ol 1000 kongresanoj ĝin partoprenas, inter kiuj el la katalunoj ni povas citi S-rojn. Dalmau, Sabadell, Domènech Alberich, Urbez, k. a.

Ni publikigos raporton pri la kongresaj laboroj kaj festoj per la venonta numero. — K. E.

EDZIĜOJ

Nia kara amiko S-ro. Joan Campdelacreu, subsekretario de la K. E. F., prezidanto de *La Rondo*, edziĝis kun la ĉarma esperantistino el Manlleu, F-ino. Concepció Llagostera.

S-ro. Joan Aubeyzón, prezidinto de *Supren*, edziĝis kun nia samideanino F-ino. María Farrán.

Al la novaj geedzoj, niaj karaj geamikoj, ni deziras eternan feliĉon!

ENLANDA MOVADO

S-ro. Manuel Bordas, la diligenta sekretario de la K. E. F., havis la grandan ĉagrenon perdi sian patron, kiun subite la Morto forprenis.

Ni akompanas en la malfeliĉo nian karan amikon, esprimante al li la kondolecon de ĉiuj federaciaĵoj.

En la proksima numero ni publikos nekrologojn pri S-ro. Carlo Bourlet; ilin ni ne povas aperigi en ĉi tiu, ĉar ĝi estis jam kompostita, kiam ni ricevis la ĉagrenan sciigon.

La Redakcio de K. E. F. sendis al vidvino de nia amiko kondolecan telegramon.

Varme oni laboras en Valencio por starigi la «Valencia Esperantista Federacio»-n. Lastatempe kaj danke precipe al la laboroj de nia fervora samideano S-ro. Andreu Piñó oni disdonis du cirkulerojn pritraktantajn tiun aferon; per la lasta oni bone komprenas, ke la valencia esperanta kampo estas preta por ricevi la federacian semon. Ankaŭ ni legis en valenciaj ĵurnaloj artikolojn favore parolantajn pri V. E. F. Antaŭen amikoj! Ni vin atendas kun malfermitaj brakoj!

D-ro. Joaquim Coll, vicprezidanto de K. E. F., provizora prezidanto, okupas en la Komisiono por la organizo de Iberia Konfederacio la lokon vakantan pro eksiĝo de S-ro. Rocamora el la prezida posteno de nia Federacio.

BARCELONO

La 29^{an} de la pasinta Junio, okazis en la grupejo de «*Semo*» ekzamenoj por atingi la Diplomon de Profesoro de K. E. F. Formis la tribunalo S-roj. Pujulà, Grau kaj Pellicer, kiuj post la kutimaj ekzercoj decidis liveri la diplomon al S-roj. Emili Presas el St. Feliu de Guixols kaj Joan Amades el Barcelono.

En la sama sidejo la 26^{an} de Junio S-ro. Fred. Pujulà faris paroladon pri Berno dum kiu oni projekciis 110 lumbildojn prezentantajn la urbon kaj landon de la IX^{an}. S-ro. Joan Rosals klarigis al la ĉeestantoj la plimulton de la cititaj bildoj; ambaŭ parolantoj estis treege aplaŭdataj.

— La 6^{an} de Julio kaj en bela salono de la «Ateneo Barcelonés» okazis la festo de fermo de la kursoj de Esperanto. La ĉeestantoj estis multenombraj inter ili multaj esperantistinoj kaj samideanoj el ĉiuj barcelonaj grupoj. Dum la festo oni disdonis la premiojn atingitajn de la anoj de la kurso *Universitat*, F-inoj. Arnella kaj Puigbonet, S-no. González kaj S-roj. Monjonell, Pla, Miquel, Ptro. Planas, Mauri, Adam kaj Bonet; ricevis la ateston de profesoro S-roj. Ptro. Planas, Monjonell, Miquel kaj Amades kaj tiun pri lernado, F-ino. Arnella. La premion *Universitat* ricevis S-ro. A. Plà kaj estis donata speciala mencio al F-ino. Puigbonet.

La festo estis prezidata de S-ro. E. Rey, el la Komitato de K. E. F., kaj dum ĝi parolis S-roj. Campdelacreu, Dalmau, Rocamora kaj Pro. Coll. Tiu lasta, kiel gvidanto de la kurso en la Universitato, klare vidigis ĝian gravecon kaj esperis, ke la venonta kurso estos ankoraŭ pli sukcesa.

Specialaj dankoj estis adresitaj al F-ino. Sobrevila, kiu per sia bonega ludo en la fortepiano amuzigis la feston.

— La grupo «*Libera Stelo*» okazigis la 15^{an} Julio ekskurson al la «Granja Flor de Mayo», kiu bone sukcesis: la ekskursantoj reiris en Barcelonon post tago pasigita sur la kamparo.

— «*Ĉiam Antaŭen*» en ĝenerala kunsido okazinta la 15^{an} de Julio elektis la jenan novan komitaton: *Prezidanto*, S-ro. L. Renom; *Vicprezidanto*, S-ro. F. Mensa; *Sekretario*, S-ro. J. Buyé; *Vicsekretario*, S-ro. L. Badía; *Kasisto*, S-ro. J. Rovira, *Voĉdonantoj*, S-roj. J. Caluz kaj F. Albort.

La sama grupo ŝanĝis sian adreson; jen la nuna: strato Poblet, 25 (Sant Martí), Barcelono.

— La 20^{an} de Julio la grupo *Paco kaj Amo* organizis festenon en Rabassallet por solenigi la datrevenon de la apero de la unua esperanta lernolibro. De frumatene multaj partoprenantoj renkontiĝis por sin direkti piede al la loko antaŭfiksita, kiu kuŝas en plej bela angulo de la montoj ĉirkaŭantaj Barcelonon. La festeno estis sukceso; pli ol 60 samideanoj partoprenis en ĝi. Je la fino tostis inter multaj aliaj F-inoj. Barba, Pérez kaj S-roj. Vilaró, Rey (delegito de *Barcelona Stelo*) k. a. Oni sendis saluton al D-ro. Zamenhof kaj al la migrintaj-amikoj.

La sama grupo organizis esperantan ekspozicion, kiu estis malfermata la tagojn de la ĉefa festo de la kvartalo Gracia, kaj tial ĝin vizitas centoj de ne-esperantistoj. La ekspozicio estas interesa kaj konvinka; tial ni konsilas niajn barcelonajn samideanojn, ke ili ĝin vizitu kaj akompanu tien la skeptikulojn kaj dubantojn.

— La *Esperanta Fako* de la «Centre Autonomista de Dependents del C. i de la J.» aranĝis konferencon pri Svislando kaj la urbo Berno. S-ro. Anglada faris la paroladon kaj klarigis al la ĉeestantoj la lumbildojn, kiuj unu post alia montriĝis sur la blanka tolo. Varmaj aplaŭdoj premiis la parolinton.

MARTORELL

La grupo *Martorelja Stelo* kun la helpo de *Esperanto kaj Patrujo* organizis gravan propagandon agon la 10^{an} Aŭguston.

25 samideanoj barcelonaj veturis posttagmeze al Martorell, kie aliaj 25 esperantemuloj atendis kaj ĝoje akceptis ilin. Post vizito al la romepoka ponto super la Llobregat rivero, en la sidejo de la kultura societo «El Progreso» okazis paroladoj propagandaj. Delegite de la Komitato de K. E. F. prezidis S-ro. E. Rey. S-roj. Domènech, Rocamora kaj Dalmau diris la paroladojn, kiuj bone efikis en la pli ol ducent aŭskultantoj. Ili sendube sukcesigos la kursojn de la nova grupo, kiu tiel bone komencas sian esperantistan agadon.

SANT FELIU DEL LLOBREGAT

Ankaŭ la grupo *Esperanto kaj Patrujo* aranĝis feston en tiu urbeto la 18^{an} de Julio.

60 samideanoj el Barcelono ekskursis tien. En la Kazino antaŭ elektita aŭskultantaro parolis pri kaj por Esperanto S-roj. Sadurní, Rocamora, Domènec, Dalmau kaj Campdelacreu, kiujn oni aplaŭdis entuziasme.

VIC

La 6^{an} de la pasinta Julio, niaj vikaj samideanoj organizis propagandan feston kun paroladaro, multe sukcesintan.

Konvinke parolis S-roj. Albagés (el Vic), Delfi Dalmau (el Barcelono), Toboso (el Vic) kaj Rocamora (el Barcelono).

Al tiu propagandago, kiun oni okazigis en la Urbdomo, ĉeestis Vikaj aŭtoritatuloj.

Gratulon al vikanoj!

MANLLEU

Dank'al la senĉesaj klopodoj de la senlaciaj Manlleu'aj samideanoj Esperanto sin trudas rapide en nia industria vilaĝo.

Dum la oficialaj kaj tre interesaj ekzamenoj okazintaj la 22^{an} de pasinta Julio ĉe nacia lernejo, kiun regas sperta instruistino Sinjorino Francisca Benet, la infanoj deklamis esperante kaj ĥore la nomojn de la tagoj de la semajno kaj tiujn de la monatoj de la jaro kaj kantis fine la esperantan himnon «La Espero». Poste tri kvarjaraj infaninoj tradukis nialingve la esperantaĵojn deklamatajn kaj kantatajn de siaj gekunuloj. Sinjorino Benet estis forte gratulata de ĉiuj aŭtoritatuloj kaj la geinfanoj forte aplaŭdataj de la multaj geĉeestantoj en tiu kultura festo.

Post kelkaj tagoj instruistino Sinjorino Benet, ricevis viziton de nia samideano sinjoro Campdelacreu, kiu en la nomo de la Komitato de K. E. F. gratulis sin pro la laboroj, kiujn ŝi efektivigis por la disvastigo de Esperanto.

— La 17^{an} de pasinta Aŭgusto kaj organizita de la societo *Esperantista Amikeco* okazis granda propaganda paroladaro en la provizora dancsalono starigita sur la Placo de Bernardiño. Ĝi estis prezidata de samideano sinjoro Solà kaj partoprenis en ĝi niaj fervoraj samideanoj Sinjoroj Manuel Roca, el Manlleu, Campdelacreu kaj Rocamora, el Barcelono.

Ĝia sukceso estis multe pli grava ol esperis ĝiaj organizantoj, ĉar alestis en ĝi pli ol 400 ĉeestantoj, kiuj post la konvinkaj paroladoj de la oratoroj varme diskutadis la efikon de Esperanto kaj ĝian konstantan disvolvigon. Sur la prezidejo sidadis la urbestro S-ro. Josefo Inglés, Provinca deputito S-ro. Bosc i Catarineu, juĝisto S-ro. Manuel Torrent, delegito de *Nova Harmonio* el Torelló, S-ro. F. Guitart; delegito de la esperantistoj el Sant Hipolit, S-ro. J. Fluviá, delegito el la esperantistoj el Campdevanól, S-ro. F. Guardia, Prezidanto de la grupo *Esperanta Aŭroro* el Sant Gervasi de Cassolas, S-ro. Petro Mayol kaj multaj aliaj kies nomojn nia memoro kun bedaŭro perdis.

Oficiala Parto

La 15^{an} de Junio S-ro. R. S. Rocamora prezentis sian eksigon el la ofico de Prezidanto de K. E. F. La Komitato, studinte la aferon kun aplaŭdinda prudento, prenis decidon oficialan en kunsido, kiu okazis la 27^{an} de Julio 1913^a. Ĉeestis S-roj. D-ro. Coll, Rey, Bordas, Horta kaj Campdelacreu. S-ro. Piferer delegis D-ron. Coll, ke li reprezentu lin. En reprezento de la Redakcio de K. E., ĉeestis S-ro. Grau. Estis subskribita de ĉiuj ĉeestantoj la akto, kies tekston ni donas jene:

«Ĉar la Komitato plenumis siajn egajn dezirojn rilate al la eksigo de S-ro. Rocamora kiel prezidanto de la K. E. F.; tiucele ĝi laŭ plej alta samideana kaj amika sento klopodis forigi la kaŭzojn de tiu eksigo, opiniante ke ĝi devas respekti la rajton kaj dezirojn de la eksiginta prezidanto, kiu de post la dato de sia eksigo (15^{an} de Julio 1913^a) ĝis hodiaŭ ne nuligis sian oficialan eksigan dokumenton; celante, fine, la altajn interesojn de la K. E. F., kiuj samtempe estas tiuj de Esperanto en nia lando, ĝi decidis akcepti la proprvolan eksigon de S-ro. Rocamora.

La Komitato bedaŭras, ke ĝi ne plu povas ricevi la helpon de S-ro. Rocamora, kaj juĝas kiel devon konstati ke tiu akcepto de lia eksigo neniel povas signifi decidon pri la motivoj, kiuj povas kaŭzi tiun eksigon.»

La Komitato decidis konsidere akcepti belajn proponojn prezentitajn al la K. E. F. de S-roj. Gili kaj Campdelacreu, kaj en momentoj konvenaj ilin efektiviĝi. Ankaŭ oni parolis pri la Kongreso de K. E. F. okazonta en Sant Feliu de Guixols.

— La Komitato de la K. E. F. komisiis niajn kunfederacianojn S-rojn. Dalmau, Domènech Alberich kaj Perogordo, ke ili oficiale reprezentu ĝin en la IX^a Universala Kongreso de Esperanto. — La Sekretario, *Manuel Bordas*.

Noto. — La grupoj aligintaj al K. E. F. kiuj ne estas ricevintaj cirkulieron, adresitan de la Sekretario, petantan nomojn kaj adresojn de iliaj Prezidantoj kaj Sekretarioj, faros bone sciigante tiuj tiujn nomojn kaj adresojn al la Sekretario de K. E. F. Carrer Cerdenya, 84, 3^a, Barcelona.

KORESPONDADO

Al sendintoj de cirkuleroj: Kvankam ni deziras presigi en «K. E.» la cirkulerojn, kiujn pri aferoj per-aŭ priesperantaj ni ricevas, la manko de loko malpermesas tamen al ni la plenumon de nia deziro, ĉar tiel multnombre ili alvenas al la redakcio, ke estus necesaj tri-kvar paĝoj en ĉiuj numeroj por kontentigi la petojn de la sendintoj. Ni do tion publike avertas, por ke oni ne kredis pri malbonvolo.

Kolekto de lernolibroj

Katalunaj kaj Kastilaj

Ptas.

<i>Fundamento de Esperanto</i> , L. L. Zamenhof (Eldono hispana) . . .	1'25
* <i>Gramatica rahonada de la llengua Esperanto</i> , Sro. Pujulà i Vallès. . .	2
* <i>Vocabulari Esperanto-Català</i> , Sro. Pujulà i Vallès.	3
* <i>Vocabulari Català-Esperanto</i> , » » »	3
Poŝvortareto <i>Esperanto-Català i Català-Esperanto</i> , Sroj. Dro. Bremon, Martí i Aldrich	0'75
<i>Kataluna Ŝlosilo</i>	0'05
<i>Quiere V. aprender Esperanto?</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau. . .	0'50
<i>Gramática y Vocabulario Esperanto</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau. . .	3
<i>Vocabulario Esperanto-Español</i> , Sro. F. Pujulà i Vallès	3
<i>Vocabulario Español-Esperanto</i> , » » » »	3
<i>Primeras lecciones de Esperanto de Th. Carl</i> , A. L. Villanueva. . .	0'60
<i>Manual y Ejercicios de la lengua Esperanto</i> , Inglada-Villanueva. . .	1'50
<i>Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto</i> , Inglada-Villanueva	5
<i>Curso Práctico de Esperanto</i> , Duyos-Inglada	3
* <i>Gramática de Esperanto</i> , Sro. J. Garzon Ruiz	2
<i>Prontuario de Esperanto</i> , » » »	4
<i>Programa d'Esperanto</i> , J. B. Albiñana	0'25
<i>El Esperanto al alcance de todos</i> , Fernando Soler y Valls.	3

Tiujn verkojn oni povas mendii ĉe nia administracio sendante kune la monon, plus o'25 ptojn. por la rekomenditaj poŝtelspezoj.

* Bindita 0'50 ptes. plie.

== LA REVUO ==

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado
de

DRO. L. L. ZAMENHOF

Literaturaj verkoj. Teatraĵoj. Poezioj. Informoj. Internacia vivo

Unu numero : fr. 50

Abono : por Francujo 6 fr.

Por aliaj landoj : 3 Sm. 800

Abonebla ĉe la Administracio de K. E. F., str. Gracia, 12 — SABADELL

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO

— fondita en la jaro 1909 —

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj «*Princo Serebrjani*» kies prezo por ne-abonintoj estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donace belan Esper. libron: **Orienta almanako el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p., k. t. p.** «La Ondo» aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16 — 24 paĝ. Formato 17 × 26. Bela kovrilo. Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.) Anonco en «*Koresp. Fako*» 3 respond-kuponoj La abonpagcn (2 rubl. = 2, 120 sm). oni sendu al librejo «*Esperanto*» (Moskvo, Tverskaja, 26, uslando) aŭ al aliaj Esperanto-librejoj — poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko.

Oni abonas «La Ondo» 'n ĉe la Administracio de «K. E.», str. Gracia, 12. — SABADELL

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
KATALUNUJO

Red. : Frederic Pujulà

Sek. de Red. : Josep Grau

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Rememoro, Dro. Zamenhof, Fred. Pujulà, Dro. Coll, Josep Grau. — *Konservantaro de la Floraj Ludoj*. — *Amo*, Clarence Bicknell. — *Eksterlanda Movado*. — *IX^a Universala Kongreso de Esperanto*. — *Historio de Esperanto en Katalunujo* (Gazetoj), J. Amades. — *La Folio*, Josep Ventura. — *V^a Kongreso de la K. E. F.*, Josep Grau. — *Kelkaj konsideroj pri rimoj en Esperanto*, Czeslaw Kozlowski. — *Bibliografio*, Tamen. — *Enlanda Movado*. — *Oficiala parto*. — *Korespondado*



JARO IV^a SEPTEMBRO-OKTOBRO 1913^a N^o 9-10 (42-43)

Important avís d'Administració

Recordem a tots els federats que la marxa regular de la K. E. F. únicament pot continuar-se comptant amb la bona voluntat de tots.

Havem entrat en el quart i darrer trimestre del present any, i l'Administració no ha rebut encara bon nombre de quotes, la falta de l'ingrés de les quals dificulta el compliment de les obligacions de la K. E. F.

Per tant, preguem a tots els federats de les poblacions on no hi ha delegat, i a tots els delegats que no han fet encara liquidació de les quotes rebudes, que se serveixin remetre an aquesta Administració les quantitats en metàl·lic corresponents a les mateixes.

Aquesta Administració fa la darrera crida a la bona voluntat de tots els companys de Federació creient que no serà necessari l'ús de mides de rigor, que esdevindrien perniciososes per a tots.

L'enviu de quantitats pot fer-se en segells de 5, 10 o 15 cèntims, per gir postal, etc., etc.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Red. : FREDERIC PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEP GRAU

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : *Rememoro*, Dro. Zamenhof, Fred. Pujulà, Dro. Coll, Josep Grau. — *Konservantaro de la Floraj Ludoj*. — *Amo*, Clarence Bicknell. — *Eksterlanda Movado*. — *IX^a Universala Kongreso de Esperanto*. — *Historio de Esperanto en Katalunujo* (Gazetoj), J. Amades. — *La Folio*, Josep Ventura. — *V^a Kongreso de la K. E. F.*, Josep Grau. — *Kelkaj konsideroj pri rimoj en Esperanto*, Czeslaw Kozlowski. — *Bibliografio*, Tamen. — *Enlanda Movado*. — *Oficiala Parto*. — *Korespondado*.

REMEMORO

SUPER LA TOMBO DE CARLO BOURLET

EN la germana banloko, kie mi estis, atingis min tute subite la doloriga sciigo pri la morto de tiu, pri kiu ni nun ĉiuj funebras. Ĝi trafis min tute neatendite kiel frapo de tondro. Mi rapidis veni ĉi tien, por doni al la kara foririnto mian lastan, tre malĝojan saluton. Mi tute ne havis la tempon, por min prepari, por ke mi povu prezenti al vi ĝustan bildon pri la tuta historio de agado kaj pri ĉiuj meritoj de tiu, kiun ni perdis, tial pardonu, ke mi parolos nur mallonge, ke mi ne prezentos al vi historion, sed nur esprimos iom miajn sentojn. La historion sendube

skribos pli aŭ malpli frue aliaj personoj, kaj ili certe povos rakonti tre multe.

La foririnto estis scienculo, li estis socia aganto kaj tiel plu, sed de ĉi tiuj flankoj mi persone ne konis lin multe, mi konis lin nur kiel Esperantiston; tamen tuj de la unua momento, kiam mi ekkonis lin kiel Esperantiston, li ĉiam staris antaŭ miaj okuloj kiel homo tiel grava kaj tiel meritplena, ke ĉiufoje, kiam mi pensis pri la sorto de Esperanto, pri ĝia progresado, pri ĝia batalado, pri ĝiaj esperoj por la estonteco, ĉiam sur la unua plano staris antaŭ mi la bildo de Bourlet.

Oni multe laboris por Esperanto ankaŭ antaŭ Bourlet, sed de la momento, kiam li aliĝis al nia anaro, en nian aferon enversiĝis ia nova energio. Tuj post sia apero li komencis propagandon viglan, kiu ĝis tiam ne estis multe konata en Esperantujo. Li altiris al nia afero gravan firmon, kiu al la tiam ankoraŭ malforta Esperanto donis potencon apogon kaj fortan puŝon antaŭen. Li komencis serion de publikaj paroladoj, sed tiuj paroladoj ne estis sole teoriaj, ĉiu parolado sekvigis fondadon de grupo Esperantista. En Parizo li fondis grupon, kiu per sia bonega organizo kaj vigla laborado baldaŭ fariĝis imitinda modelo por ĉiuj aliaj grupoj esperantistaj en la mondo. Al lia senlaca iniciatado, instigado kaj helpado ni ŝuldas grandan riĉiĝon de nia literaturo kaj aperon de plej gravaj verkoj pri kaj en nia lingvo, al lia iniciato kaj energia laborado ni ŝuldas la fondigon de gravaj institucioj, kiel ekzemple la Internacia Scienca Asocio kaj aliaj. Li laboris ne sole en sia lando kaj en sia urbo; por multaj lokoj, kie oni bezonis helpon, aŭ kie aperis ia danĝero por nia afero, Bourlet, la energia helpanto de nia kara Generalo Sébert, ĉiam estis preta kun sia laboro kaj helpo. Sed unu el la plej gravaj roloj de Bourlet estis ĉe niaj Kongresoj. Ĉiuj aranĝintoj de kongresoj de Esperanto scias tre bone, kiom multe Bourlet laboris por ĉiu kongreso, antaŭ ĝi, dum ĝi kaj post ĝi. En la jaro 1914 Bourlet estis aperonta antaŭ ni kiel rekta kaj senpera organizanto de la Kongreso en lia propra urbo, de la Kongreso en Parizo, jam antaŭ pli ol unu jaro li komencis plej energian preparadon de tiu Kongreso, la Kongreso promesis esti grandioza, la tuta mondo Esperantista, kostante tre bone la organizajn kapablojn de Bourlet kaj lian ekstraordinaran energion, atendis tre multe de tiu Kongreso kaj prepariĝadis veni en tre granda nombro. Sed ho ve, la senkompata morto diris sian kruelan vorton.

Mi ne volas plu paroli. Ne ĉiuj Esperantistoj scias, kiom multe nia afero ŝuldas al nia kara foririnto. Venos la tempo, kiam ĉiuj

Esperantistoj ekkomprenos, kiel gravega estis la laborado de Bourlet, kaj tiam, ho ve, tro malfrue — ili rekompencos al lia ombro tiun sendankecon, kiun li de kelkaj flankoj suferis dum li vivis.

Al la nekonsolebla edzino kaj ŝiaj gefiloj mi povas certigi, ke en la mondo de la Esperantistoj la memoro pri la kara foririnto neniam mortos.

Vi, ombro de nia kara amiko kaj kunbatalanto, akceptu mian funebran saluton kaj per mia la saluton de tiu afero, por kiu vi tiel multe kaj sindone laboris.

Parolado de D-RO L. L. ZAMENHOF

FATALO



CARLO BOURLET mortis! Por tiuj, kiuj lin konis, mi bezonas nenion plu aldoni : ne nian malĝojon, nek nian doloron, nian furiozon kontraŭ la fatalo, nian senesperon. Ni ĉiuj same sentas : kial mi analizos niajn larmojn? Por la aliaj malmultaj mi estas nekapabla diri ion ajn. Li lasas kiel amiko tro grandan malplenon en mia koro, kaj mi sentas min kvazaŭ falanta tra senfina nemateria spaco. Mia kapo turniĝas de la bato. Se mia penso nebuligita de la doloro povus dikti al mia mano, mia mano ankoraŭ varma de la sana, kora, esperoplena premo de l' mortinto, estus nekapabla konduki mian plumon.

Carlo Bourlet mortis! Mi tre malfacile alkutimiĝos al la certeco, ke tiuj tri vortoj estas esprimo de efektiva realaĵo. Mi skribas ilin perfortante mian volon... Ridinda homa volo, kiu ne povas redoni vivon, kiu ne povas perforti la fatalon, kiu nur taŭgas por sin savi de la fluo de l' senespero, kaj vivi en la mizero de l' atendo...!

Carlo Bourlet mortis! Ne nun, kiam li kaj nia doloro ankoraŭ estas varmaj, oni povos vidi kaj vidigi lian grandecon — oni vidos kiam li staros ĉe la horizonto de l' tempo, en plena majesteco, kiel la siluetoj, kiuj desegniĝas sur la kresto de monto. Li estis granda en ĉio — granda en nobleco, en laboremo, en amikeco, en sia verko. Kaj la unua ĉagreno, kiun li kaŭzis al la siaj kaj al Esperanto, estis ankaŭ granda : lia morto!

Skribinte tiujn vortojn mi ricevas la sciigon pri la morto de Pastro Austin Richardson, sincera amiko pri kies morto mi ankaŭ ne povos konsoliĝi. La bonaj, la fortaj forlasas nin! Kiom da pe-

nado en nia animo por ne fali en profundan pesimismen! Adiaŭ amikoj! Via memoro kaj via verko restas vivanta ĉe ni. Ni vin ne forgesos!

FRED. PUJULÀ

ESPERANTISTA FUNEBRO!

PER lakonaj frazoj sciigas al ni la telegrafo, ĉe unu sola semajno, du tre gravajn perdojn por la tutmonda esperantistaro. S-ro Carlo Bourlet mortis ĉe Annecy; ankaŭ Abato A. Richardson mortis apud Genevo! Ambaŭ mortoj estis preskaŭ subitaj! Ĉiuj niaj katalunaj samideanoj sendube rememoras pri la du famekonataj esperantistoj, kiujn ĵus la morto forrabis el niaj vicoj.

Pro funebra doloro mia koro ne scias nunmomente trovi vortojn kapablajn esprimi la sentojn, kiujn naskas tiu duobla vundo. Kiam infaneto serĉas senfrukte siajn ludilojn... senkonsole ploras kiam rimarkas pri ĝia neevitebla perdo. Se fraŭlineto zorge kulturas ĝardenon, kiu ĉiumatene produktas novajn parfumplenajn florojn kies bonodoron ŝi avide flaras..., kiam nokta ventego elŝiras kaj velkigas tiujn florojn, la venontan matenon antaŭ tiu perdo ŝi ankaŭ ploras... ŝi nur scias plori, eĉ ne vorton povas ŝi balbuti...

Simile okazas al mi antaŭ la realeco, ĉe la perdo de tiuj du esperantistaj floroj : Carlo Bourlet kaj Abato Richardson estis du el la plej belaj floroj de nia esperantista ĝardeno.

C. Bourlet amis nin, nian landon, nian enlandan movadon esperantistan! Tion li ja pruvis per sia tre efika kunlaborado okaze de la memorinda V^a Kongreso en Barcelono, por ni ĉiuj vere neforgesebla, precipe ĉe la zorga aranĝo de la Floraj Ludoj. Du semajnojn tiam li vivis nian katalunan vivadon, lasante ĉe ni semojn de entuziasmo kaj simpatio. De tiu tempo ameme li sekvis la katalunan esperantistan plikreskadon. Benata esperantista frukto, kiu alproksimigas homon al homo, popolon al popolo! Grava perdo estas lia morto por ĉiuj, sed aparte por ni katalunoj. Neniam la esperantista popolo forgesos la nomon de tiu eminenta samideano, kiu uzis la plej bonajn jarojn de sia vivado por la antaŭenirado de Esperanto. Katalunaj esperantistoj lernigu al viaj gefiloj, estontaj esperantistoj, la nomon de C. Bourlet!

Abato Richardson ankaŭ montris sian amon al ni! Neniam ni forgesos la tagojn, kiam ni havis la honoron konversacii kun li, kiam

Barcelono, nia ĉefurbo, gastigis la V^{an} Kongreson. Tiun amon li plue pruvis, kiam li volis ke la standardo de I. K. U. E. kiu devos prezidi ĉiujn katolikesperantajn kongresojn, estu inaŭguraciita kaj benita ĉe la perlo de niaj montoj, apud la trono de la Sankta Reĝino de Montserrat. De sia lando, dolorigita li pro malsano, ofte alsendis al ni kuraĝigajn vortojn por la daŭrigado de nia propagando de Esperanto ĉe la katalunaj katolikoj. Tiel grandan amon li sentis por nia lando, ke ĉe la Unua Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Parizo li proponis okazigi la duan en Barcelono. Bedaŭrinde ni ne estis tiam sufiĉe preparitaj. Tamen li estis sufiĉe montrinta sian amon al katalunaj samideanoj. Grandan ŝuldon de dankemo ni havas por A. Richardson. Ni ĝin pagu per preĝoj kaj per daŭriga sekvado de la imitinda vojo de lia agema vivado.

S-ro Carlo Bourlet flaris la *patrujan* senton ĉe niaj Floraj Ludoj. Abato Richardson flaris la katalunan *fidon* ĉe la piedoj de nia Reĝino de Montserrat. Ambaŭ sentis la fortan altiron de l' *amo* por Esperanto. FIDO! PATRUJO! AMO! Jen belega triflora bukedo detranĉita de la ĝardeno de Katalunlando, kiun ni metas sur la tombojn de tiuj, kiuj estis S-ro C. Bourlet kaj Abato Richardson!

Ni funebru...! ni plendu...! sed ni ne forgesu en niaj plendoj ke ni ŝuldas ankaŭ al ili la florojn de niaj preĝoj, de nia dankemo, al tiuj soldatoj de nia armeo, kiuj malgraŭ antaŭsenti nian finan sukceson ne povis ĝin vidi, kiel novaj *Moseoj*, kiuj ne povis atingi la *promesitan landon* kies celo okupis preskaŭ ilian tutan vivon.

Esperantista popolo! Kataluna esperantistaro! K. E. F.! Ni funebru!

D-RO JOAQUIM COLL

AL CARLO BOURLET

prezidinto de la III^a Floraj Ludoj de K. E. F.



IA parolo dolore singulta provas esprimi al vi, foririnta amiko, la ĉagrenon de la katalunaj samideanoj, kiujn vi kore estimis, kiujn vi frate amis.

Ni plektas por vi girlandon poezian; por vi, kiu volis briligii nian feston de Amo kaj Belo, niajn Florajn Ludojn, en la ĉefurbo de via lando. Ni plendas pri vi, kiu revis florigi ĉiujare en la Urbo Lumo la tradician Feston de l' ĝentileco, la katalunan Feston de Poezio. Ni dankas vin!

Ni dankas vin, kiel esperantistoj : al la sukceso de nia propagando, al la disvastigo de Esperanto inter niaj samlandanoj vi helpis per via tuta forto, vi kontribuis per via tuta povo. Ni dankas vin, kiel katalunoj : vi pagis nian gastamecon, la malgrandajn regalojn, kiujn ni povis al vi proponi, kiujn ja ni al vi ŝuldis, — publike laŭdante nin, amante la al ni plej karan ceremonion kaj laborante por internaciigi ĝin, kiel altan feston de spiriteco, kiel noblan elmontron de Frateco kaj Amo.

En nia koro ni gravuros vian nomon! Sopirante al vi, ni imitos vin, vian firman energion, kiam nian vojon baros malhelpoj! Plorante vin, ni kulturos la semon de vi ĵetitan, kaj en la tago de l' venko, ĉe la ĝojo de l' triumfo, ĝiaj fruktoj heligos vian gloran aŭreolon!

Sur via tombo miaj vortoj estu kvazaŭ florkrono! Super via tombo eterne sonoru mia kanto elegia!

JOSEF GRAU



Konservantaro de la Floraj Ludoj

de K. E. F.

Laŭ la Regularo de tiu institucio, kiun ni publikigis en nia lasta numero, konsistigas la Konservantaron la sekvantaj sinjoroj:

BOURLET, Carlo †; BREMÓN, Jascint; BRICARD, Raoul; CHAVET, Gabriel; CODORNIU, Antoni; COLL, Joaquim; GALCERAN, Gustau; GARGANTA, Josep M.^o; GRAU, Josep; MENIL, Fèlicien de; PUJULÁ, Frederic; ROSALS, Joan; SERDÁ, Domènec †.

Fariĝis protektaj anoj laŭ la dua regulo sinjoroj: AMADES, Joan; PIFERRER, Joan.



Amo'DEVIZO : *Sursum Corda*

Al la dezerta tero, kiun tenis
 La vintro en kareso sia forta,
 Konato libera fine venis
 Tra la mallumo kaj silento morta.
 Alvoko de la Marta vent' elspiris;
 Trumpeto ĝia sonis «Revekiĝu»!
 Li, kiu vin katenis, jam foriris;
 Kaŝita via koro reviviĝu!
 Ho, ĉio, kio dormis, nun kun Fido
 Respondu al la voĉo elĉiela;
 Sen ĝojo longe restis vi, sen rido,
 Nun vestu vin por la printempo bela!»

Silentis la invito de l' trumpeto;
 Eksonis nova ĥoro de muziko
 Proksimiĝanta, la April-pluveto,
 Pli sindonema ol konat', — amiko.
 En la radikojn la gutaro kuris;
 Kreskaĵoj ĉie el la ter' levigis;
 En ĝiaj vejnoj pluvosang' murmuris,
 Kaj la dezerta ter' ĝardeno igis.
 Pro la vivado nova ili miris,
 Ĝuante liberecon kaj aeron,
 Dum mil voĉetoj kun dankemo diris
 «La vento donis Fidon, vi Esperon.»

Sed la pluveroj ĉesis pro la gloro
 De l' Maja sun' : sur ĉiu verda zono
 Aperis brila parfumita floro,
 Juvelo el la sepkolora krono.
 Ĝi diris «Marta aŭ Aprila kanto,
 Konato aŭ amiko, bona estas,
 Sed mi vin perfektigas; nur Amanto

Per sia vivo, sia lum' vin vestas.»
 Kaj roz', lilio, kaj la mond' florara,
 Saltante kiel la ĉielo flamo,
 Ekkriis «Ho, Amato, pli, pli kara
 Oi Fido kaj Espero estas Amo.»

CLARENCE BICKNELL



Eksterlanda Movado

Ni ricevis antaŭ nelonge la gravan «Deklaracion pri Mondamikigo» de honorinda Sir Vezey Strong, ĉefurbestro de Londono en 1911, kiun presigis en sia numero de Junio nia kolego «Pola Esperantisto». Ĝia longeco malpermesas al ni ĝin publikigi, kaj ĉar en ĝi estas speciale petate pri traduko naci-lingve kaj publikigo en la enlandaj gazetoj, ni klopodos atingi de tiuj ĉi la aperigon de la altcela dokumento. Cetere, ĉiuj esperantistoj, kiujn interesas la demando, povas sin turni al ni por sciigoj, kiujn ni plej plzure donos.

INTERNACIA PILGRIMO KATOLIKA AL ROMO

Nia kara amiko Pastro Josep Planas, vicprezidinto de la K. E. F. ĉeestis en reprezento de Lia Episkopa Moŝto de Barcelono kaj de la «Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj» la IV^{an} Internacian Kongreson de la Katolikaj Esperantistoj, kiu havis lokon en Romo la 4^{an}-10^{an} de Septembro.

100 samideanoj el 12 diversaj nacioj partoprenis. La Kongreso malfermiĝis prezidate de Pastro Patrick Parker la 4^{an} de Septembro. Laboraj kunsidoj okazis la 5^{an}, 6^{an} kaj 7^{an}. En tiu ĉi lasta estis elektitaj por la oficoj de Prezidanto kaj Sekretario de I. K. U. E. Pastroj Parker kaj Bianchini. Dum la Kongreso la esperantistoj vizitis la romajn monumentojn, la bazilikojn kaj la Vatikanon, en kiu la 8^{an} Lia Papa Moŝto akceptis kaj benis la Kongresanojn, kiuj kantis esperante religian himnon akordigitan al la muziko de l'papa orkestro; kaj la 9^{an} okazis la solena fermo de l'Kongreso.

Proponite de la katalunaj katolikoj la Kongreso akceptis kiel Patroninon por la tuta katolika esperantistaro la Virgulinon de l'Espero. En Romo, kie nia afero estas malforta, la efiko de la propagando farita de l'pilgrimantoj estos certe tre granda.



IX.^a Universala Kongreso de Esperanto ¹

Bern, 24.^a - 31.^a Augusto 1913.^a

BERN, la ĉefurbo de la libera Svisujo, feste ornamigis por akcepti la esperantistojn partoprenantajn en la IX.^a Universala Kongreso de Esperanto. Verdoblankaj standardoj kaj verdaj steloj vidiĝis ĉe multaj fenestroj kaj flirtis super stratoj kaj domoj. En multaj firmoj, esperantaj surskriboj «Esperanto parolata», «Rekomendinda firma» k. s., estas legeblaj en prefera loko.

La kongresistojn atendis en la stacidomo bernaj samideanoj kaj *boy-scouts* kun esperantaj flagoj, proponante al ili siajn aŭtoblajn servojn. Antaŭ la stacidomo staris bela portiko, kiu esprimas bonvenon al la kongresanoj; ĝi impresis tre bone.

En la akceptejo malgraŭ la afiŝo «Tie ĉi ne estas babilejo» la bruo de la gajaj intersamideanaj renkontiĝoj malhelpas tre ofte la laboron de la oficistoj kiuj plenumas sian oficon. Tie la kongresanoj ricevis koverton enhavantan multe da paperaĵoj kaj la kongresinsignon; ĝi konsistas el verda rubando kun stelo kiu havas en la centro vidaĵon de Bern kun la vortoj «IX.^a Universala Kongreso de Esperanto, 1913.^a».

KUNSIDOJ DE LA KONGRESO. *Malferma kunsido.* — Je la tria posttagmeze en la granda kaj luksa ĉambro de la Kazino, amasiĝis jam la 1,200 kongresanoj kaj aliaj esperantistoj kun granda nombro da scivolaj bernanoj. Grandega aplaŭdado kaj entuziasmaj krioj salutas D-ron Zamenhof enirantan en la podion. Lin sekvas la komitatanoj kaj la naciaj delegitoj. Sonoj de *La Espero*, kiun ludas tre bele orgeninsektoro Locher kortuŝas la ĉeestantojn, kiuj kunkantas nian himnon.

Fariĝas silento kaj Generalo Sebert anstataŭ S-ro Mikolajski prezidanto de la VIII.^a malfermas la kunsidon. Laŭ lia propono la Kongreso elektas la jenan estraron: Prezidanto, S-ro J. Schmid; Vicprezidantoj, S-roj R. de Saussure kaj E. Stettler; Ĝenerala Se-

1. Raporto verkita laŭ sciigoj de la reprezentantoj de K. E. F. en la Berna Kongreso.

kretario, S-ro Gabriel Chavet. Tiu lasta legas la multajn salutojn ricevatajn el diversaj landoj kaj la liston de oficialaj delegitoj. Estas reprezentataj la ŝtatoj Aŭstrio, Costa Rica, Germanujo, Hispanlando, Svisujo kaj Usono, kaj multaj gravaj internaciaj societoj.

S-ro kolonelo Emil Frey, eksprezidanto de la Svisa Federacio kaj direktoro de la Internacia Oficejo de la Telegrafoj faras parolon en germana lingvo, kiun tradukas esperante F-ino Haberli, akceptante la esperantistojn kaj parolante pri la toleremo, kiun naskas la esperantista sento.

S-ro Kistler, reprezentanto de la kantono Bern, salutas la Kongreson kaj esprimas la plej grandan simpatian al la sukceso de Esperanto. S-ro Locher improvizas ĉe l' orgeno impresan gloson pri l' realiĝo de universala paco per Esperanto. Post la aplaŭdego kiu sekvis tiun ludadon kaj post saluto de S-ro Rollier, Rektoro Boirac prezidanto de la Esperantista Akademio rememorigas pri niaj mortintaj kunbatalintoj, D-ro Dor, de Ladevèze, Carlo Bourlet, Abato Richardson, k. t. p. Laŭ propono de S-ro Schmid la kongresanoj starigas en honoro de la mortintoj.

S-ro de Saussure faras sian solenan malferman paroladon. El ĝia interesa enhavo ni eltiras la jenon:

Lastan jaron, ĉe la 8^a universala Kongreso de Esperanto en Krakovo, D-ro Zamenhof en sia oficiala parolado faris al la Esperantistaro deklaron tute ne atenditan:

«Konsciante — li diris — ke, ĝis sia plena fortikiĝo, nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi — laŭ via deziro — dum 25 jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj Majstron. Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi tiun rolon. La nuna Kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min *antaŭ* vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.»

Kaj inter la diversaj kaŭzoj, aluditaj de D-ro Zamenhof, por klarigi sian decidon, li diris interalie:

«Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne nur libera de ĉiuj personaj *dekvetoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ 25 jaroj, sed ankaŭ de ĉiu efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciigu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *Majstron*.»

Fininte sian paroladon, D-ro Zamenhof kredis ke li povas tiam tute simple forkuri de la publika scenejo, ofenda por lia modesteco, kaj efektive li forlasis la oficialan podiumon, kie sidas kutime la kongresestraro kaj malaperis en la popolon Esperantistan. Tiel surprizitaj estis la kongresanoj, ke ili eĉ faris nenian provon, reteni perforte la Majstron sur la podiumo.

Sed nun pasis preskaŭ unu jaro, kaj pripensinte la aferon, multaj Esper-

antistoj, se ne ĉiuj, venis al la konkludo, ke, kiel ajn doloriga estas por ili la decido de nia Majstro, ĝi tamen estas decido grandanima, kaj benefikonta sur la estontecon de nia movado. D-ro Zamenhof, kvankam li ĉiam portas okulvitrojn, estas homo tute ne miopa, kaj la demandon pri lingvo internacia li juĝas de punkto tre alta kaj foren videbliganta. Li komprenas, ke la homa vivdaŭro estas tempo tre mallonga kompare kun la tempo postulita, por plene efektiviĝi la realigon de lingvo internacia. Jam dum 25 jaroj li fervore kaj senlace direktadis la movadon Esperantistan tra ĉiuj malhelpoj kaj kontraŭventoj: la infano «Esperanto» estas nun plenkreska, kaj alvenis la tempo, kiam ĝi *devas* sin disigi de la patro, por konkeri la mondon per siaj propraj fortoj. Certe tiu momento estas doloriga por la filo, kaj ankaŭ — mi kredas — por la patro; sed por ambaŭ ĝi estas esperplena matenruĝo de komencanta nova periodo.

Tamen, kvankam ni ne volas kontraŭstari al la decido de D-ro Zamenhof pro tio, ke li juĝas ĝin oportuna, utila kaj eĉ necesa por la movado Esperantista, kvankam ni ne povas malhelpi, ke li jam lastan jaron demetis sian oficialan rolon, ni almenaŭ ne volas permesi al nia Majstro, ke li forlasu sian oficon tiel nerimarkite, kvazaŭ nenio grava estus okazinta. Pro tio, kara Majstro, permesu nun al mi, esprimi al vi *oficiale* la profundan dankon, admiron kaj amsenton de la tuta Esperantistaro, ne nur por via genia verko, sed precipe ankaŭ por la nova sento, aperinta en la mondon antaŭ 25 jaroj kaj nun enkorpigita en Via modesta persono.

Resume, ĉe la sojlo de la nova periodo de nia historio, rigardante de vidpunkto kiel eble plej neŭtrala la ĉefajn instituciojn de la Esperantista movado, mi komprenas ilin jenmaniere:

(a) *Lingvaj* institucioj: «E. L. K.» (Esperantista Lingva Komitato kun ĝia Akademio) kaj sekretario en la lando de ĝia prezidanto.

(b) *Propagandaj* institucioj: «I. A. E.» (Internacia Asocio Esperantista) kaj ĝia centra oficejo en Parizo.

(c) *Aplikaj* institucioj: «U. E. A.» (Universala Esperanto Asocio) kaj ĝia centra oficejo en Genevo.

Koncerne *niajn internaciajn kongresojn*, ili estas kaj restos ĉiujara *festoj* de la Esperantista popolo; tamen dum tiu festo okazas aŭ devus okazi laborkunsidoj el du kategorioj:

(a) La oficiala parto de la Kongreso, konsistanta el la kunsidoj de la «L. K.» (por la lingvo), tiuj de «I. A. E.» (por la propagando) kaj tiuj de «U. E. A.» (por la aplikado).

(b) La neoficiala parto, konsistanta el la diversaj fakkunsidoj de «I. A. E.» aŭ de «U. E. A.» (kuracistoj, katolikoj, framasonoj, k. t. p.).

Sajnas al mi, ke la nuna Kongreso estas jam preskaŭ konforma al tiu plano, se ne teorie almenaŭ fakte. Efektive, sufiĉus anstataŭ «ĝenerala labora kunsido» skribi sur la programon: «ĝenerala labor-kunsido de I. A. E.» ĉar koncerne la laborkunsidojn de «U. E. A.», ili jam estas sur la nuna programo.

Tamen mi denove insistas pri tio, ke ĉio, kion mi diris ĉi-supre, estas nur persona opinio.

La unua periodo de la Esperantista historio forpasis; vivu la dua! Ĝi estu la decida periodo dum kiu Esperanto enradikiĝos pli forte en la tuta mondo! Vivu la IX^a Kongreso kaj vivu Zamenhof!

Parolas poste 28 naciaj delegitoj kaj tiam leviĝas G-lo Sebert kiu esprimante la admiron al D-ro Zamenhof pro lia verko, transdonas al S-ro Schmid oran medalon, kiu prezentas unuflanke la portreton de la Majstro kaj aliflanke simbolon de Esperanto; li donas ĝin al svisino nacie vestita, kiu iras ĝin prezenti al la Majstro meze de brua aplaŭdego. Samtempe alia svisino prezentas al S-ino Zamenhof bukedon el ruĝaj rozoj kun blanka kruco el edelvejsoj, blazono de la Svisa Federacio.

Fine S-ro Schmid fermas la kunsidon kaj resonas denove orgena melodio.

— La laboraj kunsidoj okazis mardon, merkredon kaj sabaton; dum ili S-ro Chavet legis la amasegon de telegramoj kaj salutleteroj, kiujn la Kongreso ricevis. S-ro Rektoro Boirac legis raporton pri la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj Generalo Sebert raportis pri la laboroj de la Administra Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj. Ili ĉiuj meritis unuaniman aprobon. Estis ankaŭ diskutate pri la kunvenoj de la Rajtigitaj Delegitoj kaj estis preskaŭ unuanime akceptata la konkludo, ke:

«La rajtigitaj delegitoj havu la rajton kunveni kaj havu la okazon voĉdoni preparajn proponojn, poste antaŭmetotajn al la voĉdono de ĝenerala kunveno».

Alia grava decido de la Kongreso sendiskute alprenita estas la jena:

1) La Kongreso aprobas la kunordigon de la nun ekzistantaj institucioj kaj publikigon de la teksto de tiu kunordigo laŭ la plano, nomita en la raporto.

2) La Kongreso denove rekomendas al la naciaj societoj, ke ili esploru la demandon pri bonvola organizo de kunlaboro de la esperantistaj societoj kaj grupoj, laŭ la projekto, montrita en la aldono II de la raporto, kaj konsiderante, ke jam kelkaj societoj kaj grupoj akceptis aliĝi al tiu projekto de kunlaboro, la Kongreso invitas la Centran Oficejon, ke ĝi organizu de nun la komencon de la efektiviĝo de komuna agado.

3) La Kongreso konstatas, ke la komisiono por ĝenerala organizaĵo finis sian taskon kaj dankas ĝin por ĝia valora laboro.

En la tria kunsido, parolinte pri la propono okazigi kongreson nur ĉiun duan jaron, oni decidis okazigi ĝin ĉiujare; por la venonta Kongreso oni elektis la urbon Parizo, kaj por la XI^a okazonta en 1915^a Edimburg'on (Skotlando).

Aliaj diskutoj pri proponoj, la konkludoj alprenitaj kaj ceteraj detaloj estos troveblaj de niaj amikoj en la Oficiala Protokolo, kiun publikigos «Oficiala Gazeto». Ni volas konigi tamen la respondo de D-ro Zamenhof al la propono de S-ro Kronenberg (Krakovo) starigi liahonore monumenton. Jen la vortoj de la Majstro: «Ni havas monumenton en nia laboro; ju pli kreskas nia movado, des pli granda fariĝas la monumento.»

FAKKUNSIDOJ. Ili estis tre grandnombraj, kaj tiel raporto pri ĉiuj estas ne publikigebla pro manko de loko. Ni diros ke la kunsidoj de la Kongreso de U. E. A. samtempe okazinta kun la IX^a Universala estis multe ĉeestataj, kaj montris bone la gravecon de tiu organizaĵo. Okazis ankaŭ kunsidoj de Internacia Scienca Asocio, de la instruistoj, de la T. E. K. A. (kuracistoj), de katolikoj, de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, de la Lingva Komitato, de ruĝkruculoj, de socialistoj, k. t. p. k. t. p.

Oni povas prave aserti, ke la Kongresoj de Esperanto distingiĝas el ĉiuj ceteraj per la granda laboro, kiun oni faras dum ili. De multaj personoj ni aŭdis tiun diron, kiu montras vere realaĵon. Ni do estu ĝojaj.

DISERVOJ. Bona aranĝo de la programo permesis al la kongresanoj ĉeesti en la diservoj hebrea, protestanta kaj katolika, kiuj okazis respektive en la Sinagogo, kie S-ro Rabeno Saphra legis elokventan predikon; en la preĝejo de la Sankta Spirito kie bone predikis pastro Rust, kaj en preĝejo Trinitatis, kie, anstataŭ la mortinta pastro Richardson, predikis pastro Lajos, el Budapest.

La mardon je la 9^a en la laste citita preĝejo okazis diservo je funebro de Abato Richardson. D-ro Zamenhof ĉeestis; pastro Lajos predikis esperante kaj S-ro Colas parolis pri la lastaj momentoj de nia eminenta samideano.

TEATRAJ PREZENTADOJ. Ili okazis la 26^{an} en la «Varietea Teatro». Oni prezentis du dramojn, nome «Patreco» de S-ino M. Wolf kaj «Ginevra» de S-ro Privat. La unuan ludis sufiĉe kontentige la laboristoj horloĝistoj, kiuj prezentis al ni impreson de sia socia vivo. La lirika dramo «Ginevra» estis ludata de la geaktoraro de la reĝa

flandra teatro de Antverpeno. Ili bonege prezentis la belan originalan verkon de S-ro Privat, kaj tiu prezentado faris unu el la plej grandaj sukcesoj de la IX^a.

MARŝADO DE LA KONGRESANOJ. Tra la bernaj stratoj dimanĉon post la malfermo de l' Kongreso, la esperantistoj marŝis al la Placo antaŭ la Palaco de la Federacio. Post la naciaj standardoj, kvarope grupiĝinte, la kongresanoj iris inter muro da personoj, simpatie rigardantaj tiun imponan pruvon de forto de la esperantista movado. Antaŭ la Kazino en kies balkonoj sidis Gesinjoroj Zamenhof la esperantistoj kantis nian himnon kaj ovaciis la Majstron.

INTERNACIA BALO. En ĝi vidiĝis multaj naciaj vestoj, kaj eĉ kelkaj karnavalaj. Oni imagos pri tiu kongresa distraĵo, vidinte similajn; ni do ne priskribas. Ni nur plendas pri la servoj (!) de la Bufedo, kiun ne ĉiu persono povis atingi; venontan kongreson, ni surmetos veston de pakajisto kolportisto aŭ similan kaj tiamaniere ni povos kaŝi ĝis la oportuna momento la frandaĵojn, kiujn la Bufedo ne povos (?) havigi.

ALIAJ AMUZOFESTOJ. Okazis diversaj koncertoj : de la urbomuzikistaro, en Innere Enge, de la berna virĥoro, de la fervojista orkestro, kaj aliaj. En la merkreda estis ĉefe rimarkinda la orgenludado de S-ro Locher, kiu regalis nin per kompozicioj de Huber, Bach kaj Mathison, por kiuj li ricevis multe da aplaŭdoj.

La fotografado de la kongresanaro ne sukcesis, ĉar ĉiu deziris esti bone videbla en la portreto kaj forgesis pri la malantaŭulo, kiu siaflanke... k. t. p., k. t. p. Do, la bildo ne estas multe interesa.

Pri la ekskurso al Interlaken, ni presigas la raporton de «Pola Esperantisto» kiu prezentas plene nian opinion; ĝi estis la al ni plej agrabla distraĵo el la Kongresoj.

Per du specialaj vagonaroj la kongresanoj veturis jaŭde al Scherzlihen kaj de tie vaporŝipe Interlaken.

En Interlaken la kongresanoj havis la okazon ĉeesti la prezentadon de «Wilhelm Tell». Ĝi estis ludata de laboristoj aktoroj germanlingve sed vere perfekte. Eĉ dekjara filo de Wilhelm ludis kiel vera artisto. Cetere por la honorkaj plezuro de la kongresanoj, du frazoj en tiu ĉi dramo estis diritaj esperante. Sed plej ĉefa en la prezentado estas sendube tio, ke ĝi estis ludata en plena scenejo. Naturaj rokoj, arboj, akvo kaj bona ludo de la aktoroj donas plenan iluzion de la vivo. Unuvorte la prezentado estis belega.

Vespere multaj kongresanoj kunvenis en «Kursaal», kie estis donita granda koncerto.

Post la koncerto estis bruligitaj artfajraĵoj. Interalie estis fajraĵo «Verda Stelo». Abundeco de raketoj faris el nokto luman tagon. La tuta ĝardeno brilis ŝanĝante kolorojn pro bengalaj fajroj.

La kongresanoj krom artefaritaj plezurajoj povis admiri belecon de Alparo, inter kiu kuŝas pitoreska urbo Interlaken. Oni admiris belecon de lagoj, estante sur la montoj kaj veturante vaporŝipe oni vidis nepriskribeble belan kaj gigantan Alparon.

ORATORA KONKURSO. Ĝi okazis la sabaton, sub prezido de S-ro Wenger. Partoprenis ok konkursantoj, kiuj lote ricevis 4 temojn, el kiuj ili devas elekti unu por pritrakti.

Komence, parolas nia amiko S-ro Dalmau pri «Kuraĝo», kaj sekvas lin gesinjoroj Pichon (franco), Van Schoor (belgo), Tropeolo (francino), Jacobs (belgo), Wight (anglino), Mahn (germano) kaj Rajczy (hungaro). Oni konstatis, malgraŭ makuletoj, kiom facile kaj flue ili ĉiuj parolas nian lingvon.

La morgaŭon F-ino Hankel, post parolado de S-ro Privat, disdonis la premiojn al la laŭreatoj en la Oratora Konkursu, Unuan ricevis S-ro René Ch. Pichon (el Parizo). Nia kamarado Dalmau ricevis la 5^{an}.

LASTAN TAGON. Okazis post la disdono de premioj de la Oratora Konkursu, ekskursu sur monton Gurten, kie oni ĝuas belegan panoranon de la Alpoj. Tie okazis la ekzercoj de Ruĝa Kruco, festeno kaj svisa festo. Aviadisto S-ro Bider flugis per sia aeroplano honore de la esperantistoj kaj akceptis insignon esperantistan kaj unu ekzempleron de «La Movado» kiujn al li donacis S-ro Houbart. La kongresanoj aklamis en lia alteriĝo la afablan aviadiston, kiu trinkis kun ili je la triumfo de Esperanto.

Jen la skiza raporto pri la bela IX^a Kongreso, kiun ni ne povas fini nedankante kapitanon Perogordo, nian komplezeman samideanon, kiu en la ferma kunsido de la Kongreso aŭdigis la voĉon de la Kataluna Esperantista Federacio, kies reprezentanto li estis, ĉe sia elokventa parolo de adiaŭo al la Kongreso.

La IX^a estis nova sukceso. Ni prepariĝu por la X^a! Vivu Esperanto!...



Historio de Esperanto en Katalunujo

KATALUNAJ ESPERANTAJ GAZETOJ

Espero de Katalunjo. — Aperis en Ceret, franca kataluna vilaĝo, en Januaro de 1905, eldonita de P. Berthelot; oficiala organo de «Aplec esperantista de Catalunya», redaktata en kataluna kaj esperanta lingvoj, aperis nur tri numeroj.

Stelo Kataluna. — Monata revuo pri scienco, arto kaj esperanta movado, aperis en Igualada en Januaro de 1908, eldonita de la grupo esperantista de tiu urbo, kaj direktata de J. Llansana, publikigis gravajn artikolojn kaj poeziojn de J. Ribera kaj Comas; redaktata katalune, kastile kaj esperante, aperis nur ses numeroj.

Tutmonda Espero. — Ĉiumonata organo de la kataluna esperantistaro eldonita de la societo «Espero Kataluna»; la unua numero aperis en Januaro de 1908; dum tiu jaro estis direktata de D-ro Xalabarder, dum 1909 de Dro. Bremón, dum 1910 de M. Cases kaj de post 1911 aperas sub ne konata direktoreco; katalune kaj esperante redaktata.

Bulteno de «Paco kaj Amo». — Eldonita de la societo de sama nomo el Barcelono, aperis nur du numeroj, la unua en aprilo de 1909 hektografita, redaktata nur en Esperanto.

Kataluna nacio. — Internacia revuo naciista, direktoro C. Zanni, katalune kaj esperante redaktata; la unua numero aperis en Aprilo de 1909, la dua numero aperis sub la nomo de

Supren! — Internacia revuo naciista, direktoro C. Zanni, aperis nur du numeroj, la unua en malgranda formato katalune kaj esperante redaktata en Majo de 1909, la dua en Septembro de la sama jaro en ĵurnala formato kaj nur en Esperanto.

Tutmonda sonorilo. — Esperanta ilustrita gazeto, direktita de M. Bordas, aperis nur du numeroj en Majo kaj Junio de 1909 respektive, hektografita, nur esperante redaktita.

Jen. — Esperanta ilustrita humora monata gazeto, aperis en Bar-

celono dum Junio de 1909 eldonita de samideano J. Farré; plum-direktoro, F. Pujulà; krajondirektoro, Apa. Aperis nur unu tuta jarkolekto.

KATALUNA ESPERANTISTO (Oficiala organo de K. E. F.), ĉe Sabadell, Januaro de 1910, direktita ĝis Junio de 1911 de D. Serdá, post tiam pro bedaŭra morto de tiu nia karega amiko, lin anstataŭis S-ro Pujulà.

Semo. — Monata gazeto eldonita de la grupo «Paco kaj Amo» ĉe Barcelono, de Januaro ĝis Julio de 1910; direktoro, E. Brunet, redaktata nur en Esperanto.

Fulmo. — Duonmonata gazeto dediĉita al la gesamgrupanoj, eldonita de la grupo «Barcelono», direktoro, F. Sabaté; aperis en Aŭgusto de 1910, hektografita, redaktata nur esperante, aperis malmultaj numeroj, mi ne scias kiom da ili.

Kataluna Katoliko. — Ĉiumonata organo de la Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj, direktoro, J. Coll; la unua numero aperis en Aprilo de 1912; redaktata katalune, kastile kaj esperante.

Bulteno de «Barcelona Stelo». — Oficiala organo de la grupo de sama nomo, senpaga aldono al K. E.; direktoro, J. Grau, aperis en Junio de 1912 redaktata nur esperante.

Juneco. — Organo de la grupo «Esperanta junularo», direktoro ne konata, en Terrassa en septembro de 1912, hektografita, katalune kaj esperante redaktata, mi ne scias ĉu ankoraŭ aperas.

Grafologia revuo. — Intermita esperanta gazeto por vulgarigo de la grafologio; direktoro, J. A.; aperis ĝis nun nur unu numero en januaro de 1913, redaktata nur esperante.

J. AMADES



La Folio'DEVIZO : *Aŭtuna impresio*

De branĉo de arbo ĝi pendis
 en tempo aŭtuna;
 malĝoja fariĝis kaj plendis
 en tiu altaĵo, al vento
 rapide fluganta
 kaj frosta iĝanta.

Ĝi diris : — Ho bela printempo!
 al via dolĉ-viv' mi sopiras,
 mi sentas en la nuna tempo
 ke l' morto sendube min tiras.

Kaj tamen dezir' mia estas
 nur vivi, sed vivon liberan,
 mi sklava de l' branĉo nun restas
 kaj vivas nur vivon mizeran.

Mi volas flugadi ja sola
 tra kampoj, tra montoj sencele,
 mi volas en iro laŭvola
 printempon renkonti tre bele.

Kaj ĝui sen ia sklaveco
 la vivon de ĝojo senfina,
 ke larĝa fariĝu l' soleco
 dum mia flugado obstina.

Ho vento, min plu ne karesu,
 forportu min post fort-detranĉo
 al lok' malproksima, ke ĉesu
 mi vivi pendanta de l' branĉo.

La vento ĝin aŭdis zumante,
 deŝiris ĝin blov' senkompata,
 foli' malfeliĉa rajdante
 ekiris de l' vent' forportata.

Sed tuje, de l' arb', forigita
folio, kadavro fariĝis
kaj flugis al vento lasita,
ĝis marĉon atingis, eniĝis.

De branĉo de arbo ĝi pendis
en tempo aŭtuna;
libera ĝi flugi pretendis
sed mortis, kaj ĝiajn restaĵojn
marĉ-akvoj brilantaj,
nun estas gardantaj...

JOSEP VENTURA FREIXAS



V^a Kongreso de la K. E. F.

LA plenumon de l' decido alprenita de la Kongreso en Olot rilata al la starigo de la Organiza Komitato malhelpis kelkaj malfacilaĵoj, kiujn la Komitato de K. E. F. fine solvis.

En kunsido, kiu okazis en St. Feliu de Guixols sub la prezido de D-ro Coll, la federacianoj enurbaj elektis S-rojn Presas kaj Vilaret por la oficoj de Prezidanto kaj Vicprezidanto de la O. K.

S-ro Vilaret prezentis sian eksigon kaj en dua kunsido prezidita de sinjoro Presas estis elektita, anstataŭe de la eksiginto, S-ro Rourich.

Jen la nomaro de la membroj de la definitiva organiza komitato de nia V^a:

Prezidanto, S-ro Emili Presas; *Vicprezidanto*, S-ro Vicens Rourich; *Sekretario*, S-ro C. Blanch Vendrell; *Vicsekretario*, S-ro Josep Soler; *Financisto*, S-ro Rossendo Reixach; *Voĉdonantoj*, S-roj Víctor Lluís, Martí Reixincós Félix Jofre, kaj Feliu Bossot.

Tiuj nomoj estas garantio de la sukceso, kiun certe atingos la proksima kataluna Kongreso, kiu okazos la 31^{an} de Majo kaj 1^{an} de Junio de l' 1914^a, en St. Feliu de Guixols.

Pluajn informojn ni donos en venontaj numeroj al niaj kunfederacianoj.

JOSEP GRAU

Kelkaj konsideroj pri rimoj en Esperanto ¹

En la Decembra numero de KATALUNA ESPERANTISTO aperis mallonga (kaj mallaŭda) recenzo pri mia versaĵaro *Petaloj*. Oni ne kredu, ke mi skribas tiujn liniojn por justigi min de la riproĉoj de Tamen. Mia juĝo pri miaj versaĵoj ne tiom diferencas de la lia, por ke mi eĉ devu fari pro ĝi tian netaktajn, kiel defendi propran verkon. Simple, Tamen mallaŭdas mian versaĵaron tial ke ĝiajn rimojn li konsideras malbonaj. La kondamno estis eldirita ĝentile; ĝi min do ne ofendis. La riproĉo ne estis sensenca; do ĝi min pensigis. Kaj mi decidis diri al la Esperantistoj kelkajn vortojn pri la konsideroj, venintaj en mian cerbujon pri la *Rimoj en esperanto*.

En sia recenzeto Tamen diras, ke rimoj kiel *pala* kaj *najtingalon*, *korto* kaj *morta* k. t. p. ofendas lian *latinan* oreilon. Ĉu efektive la orelo de Tamen estis ofendita de tiaj rimoj pro tio, aŭ nur pro tio, — ke ĝi estas latina? Mi ne kredas. Mi ne kredas pro kelkaj kaŭzoj: Unue. Al S-roj Noel kaj Verito, kies oreloj estas ne malpli latinaj ol tiuj de Tamen, *Petaloj* plaĉis: la dua eĉ alskribas al mi «perfektan konon de rimaj leĝoj.» Same, multaj «latinaj» esperantistoj tre ŝatas la versaĵojn de Deŝkin, kvankam en ili la radikaj rimoj svarmas same kiel ĉe mi. Due. S-ro Privat, kiu tamen estas *latino*, ĉu ne?, rimigas *koroj* kun *ankoraŭ*, *vizaĝon* kun *ruĝigaĝon*, *muzikon* kun *mistikan*, *lulante* kun *brilanta*, k. t. p. Trie. S-ro Citterdijk, recenzante, en «*Holanda Pioniro*», nomas miajn versaĵojn «senrimaj strofoj». Tio signifas, ke li ne nur konsideras la radikajn rimojn malbonaj, kiel Tamen, sed eĉ tute ne konsideras ilin rimoj. Kaj li ja ne estas *latino*. Simile pri S-ro. Schulhof kiu, estante ĉeĥo, plene evitas la suprenomitajn rimojn, kaj Elski, kiu kvankam polo, malkonsilis al mi en privataj leteroj ilian uzadon.

Mi do pensas ke la aprobo aŭ malaprobo de iaj rimoj en Esperanto ĝis nun plene dependas de individua gusto. Sed ĉu povas ekzisti iu iom pli certa bazo? *That is the question.*

Francoj rimigas tiajn vortojn, kiel ekzemple, (de Musset): *ennui*, *lui*; *foi*, *moi*; *celà*, *holdà*; *bruni*, *Amaĝui*; kiuj ŝajnus bonegaj al poloj kaj malbonegaj al rusoj. Aliflanke, tiuj lastaj uzas rimojn kiel: *obyjetsnalaj*, *zapozdalyj*; *zlaja*, *znaju*, k. s., kiuj al francoj kaj poloj ŝajnus sovaĝaj.

1. Ni publikigas kun tre granda plezuro ĉi tiun artikolon, kiun nia konita samideano S-ro Kozlowski havis la afablecon sendi al ni, kies klarigoj estas tiel ĝustaj laŭ nia opinio, ke ni, kiuj deziras ne trudi nian apartan vidmanieron sed kontribui al la perfektigo de nia literaturo, ne hezitus subskribi ilin.

Ni esperas tamen, ke ni ne bezonos pruvi, ke kiam ni diris, ke tiuj rimoj ofendas nian latinan oreilon, ni tute ne intencas aplombe paroli pri supereco de nia raso. Ni simple konstatis fakton, kiun S-ro Kozlowski tre lerte senvalorigas. Nia firma esperantisteco estas garantio de nia sincereco kaj de la respekto, kun kiu ni rigardas ĉiujn homon kaj genton. — TAMEN.

Ĉu do inter la rimreguloj de l'diversaj Eŭropaj lingvoj kuŝas grandega diferenco? Mi ne pensas. Jen, laŭ mi, la ĝenerala regulo:

Por ke du vortoj perfekte rimu, ili devas esti tute identaj, komencante de la akcentita vokalo kaj ĝis la fino.

Diversaj lingvoj faras diversajn limigojn aŭ plivastigojn.

La pola, ne havanta vortojn lastsilabe akcentatajn, kaj tial povanta atingi verajn rimojn nur pere de unusilabaj vortoj, sekvas por tiuj lastaj la ĝeneralan regulon, tiel do permesante ke ĉe ili estu identa nur la lasta (akcentata) vokalo. Do *zna, twa; co, stori*, rimas.

La rusa, en kiu tiasisteme rimus ne multe malpli ol duono de l'vortaro, volas ke estu identa ankaŭ la antaŭiranta konsonanto.

La Esperanta trezoro de perfektaj rimoj estas poëtmortige malriĉa. Se mi finas verson per *bubo* estu certa, ke mi tuj ekkantos pri *ĉubo* aŭ *inkubo*. Se mi skribis *ankro*, ĉesu legi, ĉar vi riskas renkonti *kankron* aŭ ankoraŭ malpli poezian vorton. En unu Esperanta ĵurnalo (*Nova Sento*, se mi ne eraras), mi legis nekrologian versaĵon, en kiu oni nomis la ĵus mortintan samideanon, pro rimo al *vundo*, *Dia Hundol!* Kial ne *pentekosta lundo*?

Mi do kredas, ke kelkan liberecon ne estus malutile doni al Esperantaj poetoj. Sed kiajn? Por tion decidi, oni devas scii, entute kiaj liberecoj estas eblaj.

Ekpensinte tion (en Aŭgusto 1912), mi prenis la kvin originalajn Esperantajn versaĵarojn, kiujn mi tiam konis nome: *Elŝki* kaj *Eska*: «Unuaj agordoj», *Schulhof*: «Per espero al despero» kaj «Kion la vivo alportis», *Deŝkin*: «Versaĵoj», *Kozłowski*: «Petaloj», kaj mi atente esploris ilin. Jen kion mi trovis. En ili ekzistas rimoj:

I. Perfektaj.

II. Korelativaj. Tiel mi nomas rimojn kiel: kiam, tiam, ĉiam; iel, tiel...; mia, cia, lia, ŝia, k. t. p.

III. Radikaj. Ĉe kiuj rimas la radikoj, sed ne la finaĵoj. Nome tiujn malaprobas Tamen.

IV. Sufiksaj. Ekzemple: koreto, vangeto, homaro, arbaro, k. t. p.

V. Nerimoj. Ekzemple: vizagon, ruĝigaĵon (Privat), tomo, plumbo (Kozłowski).

La unuaj estas eblaj en Esperanto preskaŭ ekskluzive en la okazo, se la rimantaj vortoj estas en sama parolparto kaj kazo, nombro, aŭ modo, tempo. Tial, permesi nur ilin, estus eble mortigi Esperantan versfaradon. Sed ne estas eble dubi ke ili estas la plej rekomendindaj.

Pri la duaj, mi opinias, ke ilia uzado estas allasebla, sed en tre negranda procento. Alie la verso estas tro maleganta.

Pri la rimoj radikaj, ilin evidente aprobas Grabowski, Privat, Deŝkin kaj multaj aliaj Esperantistoj, inter kiuj via humila servanto. Tamen oni ne preterpasu mezuron. Oni ne imitu min, skribante tiajn sovaĝaĵojn, kiel ekzemple la rimarkitan de Tamen *pala-najtingalon*. Mi opinias, ke oni devas kontentigi per ne identeco de unu sola litero.

De la sufiksaj rimoj mi, persone estas konvinkita malamiko. Ili ŝajnas al

mi supro de neeleganteco. Oni kredeble nur ridus pri tiaj «rimoj»: *homo-homo*; aŭ: *malgranda-malgranda*. Kiel do oni povas aprobi *bonulo-belulo*, aŭ *beleta-gajeta* kiuj ankaŭ estas simpla ripeto de la sama vorto («ulo» aŭ «eta»)?

Pri la nerimoj... Al ili mankas nur unu eco por esti perfektaj: ili inter si tute ne rimas. Mi do ne konsilas al Esperantistoj poetoj kunigi *tombon* kun *plumbo* (kiel, *mea culpa*, mi mem faris) aŭ *siajn verkojn* kun *presejo* (kiel, *mea maxima culpa*, mi ankaŭ faris mem.)

Por fini, mi volas doni malgrandan statistik-tabelon pri la rimoj en la kelkaj de mi esploritaj versajaroj (la ciferoj de l'procentoj estas proksimumaj). Ĉu iu ne daŭrigus mian esploron?

	ELSKI	ESKA	SCHULOF	DEŜKIN	KOZLOWSKI
Entute.....	241	203	249	176	188
Sufiksaj.....	24 (10 %)	16 (8 %)	14 (6'5 %)	8 (5 %)	5 (3 %)
Korelativaj....	9 (4 ¹ / ₃ %)	15 (8 %)	1 (1/3 %)	12 (8 %)	— (%)
Radikaj.....	2 (2/3 %)	2 (1 %)	— (0 %)	10 (7 %)	38 (20 %)
Nerimoj.....	11 (5 %) ¹	1 (1/3 %) ²	2 (1 %) ³	5 (3 %) ⁴	2 (1 %) ⁵
Do, perfektaj...	80 %	82'5 %	92 %	77 %	76 %

1. Nia-nia (p. 9), mi-mi (28), parolojn-korojn (62), river-ci (66), ni-mi (68), mallonge-longe (69), amo-reamo (75), nokto-nokto (89), rondiras-iras (89), malĝojo-ĝojo (69).

2. Atendis-eksentis.

3. Aĝo-mokataĵo, vilaĝon-novajon.

4. Kant-regoland, fonto-ondo, malluma-luma, malproksimen-kien, ĝoj-malĝoj.

5. Tombo-plumbo, feino-animo.

Per tio videbliĝas ke plej bone la afero staras ĉe Schulhof, plej malbona ĉe via humila servisto,

CZESLAW KOZLOWSKI



Samideanoj!

Ni ricevis la unuajn numerojn de nova *ĉiutaga* gazeto «Telegramo», kiu aperas en Ŝumen, Bulgarujo. Ĝi estas tre malgranda nuntempe, sed se la nombro de aĉetantoj aŭ abonantoj kreskas preter 150 (malplejmulto necesa por subteni la gazeton) ĝia Redakcio duobligos, tri-, kvar-, eĉ okobligos la nombron da paĝoj sen plialtigo de l' prezo.

Ĉiu numero kostas 2 spesdekojn (5 cent.) kaj estas havebla ĉe la Deleĝito de K. E. F. en Barcelono, S-ro. Joan Rosals, Portaferriça, 30, Librejo, al kiu povas sin turni la esperantistoj dezirantaj aboni la novan ĵurnalon.

Al kolego «Telegramo» la Redakcio de K. E. esprimas siajn bondezirojn pri sukceso.

BIBLIOGRAFIO

ESPERANTA POŝ-BIBLIOTEKO

La Premiito, novelo originale verkita en Esperanto, de Herschell S. Hall. (Cleveland, Ameriko). 1913. — Prezo 5 kop. (Sm. 0,05).

Tva la loko ensorĉita, novelo originale verkita en Esperanto de J. Ŝirjaev (Ivan Malfeliĉulo). 1913. — Prezo 5 kop. (Sm. 0,05). Librejo «Esperanto» Moskvo (Ruslando.) Lubjanskij proezd, 3.

Ambaŭ rakontoj jam aperis en la numeroj 46-47 de *La Ondo de Esperanto*, 1913. *La Premiito* — unua kajero de tiu nova malkara poŝbiblioteko, apartenas al romantika subjekta skolo kiu evidente havas ankoraŭ diletantojn. Ili estas pravaj. La ĉefverkoj troviĝas en ĉiu skolo. Iel, S-ro Hall ŝajnas al mi plej akuta humoristo. Tiu ministro, kiu lernas Esperanton ĉar li devas iri Germanlandon, Franclandon kaj Usonon por studi meĥanikon; tiu patrino, kiu lernas kun la filo pro patrineco; ili estas jam iom suspektaj. Sed la ideo de la filo sendi literaturajon al Konkurso de Kongreso por havigi al si monon por la vojaĝo, plene apartenas al la satiro. Ĉar la ministro mortas, ĉar la patrino mem fariĝas literaturistino, verkas la romanon, sendas ĝin al la Konkurso, kaj ĉar la verko estas premiita, ni rajtas supozi ke la tuto estas serco. Serco cetere verkita per tre bona Esperanto.

Per bona lingvo ankaŭ estas verkita la rakonto de Pastro Ŝirjaev, kies enhavo estas tre interesa.

OĈOHBHOŜ kaj cetero en rusaj preslitteroj¹. Librejo «Esperanto», 3, Lubjanskij proezd. Moskvo. Ruslando.

Ĉi tiujn lastajn vortojn, la nomon de S-ro Ŝaharov ĉar ĝi estas klarigita per stampo, kaj tiun de nia lingvo, ni nur komprenis.

En la entenaĵo troviĝas kelkaj vortoj esperantaj, ĉe kiuj mia vido alvenas kiel en ombroplenan oazon. Kelkaj desegnaĵoj, tre lertaj kaj spritaj igas min kredi ke ĉi tio estas lernolibro.

Ĉu ĝi ne povus esti broŝuro por pruvi ke Esperanto estas sensencaĵo kaj la Esperantistoj, sensenculoj? La nomoj de la librejo kaj de la aŭtoro trankviligas min. Tial mi povas rekomendi la libron al la rusoj, kiuj legas KATALUNAN ESPERANTISTON (1), kaj esti certa ke ili dankos min sekvinte mian konsilon ĝin aĉeti.

Pri Esperanto. Diskutado pri kelkaj ŝanĝoj de Ido proponitaj. Camille Aymonier. Agregaciulo de l'Franca Universitato. El Franca lingvo, kun la permeso de l'aŭtoro esperantigis René Ferter. — Paris. Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, 51. 1913. — Prezo : 0. fr. 75.

Pri verko kaj aŭtoro ni parolis, post apero de la franca eldono; la legantoj trovos tiun nian opinion en num. 32 de l'KATALUNA ESPERAN-

1. Kiujn la presejo ne havas.

tisto, paĝo 525. Ni ne povas laŭdi ĉi tie nian amikon S-ro René Ferter, kiun la Kataluna Federacio delegis por Krakovo kiel reprezentanton. Ni simple konstatu, ke li tradukis per flua korekta lingvo, pruvante profundan konon de Esperanto.

Tacoma. Propaganda broŝuro de tiu urbo, kun Esperanta aldono. — Published by Tacoma Commercial Club and Chamber of Commerce. Tacoma, Washington.

Bela kolorita broŝuro el granda formato, kiu bone propagandos por tiu urbo kaj helpas al la pruvo de la disvastiĝo de Esperanto en la Mondo. Ni ŝuldas la tradukon al S-ro Lehman Wendell, la konata aŭtoro de «Sub la Meznokta Suno» kaj «La lasta Usonano», ĉi tiu lasta jam recenzita en KATALUNA ESPERANTISTO.

Niaj legantoj, kiuj volas havigi al si la broŝuron aŭ dezirus informojn pri la urbo, skribu en Esperanto al la jena adreso: «Esperanto. — Commercial Club. — Tacoma. (Wash.) U. S. A.»

Esperanta Nomenklaturō de Kemio kaj Vortaro de Kemio, kompletigita kaj korektita eliraĵo el *Scienca Revuo*, 1912, (Internacia Scienca Asocio Esperantista. Scienca kaj Teknika Komisiono.) — Eldonejo: Internacia Scienca Asocio Esperantista, 51, rue de Clichy, 51, Paris, 1913. Prezo: 0 fr. 50 (0 Sm. 200).

Se mi estus sciencisto kaj oni komisius min verki teknikan vortaron, mi estus pli inklina al la logikeco ol al la internacieco, kaj anstataŭ enkonduki vortojn, kiel *emergĝi*, *refrakti*, *difuzi*, *dispersi*, *konverĝi*, *diverĝi*, k. t. p. — kiujn, se ili estas internaciaj, jam ni rajtas uzi laŭ la 15.^a regulo de la Fundamento, kaj ili nur bezonas esti fiksitaj. — mi klopodus fiksi la sencon de radikoj kiel *merĝi*, *frakti*, *fuzi*, *persi*, *verĝi*, kiuj per afiksoj *kun* kaj *dis* donus la deziritajn vortojn, kaj helpus per sia simpleco al la disvastiĝo de la scienco inter la popolo.

Ju pli la homaro progresas, des pli la vulgara lingvo pligrandigas prenante materialon de la teknika. Ni devas esperi ke iam ambaŭ lingvoj konsistigos la solan lingvon parolatan de la popolo. Tiam oni sin demandos mirigite, kial ni devas diri *kunveni*, *disiri*, kaj kial *konverĝi* kaj *diverĝi*, ĉar pro la instruado oni ne konsideros pli fizika la iradon de radioj ol la de aliaj korpoj.

Ĉar mi ne estas sciencisto, mi devos lerni la sencon de ĉiu aparta vorto. Sed eble se mi estus tia, mi ne komprenus la sencon de *kunverĝi*, *disverĝi*, *kunfuzi*, *disfuzi*, kiuj unuavide ŝajnas tre riĉigi la lingvon, sed kiuj kredeble estas herezioj, kvankam tiuj *dis* neniam konfuziĝus kun la prefikso *di* akceptita anstataŭ *bi*.

TAMEN



ENLANDA MOVADO

Nia estimata amiko kaj inda prezidinto de K. E. F. D-ro Bremon i Masgrau, lingvakomitatano, edziĝis kun la ĉarma kaj distinginda F-no Carme Juglà. Ni tre kore deziras al la nova paro plej grandan feliĉon.

BARCELONA

Delfi Dalmau, nia bona kamarado, la energia kaj senlaca propagandisto de nia afero, forlasis nin, transloĝante en Amerikon la 15^{an} de Septembro. La lastajn tagojn de sia restado inter ni, reveninte de la Berna Kongreso, li dediĉis plene al Esperanto, farante efikajn paroladojn, per kiuj li samtempe adiaŭis de siaj multnombraj amikoj. En la Ateneo de Valencio la 6^{an} de Aŭgusto kaj la 21^{an} de Septembro, en *Paco kaj Amo*, de Barcelono, la 11^{an}; en Tarragono, la 17^{an} de Septembro; en Figueres, la 6^{an}; en *Asociació de la Dependencia Mercantil* (Barcelono) la 13^{an}; kaj en *Lumon* (Terrassa), la 14^{an}, li parolis propagande pri Esperanto kaj ricevis kun la aplaŭdoj entuziasmaj vekitaj de lia elokventa parolo, la esprimojn del' bedaŭro de la samideanoj, kiuj estimis lin tre kore kaj amike.

La barcelonaj esperantistoj volis adiaŭi lin solene kaj iel rekompenci liajn grandajn klopodojn per intima festeno, kiu okazis ĉe restoracio Moritz, la 14^{an} de Septembro. Malgraŭ ke ĝi estis preparita nur antaŭ du tagoj, dudeko da gesamideanoj ĝin ĉeestis, kiuj reprezentis preskaŭ ĉiujn esperantistajn grupojn barcelonajn.

La tostojn, senceremonie, frate faritajn, komencis S-ro Bordas, sekretario de K. E. F., kiu dediĉis la feston al S-ro Dalmau kiel dankan pruvon de estimo al la batalanto, kiu foriros. Legis ankaŭ leteron de *Ĉiam Antaŭen*, kiu elmontras la sentojn de simpatio kaj bedaŭro de ties gesamideanoj. S-ro Grau deziras al S-ro Dalmau, ke lia propagando en Sudameriko atingu brilan sukceson, diras ke la amiko vidas malgajnon en lia foriro sed la samideano konscias ke la fruktoj de lia agado en la transmara lando kompensas la ĉagrenon de l'disigo, kaj aludas S-ron Gili, ankaŭ vojaĝontan kelkatempe en Ameriko pro komercaferoj, al kiu li etendas la bondezirojn montritajn al Dalmau.

S-ro Gili dankas, kaj deziras al S-ro Dalmau en la nomo de la *Esperanta Fako* de la Aŭtonomia Centro de Komizoj, kies profesoro iam estis la regalato, progresojn kaj profitojn; S-ro Horta, de *Semo*, kortuŝite, senvorte ĉirkaŭprenas la forironton, kaj S-ro Rey de «*B. S.*», en la nomo de la grupo esprimas al ĝia *perdota* grupano korajn bondezirojn. Samajn sentojn tradukis per trafaj vortoj S-roj Bausells, de *Paco kaj Amo*; Mayol, de *Esperanta Aŭroro*; Blanch, de *Esperanto kaj Patrujo*; Amades, Bellver, delegito de U. E. A., kaj F-ino Rey.

S-ro Dalmau emocie parolas. Dankas por ĉio kaj aludas la konstantecon de du kamaradoj, S-roj Pujulá kaj Piferrer, kies fervoron li ĉiam memoris kaj imitis. Diras ke en la nova lando, kien li veturos, Esperanto, kiu super ni ĉiuj

lumas, bruligos lian koron, kiun kuraĝigis la sinceraj vortoj ĵus diritaj. Kaj premas la manojn de ĉiuj, bedaŭrante ke la manko de tempo ne permesas al li adiaŭi ĉiujn amikojn.

S-ro Bordas, sekretario de K. E. F., resumas kaj la kunmanĝintoj disiras kortuŝitaj de la simpla, sed sincere frata adiaŭo.

S-ro Dalmau petis nin, ke ni senkulpigu lin al la multaj samideanoj, kiujn li ne havis tempon adiaŭi.

Niaflanke, ni, kiuj ne povas kutimiĝi al la penso ke li ne plu kunlaboras apud ni, deziras al li ĉiuspecajn triumfojn kaj esperas, ke en la X^a Kongreso en Parizo ni havos la grandan ĝojon lin ĉirkaŭpreni. — K. E.

— En sia nova sidejo, strato Poblet, 25, okazigis la malnova kaj fervora grupo *Ĉiam Antaŭen* tre agrablan feston, kiun ĉeestis grandnombra personaro, la 28^a de Septembro. Ĝi komenciĝis je la 4^a posttagmeze, kiam sur la estrado eksidis la ĝentilaj fraŭlinoj Josepa Badia, María Lain kaj Genoveva Soler, grupaninoj de *Ĉ. A.*, kaj S-roj Joan Campdelacreu, subsekretario de l'Komitato de K. E. F., Lleonard Renom, Ramón Soler kaj Josep Buyé, de la Komitato de *Ĉ. A.* kaj Josep Grau, de «K. E.».

S-ro Renóm, prezidanto, malfermis la feston per elokventaj vortoj kaj cedis la prezidan lokon al S-ro Campdelacreu, delegito de K. E. F. por tiu Festo, kiu dankis por la honoro. S-ro Buyé, sekretario, legis la ricevitajn aliĝojn kaj donis la parolon al S-ro Soler, kiu legis koncizan historion pri la movado esperantista en la barcelona kvartalo Clot evidente montrantan la konstantan kaj fruktoportan agadon de la grupo.

Gefratoj Eulalia kaj J. M.^a Soler ludis plane kaj flute muzikan komponicion, kiu gajnis al ili multajn aplaŭdojn. Fraŭlino Badia legis bone la katalunan poezion de Maragall «La vaca cega» kaj ĝian esperantan tradukon «La blinda bovino» faritan de S-ro Inglada. La belan versaĵon «Kanto» de Seleznet kun agraba muziko de nia samideano Suñer kantis la rimarkinda baritono S-ro Batlle, kiu kantis ankaŭ bukedon de katalunaj popoloj kantoj. Ĉe la piano akompanis lin S-ro Margenats.

Post mallonga paŭzo S-ro Buyé legis originalan disertacion pri «Zamenhof kaj Esperanto» premiitan per fortaj aplaŭdoj. Plane fino. E. Soler ludis «Réve d'un ange» kaj finoj. Genoveva Soler kaj María Lain recitis respektive la poezion «Versaĵo pri Amo» de S-ro Bicknell kaj «La Simbolo de l'Amo», de S-ino. María Hankel. Ili aŭdis multajn meritajn aplaŭdojn. Melodion de S-ro Suñer verkitan al «Mi amis vin» de Naumann, kantis sopranino Mercé Freixas, kiu devis ripeti ĝin laŭ peto de l'Esperantistoj. Fine, S-ro Campdelacreu eldiris paroladon katalunlingve dankante ĉiujn partoprenintojn kaj invitante la ĉeestantojn al la studo de nia lingvo. Post aplaŭdado, la festo estis finita per kanto de *La Espero*.

Ĉiuj ĉeestantoj vizitis poste la sidejon de la grupo kaj deziris al ĝiaj geanoj sukceson en la propagando, kiun tiel vigle ili faras en tiu laborista kvartalo.

— La kurson, kiu kiel ĉiujare, klarigas en la Universitato D-ro Joaquim Coll estas tre granda sukceso. La ĉeestantoj estas multnombraj; 50 gelnantoj kunsidas ĉiumerkrede kaj vendrede por lerni nian lingvon.

— Aligis al K. E. F. nova grupo fondita de S-ro Artur Casas en la kvartalo La Salud. *Esperanta Stelo* venas plifortigi niajn vicojn; saluton al ĝil!

— Nova grupo ankaŭ eniris en la Federacion, *Esperantanaro Fajro*. La unua decido, kiun alprenis ĝia Komitato, estas tia. Bonvenoni!

— La grupo *La Rondo* disdonis foliojn per kiuj ĝi sciigas al la personoj dezirantaj viziti Parizon la okazigon de la X^a Universala Kongreso en tiu urbo; la grupo zorgos pri ĉiusemajna monkolekto, kiu facile ebligos al ĝiaj membroj fari tiun vojaĝon kaj malfermis kurson por la neesperantistoj, kiuj dezirus ĉeesti la X^{an}. Por malfermi tiun kurson, la 8^{an} de Oktobro S-ro Rómulo S. Rocamora faris paroladon pri «Imperiosa necessitat d'un idioma internacional».

— En la grupo *Paco kaj Amo* okazis du paroladoj faritaj de la germanaj samideanoj S-ro R. Schwartz, el Metz, kaj Conrad Berghänel, el Dresden. La lasta el tiuj paroladoj okazinta la 18^{an} de Septembro sciigis nin pri la progresado de nia afero en Germanujo kaj pri la helpo, kiu jam nun donas Esperanto en vojaĝo.

La sama grupo akompanis S-ron R. Schwartz dum nokta ekskurso al niaj najbaraj montoj. Ambaŭ paroladintoj ricevis gratulojn kaj aplaŭdojn de la ĉeestantoj.

— Reaperis en la ĉiutaga ĵurnalo «La Publicidad» Esperanta Fako sub la direkto de S-ro Rómulo S. Rocamora. Ĝi aperos la unuan kaj trian merkredon de ĉiu monato; nian saluton al la nova Fako.

— La esperantista grupo *Aŭroro* organizis ekskurson al la barcelonaj montoj la 5^{an} de Oktobro, kiu plene sukcesis. Oni faris belajn fotografadojn.

— Por solenigi la malfermon de la kurso, kiu okazas ĉiulunde, merkrede kaj vendrede, S-ro Rómulo S. Rocamora faris paroladon en la Grupo *Esperanto kaj Patrujo* la 3^{an} de Oktobro. La kurso estas elementa kaj havas lokon de la 9^a ĝis la 10^a en la nova sidejo : strato St. Simplicí, 6.

REUS

Esperantista Kunveno. — La 19^{an} de Oktobro okazis en tiu urbo grava kunveno de la esperantistoj de la Tarragona provinco, organizita de la grupo *Nova Semo*. Afable invititaj de la Organiza Komitato ĉeestis en la kunveno reprezentanto de K. E.

Kune kun kelkaj aliaj barcelonaj samideanoj, ni foriris matene de Barcelono; sur la vojo al Reus ni renkontis grandan nombron da Vendrell'aj esperantistoj kaj gaje interbabilante ni alvenis al la stacidomo de Reus. Tie nin atendis nia kora amiko S-ro Baró el la Organiza Komitato.

Senhalte, ĉar kiel kutime la vagonaro prokrastiĝis, ni nin direktis al la bela teatro de la «Centre de Lectura», kie la ceteraj membroj de la Komitato rapide faris la lastajn preparojn. Ni profitas la momenton salutante la reŭsajn samideanojn, niajn tarragonajn amikojn, la enurbajn samideanojn, k. c.

Post malgranda tempo S-ro Enric Aguadé malfermas la kunvenon; en la prezidejo staras la standardoj de *Nova Semo* kaj *Tarragono Esperanta*.

La prezidanto legas belan esperantan paroladon; li pritraktas nian ling-

von laŭ la literatura vidpunkto kaj rimarkas la helpon, kiun ĝi povas doni al la lingvoj de la malgrandaj nacioj; li atentigas nin pri la nombro ĉiam kreskanta de esperantistaj verkoj, kaj finas kuragiĝante la esperantistojn por alveni al la oficialigo de Esperanto kaj ĝia plena triumfo.

La sekretariino F-ino Teresa Estela legas la liston de reprezentantoj kaj aliĝintoj. Ĉeestas S-ro Josep Grau en reprezento de KATALUNA ESPERANTISTO, organo de K. E. F.; S-ro Estanislao Pellicer, de *Barcelona Stelo*; S-ro Rómul S. Rocamora, de *Fajro*, kaj la Esperanta Fako de «La Publicidad»; S-ro Joan Urgellés, de la *Esperantista Klubo* de Palma de Mallorca; S-ro Joan Martorell, de *Frateco*, Vendrell; S-ro Doménec Obiol, de *Tarragono Esperanta*; S-ro Josep Molas, de *Nova Tarragono* (fondata grupo), kaj S-ro Joan Amades, de *Semo*, Barcelono kaj de la *Instituto de l'Esperanta Gazetaro*. Estas aliĝintaj al la Kunveno: *La Rizamantoj*, kataluna grupo Esperantista, Parizo; *Laboro kaj Kulturo*, Calafell; S-ro Josep Doménec el Girona kaj aliaj enprovincaj samideanoj.

S-ro Lluís Alabart legas sian paroladon en kataluna lingvo pri la «Ĉefaj elementoj por la disvastigo de Esperanto»; li trafe proponas la kreon de komisiono por sendi cirkuleron kaj slojlojn k. c. al la instruistoj kaj pastroj de ĉiu vilaĝo, vizitante poste ilin por instrui al ili la fonetikon de nia lingvo; li klarigas kelkajn detalojn kaj la ĉeestantoj premias lian laboron per longa aplaŭdo.

La Grupo *Tarragono Esperanta* proponas «Projekton por starigi provincan Esperantistan Ligon». S-ro Obiols donas interesajn detalojn pri la nuna situacio de la movado en la provinco. Ĝi estas en tre bona stato kaj pro tio li opinias konvena la kreon de provinca Ligo. S-ro Vidal legas la provizoran regularon.

S-ro Joan Moles ankaŭ faras paroladon pri la sama temo kaj opinias simile kiel S-ro Obiols. Tre interesa diskuto okazas poste pri aferoj rilatantaj al tiu temo; en tiu interparolado partoprenas S-roj Pellicer, Pallejá, Grau, Martorell, Aguadé k. c., fine estas decidate unuanime ke oni disdonu tiun regularon al la enprovincaj grupoj por definitiva aprobo kun la necesaj ŝanĝoj, en kunsido de la rajtigataj delegitoj.

S-ro Josep Vidal legas sian paroladon katalune pri la «Necese disvastigi Esperanton en nia regiono kaj praktikaj manieroj tion fari». Li estas tre aplaŭdata.

Nia redaktoro sekretario, S-ro Josep Grau, faras esperantan paroladon pri la «Nuntempa neceso plifortigi la grandajn esperantistajn organizaĵojn». Li, diris ke la kreo de nova Ligo ne devas izoli la tarragonajn esperantistojn kiuj, tial ke per ĝi ili havos pli grandan forton, povos plimulte helpi la taskon de a K. E. F.

Li proponas al la prezidanto de *Nova Semo*, ke li siavice prezentu al la kunveno de rajtigataj delegitoj la jenajn ŝanĝojn al la regularo de la fondata Ligo.

«La provinca tarragona Ligo decidis aliĝi al la *Kataluna Esperantista Federacio*».

«La oficiala organo de la Ligo estos KATALUNA ESPERANTISTO aŭ Bul-teno, kiu aperos kiel suplemento de la organo de K. E. F.»

«La Ligo ne organizos apartan kongreson, la jarojn kiam la K. E. F. okazigos la sian en la tarragona provinco.»

La ĉeestantaro akceptas kun simpatio tiujn modifojn kaj brue aplaŭdas la parolinton,

S-ro Daniel Roig paroladas katalune pri «Esperanto antaŭ aliaj idealoj» kaj ricevas longan aplaŭdon de la kunvenintoj.

En foresto de la aŭtoro, Pastro Josep Pamies, S-ro R. Pallejà legas lian paroladon «Esperanto kaj la katolikaj esperantistoj» kiun la ĉeestantoj multe aplaŭdis.

Post kelkaj vortoj de S-roj Rocamora, Pellicer kaj Pallejà, la Prezidanto fermis la kunsidon. Ni esperas ke ĝi estos fruktodona kaj ke la venontaj agoj de la tarragonaj samideanoj estos tiel sukcesaj kiel tiu ĉi.

Universala Ekspozicio de esperantaj poŝtkartoj. — Fininte la kunsidon, kaj afable invitataj de la reŭsaj samideanoj ni iris viziti tiun ekspozicion. Ĝi estas tre bele aranĝita en unu el la salonoj de la «Centre de Lectura».

En honora loko ni vidas kelkajn poŝtkartojn de D-ro Zamenhof kaj en la muroj, apartigitaj laŭ nacioj, estas kelkaj miloj da ilustritaj kartoj kiuj montras ke en ĉiu angulo de la mondo oni povas renkonti esperantistojn. Meritas specialan atenton grava kolekto de S-ro Joan Amades prezentanta tipojn el ĉiuj landoj kaj popoloj. Ankaŭ atentigas la vizitantojn la rondirantaj poŝtkartoj kaj granda nombro de esperantistaj ĵurnaloj. Niajn laŭdojn al la aranĝintoj. — E. P.

FIGUERES

En la «Casino Menestral» okazis granda propaganda festo la 6^{an} de Septembro.

La parolantoj estis S-ro Santaló, urbestro de Figueres; S-ro Díaz, prezidanto de la «Casino Menestral»; la nuna delegito de K. E. F. en Ameriko, S-ro Delfí Dalmau kaj la profesoro de Santa Coloma de Farnés, S-ro Pere Costa.

La ĉeestantoj estis en granda nombro kaj la festo, sukceso por la organizantoj.

VALENCIA

S-ro Delfí Dalmau faris belan paroladon la 21^{an} de Septembro en la «Círculo de Bellas Artes» de tiu urbo.

Li komencis parolante pri la influoj de la diversaj projektoj de internacia lingvo en Esperanton kaj klarigis la metodon, kiun sekvis D-ro Zamenhof por la kreo de la esperantaj gramatiko kaj vortaro, kaj la genian elpenson de nia sufiksaro.

Prezentinte la politikajn kaŭzojn, kiuj malpermesas alpreni ian ajn naturan lingvon kiel internacian, decido jam alprenita de la Kongreso de Inter-

naciaj Asocioj en Bruselo, li fine montris, ke Esperanto ne estas miksaĵo sed elekto el la plej bonaj elementoj de ĉiu natura lingvo kaj ke ĝi estas la sola solvo de la problemo pri internacia lingvo, ĉar ĝi estas la antaŭefektiviĝo de la lingva evoluado.

S-ro Dalmau estis tre gratulita kaj aplaŭdita.

VILANOVA I GELTRÚ

Laboro Esperanta solenigis la malfermon de kursoj per agrabla festo, kin okazis en la salono de la Ateneo la 7^{an} de Oktobro. Grandnombra ĉeestantaro aplaŭdis multe ĉiujn partoprenintojn.

S-ro Escofet legis bone la originalon katalunan kaj esperantan tradukon de «La Sembra» de I. Iglesias, kaj F-ino Eulalia Rosell en elokventa parolo komentariis la tradukon al Esperanto de fragmento de «L'Atlántida», aperinta en la libro de S-ro Grabowski «El Parnaso de popoloj». La muzikaĵoj luditaj de F-inoj Lafuente kaj S-roj Segalés kaj Escofet meritis grandajn aplaŭdojn, kiujn ankaŭ ricevis la lernantoj de la muzika kurso, kiuj sub direkto de S-ro Ojeda ludis tre bone.

S-ro Josep Grau parolis, fine, pri «Esperanto kaj logiko»; li faris konvinkan pledon por nia ideo, metode malvolvitan.

BANYOLES

La 16^{an} de Aŭgusto en la vasta salono de la societo «Foment de Cultura», organize de *Esperanta Amikaro*, S-ro Delfi Dalmau faris paroladon, kiun ĉeestis la tuta klerularo de Banyoles. Li ricevis varmajn aplaŭdojn por lia efika laboro.

PALAMÓS

Kelkaj novaj samideanoj ĵus starigis en tiu urbo grupon kun la nomo *Ĉiam Antaŭen*, kiu aliĝis tuj al la Federacio; sidejo de la grupo estas la «Centro Económico» kaj ĝia komitato konsistas el la jenaj sinjoroj: *Prezidanto*, Rafel Albiol; *Vicprezidanto*, Enric Cantero; *Sekretario*, Recared Gaudol; *Vicsekretario*, Raimond Torrent; *Kasisto*, Francisco Vidal; *Membroj*, Esteve Roura, Joan Barceló kaj Josep Niell.

Al la nova grupo nian plej koran saluton.

SANT FELIU DE GUIXOLS

Kun bona sukceso okazis du paroladoj priesperantaj, en la du lastaj monatoj. La unuan faris S-ro R. S. Rocamora en la salono de kunsidoj de la Urbestro, sub prezido de lia Moŝto la Urbestro, pri la temoj: «Absoluta neceso enkonduki internacian lingvon. La socia forto de Esperanto.» La duan pri «Esperanto kaj la naturaj lingvoj.» faris en la kinematografejo «Cineorama», la provizora prezidanto de K. E. F., D-ro Joaquim Coll.

Grandnombra ĉeestantaro, en kiu certe enradikiĝis la semoj esperantaj, plenigis la salonojn, kie la propagandoj okazis. La ĵurnaloj enurbaj longe raportis pri ili kaj konstatis, ke la publiko de St. Feliu favore akceptos la esperantistojn okaze de la V^a Kongreso de la K. E. F., kies preparon inaŭguris la cititaj paroladoj.

TARRAGONA

La 17^{an} de Aŭgusto, nia kara amiko S-ro Delfi Dalmau faris paroladon en la sidejo de la «Centro Industrial».

Antaŭ la parolado li estis regalita de la Direkta Komitato de *Tarragona Esperanta*, per intima festeno en la hotelo *de l'Centre*. Je la antaŭfiksita horo la ĉeestantaro estis multenombra en la granda salono kie la parolado okazis. S-ro Huecas, el «*T. E.*» prezentis la paroladonton. S-ro Dalmau parolis pri la genio de D-ro Zamenhof; li prezentis Esperanton kiel definitivan solvon de internacia lingvo, rezultato de la evolucio de lingvoj artefaritaj; per granda nombro da ekzemploj li montris, ke nia lingvo estas pli facila ol ĝiaj konkurantoj kaj tamen ĝi estas pli perfekta. La parolanto kontraŭstaris la argumentojn, per kiuj la lingvaj profesoroj atakas Esperanton kaj fine li montris per klaraj pruvoj la neceson, kiun ĉiu havas pri la lernado de Esperanto.



POR ESPERANTISMO EN BAHÍA BLANCA

Krom parolada kaj Esperantokursa propagandoj, mi volas organizadi Esperantistan Ekspozicion. Por tio mi petas ĉiujn gazetojn bonvolu sendi ekzemplerojn de sia lasta numero al mia adreso. Mi esperas, ke ĉiuj gazetoj bonvolos montri pruvon de la propra ekzistado por propra propagando kaj por helpi nian movadon, kiu estas ankoraŭ infano en Bahía Blanca, de kie ĝi disvastiĝos en ĉiujn urbojn Argentinandajn. Por sama celo mi ankaŭ petas ĉiujn gesamideanojn bonvole sendi al mi ĉiajn esperantaĵojn.

Ĉiujn antaŭdankante, mi restas servema samideano,

Delfi Dalmau

Bahía Blanca (Argentina Respubliko), str. 19 de Mayo, 141.

(Ĉiuj gazetoj estas petataj represi)



Oficiala Parto

La 20^{an} de Aŭgusto okazis nova kunsido de la Komitato de K. E. F. kiu prenis la jenajn decidojn:

Sciigi al Sinjorino Bourlet la ĉagrenon, kiun sentas tiu ĉi Komitato kaj la K. E. F. pro la morto de nia tre estimata amiko kaj helpanto S-ro Carlo Bourlet.

Preni energian decidon pri la konduto de l'Komitato en la aferoj rilatantaj la V^{an} Kongreson.

Gratuli kaj danki la instruistino Francisca Benet, el Manlleu, por la laboroj por Esperanto, kiujn ŝi faras en la lernejo kies direktistino ŝi estas.

Pri dokumento adresita al la K. E. F. de U. E. A. kiu petas interkonsenton, inter la naciaj societoj kaj tiu ĉi institucio, oni decidis, ĉar la afero estas inda je plej bona atento, ne diskuti ankoraŭ pri ĝi kaj studi la petojn de l'dokumentito citita.

— La 22^{an} de Septembro de 1913^a denove kunvenis la Komitato de K. E. F. ĉe D-ro Coll. Ĉeestis S-roj Rey, Coll, Campdelacreu, Horta kaj Bordas. Oni prenis la jenajn decidojn.

La Sekretario skribos al ĉiu federaciano el Sant Feliu de Guixols invitante ilin ĉeesti kunvenon prezidotan de la provizora prezidanto de K. E. F. kiu en la nomo de tiu ĉi Komitato aranĝos la aferojn en tiu urbo.

Sendi delegiton al festo de la Grupo *Ĉiam Antaŭen*.

Nomi S-ron Dalmau, reprezentanto de la K. E. F. en Amerikaj Landoj.

La Sekretario, Manuel Bordas.



AVIZO

Administraciaj kaj redakciaj malhelpoj, de privata karaktero kelkaj el ili, prokrastis ĝis nun la publikigon de ĉi tiu numero. Ni tion sciigas al niaj kunfederacianoj ne dubante, ke ili indulgos nin.

K. E.



KORESPONDADO

S-ro S. Esvertit, Vendrell. — La cirkuleron, kiun vi sendis, ni ne povas pro manko de loko publikigi. Ĉu vi volos mem private komplezi la peton per ĝi faritan?

Ja ha sortit i s'ha posat a la venda la segona edició del

Curs Pràctic d'Esperanto

d'en FRED. PUJULÀ

CONTÉ L'EXPLICACIÓ DE LES SETZE REGLES DEL
DR. ZAMENHOF, TEMES, VERSIONS, TEXTOS I UN
VOCABULARI DE MÉS DE 800 MOTS

Preu del volum : 50 cèntims

Rebaixa de preus per als grups que'n facin comandes
d'almenys 10 exemplars

GLUMARKOJ

PROPAGANDAJ!

BELAJ!

Estas vendataj po unu centimo ĉiu marko je folioj de 50 ekzempleroj.

Por la grupoj mendantaj pli ol milon da markoj estas farata rabato de 25 %.

Sendu la monon per poŝtmarkoj aŭ poŝta ĝiro al sidejo de la K. E. F., strato Gracia, 12 : Sabadell.

Ni rekomendas la abonon al

X^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN PARIS 1914

LA MOVADO

(L'ESPÉRANTISTE FRANÇAIS)

Oficiala Organo de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto

Publikigas informojn pri la organizado de la X^a Kongreso, la Pariza vivado kaj aliaj plej interesaj aferoj.

Aperinte, en la daŭro de kvin jaroj, laŭvice sur 4, 8, 12, 16, 20 kaj nune 24 paĝoj (granda formato : 25 × 33) kun *ilustraĵoj* **La Movado** estas la plej granda el ĉiuj esperantistaj gazetoj, laŭ la vidpunkto materiala, kaj unu el la ĉefaj plej interesaj laŭ la vidpunkto morala.

Ĉiuj gesamideanoj, precipe la estontaj gekongresanoj, devas do legi ĝin.

Jara abono : Francujo : fr. 2'50

Alilando : fr. 3'25 (Sm. 1,300)

Sendo de la lasta numero kontraŭ unu internacia respondkupono.

61, Boulevard St-Marcel, Paris 13^e

Abonebla ĉe la Administracio de K. E. F. : Gracia, 12. Sabadell

≡ KATALUNA ≡ ESPERANTISTO

MONATA GAZETO * OFICIALA ORGANO

DE LA



REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. - SABADELL
KATALUNUJO

Red. : Frederic Pujulà
Sek. de Red. : Josep Grau

SENPAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO:

Pro..., Josep Grau. — *Deka Universala Kongreso de Esperanto* (Cirkulero 2^a). — *Floraj Ludoj*. — *Esperanta Racionala Grup'igo*, J. Grau. — *Tra Germanujo*, Fred. Pujulà. — *La Kata-Luna Lingvo*, Clarence Bicknell. — *Oi post antaŭ*. — *Ĉapelo de Vik'a Pastra Studento*, Josep Albagès. — *Necesa klarigo*. — *Kvielo (el Horacio)*, Josep Rosselló. — *VI^a Literatura Konkurso*. — *Bibliografio*, Tamen. — *Atlando Movado*, E. P. — *Enlanda Movado*. — *Oficiala Parto*. — *Korespondado*. — *Tabelo de enhavo*. — *Atvoko al la IV^{aj} Floraj Ludoj*



Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al la «Kataluna Esperantista Federacio»

Badalona Stelo	Badalona
Barcelona Stelo	Barcelona
Casino del Comercio	Terrassa
Ĉiam Antaŭen	Barcelona
Ĉiam Antaŭen	Palamós
Escola Universitaria	Barcelona
Esperanta Akvofalo	Ripollet
Esperanta Amikaro	Banyoles
Esperanta Aŭroro	Barcelona
Esperanta Fako (secció del C. A. de D. del C. i la I.)	»
Esperanta Frateco	»
Esperanta Idealo	Santa Coloma de Farnés
Esperanta Juneco	Barcelona
Esperanta Nesto	Barbarà del Vallès
Esperanta Racionala Grupo	Barcelona
Esperanta Semo	Sabadell
Esperanta Stelo	Barcelona
Esperantista Amikeco	Manlleu
Esperantista Grupo	Mataró
Esperantista Junularo	Terrassa
Esperanto kaj Patrujo	Barcelona
Evolucio	»
Fajro	»
Forigu Barojn	»
Frateca Kunigo	Reus
Frateco	S. Feliu de Guixols
Frateco	Vendrell
Ĝeronprovinca Esperantista Ligo	Girona
Ĝerona Espero	»
Herda Espero	Lleida
Instituto por la disvastigado de l'esperanta gazetaro	Barcelona
Kamparo	S ^a Perpetua de la Moguda
Kulturo	Barcelona
Laboro Esperanta	Vilanova i Geltrú
Laboro kaj Kulturo	Calafell
La Rondo	Barcelona
Lumon	Terrassa
Malestraro (U. F. N. R. Dte. II)	Barcelona
Monta Grupeto	Sant Llorenç Savall
Montsanta Stelo	Ulldemolins
Novan Vojon	Barcelona
Nova Semo	Reus
Nova Harmonio	Torelló
Olot Stelo	Olot
Pacaj Batalantoj	Castellar del Vallès
Paco kaj Amo	Palafrugell
Semo (Ateneo E. P.)	Barcelona
Semo	Buenos Aires
Supren!	Barcelona
Tarragono Esperanta	Tarragona
Unió Catalanista	Barcelona
Universala Frateco	»
Verda Stelo	Flix
Vika Esperantistaro	Vic
Vojantaŭen	Mollet

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Red. : FREDERIC PUJULÀ
Sek. de Red. : JOSEP GRAU

— NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO » —

ENHAVO : *Pro...*, Josep Grau. — *Deka Universala Kongreso de Esperanto* (Cirkulero 2^a). — *Floraj Ludoj*. — *Esperanta Racionala Grup'igo*, J. Grau. — *Tra Germanujo*, Fred. Pujulà. — *La Kata-Luna Lingvo*, Clarence Bicknell. — *Ol post antaŭ*. — *Ĉapelo de Vik'a Paŝtra Studento*, Josep Albanés. — *Necesa klarigo*. — *Kvieto (el Horacio)*, Josep Rosselló. — *VI^a Literatura Konkurso*. — *Bibliografio*, Tamen. — *Atilanda Movado*, E. P. — *Enlanda Movado*. — *Oficiala Parto*. — *Korespondado*. — *Tabelo de enhavo*. — *Alvoko al la IV^{aj} Floraj Ludoj*.

Pro...

MANKO DE «PRI...»



A legantoj certe miros, ke ni ne povas aperigi la artikolon «Pri...» kiun de post sia redaktoriĝo verkis kutime por ĉiu numero de KATALUNA ESPERANTISTO S-ro Pujulà.

Sed vojaĝo tra Germanujo okupis lin plene post lia somera ripozado apud Parizo, kaj estas kaŭzo, ke li ne povis plenumi sian deziron doni mem al vi la interesajn novaĵojn pri la X^a Universala Kongreso de Esperanto, kiujn mi laŭ liaj sciigoj priskribos iomete.

Mi pensas tamen, ke la federacianoj ne kulpigos por tiu mallaboro nian pioniron, ĉar li kompensas ĝin abunde per la raporto ekaperantaj sur niaj paĝoj pri siaj vizitoj al la samideanoj de la germanaj urboj, kiujn li traveturis.

Ĉiuj esperantistoj, almenaŭ niaj enlandaj kamaradoj, prave pensas pri la Kongreso Pariza, kiel pri apoteozo de nia movado, kaj la deziro ĝin partopreni estas tiel ĝenerala, ke ni scias pri kelkaj grupoj kaj izolaj samideanoj, kiuj jam komencis ŝparadi por kolekti la monon necesan por la vojaĝo kaj restado en la Kongresurbo de nia X^a. Ni tial supozas, ke la iberaj esperantistoj amase ĉeestos, kaj ni plifirmigas nian supozon, ĉar la aranĝoj, pri kiuj ni parolos, certe kontribuos fari atingebla la partoprenon en la festoj kaj plezuroj, tiel forte dezirataj de multaj amikoj, kiuj pli ŝatas ilin ol la taskojn kaj laborojn de la kongresaj kunsidoj.

Studata plano por ekonomiaj elspezoj, kiun ni maturigos kaj prezentos por kontentigo de neriĉaj poŝoj, certe stimulos multajn, kies kongresemo estas bedaŭrinde pli granda ol ilia monhavo. Ili do komencu siajn ŝparojn, kaj atendu nian proponon, kiu espereble estos bone adekvata al ilia povo. Krom tio, nia Direktoro konsentis kun la Organiza Komitato de la X^a pri diversaj faciligoj, kiujn en venontaj numeroj ni detale publikigos, rilatantaj la aliĝojn al la Kongreso kaj la enloĝigon, en komfortaj kaj oportunaj hoteloj, de la kongresanoj nialandaj, kaj siaflanke la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO, preta volonte labori por ĉiuj esperantistoj de nialanda flanko de l' Pirineoj entreprenos interkonsente kun la Pariza Komitato la organizon de karavanoj, kiuj veturos per specialaj vagonaroj, deirontaj de Irún kaj Portbou, kaj zorgos pri ĉiuj helpaĵoj, kiujn estos eble prezenti al la esperantistoj de la Iberaj landoj.

Nia esperantisteco, aparte de ĉiu alia sento, devigas nin penadi laŭ eble por ĉeesti en la grandioza manifestado esperantista, kies graveco, ni esperas por la bono de nia afero, estos tiel evidenta ke ĝi estos kvazaŭ efika kaj fruktoporta apoteozo de nia lingvo, kiu atingos tiam grandegan triumfon, se ni ĉiuj partoprenas kaj helpas al ĝi.

La donitaj sciigoj, malgrandaj sed ne malgravaj, sendube plaĉos al ĉiuj niaj legantoj, kiuj de nun povas turni al ni siajn konsultojn pri ĉiuj aferoj rilataj al la X^a Kongreso de Esperanto, kiujn kun la plej granda plezuro ni respondos.

JOSEP GRAU



Deka Universala Kongreso de Esperanto¹

París, 2-10 Aŭgusto 1914. Cirkulero 2^a 2 — Por ke la «Deka» bone sukcesu, estas nepre necese, ke la Organiza Komitato sciigu, kiel eble plej baldaŭ, pri la nombro de la Kongresanoj.

Pro tio, tuj konigu vian aliĝon al la Komitato de Kataluna Esperantista Federacio.

Kune sendu vian kotizon per poŝtmandato, ĉeko aŭ transpagilo.

ATENTU! Ĝis la 1^a de Junio 1914, tiu kotizo estas 15 frankoj (10 frankoj por familianoj : edzino kaj infanoj).

Post la 1 de Junio de 1914, tiu kotizo estos 25 frankoj (20 frankoj por familianoj).

Eĉ se vi ne estas certa, ke vi povos veni al la Kongreso, tamen tuj aliĝu, ĉar se vi ne ĉestos, oni repagos al vi vian antaŭpagitan kotizon, deprenante nur unu frankon por oficejaj elspezoj. Sufiĉos, ke vi tion petos, sendante vian provizoran karton, antaŭ la 1 de Aŭgusto 1914.

Sekve, nenion riskante, vi ricevos grandan profiton, se vi aliĝos kiel eble plej baldaŭ, ĉar la tiu monatan Kongresan Gazeton, ĉiuj kongresano (escepte la familianoj) ricevos senpage nur de post la tago de sia aliĝo.

La unua numero aperos la 1 de Januaro 1914, kaj ĝin ricevos nur la Kongresanoj kies aliĝojn ni estos ricevintaj antaŭ la 31 de Decembro 1913. Ĉar ni presigos precize la sufiĉan nombron da ekzempleroj, al Kongresano kies aliĝon ni ricevos ekzemple en Marto, ni sendos la Kongresan Gazeton nur de la 1 de Aprilo.

RIMARKO! Se vi havas presitan aliĝilon, uzu ĝin por sendi vian aliĝon; tio estas preferinda, sed ne necesa.

La Komitato de la Deka.



Floraj Ludoj

Kiel suplemento al tiu ĉi numero publikigās la ALVOKO al la IV^a) Floraj Ludoj de nia K. E. F., kiu certe atingos tiel grandan sukceson, kiel la antaŭaj.

La Komitato de la Floraj Ludoj havas la projekton okazigi ilin, dum la Kongreso en Sant Feliu de Guixols, sub pinarbaro apud gol-

1. En tiu ĉi numero oni trovos aliĝilon kun la specialaj kondiĉoj por Iberoĵ.

2. La cirkulero 1 traktis pri la Garantia Kapitalo kaj estas sendita nur al francaj samideanoj.

feto ĉarma, kie la bruo de l' lazura maro, tie etendanta sur la bordo tapiŝon el ŝaŭmo, kvazaŭ glosos la harmoniajn strofojn de la poetoj, kiuj sendube partoprenos en nia konkurso per siaj inspiritaj verkoj. Tamen, tio ĉi estas nur projekto, kvankam plene efektivebla.

— La Novembra numero de «La Revuo» publikigas la verkon de NEDERLANDANO kun devizo *P. A. de Genestet*, kiu ricevis la unuan premion de «La Revuo» en la III^a Floraj Ludoj de nia Federacio. Sub tiu pseŭdonimo prezentis la verkon Sro. D. J. Broekhuizem el Hago.

— La Januara numero enhavas la verkon «La Patro de l' Usona Literaturo» de S-ro Herbert M. Scott, kiun oni kronis per la dua premio en tiuj samaj Floraj Ludoj.



Esperanta Racionala Grup'igo

DE LA NOMOJ DE KATALUNAJ
GRUPOJ ALIĜINTAJ AL K. E. F.¹

Esperanta Aŭroro helis ĉe la horizonto, kiam la *Steloj* (*Verda, Esperanta, Badalona, Olota, Montsanta, Barcelona*) malaperis el la ĉielo. Ĝian Lumon rigardis *Vika Esperantistaro*, sopirante *Novan Vojon* al la *Esperanta Idealo*; el *La Rondo* de tiu *Esperantista Junularo, Antaŭen* marŝanta, aŭdigis voĉo inspirita de *Esperanta Amo*, kiu parolis tiel al la *Esperanta Amikaro*, en *Frateca Kunigo* atendanta la *Nova'n Semo'n*:

Supren, Pacaj Batalantoj jam elirintaj de la *Esperanta Nesto!* La *Evolucio* de la *Kulturo*, al kiu vi dediĉis vian *Esperanta'n Juneco'n*, fruktigis la *Semo'n* de vi jetitan. Via *Laboro Esperanta* sur la *Kamparo* vidigas jam la *Universala'n Frateco'n*, kiu regos en *Esperanto kaj en Patrujo*. Per *Laboro kaj Kulturo Forigu la barojn* de la *Monta Grupeto*, kies *Espero'j* (*Ilerda, Ĝerona*) forvelkis, ĉar vera *Esperantista Amikeco* ne restis en ĝi. *Paco kaj Amo* estu via devizo! *Frateco* konduku vin *Ĉiam Antaŭen! Konstante Frapante*, kreskigu la *Esperanta'n Fako'n*, ĝis kiam la *Esperanta Akvoŝalo* estos estinginta la *Fajro'n* kaj helpos al la florado de la *Esperanta Semo* en la *Tarragono Esperanta* kiu gastigis la II^a Kongreson de la *Kataluna Esperantista Federacio!*

JOSEF GRAU, el *Kataluna Esperantisto*

1. Vidu 2^{an} paĝon de la kovrilo.

Tra Germanujo

I

SE miaj karaj germanaj samideanoj rimarkas, ke mankas al ili tre utilaj vortoj el la germana leksikono, mi amike kaj sincere devas nun konfesi, ke mi elspezis la tutan provizon dum mia lasta vojaĝo tra Germanujo, en la malmultaj momentoj, tre malmultaj, kiam mi restis sola sen ilia afabla helpo. Mi ja konsumis tiom da *ja, ne* (kvazaŭ Berlino!) *so, schon, wohl, geben Sie mir* kaj *ober*¹ ke mi ne dubas, mi elĉerpis ĉiujn. Sed mi ankaŭ eksperimentis ilin, kaj certe, se tempo kaj humoro helpas, mi verkos plenan gramatikon por fremduloj trafrontantaj tra Germanujo, per kiu mi montros, kiel per tiuj vortoj kaj iom da Esperanto, oni povas tre bone vojaĝi kaj komprenigi sin. Tio povas ŝajni stranga, iel trograndida aserto de sudulo, sed nenio estas pli ĝusta kaj pli vera.

Ni rimarku unue la filozofian kaj praktikan gravecon de la esprimo *geben Sie mir*, akso de la homa agitado, mil fojojn pli utila ol la malutila por individuo «mi donas al vi!» Kiam oni scias diri tiun frazon kun aplombo, oni devas nur aldoni la necesajn radikojn en Esperanto, kompreneble sen finiĝoj, la radikojn nur, iom murmure, konfuzige. Vi povas esti certa ke vi ricevos ion; eble ne la deziritan aferon, sed ion vi ja ricevos. Se ekzemple en kafejo vi diras: «*Geben Sie mir* hel' bier'» oni nepre prezentos al vi la refreŝigan bongustan germanan trinkaĵon. Se vi diras: «*Geben sie mir* kaf'» vi ricevos kafon. Se vi deziras kukon kaj vi petas post la Germanaj vortoj *kuk'*, vi ricevos ilin. Se vi deziras lakton kaj vi petas *lakt'*, eble vi ricevos peklakvon aŭ pecon de salmo, sed ĉiuokaze vi povas esti certa, ke vi ne ricevos meblon nek veturilon, sed manĝeblan aŭ trinkeblan aferon — kaj dum vojaĝo oni ne devas esti tro precizema. Cetere, imagu ke per via lasta peto oni komprenis, ke vi deziras *laken* kaj oni alportas al vi drapon aŭ tolon, tio ja helpas al pitoreska priskribo de via vojaĝo, kaj vi povos diri aŭ eĉ verki «kia stranga popolo la germana estas, imagu al vi ke en la kafejoj... k. t. p.» cetere la plimulto de priskribintoj de vojaĝoj agis tiel. Vi kontribuos al la malsprita antaŭjuĝo pri la diferenco de popoloj, sed vi ne estos sola, vi nur estos unu plii!

1. Sekvante la konsilon de nia bedaŭrata Carlo Bourlet, mi neniam vokis la kelnerinon *oberin!*

La ĉefa afero estas havi aplombon, diri viajn vortojn kvazaŭ vi konus la refaldojn de la lingvo pli bone ol Goethe mem, kaj tute ne klopodi kompreni tion, kion oni diros, respondos aŭ demandas. Se via alparolato ne ekdubas ke vi ne estas germano aŭ ne konas la lingvon, li sin sentos kulpa pro tio, ke li ne bone komprenis, kaj ĉar neniu deziras ŝajni malsprita, li mem klopodos elpremi sian cerbon kaj *diveni* tion, kion vi diris. Eble li petos klarigojn; tiam ne malsaĝe aŭskultu lin aŭ celu lin kompreni; vi ja ne scias la lingvon! vi nur prosperos akiri la malspritan mienon de tiu, kiu ne komprenas. Kiam post peto via oni alparolos vin, respondu interrompe: *ja, ja wolh, so, ja*, kvazaŭ vi dirus: «Nu! efektive! ĉu vi povas esti tiel malsaĝa, ke vi bezonas klarigojn!» Nepre la homo petos pardonon kaj servos vin. Eble vi ricevos la plej neatenditan aferon, sed ne estas grave, ĉar vi ricevos ion ajn. Kaj se vi estas iom filozofiema, vi eĉ ĝojos, ĉar certe en via lando kaj per via lingvo, kiun vi bone konas, vi petis ofte liberecon aŭ komforton, aŭ trankvilon aŭ pacon, kaj nenion vi ricevis kvankam, aŭ precipe ĉar, oni komprenis vin!

Se oni divenas, ke vi ne scias la lingvon, vi estas homo malfeliĉa, ĉar tiam oni klopodos por ke vi komprenu, kaj kompreneble ju pli oni parolos, des malpli vi komprenos la klarigantojn.

Inter la vortoj *ja* kaj *ne*, kies sencon oni konas kiam oni estas esperantisto, oni neniam hezitu: uzu ĉiam *ja*. Kiam oni eniras en magazenon, oni ne demandas vin ĉu vi deziras esti mortigata, sekve vi ne bezonas nei. Diru *ja*; vi ja povos post vido aplombe nei.

Ne lernu la nombrajn adjektivojn. Kial! Por pagi vi ja ne bezonas ilin, se vi zorgas ĉiam pagi per granda monero kaj stoike atendi la redonotan monon. Se oni malkovris vian fremdecon, oni rabos vin, sed en ĉiu okazo, nenion dirante, vi nur rigardu unue la monon kaj poste fikse en la okulojn de l' enpezinto, vi vidos kiel tuj li mem rekalkulos kun mieno de senpeke erarinta homo. Se li ŝtelis li redonos; se li ne redonas, vi povas esti certa, ke la kalkulo estas korekta. Sekve, kiu bezonas kalkuli estas la alia, ne vi. Kial lerni *zwei, drei*, k. t. p.? Vi ja ne petos *du* bierojn en kafejo... kaj se vi petus eĉ per plej korekta lingvo, vi nur mirigus la kelneron. Oni ne forgesu, ke en la vivo, ĉio jam estas antaŭvidita, preparita, kaj submetita al kutimo. Ni ne estu tro detalemaj. Ĝi estas grava difekto de multaj esperantistoj, kiuj senvole ofendas la aŭskultantojn per tro infana klarigado. Vi ne bezonas peti unu bileton, unu ĉambron, unu vetutilon, ĉar ja oni ne donos al vi du, aŭ tri.

Kaj fine, en grava okazo, se la afero komplikiĝas, kaj oni profitas kontraŭ vi la superecon de kono de lingvo, tiam, nur tiam, mal-

fermu la kranon de via elokventeco kaj per via propra lingvo, kvazaŭ por memori ke vi ankaŭ havas lingvon, superŝutu la malamikon. Tiam li sin sentos malsupera ĉar rimarkos, ke li ankaŭ ne komprenas, eĉ komprenas multe malpli. Mi memoras, ke en Leipzig, al du homoj, kiuj transportis tri valizojn de la hotelo, kiu kuŝas ĝuste kontraŭ la stacidomo, al la vagonaro, mi donis du markojn. Kvankam tio ne estas kapitalo, mi supozis, ke la mono estis sufiĉa kaj malavara, 2 markoj por 10 minutoj da laboro korespondas al salajro de 288 markoj por tago! Tamen, la homoj postulis ke mi pagu 20 pfenigojn por la du biletoj, kiujn ili bezonis por eniri ĝis la vagono. Ili gestis, laŭte parolis, kvazaŭ mi estus ŝtelinta ilin. Plej simpla afero estus doni al la homoj la 20 pfenigojn kaj al la diablo kun ili. Sed la postulo min indignigis. Jen homoj kun kiuj oni estas malavara, kaj tamen ili volas profiti sian lingvan superecon! Mi komprenis tuj, ke per germana lingvo mi nur malpravigus min antaŭ la rigardantaj kun scivolo personoj. Nu, mi malsupreniris la vagonon, mi aliris al la homoj kaj alparolis jene en Esperanto kun konvinka akcento: «Aŭdu sentaŭguloj: se vi daŭrigas vian dudekpfenigan postulon, mi tute simple klarigos al vi la dek ses regulojn de la helpa lingvo, la sufiksojn kaj prefiksojn, kaj la gramatikajn finiĝojn kaj la signifon de la participoj en estonta tempo»... Ne, ili ne komprenis, ili tute nenion komprenis, sed ili malfermis la buŝon, rigardis sin unu la alian kaj foriris. Neniu el la rigardantoj dubis pri mia praveco... Helpa lingvo, helpa lingvo! Malgaje, sed tro vere — la homoj plej bone komprenas sin unu la alian, kiam ili ne komprenas sin reciproke!

FRED. PUJULA

Daŭros.



SAMIDEANOJ:

Aĉetu kaj aĉetigu la belajn esperantajn markojn eldonitajn de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO. Vi helpas al la propagando!



La Kata-Luna Lingvo'DEVIZO : *Serenado*

En mia lit' mi dormis kiel
 En murotru' lacerto,
 Sed je la tria mi vekigis
 Pro bruo de koncerto.

Ekstere lunradioj brilis
 Sur domoj kaj sur stratoj;
 Allogis ili kaj flamigis
 La korojn de la katoj.

En tia hor' trankvila devus
 Maldormi nur vesperto,
 Sed tiuj geamantoj trovis
 Ĝin bona por koncerto.

Proksime de fenestro mia,
 Malsupre sur tegmento,
 Virkato kaj katino kantis
 Pro sia amosento.

Mi kiel lunatik' elsaltis,
 Kriante pro korbatoj:
 «Malbone edukitaj bestoj,
 Vi estu edukatoj!»

Pistolon mi ne havis; tamen
 Da botoj kaptis paron,
 Kaj ĵuris ke mi sen prokrasto
 Mortigos la kataron.

Do la fenestron mi malfermis;
 La nokta vent' min baptis;
 Mi vane ĵetis miajn botojn;
 Kaj la katar' min kaptis.

Kaj nun mi estas tre malsana;
 Mi kuŝas sur la sofo,

Kaj ne parolas pro raŭkeco;
Terura katastrofo!

Pro mia tuso, kataplasmo
Estas la taga puno:
Kaj dum la nokto mi nur sonĝas
Pri katoj aŭ pri luno;

Aŭ ke la katedral' min tenas
En sia katakombo
Balzamigitan kiel katon
En Egiptuja tombo.

Ne plu mi en la nokt' rigardos
La kato-akrobatojn,
Eĉ se dekdu da ili volus
Donaci dek dukatojn.

Mi povas ĝui Esperanton,
Sed dum la jaro nuna
Ne plu belsona al mi ŝajnas
La Lingvo Kata-luna.

CLARENCE BICKNELL



Ol post **antaŭ**

Ni diras *antaŭ ol -i*, sed ni ne diras *post ol -i*.

Anstataŭ tiu ĉi ŝajne nekorekta formo, ni preferas uzi la pasintan partikipon kun adverba finiĝo, *-inte*. Tamen, se *antaŭ ol -i* estas korekta esprimo, *post ol -i* povas esti uzata tute sen timo fali en eraron. Sed la stilistoj ne uzas tiun ĉi lastan formon. *Ol*, komparativo, bona kun *antaŭ*, ne ŝajnas rekomendinda kun *post*; opinio, kiun multaj havas ankaŭ rilate al la unua formo. Tial ili uzas *kiam*, anstataŭ *ol*, kiam la verbo ne estas en infinitivo: *Antaŭ kiam oni -s*. Sed *antaŭ* la infinitivo *kiam* ne estas uzebla. Ĉu ni ne povas uzi la estontan partikipon kun adverba finiĝo, tute same kiel ni agas kun la ideo de *post*? Ĉu eĉ ne estus preferinde anstataŭ *antaŭ ol -i*, uzi la formon *-onte*? Ex. : *Legonte la leteron mi timis; leginte ĝin mi trankviliĝis*. Ĉu tiu ĉi frazo ne estis pli korekta, esperantista kaj unueca ol: *Antaŭ ol legi la leteron mi timis; Post kiam mi legis ĝin mi trankviliĝis*?

(Ni publikos la interesajn opiniojn, kiujn ni ricevos rilate tiun demandon).

Ĉapelo de Vik'a Pastra Studento¹

DEVIZO : *Kataluna rimarkindaĵo*



Ĉa ĉapelo kaj la kanabaj piedvestoj de la vika studento estas kataluna kutimo tiel stranga kiel fama : eĉ tiuj, kiuj neniam vizitis Vik'on parolas pri tiaj rimarkindaj vestaĵoj.

Okazas, ke kiam tiuj studentoj lernas teologion, ili estas devigataj porti kamentuban ĉapelon kaj mantelon. Tio estas jam neordinara vesto, precipe dum la monato Junio, kiam la varmo ne petas ja la mantelon.

La malriĉuloj, kiuj estas pastraj studentoj, vestas, sekve, malriĉe kaj kvankam ili ne povas kunporti novan pantalonon, ili devas uzi tiujn vestaĵojn. Tiam ni povas vidi sur tiu kompatinda viro, kunigitajn kun liaj propraj malriĉaj vestaĵoj kaj kanabaj piedvestoj, la malnovan mantelon, ofte truan, kiu brilis dum alia tempo, kaj la kamentuban ĉapelon de nedifinita modo, ambaŭ donacitaj, aŭ aĉetitaj el ĉifonisto aŭ el la nunaj pastroj.

Jen la historio de unu el tiuj ĉapeloj:

Estis originala sinjoro, kiu, kvankam tre malalta, ne volis aparteni al la vicoj de la malaltuloj. Lia fiereco de altulo daŭris eĉ post lia vivo, ĉar kiam li mortis, li ordonis ke oni enterigu lin kunportantan altan ĉapelon. Tiamaniere la ĉerko estus pli longa kaj la rigardantoj kredus, ke la enterigota estis alta viro. Oni faris tion laŭ lia volo : krom lia plej bona vesto oni kapvestis la mortinton per la kamentuba ĉapelo, kiun nia malaltulo aĉetis ĉe unu el la plej famaj ĉapelejoj el Barcelono.

Okazis ke unu el la tombejgardistoj, dum nigra nokto, ĉerpis la ĉapelon de la ĉerko, ĉar lia baptofilo estis edziĝonta kaj li deziris donaci al li ĉapelon. La parenco de la ŝtelisto, post sia edziĝo, donacis ĝin al unu el siaj bokuzoj, kiu estis duelanto. Poste, bofrato de la antaŭa kunportinto ĉeestis en maska balo kun nia ĉapelo, kaj alia parenco portis ĝin dum la enterigo de sia bopatrino. Tiel, tiu familio, kiu estis multenombra taŭgigis nian ĉapelon por edziĝoj, enterigoj, baptofestoj kaj aliaj gravaj ceremonioj. Fine, oni ĝin donacis al veturisto de grafa sinjoro, kiu, post tri monatoj, ĝin vendis al ĉifonisto, de kiu ĝin aĉetis pastra studento el Vik'o.

1. Premiita en la III^a Literatura Konkurso de la K. E. F.

Dum ĝia longa vivo, nia ĉapelo ĉeestis al ploroj kaj ridoj; ĝi ricevis batojn, grimacojn, admirojn, k. t. p.

Nun, ĝi promenas tra la Vik'aj stratoj kaj ekskursas al la ĉirkaŭaj fontoj, kie ĝi estas plenigita de akvo kaj estas ludilo de la infanoj akompanataj de la studento. Tial ĝi estas de sendifinita koloro, trua kaj premita kiel akordeono.

Ĝi nur atendas ke la seminario finu la kurson por serĉi ripozon sur pajlokonservejo, kie ĝi finos sian historion, kiel birdtimigilo.

Ni estas certaj, ke tiuj studentoj pli plezure rigardos la ĉapelon sur la pajlejoj, ol sur sia kapo.

JOSEP ALBAGÉS



Necesa klarigo

Kelkaj esperantistaj gazetoj miris ke ni faris klopodojn por ke la hispana ŝtato ekpetu aliajn por starigo de konvencio dekretanta la oficialan uzon de Esperanto en la diplomaciaj aferoj kaj ilia miro tre kontentigas nin, ĉar ĝi pravas ke ni ne kutimigis la samideanaron al strangaj troriskaj agoj. Sed ni ŝuldas klarigojn.

La komitato, kiu regas la Federacion, la Konsulta Komitato konsistanta el la Prezidantoj de Aliĝintaj Grupoj, kaj la Redakcio de KATALUNA ESPERANTISTO, unuvorte ĉiu persono, kiu regas, konsilas aŭ sugestias la agojn de nia Kataluna Federacio, estas sufiĉe saĝa kaj konas sufiĉe la staton kaj psikologion de nia movado por konduki la tutan organizaĵon al agoj, kiuj povas doni famon al unu persono, sed nepre malprosperigos kaj haltigos nian movadon dum kelka tempo. Sed la plej bona organizita Asocio ne povas malhelpi mankon de disciplino nek agojn de impulsemuloj. La Federacio ne estas do responda de aliaj agoj ol tiuj, kiujn ĝi subskribas per sia propra nomo, la nomo de sia Komitato aŭ la decidoj de siaj Kongresoj.—Ni ankoraŭ ŝuldis tiun ĉi klarigon al la estimo kaj respekto, kiun ni kavas por la ceteraj fonditaj aŭ fondotaj Iberiaj Federacioj, kun kiuj en la Olota Kongreso, ni decidis kunlabori en frata Konfederacio precipe por tiuj aferoj, pri kiuj ni do ne plu rajtas labori solaj.

Taŭgu tio, kiel ekzemplo al ni ĉiuj, kaj ni lernu per ĝi la respekton al nia Komitato, submetante al ĝia aprobo ĉiun iniciaton, ne servute, sed profite al nia movado, ĉar ĝi konas pli ol izoluloj ĝiajn bezonojn, kaj tial ke ofte izolula iniciatemo, kiam ĝi ne respondas al privata vidiĝemo, povas eĉ nevole kontraŭstari pli gravajn aŭ profitodonajn agojn. — K. E.

Kvieto¹DEVIZO : «*Calma*»(Traduko de la Odo XVI^a *Otium*
Divos el la II^a Libro de Horacio).

En Safaj versoj.

Dolĉan kvieton la marist' al Dioj
petas kaptita tra l' Egeo larĝa,
dum per nubegoj vualigás nigre
Luno kaj steloj.

Pacon deziras Traciland' fiera;
Pacon la Medoj, je l' pafarko lertaj;
pacon, ho Grosfo!, per purpur' aŭ oro
ne aĉeteblan.

Riĉaj trezoroj nek konsul-liktoroj
povas forigi la animĉagrenojn
nek la korpremojn, sub plafonoj oraj
ĉiam flugantaj.

Apud sobrega tabl' feliĉe ĝuas,
kiu briligas la salujon avan;
liajn facilajn ne forigas dormojn
hontaj avidoj.

Kial dum vivo rapidega, tiaj
penoj? kaj ŝanĝi kun alia suno
hejmon? Nu! Kiu el patruj' migrante,
el si formigras?

Emoj malvirtaj la ŝipegojn ferajn
trafas, kaj kuras post rajdantaj rotoj,
pli ol la cerv' aŭ la Eŭrvent', naskanta
la uraganojn.

1. Distingita per Speciala Honora Mencio en la III^a Literatura Konkurso de la K. E. F.

Gaja l' animo nun, ne pri l' estonto
 volu prizorgi; la ĉagrenojn miksu
 kun la gajrido... do nenio estas
 tute feliĉa...

Frua forrabis Mort' Afilon gloran;
 vivo longdaŭra tre Tironon ĝenis;
 eble, do, kion al ci neis Sorto
 al mi donacis.

Ĉirkaŭ ci miloj da Sikulaj bestoj
 paŝtas sin; lertaj ĉevalinoj blekas
 pretaj por ci, kaj per purpur' duobla
 Afra cin vestas.

Terojn mallongajn al mi donis Parco,
 nur la spiriton de la Dia Helena
 Muzo... kaj tedan la popolamason
 scii malŝati!...

JOSEF ROSSELLÓ



IV^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. PREMIO de la Nova Kazino «La Constancia»: Artaĵo. TEMO: *Influo de Esperanto en la socia-ekonomia problemo.*
- II. PREMIO de «Ateneo Social». TEMO: *Kiamaniere Esperanto povas kontribui al la socia movado.* | Artaĵo
- III. PREMIO de «Semo» (A. E. P.): TEMO: *Traduki el la Ĉapitro VI de la verko «La Nacionalitat Catalana» de S-ro E. Prat de la Riba la paragrafon, kiu komenciĝas: El fet de les nacionalitats sugestionà poderosament... ĝis la llengua és la mateixa nacionalitat.* | 25 pesetas (10 Lu.)

Por eviti malagrablajn prokrastojn kaj simpligi la jam tre komplikitan taskon de la Komitatoj de Floraj Ludoj ni petas al la premiitoj, kiuj ne povos ricevi la premiojn rekte de la manoj de la Reĝino, havu la afablecon elekti reprezentanton.

BIBLIOGRAFIO

Aŭtunaj floroj. Dek originalaj poemoj de D-ro Stanislao Schulhof, en Pardubice (Bohemujo). — 1912. Universala Esperantia Librejo, 10, rue de la Bourse, Genève (Svisujo). Prezo : 0'25 Sm. — Presita de J. Scholle en Chrudion (Bohemujo).

Mi tre dankas S-ron Schulhof, tial ke li donis al ni kelkajn poemojn de vera poeto, kaj li ne celis agaci la klasikajn vundojn trapikitajn en niaj homaj koroj de vorto «Amatino» kaj de pesimismaj inklinoj... sukeritaj. Tial mi bedaŭras, ke la rezervitaj rajtoj de la eldonisto malpermesas al mi reprodukti ekzemple, «Vi feliĉaj homoj ĉiutagaj!» 'on akran kaj vibrantan, sed certe niaj legantoj ĝuos per lia libro mem.

RIMARKOJ¹ Oni devas eviti ke la ritma akcento falu sur neĉefajn en la frazo unusilabajn prepoziciojn. En

Flame vi sopiris je la kor' de Laŭro,
sed la ĉarma al vi ĉiam malaperis...

komparu la duan version kun la sama, metinte *la ĉarma* post *al vi*.

La originala formo postulas duan legadon por trovi la ritmon, ĉar ĉe la unua, oni instinkte apogas la akcenton sur *vi*. La dua formo fluas nature kaj unuavide oni legas ĝin korekte. Eble oni diros, ke la senco eble estus malsama... Tie kuŝas la malfacileco. Mi nur parolas pri formo.

Oni devas eviti renkonton de samaj vokaloj. Komparu la unuan formon, de la sama ekzemplo, kiu donas al ni *la ĉarma al*, kun la dua formo, pli agrabla laŭ nia opinio.

Gvidfolio tra Lechtworth (Ĝarden-urbo). Eldonita de la Letchworth Grupo Esperantista sub la aŭspicioj de U. E. A.

Tre interesa gvidilo de tre interesa urbo, redaktita per bona Esperanto de nia kara samideano S-ro F. A. Goodlife, sekretario de la urba grupo. (Adreso: «Elm. Tree House»).

Gvidfolio tra Genevo. Eldonita de la nova Esperanto-Klubo de Genevo.

Utila gvidilo de la urbo de la II^a Internacia Kongreso, kiu bone helpas ekskursojn tra ĝi.

1. Tiuj iel pedantaj rimarkoj, kiel aliaj kiuj jam aperis post kelkaj recenzoj pri versaĵoj, tute ne celas malaprobon sed kontribuon al la perfektigado de la Esperanta versofarado, alportante al ĝi, por diskuto, nian eble eraran sed nacie personan senton.

Gvidlibro tra Graz. Graz, 1913. Presejo de Heinrich Stiasny. Prezo : 20 sd.

Ĝi estas eldonita de la «Stiria Esperantista Societo» (Wielandgasse, 42, Graz), sub aŭspicioj de la Provinca Ligo por fremdulaj aferoj en Stirio, kaj subvenciita de la Urbestro per 100 k. (42 Sm.).

Broŝuro de la *Ekspozicio Internacia pri maraĵeroj, mara higieno kaj Itala elmontro Kolonia. Sportaj-Gimnastikaj festoj. Sciencaj Kongresoj.* Genova, marto-novembro 1914.

Iom post iom nia afero venkas kaj enkondukigas en ĉiun agadan centron de la socia vivo. Ni kun plezuro represigas la jenajn vortojn de la Komitato: «La Kom. intencas utiligi la bonajn servojn, kiujn Esperanto jam pruvis okaze de l' Internacia Dresdena Ekspozicio pri Higieno okazinta en 1911. Ĝi tial sin turnas al la tutmondaj industriistoj, altirante ilian atenton al la granda efiko de tiel potenca interkomprenilo, unuvorte de ĉiuj reklamiloj, kiujn la partoprenantoj intencos disdonigi en la ekspozicia teritorio, por la diskonigo de siaj produktaĵoj.»

Geedzigopeto. Triakta komedio. El Roksano. Vic-Ĉef-Vagabondino. Varme rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio. Prezo : 0.250 Sm. 1913. Eldonejo de la «La Marto». Haida (Bohem.).

Ĝis nun ni havis nur la simple mortulajn verkojn, kies titoloj flugis kiel monoplando aŭ biplano ĉe la malplena spaco de kovriloj. Poste ni havis, kies titoloj sin apogis sur la fortika bazo de E. L. A. 'a rekomendo. Nun, ĉe la komenco de somero,¹ la rekomendo fariĝis varma. Ni bone scias, ke Roksano estas bonhumoristino. Ĉu vintro alportos al ni verkojn *froste* rekomenditajn? Eble. Ĉar imagu al ni ke ia malfeliĉulo anstataŭ verki : «Vi ne povas neigi, kion vi ĵus diris» (paĝo 9^a), verkas «nei»; ĉu ĝi ne glaciigos nian entuziasmon?

La verko mem apartenas al la bonhumora skolo, kiun ĉiuj bone konas, de nia kara amikino Roksano.

Vojaĝado en Finnlando. La paca angulo de Eŭropo. — Turista Societo de Finnlando. Eldonita de Esperanto Asocio de Finnlando. Helsingforso. 1913. Presejo de K. F. Puromies, A. S.

Bone verkita gvidlibro, kiu entenas liston de la Esperantistaj grupoj kaj karton de la lando.

Esperanta Universal-Biblioteko. Num. 1. BEN-TOVIT. Rakonto de Leonido Andrew. Tradukis D-ro A. Fiŝer. — Tiflis. Prezo : S-m 0,10.

Sespaĝa rakonto vere interesa kaj pensiga, - bonege tradukita de D-ro Fiŝer. Bona unua broŝuro de la Kolekto de «Riga Stelo».

TAMEN

1. Tio estis verkita dum la aludita sezono (N. de l' Red.)

RICEVITAJ VERKOJ, PRI KIUJ RECENZO APEROS EN VENONTAJ NUMEROJ

Tutmonda Jarlibro Esperantista, korektita ĝis la 15^a de Aŭgusto 1913. Esperantista Centra Oficejo. Paris, 51, rue de Clichy. Prezo : Fr. 3'50 (Sm. 1'40).

Historio de Esperanto. 1887-1912. Adam Zakrzewski. 1913. Varsovio. Librejo Gebethner kaj Wolff, str. Nowo-Sienna, 9. Prezo : 2. Fr.

Konfeso de Milka Pogačić, kun permeso de l' aŭtorino el la kroata lingvo tradukis Antonija Gozičić. 1913. (Propra eldono). Kostajnica (Kroatujo). Prezo : Sm. 0'500.

Patreco. Kvarakta socia dramo. M. Wolff. Esperantigita de M. kaj J. Wolff, sub afabla kontrolo de S-roj Ch. Rosen, D-ro H. Brandt, G. Stroele kaj F-ino Ch. Pulvers. 1913. Hachette et C.^a; 79, boulevard Saint Germain, Paris. Prezo : Fr. 1'25. Sm. 0,50.

Oka Universala Kongreso de Esperanto. Esperantista Dokumentaro, kajero dudek-unua. Esperantista Centra Oficejo. 1913. Paris, 51, rue de Clichy. Prezo : Fr. 3.

Historio kaj teorio de «Ido», kun antaŭparolo de R. Brandt. B. Kotzin. 1913. Librejo «Esperanto». Moskvo, Lubjanskij projezd, 3. Prezo : 50 kop. Sm. 0'53.

Solecaj animoj, unuakta gajaĵo el Homunkulus, tradukis Oskar Süssmann. Ege-ra Presejo. Eger, Hungarlando. Prezo : Sm. 0'10.

La vojo de la vivo; Ĉapitro XXII, La vorto, de L. N. Tolstoj, tradukis Paŭlo Medem. 1913. Kovna Esperantista Societo. Kovno (Ruslando).

La kamena angulo, familia dramo en du aktoj, de H. T. Craven, el la angla lingvo tradukis Gego. 1913. Paris. Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo : Fr. 0'75, Sm. 0'300.

Breslau, vortpentraĵo de Hugo Kretzchmer. Esperantigita de Germana Esperanto-Asocio (Loka grupo Breslau). 1913. Prezo ne montrita.

Deklaracio pri Homaranismo, de D-ro L. L. Zamenhof. Represo de «Homaro». 1^a Eldono. 1913. Eldonejo kaj presejo de «Homaro». Pasaje del Comercio, 8. Madrid (Hispanujo). Prezo ne montrita.

Esperanta helpilo por lernantoj de Esperanto. J. Rosals. 1913. Esperanta Librejo J. Rosals, Portaferria, 30, Barcelona. Prezo ne montrita.

El Parnaso de Popoloj, poemaro de Antono Grabowski. 1913. Eldono de «Pola Esperantisto», Presejo Ll. Boguslawski. Varsovio, Str. Krzyska, 11, Prezo : 1 Sm. kun trasendo, 1'15.

En la lando de la Blanka Monto. Leon Huot-Sordot, el la franca lingvo tradukis D-ro Noel. 1913. Paris. Presa Esperantista Societo. 33, rue Lacépède. Prezo : Sm. 0'400.

Esperanto. Notions Complémentaires. Th. Cart et Em. Robert. 1913. Paris. Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo : Fr. 0'40.

Internacia lingvo Esperanto. S. P. Rantov, N.º 1 de la Esperanta Biblioteko Propaganda. 1913. Eld. G. Fedrelov. Saratov (Ruslando). Prezo : 5 sd.

Plena recenzo de l'Esperanta gazetaro, Septembro 1889, Septembro 1913. Instituto de l' Esperanta Gazetaro, Joan Amades, Peu de la Creu, 10, Barcelono.

Esperanto háté. Hungarlingva flugfolio propaganda.



Tiu ĉi numero aperas kun malfruco vere bedaŭrinda.

Malgraŭ nia deziro akurate aperigi la Gazeton ĉiumonate la unuan tagon, la ĉeno rompiĝis kaj ne pro kaŭzoj imputeblaj al ni. La numero de Novembro jam estis preparita kaj tute preta por aperi siatempe. Nia respondecio pro la malfruco estas nula. Ni pro-lavas niajn manojn.

Klopodante tamen por ĉesigi tian malordon, ni esperas, ke ankaŭ ĉiuj helpos nin per tiaj bonvolaj klopodoj, el kiuj la ĉefaj estas:

Pagar la cotisació amb puntualitat.

Instigar als Delegats a que compleixen amb llur deber no deixant de percibir les cotisacions degudes, i amb les quals se compta a l'establir els presupostos de despeses.



ALILANDA MOVADO

En Leipzig okazos en 1914 *Internacia ekspozicio por la libroindustrio kaj grafikaj artoj*.—En tiu granda entreprenajo reprezentigos jenaj ŝtatoj : Argentino, Aŭstrio, Belgujo, Britujo, Hispanujo, Italujo, Portugalujo, Rusujo, Sao Paulo (Brazilio), Svisujo, verŝajne ankaŭ Danujo, Hindujo, Ĥinujo, Hungarujo, Japanujo, Norvegujo, Svedujo kaj Usono. La plejmulto el la ŝtatoj konstruos proprajn domojn. La ekspozicio do estos efektive manifestacio de la tutmonda spirita kulturo, kaj certe multaj negermanaj samideanoj vizitos ĝin.

Ili faros tion plej bone aliĝante al la IX^a *Germana Esperanto-Kongreso*, kiu okazos inter la muroj de la ekspozicio la 30^{ma} de majo ĝis la 3^a de junio 1914 (dum la pentekostaj tagoj). La kotizo estas 2,500 sm. kaj entenas la pagon por tritaga eniro en la ekspozicion. Dum la kongresaj tagoj eksterlandaj samideanoj ĉiam trovos en la ekspozicio esperantistojn, kiuj volonte ilin gvidos. Precipe interesa estos LA DOMO DE ESPERANTO kiun ni konstruos en la «strato de la nacioj» kaj kiu efike montros la evoluon kaj nunan staton de nia movado. — La adreso de l' kongresa kasejo estas : Esperanto-Kongreso Leipzig, Johannisplatz, 3.

Esperantistoj! Helpu per aliĝo al la kongreso la progreson de nia movado!

Por la loka komitato : *Paul Bennsmann*. — Germanujo. Leipzig. Zeitzerstr, 6 b.

ALBUMO DE LA VIII^a KONGRESO

La Organiza Komitato de la VIII^a Kongreso petas ĉiujn, kiuj ankoraŭ intencas aĉeti la albumon, ke ili tion faru nepre *antaŭ la fino de decembro*, ĉar post tiu termino (pro fermo de la kalkuloj) la Komitato transdonos la reston de nedisvenditaj ekzempleroj al ia privata persono, kiu konsiderante tiun ĉi eldonajon kiel unikajoj en esperantujo kaj bona propagandilo, certe plialtigos ĝian prezon.—La aludita albumo estas ankaŭ por nekongresanoj kaj esperantaj grupoj bona propagandilo, ĉar ĝi evidente montras, kiom da diversaj nacioj partoprenis la jubilean kongreson kaj kune amuzis. — La prezon Sm. 4, oni bonvolu sendi antaŭe per poŝtmandato aŭ transpagilo de ĉekbanko al : Kongreso Esperantista, Kraków, Aŭstrio-Polujo, ĉar tiamaniere oni evitas la poŝtelspezojn kaj cetere ne al ĉiuj landoj oni povas sendi pagoŝarĝe.—Rapidu dol

Dum la nuna finiĝanta jaro, grandnombraj estis la esperantistaj kongresoj kiuj okazis, kelkaj kun vera sukceso. Ne nur la IX^a Universala Kongreso en Bern pri kiu ni raportis en nia antaŭa numero, sed multaj aliaj naciaj kongresoj vekis niajn atenton kaj miron; kvankam jam de longe la kongresanoj reiris en siajn hejmojn, ni publikigas nun malgrandajn raportojn pri kelkaj el ili, por ke ni katalunoj penu ke niaj kongresoj estu ĉiam pli sukcesaj kaj ne restu la lastaj en tiu grandioza montraro de la esperantista vivo.

II^a TUTRUSLANDA KONGRESO ESPERANTISTA EN KIEVO

Tri longajn jarojn la rusoj ne okazigis kongreson, tial ĝi estis plej esperata kaj kiam la samideanoj el Kievo vokis siajn samlandanojn al la II^a Kongreso ili ricevis amason da kuragigaj vortoj el la tuta lando. Bedaŭrinde tempo mankis por la preparo kaj multaj rusaj samideanoj ne povis aliri al la kongresurbo sed malgraŭ ĉio la kongreso estis plensukcesa.

La Kongreso malfermis la laborojn la 4^{an} de Aŭgusto en la ĉasista klubo. Sur la estrado sidis la Komitato de «Verda Stelo» kaj la Organiza Komitato. S-ro Hein, prezidanto de V. S. salutas la aliurbajn esperantistojn kaj deziras ke la laboro farota estu fervora kaj ke la kongresistoj lasu for malgrandajn diskutojn kiuj ne kondukas la esperantismon al la venko. Li proponas liston de kandidatoj por kongresestraro kaj kiel prezidanton kapitano Illaŝevič.

La aŭdantaro akceptis liajn vortojn per aplaŭdego kaj unuanime elektas la komitaton proponitan de li.

Reprezentantoj de la esperantistoj el 16 diversaj urboj salutas la Kongreson. Poste la Sekretario legas saluttelegramojn ricevitaĵojn kaj S-ro Jaĵgunoviĉ legas interesan raporton pri Esperantismo. Posttagmeze la kongresistoj faris longan viziton tra Kievo.

Ne malpli interesaj estis la du lastaj kunsidoj dum kiuj paroladis multaj eminentaj ruslandaj samideanoj kaj oni alprenis gravajn decidojn por la progreso de nia movado en Ruslando.

Rimarkinda estas la *versaj-konkurso* malfermita inter la kongresistoj. La temo de la versoj devis estis la *amo* : la juĝantaro konsistis el S-ino Slusarenko kaj S-roj Traĉevskij kaj Koŝ. La premioj estis disdonataj sur ŝipo kondukanta la kongresanojn al Mejigorje. Ilin gajnis S-roj Levenzon, Deŝkin, Poljak kaj Zamjatin.

Oni kantis kaj babilis dum la tute senceremonia festo, pri kiu same kiel pri la tuta Kongreso, la ĉeestintoj ĉiam havos rememoron.

ESPERANTA KONGRESA SEMAJNO EN GENT (BELGUJO)

Dum la pasinta Aŭgusto (14^a ĝis 20^a) okazis en Gent tiu kunveno kiu estis kronata per granda sukceso. Ni diru nur ke la esperantistoj kunvenintaj en tiu bela belga urbo atingis la nombron de 500. Ili estis venintaj el plej diversaj eŭropaj kaj eĉ aziaj landoj kaj ili dum tiuj sep tagoj disjetis tra Gent, tra la tuta Belgujo la esperantan semon.

La tuta urbo, tiutempe vizitata de miloj da fremduloj okaze de la grava Universala Ekspozicio kiun ĝi okazigis, nur parolis pri Esperanto. Grandaj flagoj antaŭ la stacidomoj kaj en la ekspozicio sciigis al ĉiuj nian belan feston.

La kunsidoj multe ĉeestataj estis prezidataj de S-roj Witteryck, Martens kaj Sebruyens kaj okazis en unu ĉambro de la bela festpalaĉo de la Ekspozicio, kies enirrajto estis senpaga por la esperantistoj.

La nura temo de la Kongreso estis : «Kiuj estas la plej bonaj rimedoj por

propagandi Esperanton?» Ĝi estis pritraktita de multaj samideanoj el la plej diversaj landoj. Vi imagu kiom ĉiu aŭskultanto povis lerni!

Se fruktodonaj estis la kunsidoj, ne malpli gajaj estis la festoj. La 15^{an} kaj 16^{an} okazis du teatraj prezentadoj en kiuj krom kantoj, monologoj, k. t. p. estis prezentataj du komedioj de Roksano «La fianĉinigo de Sovaĝulineto» kaj «Geedzigopeto», la unuan el kiuj jam konas la barcelonaj samideanoj. Ili ambaŭ atingis grandan sukceson.

La urbestro oficiale akceptis la kongresistojn, kiuj grandare alvenis al la antikva urbdomo post propaganda promonado tra Gent dum kiu ili svingis esperantajn flagojn kaj disdonis ŝlosilojn. S-ro De Weirdt skabeno, havis afablajn parolojn por la gastoj, en kies nomo parolis S-ro Martens dankante lin kaj la urbon; poste la esperantistoj vizitis la urbdomon plenan de artaj trezoroj.

Multaj aliaj festoj okazis ankoraŭ el kiuj la plej rimarkinda estas la balo kiu havis lokon en la granda salono de la Borso, bele ornamita kaj lumigita.

Finonte ni sciigu ke la Kongresa Semajno estis sub la honora protektanteco de la Reĝa Moŝto Alberto kaj ke la Provincestro, Barono de Rerllhove kaj la urbestro, S-ro Braun, estis Honoraj Membroj de la Organiza Komitato.

VIII^a GERMANA KONGRESO EN STUTTGART

Kvankam estis nur kvar la tagoj difinitaj por la Kongreso (19^a-22^a Aŭgusto) la laboro farota estis tiel granda ke jam la 18^{an} okazis kelkaj kunsidoj de la Kongreso. Matene, komenciĝis la ekzamenoj de «G. E. A.» kiuj altiris ok partoprenantojn. Vespere, la kongresanoj kunvenis en la Mozart-Salono kie S-ro Christaller prezentis al la kunsidantaro la eminentajn samideanojn ĉeestantajjn la Kongreson. Poste F-inoj Brackenhämmer kaj Wolfson kantis akompanataj per fortepiano de S-ro Schulz belajn kantojn en Esperanto.

Mardon 19^{an} okazis la oficiala malfermo de la Kongreso. La prezidanto de «G. E. A.», S-ro Reinking faris la malferman paroladon. Li estis brue aplaudata de la kongresanaro. Poste salutis la Kongreson, S-ro Dollinger, urbkonsilanto je la nomo de la urbestro, kiun sekvis, multaj aliaj oratoroj reprezentantoj de ne- kaj esperantistaj asocioj. Profesoro Christaller en la nomo de la Kongresa Komitato kaj de la Ŝvaba Ligo dankas ĉiujn parolintojn.

Kaj sekvas nur la parolado de D-ro Albert Steche, ano de la saksa parlamento. Malfacile resumi tiun belan esperantan paroladon; la ĉeestantoj brue aplaudis kaj aklamis la parolinton kaj tiu parolado aperis post la Kongreso en broŝuro germanlingva.

Oni finas la kunsidon sendante salutajn telegramojn al D-ro Zamenhof, germana imperiestro kaj reĝo de Wurttemberg.

La sekvantaj tagoj okazis tri laboraj kunsidoj de «G. E. A.» dum kiuj estis alprenataj interesaj decidoj por ĝia funkciado. Oni elektis Leipzig kiel Kongresurbon por la IX^a Germana Kongreso.

Ankaŭ dum la kongresaj tagoj kunvenis la «Germana Akademio Esperantista Ligo», «Germana Esperanto-Unuiĝo de poŝtaj kaj telegrafaj oficistoj»,

«Germana Studenta Esperanto-Ligo» kaj okazis du propagandaj paroladoj faritaj de S-roj Behrendt kaj D-ro Arnhold.

La kongresaj festoj estis tute sukcesaj. Mardon vespere okazis gaja festo dum kiu oni ludis muzikon kaj prezentis komedieton «Solecaj animoj» kiun la samideanoj tre bone akceptis. Denove oni kantis kaj deklamis ricevante ĉiu partopreninto bruan aplaŭdadon.

Ĵaŭdon vespere okazis la festtagmanĝo kaj vendredo estis difinita por fari diversajn ekskursojn.

Ĉiu ĉeestanto adiaŭante Stuttgart kriis al siaj samlandaj samideanoj: «Ĝis revido en Leipzig!», tial oni bone povas fidi je la sukceso de la venonta Kongreso.

Kaj nun post tiom da venkoj, post tiom da sukcesoj, permesu ke ni sciigu unu malsukceson (!).

Jen do, la afero:

En Stuhliweissenburg (Hungarlando) estas policestro kiu donis al nia lingvo la adjektivon... ĉu malbela, ĉu malfacila, ĉu sentaŭga, k. t. p....? Tute ne; li diris ke Esperanto estas ŝtelista lingvo. Kaj tiakaŭze li malpermesis aranĝon de kunveno en kiu socialdemokratoj volis disvastigi Esperanton. Ĉu la afero ne estus tute taŭga por operedo?

Kompreneble la gazetoj enurbaj kaj multaj aliaj de Aŭstrio-Hungarujo mokis pri la decido de tiu eminenta policestro kaj tiam li volis eltiri la piedon el la sitelo en kiun li ĝin metis, dirante ke li malpermesis pro tio ke li ne povas toleri, ke laboristoj lernas lingvon kiun la mastroj ne komprenos; do, ke Esperanto kvazaŭ estas fripona lingvo.

Kaj la *Arbeiter-Zeitung* en Wien demandas: «Se la laboristoj intencus aranĝi kursojn de la franca aŭ angla lingvo, ĉu la polico ne devas antaŭe demandi la mastrojn, ĉu scipovas tiun lingvojn, kaj se ili neas tion, malpermesi la kursojn, ĉar la disvastigo de la franca kaj angla lingvoj, kvazaŭ friponaj lingvoj, ne estas permesebla?»

Kiel fino kaj por lia gloro ni disvastigu nur la nomon de tiu fama policestro, kiu tiel efike propagandis por nia lingvo. Jen ĝi: *S-ro Sághy*, estro de la polico en Stuhlweissenburg.

E. P.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

La 30^{an} de Novembro okazis grava festo per kiu la Grupo «Fajro» komencis siajn taskojn.

La granda kaj belega salono de la «Komerca Ĉambro el Barcelono» estis tute okupata de granda nombro da gesamideanoj enurbaj kaj eksterurbaj. Inter ili ni vidis la simpatian F-inon Dolors Deig kun sia bela fratino Mario, S-rojn Sabadell, Bartomeu, Llorach, Urbez, F-ino Saltiveri, S-ro Pallejá (Reus), Abadal (Lleida) Amades, Blanch, Mayol, Horta, Campdelacreu, Más, Bori, Bellver kaj multaj aliaj estimataj samideanoj.

Komenciĝis la festo per legado de la Sekretaria raporto, en kiu oni klarigas la celon de la nova grupo, kaj oni diras la laborojn faritajn kaj farotajn de «Fajro» ĉiam pro Esperanto, en Barcelono kaj en vilaĝoj.

Poste S-ro Rocamora, prezidanto de «Fajro» faris tre longan (dum horo kaj duono li parolis) paroladon. En ĝi li pritraktis la ĉefajn aferojn rilatantajn la starigon de lingvo internacia. Fine li venis al la konkludo, ke «Fajro» proponos ke la Hispana registaro alvoku la aliajn naciojn kunveni kaj pritrakti la akcepton de Esperanto kiel lingvo oficiale internacia en la *diplomatiaj* aferoj.

S-ron Rocamora, oni ofte aplaŭdis dum lia longa kaj bela parolado.

S-ro Francisco d'A. Mas, delegito de la Komerca Ĉambro, diris kelkajn belajn vortojn, kuraĝigante la esperantistojn labori, ĝis atingi la esperatan de ĉiuj triumfon de lingvo internacia.

La ĉeestantaro eliris el la «Ĉambro» kun espero en la triumfo de niaj idealoj.

Tre gravaj estis la aliĝoj, inter ili tiuj de la Urbestro, Provincestro, Episkopo, Markizo de Alella, J. M. de Sucre, Prezidanto de A. E. P., kaj multaj aliaj. — *M. B.*

— La Grupo *Libera Stelo*, translokiĝis, al Str. Montanya, 62, 2.^a (Societo kunhelpa «Flor de Mayo») kie de la Novembra monato, klarigas la unuan kurson S-ro Miquel Perich kaj la superan kurson S-ro Arturo Melis.

TERRASSA

En la sidejo de la Spiritista Societo «Fraternidad Humana» okazis la 7^{an} Decembro, grava poresperanta festo organizita de tiu Societo kaj de la grupo «Lumon».

Granda personamaso plenis la tutan vastan salonon, kiam la ĥoro «Schola Orpheonica» komencis la feston kantante la esperantan himnon. Tuj la prezidanto S-ro Domingo Armengol parolis pri la entuziasmo vekita de Esperanto inter la membroj el la societo, kiun li prezidas, kaj finis cedante la prezidan lokon al S-ro Valentí Alavedra, prezidanto de «Lumon» kiu dankis per varmaj vortoj tiun ĝentilecon, kaj diris ke li sentas sin kontenta pro la sincereco kaj sindonemo de «Fraternidad Humana» rilate al nia afero, fakto nekutima en aliaj Societoj. Fine li kuraĝigis la aŭdantaron al lernado de nia lingvo.

La knabineto Dima Roma, deklamis belan priesperantan poezion en kataluna lingvo.

Fraŭlino Marfa Anter, legis alian poezion dediĉitan al D-ro Zamenhof.

Poste paroladis S-ro Salberi kaj Roma, bele paragrafante pri la granda utileco de Esperanto en la spiritista kampo.

S-ro Jascint Figueras el «Lumon» esprimis ke la ideo de lingvo internacia, ne estas nova, ĉar antikve la hebreoj kaj latinoj jam sentis ĝian bezonon kaj ili kreis lingvojn kiuj malsukcesis tre baldaŭ. Li ankaŭ parolis pri la multaj aliaj elpensitaj ĝis la apero de Volapük, kiu havis unuamomente grandnombrajn adeptojn sed pri kiu poste ne estis mem konvinkita ĝia aŭtoro kaj fine ĝi malaperis. Li pruvas ke depost la eliro de Esperanto al la Mondo, la solvo de helpa lingvo fariĝis vera fakto, ĉar ĝi estas facila kaj belsona.

S-ro Josep Grau el Barcelono salutinte la aŭskultantaron, dankis ĝin por ĝia konstanta atento, kiu montras kiom ĝi interesigas al la demando pri internacia lingvo. En Esperanto, li diris, kunekzistis ĝis nun unu ideo kaj unu sento : tiu ĉi subtenis la alian, ĝin nobligante kaj stimulante la batalantojn al fervora lukto por disfaligi ĉiuspecajn limojn; prezentis kelkajn faktojn, kiuj atestas pri la nobliga efiko de esperanta sento kaj disertaciis pri la valoro de nia literaturo, kiun li opinias la plej firma bazo de nia lingvo. Ĉe la resumo li rebatis kelkajn antaŭjuĝojn ofte prezentatajn kaj kuraĝigis la aŭskultantojn per entuziasmaj vortoj al la lernado de Esperanto.

Ĉiuj partoprenintoj estis entuziasme aplaŭdataj post la fino de siaj respektivaj paroladoj.

Finis tiun memorindan feston la «Schola Orpheonica» kiu kantis katalunajn kantojn inter kiuj ne mankis «La akcepto» kaj «La Espero».

— La Grupo «Lumon» organizis specon de literatura konkurso inter siaj anoj por stimuli ilin al verkado. Al tiu unua, periode sekvas aliaj. — J. V.



Oficiala Parto

La 14^{an} de Decembro, kun ĉeesto de S-roj Coll, Rey, Horta, Piferrer, Campdelacreu kaj Bordas, okazis kunsido de la Komitato de K. E. F., ĉe D-ro Coll. Oni prenis tiujn decidojn:

Delegi tri komitatanojn, kiuj studos la manieron starigi lokon kie la membroj de K. E. F. povos legi la revuojn ricevitajn, interŝanĝe de K. E.

Peti de la nova Grupo *Ĉiam Antaŭen* el Palamós, ke ĝi bonvolu ŝanĝi aŭ iel diferencigi sian nomon, ĉar ekzistas alia federaciana fama grupo nomata *Ĉiam Antaŭen* ankaŭ, en Barcelono.

Inter la Organiza komitato de la X^a Kongreso de Esperanto en Parizo kaj la K. E. F., oni akceptas interkonsenton laŭ kiu ni zorgos pri la enspezo de la mono de l'Kongresokartoj. Nomi S-ron Rosals por enspezi tiajn kotizojn.

Starigi adresojn novajn por la bona funkciado de nia Federacio. La sama komisio kiu studos la manieron starigi lokon por la gazetoj, zorgos ankaŭ pri novaj lokoj al kiuj difini la adresojn novajn.

Fari regularon por niaj Federaciaj Kongresoj kaj alian regularon por difini la taskojn de tiu-ĉi komitato kaj tiuj de la redakcio de K. E.

Meti en la tagordon de la venonta Kongreso, kunsidon de la delegitoj de K. E. F.

Sendi cirkuleron al la Grupoj, farante al ili kelkajn petojn rilatantaj al notoj pri enlanda movado.

La Sekretario,

M. BORDAS

OFICIALAJ NOTOJ

Oni ricevis leteron de la *Atracció de Forasters* responde al nia donanta al ĝi adresojn de barcelonaj samideanoj por la eksterlandaj, kiuj ofte vizitas nian urbon.

En tiu ĉi letero oni dankas nin kaj nin sciigas ke al ĉiuj eksterlandaj samideanoj kiuj sin prezentas parolante nian lingvon, en la oficejo de tiu Societo, oni respondas per nia kara Esperanto.



KORESPONDADO

Al Sinjoroj el la grupo «Esperanta Fakoj» de la C. A. de D. C. — La gazeto «Acció», kie vi publikigas «Fakon», publikigis vian premiitan en la Floraj Ludoj tradukon de la verko de Iglesias. Por tio ni donis al vi la permeson, kun plezuro, sed kondiĉe ke vi publikigu ankaŭ la devenon kaj la permeson mem. Kaj tion ĉi vi ne faris. Tio estas ago kontraŭ ĝentileco kaj kontraŭ propraĵo. Ni rajtus agi leĝe kontraŭ vi. Tamen ni ne faros, kvankam la manko de respekto al literaturaj rajtoj farigas jam tro kutima ĉe ni, kaj baldaŭ estos necese montri klare ke rajtoj sur intelektaj estas tiel aŭ pli respektindaj ol rajtoj sur poŝhorloĝo aŭ komerca firmao. Vi ne nur ne publikigis la devenon kaj permeson, sed permesis al vi fari ŝanĝojn al la teksto *tiel, kiel ĝi estis premiita de la Juĝintaro* kaj aldonis noteton rimarkigante la aferon, por doni lecionon al la Juĝintaro kaj kritiki ĝin. Tio ja preterpasas la limojn de ĝentileco, fierco kaj logikeco. Vi bone scias, sinjoroj, ke en literaturaj konkursoj, oni premias ne la ĉefverkojn, sed la verkojn kiuj estas pli bonaj ol la aliaj. Sekve, premiita verko povas esti ne tute bona, kaj tial la Juĝintaro permesas la publikigon nur post korektado de la nekorektaj vortoj aŭ esprimoj. La tradukon vi verkis en kurso; la Juĝintaro submetis la korektojn al la aprobo de via profesoro S-ro Gili, kiu ilin akceptis. Tial, kaj tial nur, la verko publikigis en «KATALUNA ESPERANTISTO» kaj ni donis al vi permeson reprodukti ĝin. Ĉar vi estis lernantoj de kurso, la opinio de via profesoro sufiĉis al ni; sed eĉ se vi estus profesoroj mem, de la momento kiam vi submetas verkon al Juĝintaro, vi akceptas pro tio la konon kaj juĝon de ĝi: kaj ĝi premiis kaj permesis vian tradukon nur kun la kondiĉaj korektoj. Eble ĝi eraris; sed ne vi, konkurstantoj, rajtas tiel opini: 1^o ĉar unu el vi estis la sama, kiu proponis la kreon de verkorekta komisiono en la Kongreso de Tarragono; 2^o ĉar vi antaŭe ne redonis la premion, por ke la Juĝintaro povu aljuĝi ĝin al alia verko, kiu eble post korektado estus pli premiinda ol la via sen korektoj—almenaŭ laŭ la Juĝintara opinio, kiu, sola kaj nur, valoras. — K. E.

— *Esperanta Universala Biblioteko.* Ne, ni nur ricevis numerojn 1 kaj 4.

Kolekto de lernolibroj

Katalunaj kaj Kastilaj

	<u>Ptas.</u>
<i>Fundamento de Esperanto</i> , L. L. Zamenhof (Eldono hispana)	1'25
* <i>Gramatica rahunada de la llengua Esperanto</i> , Sro. Pujulà i Vallès.	2
* <i>Vocabulari Esperanto-Català</i> , Sro. Pujulà i Vallès.	3
* <i>Vocabulari Català-Esperanto</i> , » » »	3
<i>Poŝvortareto Esperanto-Català i Català-Esperanto</i> , Sroj. Dro. Bremon, Martí i Aldrich	0'75
<i>Kataluna Ŝlosilo</i>	0'05
<i>Quiere V. aprender Esperanto?</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau	0'50
<i>Gramática y Vocabulario Esperanto</i> , Sro. Dro. J. Bremon Masgrau.	3
<i>Vocabulario Esperanto-Español</i> , Sro. F. Pujulà i Vallès	3
<i>Vocabulario Español-Esperanto</i> , » » » »	3
<i>Primeras lecciones de Esperanto de Th. Carl</i> , A. L. Villanueva	0'60
<i>Manual y Ejercicios de la lengua Esperanto</i> , Inglada-Villanueva.	1'50
<i>Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto</i> , Inglada-Villanueva	5
<i>Curso Práctico de Esperanto</i> , Duyos-Inglada	3
* <i>Gramática de Esperanto</i> , Sro. J. Garzon Ruiz	2
<i>Prontuario de Esperanto</i> , » » »	4
<i>Programa d'Esperanto</i> , J. B. Albiñana	0'25
<i>El Esperanto al alcance de todos</i> , Fernando Soler y Valls.	3
<i>Curs pràctic d'Esperanto</i> , Fred. Pujulà	0'50

Tiujn verkojn oni povas mendĉi ĉe nia administracio sendante kune la monon, plus 0'25 ptojn. por la rekomenditaj poŝtelspezoj.

* Bindita 0'50 ptes. plie.

Ni rekomendas la abonon al

== LA REVUO ==

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado
de

DRO. L. L. ZAMENHOF

Literaturaj verkoj. Teatraĵoj. Poezioj. Informoj. Internacia vivo

Unu numero : fr. 50

Abono : por Francujo 6 fr.

Por aliaj landoj : 3 Sm. 200

Abonebla ĉe la Administracio de K. E. F., str. Gracia, 12 — SABADELL

PARIS 1914!

Vi devas legi en la arte ilustrita

KONGRESA GAZETO

la cirkulerojn de la Organiza Komitato; la informojn de la Komisionoj;
la praktikajn konsilojn de M. Z. A.; la artikolojn de famaj Esperantistoj;
la nomaron de la Kongresanoj; la respondon al ĉiuj viaj demandoj.

SED.... por legi tion, riceve estas ricevi la Gazeton.

Ricevos ĝin nur la jam aliĝintaj Kongresanoj.

VI ALIĜU!

Se vi aliĝos ekzemple en Marto, la unua de vi ricevota numero estos la Aprila

La unua numero aperos en Januaro 1914